

Petro DIKSZTEJN

**INTER
SOVETAJ POPOLOJ**

[1939-1946]

**** dua parto**

Cercle espérantiste de l'Agenais
"LaÛte!" * F 47340 Laroque Timbaut

1981 * 10 FF

SAT-Brosurservo

Petro **DIKSZTEJN**

INTER


SOVETAJ POPOLOJ

2.

ĉap.5 - kune kun miliono da konstruantoj	5
ĉap.6 - sur la vojo reen	51
ĉap.7 - mi, soveta agrikulturisto	91
ĉap.8 - mi, laborsoldato	120
ĉap.9 - realiĝo de la revoj	152

Cercle espérantiste
de l'Agenais * Laùte!
F 47340 Laroque Timbaut
1981 *

Tiu ĉi broŝuro aperas en la kadro
de SAT-broŝurservo.



Peçoro

URAL

Arņangelsko

• Kotlaso

• Vologdo

• MOSKVO

• Varsovio



5_ kune kun miliono da konstruantoj

En la lasta semajno de aprilo estis konate, ke okazas selektado por sendado al granda tendaro. De la malgrandaj proksimaj tendaroj ĉirkaŭ Arĥangelsko ĉiutage venis pli kaj pli da homoj. Por la alvenintoj ne sufiĉis loko sur la duetaĝaj kuŝejoj, ili devis kuŝi sur la planko apud si, ke apenaŭ oni povis inter ili dumnokte trapasi.

La homoj por la forsendo devas ankaŭ esti ekzamenitaj kaj akceptitaj de kuracista komisiono. Tion postulas la mastroj de tendaroj, kien la homoj oni sendos. La homoj sendotaj al la grandaj koncentrejoj devas esti laborkapablaj almenaŭ por iom da tempo. Tiu kuracista komisiono konsistis el la tendara kuracistino en Arĥangelsko, kuracisto el la granda tendaro kaj unu altranga oficiro, kiu estos plej alta ĉefo dumvoje. Li ankaŭ estos respondeca antaŭ siaj ĉefoj pri la homa "laborforto", kiun li alveturigis. Li devas alveturigi bonan homan "laborforton", la malbonan li povas lasi en Arĥangelsko.

Inter la akceptitoj laborkapablaj por la forsendo estis ankaŭ mi.

Tri tagojn antaŭ la forveturigo de la elektitaj homoj, ili ne estis sendataj al laboro en Arĥangelsko. Iuj estis eĉ de sia laboro revokitaj al la barakoj. Nun ni estas en la posedo kaj al la dispono de nia nova mastro. Nia nova mastro ne havas la intereson disponigi siajn laboristojn por la tendaro en Arĥangelsko. Krom tio, nia preparo, laŭ la regularo, postulas multe da laboro kaj tempo. Ni devas antaŭ la forveturo nin bani, forigi pedikojn de niaj vestaĵoj per la "desinfekta kamero". Nia nova mastro scias tre bone, ke sufiĉe da pedikoj ni akiros en lia tendaro kaj alveturigi pedikojn de Arĥangelsko ne estas necese.

Dum tiuj tagoj mi ankaŭ sukcesis akiri koverton kaj folion da papero por sendi respondon al mia edzino, al ŝia unua kaj lasta letero post mia aresto. Ĉu ŝi tiun leteron ricevis, mi neniam eksciis.

La 28an de aprilo aro da NKVD-soldatoj ĉirkaŭis grandan barakon. Ili forigis ĉiujn homojn el ĝi. La homoj selektitaj por la forsendo estis vokataj al ĉambro ĉe la kuirejo. Tie grupo da soldatoj reviziis la forsendotojn laŭ la kutima maniero. Ĉiu reviziito estis tuj gvidita al la barako, speciale preparita por ni. Post kelkaj horoj la barako estis plenigita ĝis tia grado, ke oni povis sidi havante la krurojn kuntiritajn al la korpo.

Kelkaj soldatoj ĉe la pordo nenium el la barako lasis eliri. Ĉiuj fenestroj estis garditaj per po du soldatoj. Se iu volis iri al la necesejo la soldatoj deklaris, ke permeson por eliri povas doni nur la oficiro kaj la oficiro troviĝas en la kontoro, kie li estas okupata kun la preparo de niaj dokumentoj. Do kiel peti permeson de la oficiro, kiu troviĝas en la kontoro malproksime? Al tiu demando la soldatoj respondis tute trankvile: "Mi ne scias ankaŭ kiel aranĝi tian permeson, sed ellasi vin mi ne rajtas".

Kaj jen komenciĝis la organizita rabado far la krimuloj. Duope aŭ trioje la krimuloj reviziis ĉiujn homojn kaj forrabis ĉion, kio povas havi iun valoron en la rusaj cirkonstancoj. Tio okazis en la taga lumo antaŭ la okuloj de NKVD-soldatoj. La krimuloj faris la rabadlaboron akurate, atente kaj trankvile, same kiel la soldatoj dum revizioj. Ĉiu, kiu kuraĝis rezisti al la banditoj aŭ komencis voki "Civitano deĵoranto" (tio estas la titolo por gardantaj NKVD-soldatoj) tuj ricevis fortegajn batojn de la banditoj. Baldaŭ mi povis konstati, ke la banditoj antaŭe al tiu laboro sin preparis tre bone. Ĉiun ili demandis pri la nomo, ili havis informojn, kiu posedas "ion valoran", ĉu monon, ĉu iun ajn valoran vestaĵon, ekzemple bonan ĉemizon aŭ ion similan. Dum preskaŭ tri horoj, pli ol tri mil homoj, enŝovitaj en la barakon troviĝis sub la teroro de la rusaj banditoj, garditaj de NKVD-soldatoj.

En la vesperaj horoj la NKVD-istoj komencis voki laŭ

listoj la homojn el la barako. Kiam venis mia vico, jam estis ĉirkaŭ noktomezo. Dum la tuta tago ni nenian manĝaĵon ricevis. Mia nova mastro eble ne devis aŭ eble ne memoris prizorgi por ni manĝaĵon.

Jen mi troviĝis sur la tendara placo inter grupo da sesdek samsortanoj ĉirkaŭitaj de NKVD-soldatoj, kiel kutime en tiaj okazoj. Tiel mi dum nokto de la 28-29a de aprilo trapasis la lastan fojon la urbon Arĥangelsko ĝis fervoja stacio por la forveturigo al iu malproksima parto de Rusio, konstrui ankaŭ tie la socialismon.

En la ŝarĝvagonoj por ni preparitaj estis komplete malmulte. Ni devis eniri sur metitan tabulon kaj dum la eniro nin gardis spaliro de NKVD-soldatoj. Kiam ĉiuj homoj destinitaj por nia vagono estis "enŝarĝitaj", la soldatoj fermis la rulpordojn de ekstere per rigliloj.

"Mi ne konas similan al ĝi landon, kie la homo tiel libere spiras".

En la vagono estis aranĝitaj ambaŭflanke kuŝejoj, libera estis nur la mezo inter la rulpordoj. Ĉe unu pordo troviĝis en la planko truo, tio estis nia necesejo. En la vagono troviĝis ankaŭ fera forneto, sed ne havante lignon por hejti, ni dumnokte sentis la nordan malvarmon. Matene ni ricevis lignan barelon por akvo kaj ĉiu ricevis argilan vazon.

Supre en la vagono troviĝis ambaŭflanke malgrandaj fenestroj. Kompare al la "vagon-zak", tio estis avantaĝo, ni do povis elrigardi al la libero. Ĝis la forveturo ni atendis en Arĥangelsko unu tagnokton. La manĝaĵporcio konsistis el duonkilogramo da pano, unu haringo, dudek gramoj da sukero. Akvon por trinki ni ricevis relative sufiĉe. Por lavadi nin ni multe ne praktikis. Preskaŭ ĉiutage ni ricevis ankaŭ unu fojon kuiritan manĝon. Tian manĝon ni ricevis preskaŭ dum la tuta vojaĝo. Ĉiufoje kiam la trajno haltis, sur la tegmento aŭdiĝis kurado de soldato. Precipe dumnokte okazis tiu tegmenta kontrolo. Verŝajne la soldatoj havis en tiu kurado multe da sperto. Apenaŭ haltis la trajno, oni baldaŭ aŭdis en la proksimo : bum ! bum ! bum ! tuj li trakuris nian tegmenton kaj la bumado malproksimiĝis.

"Kio okazos, se tiuj simplaj homoj estos konsciaj, ke

ili estis stultigitaj ? La ĉielon ili sangigos." (Maksim Gorkij, el "La Patrino", kiam la kamaradoj preparas sin al la festo de la unua de majo).

Sur ĉiuj stacioj, kiujn nia trajno trapasas, flirtas ruĝaj flagoj. Multe da sloganoj "ornamas" la murojn de la stacidomoj kaj apudaj konstruaĵoj. Sloganoj, menciataj la grandajn sukcesojn kaj la pli grandajn socialistajn taskojn. Multaj el tiuj sloganoj mencias la socialistajn akiraĵojn. Do ankaŭ nia trajno, konsistanta el ĉ. sesdek ŝarĝvagonoj kun laborforto el ĉ. 60 laborunuoj en ĉiu vagono, estas certe enkalkulita en ĉio, kion mencias tiuj sloganoj por la solena tago de la unua de majo en tiu socialista lando kaj ni do devas ankaŭ ĝoji - ĉu povas esti por ni pli granda trompo kaj pli granda hipokriteco ?

La ruĝaj flagoj kaj la sloganoj memorigis al mi la diversajn pasintajn manifestaciojn dum la unua de majo en Polio. Ne mankis inter ili tiuj, kiuj postlasis vunditojn kaj mortigitajn dum kvereloj kun la policistoj. Fakte, nur la komunistoj organizis la unuan de majo malpermesitajn manifestaciojn en Polio. La socialdemokratoj povis manifestacii sen konflikto kun la registaro. Ĉu iu el la tiamaj komunistaj batalantoj kontraŭ la kapitalismo kaj strebantoj al la bolŝevika ordo, povus imagi, ke tiu bolŝevika ordo, al kiu li strebas, kreos por li pli grandan mizeron ol estas la ordo kapitalista ? Sendube troviĝis jam dum mia tiam vojaĝo multe da polaj komunistoj en la sama situacio kiel mi, eble en la sama trajno, kion ili tiam povis pensi ?

En tiuj tagoj de mia vojaĝo en tiu trajno mi interalie pensis : sendube ankaŭ en la jaro 1941, la komunistoj en multaj landoj aranĝis manifestaciojn kun sloganoj por la komunista venko en siaj landoj. Ĉu la simplaj laboristoj partoprenantaj en tiuj manifestacioj, povas imagi pli grandan blufadon, stultigadon kaj hipokritecon de siaj estroj ol estas la bolŝevika ?

Jen nia trajno dum nokto haltis en Kotlas. Post la peza bumado de kuranta soldato sur la tegmento, la trajno staris tie unu tagnokton. Denove mi vidis dum tiu tuta tagnokto la sloganojn, flagojn kaj la portretojn de la ĉefaj ruslandaj regantoj, inter ili la pli grandigitan portreton de Stalin kun liaj kvazaŭ mildaj

okuloj - la ĉefsimbolanto de la bolŝevika blufu, bolŝevika teroro kaj hipokriteco.

Kiam la trajno ekveturis de Kotlaso, ni komencis cerbumadi kien ni estas veturigataj. La ĉefa demando estis : ĉu ni veturas norden aŭ orienten ? Laŭ la logiko ni devus de Arĝangelsko esti veturigataj al la koncentrejo en la nordo, ĉar ankaŭ Arĝangelsko situas konsiderinde norde. Sed en Rusio la okazaĵoj ne ĉiam sekvas la logikon, ofte ili estas eĉ mallogikaj. Nia revo estis veturi al iu koncentrejo en la sudo. Verdire, laŭ la aŭditaj rakontoj ni sciis, ke la vivkondiĉoj estas similaj en ĉiuj koncentrejoj, sed la sudo allogas pro varmo, por ni malbone vestitaj ĝi multe valorus. Ni povus konstati la direkton de nia veturado, se ni konus la malgrandajn staciojn ĉirkaŭ Kotlaso, sed en la vagono neniu devenis de tiu regiono. Iuj provis konstati la direkton laŭ la steloj, laŭ la luno, sed vane. En la sekvontaj tagoj ni ne devis pri tio cerbumi.

Inter la kvindekkelkaj homoj de nia vagona anaro troviĝis homoj de kelkaj nacioj - ni do vivaĉas en la lando de multaj nacioj, do kial ne estu ankaŭ tio en nia vagono? Nia brigadisto, la homo al kiu la mastroj donis la respondecon pri ni, estis tataro. Li estis simpla homo kaj sufiĉe simpatia. Honeste li dispartigis la manĝaĵon ricevitan por ni. Jam en la unua tago li menciis, ke li ne permesos en la vagono iun ajn rabadon aŭ ion similan, petante samtempe, ke ni konduku kamaradece laŭ la ebloj. Feliĉe ne estis en la vagono tiaj kverelemuloj.

La punverdikto de la brigadisto estis dekjara. Kvinjaran koncentrejan pasintecon li jam havis malantaŭ si. Verŝajne li estis kondamnita pro ia "kontraŭrevoluciismo", kvankam li diris, ke la punon li ricevis pro fraŭdo. Ĉiu rusa huligano, ŝtelisto, fraŭdanto kaj bandito opinias sin, koncerne al la t.n. "popolaj malamikoj" homo kun pli alta moralo. La homo kondamnita laŭ la paragrafo 58 estas por la koncentreja administracio kaj en la opinio de la krimuloj la plej malbona. Nia brigadisto preferis esti fraŭdinto ol "kontraŭrevoluciulo".

Kelkaj rusoj havis dekjarajn punverdiktojn, ĉar ili estis militkaptitaj de la finnlanda armeo en la jaro 1940. Laŭ iliaj klarigoj la statuto de la ruĝa armeo enhavas

paragrafon laŭ kiu estas malpermesate al ruĝarmeano esti militkaptita. Ruĝarmeano devas venki aŭ pereji en la batalo. Sed tiel estas laŭ la statuto kaj soldato en la fronto pri tiu statuto ne memoras ; cetere, oni povas tian paragrafon taksi kiel propagandon. Kaj fine, soldato ja ne memmortigos sin, se li estos kaptita de la malamiko.

Post la interpaciĝo inter Finnlando kaj Rusio, la militkaptitaj soldatoj estis resenditaj al Rusio. Ĉe la limo ilin prenis NKVD en sia posedo. La revenintaj soldatoj estis de NKVD-istoj ofenditaj, insultitaj kaj akuzitaj pri perfido kontraŭ la patrio, ĉar ili fuĝis de la fronto al la malamiko. Ĉiu el tiuj "perfiduloj" ricevis dekjaran punon. Inter tiuj estintaj soldatoj troviĝis unu, laŭnacie finno. En aliaj landoj oni certe ne sendus homon de la popolo kontraŭ kiu li devos militi al la fronto. Sed laŭ la koncepto de la rusa registaro li ja devis sian patrion liberigi de la finnlandaj kapitalistoj.

La aziajn popolojn reprezentis krom la brigadisto tataro ankoraŭ du ĉeĉenoj. Ili estis anoj de pli granda grupo da sampopolanoj. La ceteraj troviĝis en aliaj vagonoj. La akuzo kontraŭ ili estis aparteno al politika kontraŭrevolucia bando.

Inter la popoloj, t.n. "liberigitaj", la poloj havis la plej grandan nombron, ni estis deko, sed mi ja havis kvazaŭ "duoblan naciecon", polan kaj judan. Mi tamen ne estis la sola judo. Mia samnacio estis inĝeniero el Odeso. En Arĥangelsko li estis apenaŭ unu semajnon. Veninte al Arĥangelsko, li posedis ĉ. mil rublojn kaj iom da multvaloraj vestaĵoj - kelkaj ĉemizoj, bona kostumo kaj paro da bonaj ŝuoj, krom tiuj, kiujn li havis sur la piedoj. La tuta havaĵo estis forrabita al li en la barako antaŭ la forveturigo.

De la ceteraj dum tiu tempo "liberigitaj" popoloj troviĝis unu moldavo kaj unu litovo. La moldavo scipovis perfekte la rusan lingvon kaj kelkajn aliajn lingvojn, i.a. ankaŭ la polan. Kial li estis arestita, li ne rakontis, sed laŭ lia konduto oni povis diveni, ke li apartenas al la klaso, kiu "ion perdis, aŭ eble multe perdis" dum la ruĝarmea liberigo, aŭ li estis iu, kiu

havis intelektan laboron.

La litovo estis fervojisto, homo ĉ. 60-jara. Lia bruna, bonkvalita fervojista uniformo kaj bonaj botoj allogis pli ol unu rusan ŝteliston. Per ia miraklo tiu litova fervojisto sukcesis savi sian sakon kun iom da vestaĵoj, kiujn li havis ankoraŭ en la vagono.

Kelkajn tagojn post la forveturo el Kotlaso ni vidis tra niaj fenestroj pejzaĝon tute alian ol antaŭe. Forestis ĉiu ajn libera homa komunumo. La stacioj, kiujn ni traveturis, konsistis nur el iuj lignaj dometoj. Ambaŭflanke de la fervojo ni vidis arbaron. Iom post iom ni sentis pli kaj pli da malvarmo - ni estis do veturigataj malproksime norden, tiufoje la okazintaĵoj sekvis logike.

Kvankam jam komenciĝis majo, ĉio ĉirkaŭe estis neĝkovrita kaj frostigita. Ĉiuj eksilentis. Ni, la grupo da poloj, kuŝantaj unu apud la alia, komencis pritrakti kiel povas evolui la politikaj kaj militaj okazintaĵoj. Laŭ niaj konkludoj ni opiniis, ke ni ne devos resti en la koncentrejoj dum tiuj jaroj al kiuj ni estas kondamnitaj, ni povas pensi kaj kredi je estonteco pli bona. Sed nun... Oni ja veturigas nin al la koncentrejo en la malproksima nordo... Ĉu ni sukcesos konservi la vivon ĝis la tempo kiam venos por ni la liberigo ?...

Preskaŭ ĉiu el ni havis pli-malpli relative politikan komprenon, sed kion ni povis scii, ne leginte de longa tempo gazetojn, kiuj informadas pri la veraj okazintaĵoj ? En la tendaro de Arĥangelsko ni povis akiri malofte gazetojn kaj la rusaj informoj en gazetoj diferencas de la gazetoj en la tuta mondo. Sur ties kvar paĝoj, en granda aŭ malgranda formato, troviĝas ĉefe priskriboj de la kvazaŭ feliĉa vivo en la kolĥozoj kaj eldiroj de kvazaŭlaboristoj pri siaj labortaskoj kaj pri sia feliĉa vivo. Poste multe da loko okupas ĉiuspecaj registaraj ordonoj kaj decidoj. Same pri la decidoj de la centra komitato de la bolŝevika partio, same devigaj kiel registaraj leĝoj. Ankaŭ multe da loko por la opinioj de la sovetaj ĉefuloj ĉiam ripetitaj post kelkaj semajnoj. Plejeble koncizaj informoj okupas en la sovetaj gazetoj apenaŭ unu anguleton sur la lasta paĝo.

Ĝis la militkomenco inter Rusio kaj Germanio en la sovetaj gazetoj estis presitaj ĉefe la informoj pri la milito de la germanaj informoficejoj laŭ komunikoj de la "Germana

milita ĉefkomandejo", sed ankaŭ tiuj informoj estis koncizigitaj ĝis la grado, ke pli ol militaj sukcesoj de germanoj ne multe estis troveble kaj tiuj informoj estis por ni ne esperigaj.

Tiuj en nia grupo estis tre pesimismaj. Ili opiniis, ke post la politika kaj komerca amikeco inter Rusio kaj Germanio sekvos komuna milita alianco. Dum la germanoj okupos la tutan Eŭropon kaj atakos tre forte la britajn insulojn, la rusoj invados Hindion, kiu laŭ nia tiama opinio estis la ĉefa angla bazo. Laŭ la ekzistanta tiam germana-rusa amikeco oni povis ankaŭ tion imagi ; do, kio poste ?...

Ĉiu profundiĝis en propraj pensoj kaj por sin konsoli komencis zumi melodion de revantaj kantetoj. Tiujn melodiojn postsekvis patriotaj kantoj, ŝajnis, ke ni nin mem akompanas per tiuj melodioj al propraj tomboj. Ni havis la konscian senton, ke ni estas veturigataj al baldaŭa pereco.

En mian memoron venis diversaj priskriboj de poloj, vagintaj iam piede milojn da kilometroj al Siberio dum la cara regado kaj kiujn liberigis la rusa revolucio. Sed kiom da tiuj iamaj vagintoj lasis siajn turmentitajn korpojn en la lokoj, kie ili estis ?... Ekzistas diraĵo "La historio ripetiĝas", ja ankaŭ nun la historio ripetiĝas, aliaj estas nur la formoj, sed la okazintaĵoj estas la samaj. Iam aliaj poloj piediris al tiuj lokoj, nun ni estas veturigataj en trajnoj. La deviga irado de poloj al Siberio daŭris jarcenton, eble iom pli, ĝi okazas ankaŭ nun. Iam tia deviga migrado okazis en la nomo de la Difavorataj rusaj caroj, nun la samo okazas en la nomo de laŭdire tutmonda proletara revolucio, sub la regado de la plej terura satrapo, kiun konas la historio - do nenio nova, ni daŭrigas la vojon de niaj pravaĵoj.

Jen ni venis en zonon, kie ni vidis la koncentreajn gvatturojn, nomitajn de la malliberuloj "kolombejoj". Ni vidis nur pli kaj pli da tendaroj. Jam estas mezo de majo, ĉi tie kompleta vintro, sed nia trajno veturadas, do kien ili veturigas nin ? Ĉu al la Norda Poluso ?

En iu loko ni ekvidis homojn fosantajn kanalojn apud la fervojo, inter ili ni vidis grupojn en la uniformoj de la pola armeo, sed ni veturas pli norden.

Kiam la trajno de tempo al tempo haltis apud la laborantaj homoj, ni demandis ilin kiaj estas iliaj vivkondiĉoj. "Ho, estos pli bone, se vi ekscios pri tio iom poste". Iuj respondis: "Pri tio prefere ne demandi". Ni povis kompreni iliajn vivkondiĉojn sen iliaj respondoj, sufiĉis nur rigardi ilin.

"Venos tempo, kiam unu homo al la dua brilos kiel stelo, - kiam unu homo aŭdos la duan kiel muzikon. Granda estos la homo kaj belega estos la vivo. - Por akiri tian vivon mi estas preta ĉion oferi." (Maksim Gorkij, en "La Patrino".)

En Sovetunio troviĝas multaj stratoj kaj diversaj kulturdomoj nomitaj "Maksim Gorkij", troviĝas eĉ granda urbo Gorkij. Per tiuj nomoj oni honoras tiun grandan verkiston. Laŭ la opinio de komunistoj jam realiĝis en Sovetunio la ideoj, al kiuj strebis Gorkij. Sed la mizeraj "Borlakoĵoj" - vagabondoj - kaj la mizero en Rusio priskribita de Gorkij ja povis esti modelo kompare al la homoj laborintaj en tiuj socialistaj tendaroj. Malgrasaj barbaj vizaĝoj, el kiuj rigardas indiferentaj okuloj, moviĝintaj estaĵoj, envolvitaj en siaj ĉifonoj, al kiuj la normalaj malbonaj vestaĵoj rusaj aspektas luksaĵo - tiaj estas la homoj, kiuj brilas unu al la alia kiel steloj, laŭ la revoj de Maksim Gorkij.

* * *

Matene, la 17an de majo la trajno haltis kaj staris dum kelkaj horoj. Dum tiu mateno ni ne ricevis niajn ĉiutagajn porciojn. Ni supozis, ke la trajna veturado finiĝis.

Ĉirkaŭ tagmezo la soldatoj komencis "malŝarĝi" la vagonojn. Jen ili malŝarĝis nian vagonon. Ni vidis neniun doman konstruaĵon sur tiu stacio. Ni eksciis, ke tiu stacio nomiĝas Kojva.

Kun la homoj el la najbaraj vagonoj ni estis piedire gviditaj kelkcent metrojn laŭlonge de la fervojo. Kompreneble, estis al ni memorigite kio minacas al ni en okazo de unu paŝo dekstren aŭ maldekstren. Irinte ni ekvidis en la deklivo larĝan kaj longan neĝkovritan plataĵon ĝis nevidebleco. Sur tiu plataĵo kuŝis fervojaj reloj, sur kiuj veturis en ambaŭ direktoj vagonoj tirataj de drezinoj kaj ŝarĝitaj per ŝtipoj kaj reloj. Tiu plataĵo estis la rivero

Peĉoro. Dum la monato majo Peĉoro estis glaciigita ĝis tia grado, ke sur ĝi povis veturadi ŝarĝitaj fervojaj vagonoj.

Transirinte la frostigitan Peĉoron, ni haltis antaŭ pordega enirejo. Supre de la pordego troviĝis la kvinangula komunista ruĝa stelo kaj la soveta emblemo, martelo kaj serpo.

Trapasinte la pordegon, ni estis sur grandega placo. Je longa distanco for de la pordego troviĝis multaj barakoj, ĉiu izolita per pikdratoj. La turoj staris ne nur ĉe la ĉirkaŭbarilo, sed ankaŭ interne inter la barakoj. La tendaro similis tiun en Arĥangelsko, sed ĝi estis kelkoble pli granda, ĝi aspektis giganta.

La ruĝa flago flirtis supre de la enirejo de iu barako, la ĉefadministrejo de Peĉorlag. En tiu ĉefa oficejo kaj ankaŭ en kelkaj barakoj apudaj la laboro okazis dum la tuta tagnokto, dum ĉiuj tagoj de la semajno.

Ĉiam kaj ĉiam al tiu tendaro estis enŝtopitaj ĵus alveturigitaĵoj homamasoj de la trajnoj kaj senĉese okazis ilia forsendado al laborlokoj pli norden. Apenaŭ foriris unu homamaso de la placo kaj tuj formiĝis la sekvonta homamaso forsendota. La senĉesa hommigrado okazis per piedirado. Apenaŭ estis malplenigitaj kelkaj barakoj kaj baldaŭ ili estis denove plenigitaj de la ĵus alvenintaj per trajno novaj "konstruantoj".

En Kojvo estis ankaŭ elektitaj diversaj specialistoj, ekzemple : inĝenieroj, teknikistoj, ŝoforoj, lokomotivestroj kaj aliaj.

Ni, la ĵus alvenintoj, ĉirkaŭ du mil kvincent homoj, estis enpuŝitaj en grandegan barakon. Apenaŭ ni lokigiĝis en la barako, ni tuj estis prenitaj al "Sanobrabotkan" (higienarango), tiel oni nomis fortondon de la haroj ĉie, desinfekton de niaj pedikplenaj vestaĵoj en varmega kamero kaj lavadon en banejo. Poste ni reiris al la barako, kie ni atendis du tagojn ĝis venis nia vico por la forsendo. Baldaŭ la "ĵulikoj" (sub tiu difino troviĝas ĉiuspecaj krimuloj en Rusio) komencis la rabadon. Dum la tago venis al la barako tendaranoj laborantaj konstante en tiu loko. Ili demandis pri objektoj, kiujn iu volas vendi. La "negco" devus okazi per ŝanĝo de vestaĵoj por pano. Sed la ŝajnaj aĉetemuloj volis akcepti aŭ eĉ proponi nenion prezon. Tio estis ruzaĵo de la "ĵulikoj", kiuj

volis informiĝi kion iu posedas. Dum nokto venis al la posedantoj "ĵulikoj" kaj forprenis perforte la objektojn. Tiam laboron mi vidis, kiam "ĵulikoj" venis al apud mi kuŝanta pola studento. Matene mi eksciis, ke li ne estis la sola tiuspeca viktimo.

Venontan tagon la "ĵulikoj" aranĝis alispecan rabadon, nome, ni ricevis la panon laŭ la vagonaj numeroj, en kiuj ni alveturis kaj la panon ricevis el la magazeno la brigadisto de la vagono. Aro da "ĵulikoj" eksciis la nomon de iu vagonbrigadisto kaj ili forprenis uzante lian nomon la panon de kvindekkelkaj homoj.

La 20an de majo estis komencita la forsendo de la homoj de nia barako. Ĉirkaŭ okcent homoj estis laŭ nomoj vokitaj. Ni estis gviditaj en tri grupoj antaŭ la ĉefa oficejo, kie ni estis ankoraŭfoje kontrolitaj. Stari estis malpermesite, oni devis genui.

Intertempe mi havis la okazon vidi nian ĉefmastron de Peĉorlag. Vestita en longa belega peltokaj en la akompano de kelkaj kunlaborantoj, li pasis laŭlonge kaj apude de la genuantaj siaj sklavoj. Li rimarkis inter la genuantoj ion, kio al li ne plaĉis kaj montris tion al la anaro ĉirkaŭ si. Akompananto de la ĉefo baldaŭ kuris al iu sklavoj, insultante kaj minacante per speciala puno.

Rigardante tiun mastron, mi pensis: homo, kiu gvidas tian konstrulaboron kaj regadas super unu miliono da sklavoj, certe ja devas aparteni al la komunista partio. Certe li ja iam studadis markismon-leninisman, kies teorioj temas pri la batalo por liberigi la homaron de ekspluatado kaj organizi socion socialisman kaj liberan. Kion do pensas tiu ĉefa mastro, vidante ĉiun tagon tiom da sklavoj super kiuj li regas, sciante, ke tiuj sklavoj estas praktike kondamnitaj al pereco en lia regno. Kion pensas tiu homo en tiu momento, vidante antaŭ si la genuantan amason da turmentitaj malgrasaj mizeruloj en ĉifonitaj vestaĵoj?...

Multe estis skribite pri la homa nobleco en filozofiaj traktatoj, en beletraĵrakontoj kaj poeziaĵoj. Tre abunda tiurilate estas ankaŭ la rusa literaturo. Certe do estas al tiu homo en la belega peltokun la sata stomako konataj la verkoj de Tolstoj, Hercen, Puŝkin kaj multaj aliaj. Kiel klarigi, ke lia animo povas esti komplete indiferenta, vidante antaŭ si la genuantan amason da sklavoj, kiuj eĉ ne

rajtas stariĝi laŭ sia volo kaj en ilia pereco li ankaŭ persone kunkulpas...

Multe estis skribite kaj kantite pri la ribeleco de la homa animo. Naivaĵoj oni devas taksu ĉiujn tiujn skribaĵojn, vidante, ke ĉi tie en Kojvo preskaŭ senĉese, tage kaj nokte, dekmiloj kaj centmiloj da homoj sen iu ajn rezisto iras al la sklaveco kaj pereco. Kial do tiuj homoj, kiuj fakte nenion povas perdi, lasas sin trakti de tiu mastro en la belega pelto kiel rubaĵon, kiel sterkon, kiun oni povas ĵeti kien volas iliaj mastroj ? Kial do tiuj homoj ne ribelas, eĉ se ilia mastro havas ĉirkaŭ si kelkajn fidelajn helpantojn kaj kelkajn soldatojn ? Se soldato pereas en la milito por sia patrio, li ja servas al kvazaŭ homara nobla ideo, en kiu li kredas. Kaj tiuj sklavoj katenitaj sen katenoj, pelitaj kiel la plej malfeliĉaj bestaĉoj, eĉ tiajn ideojn ne havas... Nu, estas ankaŭ al tiuj sklavoj blufite, ke ili konstruas socialismon, kiu venigos en la estonteco la tuthomaran feliĉon, sed neniu el tiuj sklavoj tiun blufon kredas, eĉ atentis. Mi povas nur opinii, ke la nuntempaj diktatoroj kaj aspirantoj al diktaturo pli bone konas la homan animon ol ĉiuj humanistoj, revoluciistoj, reformantoj k.s.

La 21an de majo, matene ĉirkaŭ la tria horo, nia karavano aŭ procesio komencis la piediradon de Kojvo. Paralele al la konstruata fervojo troviĝis vojo por la trafiko. Tiu vojo konsistas el metitaj ŝtupoj kaj forhakitaj branĉoj el la apuda arbaro kaj laŭ tiu vojo ni paŝadis.

Dum la monato majo la vetero en tiu regiono komencas esti "printempa". Matene estas plejofte ega frosto kaj dum la tago la vetero senĉese ŝanĝiĝas. Jen aperas la suno, post kelkaj minutoj pluvas aŭ neĝas akompanate de uragano kaj denove brilas la suno ; la suno brilas, sed ĝi ne varmas.

Tiu karavano, konsistanta el ĉ. okcent homoj diversnaciaj kaj diversaĝaj - 17 ĝis 60-jaraj - prezentis tipan sklavan procesion. La historio de ĉiu sklavoj aparte havis sian propran sorton kaj ĉiuj mizeroj kunligitaj faris modelon de mizerega mozaiko, ankaŭ la ŝancoj daŭrigi tiun mizeran ekzistadon varias por ĉiu aparte. Jen paŝadas la altstatura, forte aspektanta ruso Morozov. Tiu Morozov estas malnova koncentreĵano, li havas en sia

pasinteco du plenumitajn punverdiktojn po kvin jaroj. La nuna verdikto estas tiom, kiom ambaŭ pasintaj kune.

Lia sperto pri la koncentrejo faris el li unu el la plej bonaj brigadistoj en Arĝangelsko. Esti bona brigadisto signifas havi la kapablon ricevi por siaj "laboristoj" iom pli da manĝaĵo, kiaj ajn estas la homoj kaj la laboro. Okazas multfoje, ke iu homo, estanta en iu brigado kompleta sentaŭgulo, fariĝis en alia brigado "stafnanovano". Okazas ofte, ke iu brigado ne povis plenumi la normon de iu laboro, kaj alia brigado ĉiutage faris ducent procentojn de la sama laboro. Tiu ŝajna sekreto dependas ne de la farita laboro, sed de aliaj faktoroj.

Morozov, dum la plenumado de du punverdiktoj, lernis tion, li akiris multe da koncentreja sperto. Li alkiutimigis al tiu vivo kaj la koncentrejo iĝis por li hejmo. Ĉu povis sammaniere trakti sian sorton la tri junaj ĉeĉenoj 17-18-jaraj? Unu estis tre inteligenta. Li parolis la rusan lingvon perfekte kaj estis por siaj pli aĝaj samnaciaj anoj, kiuj la rusan lingvon ne komprenis, en ia senco ilia reprezentanto.

La grupo da ĉeĉenoj, sep homoj, estis kondamnitaj pro aparteno al kontraŭrevolucia bando. Mi ne scias kiom da vero estis en tiu akuzo. Kelkajn fojojn mi provis amikiĝi kun la ĉeĉeno parolanta ruse. Ĉiam li estis ĝentila, sed kiam mi komencis paroli pri la rusa reĝimo, li rigardis min suspekteme, tuj eksilentis kaj foriris. Mi faris kelkajn provojn, ke li havigu al mi iom da konfido, ĉar estis por mi interese, ĉu fakte ekzistas ie en Rusio iaj organizitaj kontraŭregistaraj grupoj; sed ĉiam miaj provoj fiaskis, mi pri tio ne miris. Ĉe tiu junulo oni povis vidi, ke li suferas pli ol la ceteraj liaj samnaciaj kamaradoj. Spite sian junecon li estis de siaj samgentanoj multe estimata kaj sendube li tion meritis. En li kuniĝis la denaska inteligenteco, la karakteriza azia saĝeco kune kun la akirita moderna scio. Neniam mi aŭdis de li iun ajn insulton aŭ iun trivialan esprimon, je kio tre abundas la rusa lingvo, precipe en la koncentrejoj.

Inter la paŝantoj mi ekvidis la maljunan litovan fervojiston, sed neniam pakaĵon li havis. Lia tuta havaĵo estis al li forŝtelita en Kojvo. "Ili rabis kaj rabas, sed mizeruloj ili estis kaj estas nun. Ni ne rabis kaj ni havis pli

ol ili", - li diris al mi.

Ĝojaj kaj bruantaj inter la paŝantoj estas la "ĵulikoj". Ili kuras, saltas, observadas kaj ŝercas. Ili ŝercas inter si, sed multe pli ŝercas kaj mokas pri la kunirantaj mizeruloj. Ili sentas sin kiel ŝakaloj atendantaj la ĉason, kiu certe venos. Pakaĵojn ili ne portas, ĉio forrabita estas baldaŭ vendita. La negoco okazas por iom da nutraĵo, iom por fumi kaj ofte por kelkaj rubloj kun aliaj "ĵulikoj", kiuj la rabaĵon de-nove vendas al aliaj "ĵulikoj". Se la rabaĵo estas tre valora, ĝi estas vendata al la koncentrejoj oficistoj, ankaŭ arestitoj, al t.n. "liberaj".

Paŝante la "ĵulikoj" observadas kion forrabindan iu posedas. La forrabo okazas plejofte nokte, aŭ per for-ŝtelo, aŭ tute malkaŝe per forto kaj minaco mortigi en okazo de kontraŭstaro. Se la "ĵulikoj" vidas, ke iu homo estas malsana kaj ion posedas, ili baldaŭ "protektas" tiun viktimon kaj faras ĉion eblan por rapidigi lian morton.

Apud la vojo troviĝis krom la konstantaj tendaraj kolonioj, ankaŭ specialaj lokoj por nutri la irantojn al la pli malproksimaj koncentrejoj. Tia "nutropunkto" konsistis el kelkaj malgrandaj barakoj, kie loĝaĉis la servantaro kaj gardistaro. Sur la placo, inter tiuj barakoj, pendis du kaldronoj. Ĉirkaŭ tagmezo nia anaro venis al tia "nutropunkto".

La amaso da malsataj mizeruloj sidiĝis kaj atendis trankvile ĝis oni kuiras por ili po tri kvaronlitrojn da supo kaj disdonos ankaŭ 450 gramojn da pano (la tagan porcion por homoj, kiuj ne laboras, sed ili estas survoje al la laboro). La "ĵulikoj" faris negocon kaj baldaŭ ili akiris panon kaj iom da salitaj fiŝoj kaj iom da sukero. Ni, la ceteraj, atendis ĉirkaŭ unu horon ĝis la supo estis por ni kuirita.

Ni apenaŭ komencis manĝi, proksimiĝis alia karavano al la "nutropunkto". Kiam post la manĝado ni forlasis tiun "nutropunkton" nian lokon okupis niaj sekvantoj.

Post kelkhora paŝado ni haltis por tranokti. Ankaŭ por tiuj tranoktadoj ekzistis specialaj kolonioj. La loko kie oni tranoktis konsistis el kelkaj subteraj

barakoj, nomitaj "Ziemplanki", ĉirkaŭitaj per pikdratoj kaj turoj en kvar anguloj kaj gardistoj en la turoj kun maŝinpafiloj.

En nia paŝanta grupo, por akiri "socialistajn venkojn" ĉe la konstruo de la fervojo Moskvo-Vorkuto, troviĝis kolonelo el la stabo de generalo Blüner. Tiu Blüner iam estis reklamita kaj tre laŭdita de la komunistoj kiel ega heroo pro liaj agoj kaj venkoj en Malproksima Oriento. En la jaroj tridekkelkaj Blüner estis "elpurigita" el la armeo, akuzita pri diversspecaj perfidoj, same kiel multaj aliaj altrangaj oficiroj, kaj malaperis. Verŝajne estis kune kun li "elpurigita" lia adjutanto, kiu troviĝis kune kun ni. Tiu kolonelo kun neniu rilatis, li paŝadis sola kaj sola li sidis dum la ripozoj, ĉiam rigardante foren.

Post la ricevita vespermanĝo, tri kvaronlitroj da sen-grasa supo, mi kuŝiĝis sur la tabuloj same kiel plimulto el miaj samsortanoj, kaj ekdormis. Pensi pri io mi ne estis kapabla. Dormante mi ekaŭdis kriojn en la sama subtera barako. Malfermante la okulojn mi vidis, ke la suno jam enbrilas tra la tegmentaj fenestretoj. Ŝajnis al mi, ke jam estas ĉirkaŭ tagmezo, sed fakte estis ĉirkaŭ la dua aŭ tria post noktomezo. Rigardante en la direkto de kie venis la krioj, mi vidis kvar "ĵulikojn" starantajn ĉe la kolonelo, kontrolantaj lian sakon por vidi kio estas plej rabinda. Komence la kolonelo provis per siaj manoj defendi la havaĵon en sia sako. Kiam du "ĵulikoj" malmovigis liajn manojn, li komencis krii. Dume la "ĵulikoj" metis sur lian buŝon ĉifonon kaj unu "ĵuliko" vokis: "Mortigu lin, tiun paraziton!". La kolonelo komprenis, ke la "ĵulikoj" povas tiun minacon realigi, li ĉesigis ĉiun reziston, permesante al ili preni kion ili volas.

Kontrolante la havaĵon en la sako, la "ĵulikoj" vidis, ke krom la botoj, kiujn li havis sur la piedoj, li havas ankaŭ paron da soldataj ŝuoj. La "ĵulikoj" prenis nur la botojn, kiuj estis la plej valora objekto. La ceteraj homoj en la barako trankvile rigardis tiun rabon kaj ĉiuj timis ion diri.

En la dua tago de nia paŝado estis malbona vetero, ĉiam ŝanĝiĝema, sed plejofte blovis ventegoj kaj neĝis.

Mangajon sur la vojo ni ricevis, sed tranokti ni devis sub la firmamento. En la samaj cirkonstancoj okazis la paŝado la trian tagnokton. La kvaran tagnokton ni estis lacigitaj ĝis tia grado, ke eĉ la "ĵulikoj" havis mal-bonan humoron. Komence ili murmuris, baldaŭ ili komencis insulti kaj fine ili postulis de la soldatoj tutagan ripozon sub ia tegmento. La soldatoj deklaris, ke ilia tasko estas gvidi nin al la loko destinita laŭ la ordono, kiun ili ricevis, promesante ĉiam, ke tiu loko estas proksima.

En la regionoj, al kiuj ni venis la duan kaj trian tagon post la foriro el Kojvo, okazis fosadlaboroj por prepari la terenon, sur kiu devas esti metitaj la reloĵ. Ni dum tiuj tagoj paŝadis inter la laborantaj homoj kaj inter ili ne mankis ankaŭ la "ĵulikoj". Ni poloj, diferencaj de la rusoj per niaj manteloj, estis ĉiam de la "ĵulikoj" ofenditaj. Ĝenerale ili nomis nin "okcidentanoj". Sub la nomo "okcidentanoj" oni komprenis ne nur polojn, sed ankaŭ ĉiujn, kiuj venis al Rusio el la t.n. "Okcidentaj landoj".

"He! Pola sinjoraĉo! Mi vidas, ke vi estas malkontenta ĉi tie. Mi tion komprenas, sed kion vi pensis, ke en Sovetunio vi ankaŭ havos la eblon spekulii kaj ekspluati laboristojn, kiel vi faris en via Polio? Ho ne! Ni instruos vin labori! Vi helpos al ni konstrui tiun fervojon kaj poste vi mortaĉos. Polion vi ja neniam revidos, forgesu pri ĝi, ĉe ni oni devas labori." Per tiaj esprimoj ofte salutis nin rusaj samsortanoj, kiuj jam havis multe da tendara edukado.

En la kvina tagnokto ni estis en stato, ke ni apenaŭ kapablis iri. La karavano longiĝis ĝis kelkcent metroj, kvankam la soldatoj senĉese ripetadis siajn vokojn, ke ni proksimiĝu kaj paŝadu kune.

Matene, kiam ni venis al loko, kie ni devis ricevi mangajon, la "ĵulikoj" iamaniere eksciis, ke ni havas pli ol kvindek kilometrojn ĝis la loko por ni destinita. Ili komencis aventuron, anoncanta, ke ili plu ne iros. Ili akuzis tiujn, kiuj nin direktis al tia longa vojo pri trockismo, buĥarinismo kaj aliaj kontraŭrevoluciismoj. La "ĵulikoj" komentis la ordonon de tiu "kontraŭ-revolucia bando", ke ili celas nin survoje lacigi ĝis

tia grado, ke ni ne estu laborkapablaj kaj tiamaniere "tiu bando" volas sabotadi la taskon de la soveta registaro en la konstruado de tiel grava fervojo por Sovetunio. La "ĵulikoj" minacis senmaskigi tiun kriman faŝistan bandon kontraŭrevolucion. Ili akuzis la soldatojn, niajn gardantojn, ke ankaŭ ili estas konsciaj helpantoj de tiu bando, kiu devas esti mortpafita pro siaj krimaj ordonoj.

Kvankam la soldatojn certe ne timigis tiu ŝajne revolucia kaj patriotisma agitado, la "ĵulikoj" tamen atingis gravan sukceson. Estis por ni rapide kuiritaj multe da densa griaĵkaĉo kun pecoj da fiŝo kaj ĉiu ricevis da tiu manĝaĵo, kiom li kapablis formangi. Dum tiu manĝado, mi la unuan fojon satiĝis de post mia aresto. La soldatoj intertempe kontaktis iun de la koncentrejoj estroj kaj ili ricevis ordonon nin gvidi al kolonio nur kelkajn kilometrojn de la loko, kie ni ricevis la manĝaĵon.

Sur la distanco de multaj centoj da kilometroj, inter la rivero Peĉoro ĝis la urbo Vorkuto, situanta norde de Eŭropo en la arkta cirklo, vivaĉis ĉirkaŭ unu miliono da homoj. La barakoj situis laŭlonge kaj proksime de la nura ligna vojo en tiu regiono, sur tereno de multaj miloj da kvadrataj kilometroj. Tiuj barakoj kaj grandaj tendoj distancis inter si po kelkcent metroj, fakte ili formis unu tuton nomitan "Peĉorlag".

La konstruado de la fervojo Moskvo-Vorkuto kostis multe da viktimoj kaj la konstruintoj de la ligna vojo, kiu devis ebligi la fervojan konstruadon, pereis amase. Ĉiu pionira laboro ĉiam postulas oferejon kaj viktimojn. Sed la soveta pionirado neniam atentis la gradon de streĉoj kaj la nombron de pereintaj homoj. Inter la rakontoj pri Stalin troviĝis jena : iam Stalin proponis ian gigantan konstruaĵon. Dum la konferenco kun specialistoj kaj planistoj por tiu konstruaĵo, iu planisto konsilis al Stalin rezigni la proponitan konstruaĵon, ĉar ĝi devos kosti kelkajn milionojn da homaj viktimoj kaj tio estos tragedio. Al tiu rezigna propono Stalin respondis : "Se pereas unu homo, tio estas tragedio, sed se pereas milionoj, tio estas statistiko."

De la homoj, kiuj venis al Peĉorlag antaŭe, mi eksciis kiamaniere okazis la aranĝo de novaj kolonioj. Kelkcent homoj kun kelkaj gardistoj estis senditaj antaŭe al loko

en la arbaro, kie neniam ĝi estis tuŝita de homa piedo. Tiuj "pioniroj" kunportis segilojn, hakilojn, ktp. La unua laboro estis faligi arbojn kaj prepari el ili la lignan vojon. Ĝis la vojo estis veturebla, tiu pionira avangardo vivis sub la ĉielo, sendepende ĉu estis somero aŭ kruda vintro. Ĝis la vojo estis konstruita, estis al tiu "pionira avangardo" sendita la nutraĵo per sledoj, tiritaj de hundoj, ĉar ĉevalo ne trairus densan arbaron kun iu ajn ŝarĝo. La nutraĵo, kiun tiuj hundoj alveturigis estis iom da faruno. Tiam, tiu "avangardo" ricevis por nutri sin 150-250 gramojn da faruno por tag-nokto. Kion do povis fari tiuj homoj per la ricevita porcio da faruno ?

Iuj ĝin kuiris kun akvo, iuj miksis ĝin kun akvo kaj trinkis, iuj formanĝis la sekan farunon. Tiam "dieton" tiuj "pioniroj" ricevis dum 1-2 semajnoj, tiom longe daŭris la konstruado de la ligna vojo ĝis la punkto antaŭe fiksita. Kiam la vojo estis jam uzebla, oni alveturigis al la "pioniroj" normalan nutraĵon kaj ili komencis konstrui por si barakojn. Multe da ili venis ĝis tia stato, ke ili labori ne kapablis kaj nemalmultaj pereis.

En Sovetunio oni uzas ofte militistajn sloganojn. Tiu "avangardo" laŭ la soveta kutimo povas esti nomita "atakantoj de la malamiko en la unua linio", eĉ se la malamiko estas la senkulpa arbaro.

Kaj kiel aspektis la normala vivo post la unua akirita venko super la arbaro ? La laboro ĉe la konstruado de la fervojo Moskvo-Vorkuton okazis seninterrompe tage kaj nokte per du laborsekcioj.

Je la kvara matene aŭ posttagmeze, oni sonorigas, frapante pecon da fero en alia pendanta ferpeco. Post tiu signalo la homoj devas leviĝi kaj prepari sin al la glora tasko, laŭ la konstitucio - labori. La prepariĝo konsistas el ricevo de iom da manĝaĵo laŭ la plenumita labornormo antaŭ tri tagoj. La ricevo de la manĝaĵo ne daŭras longe, ankaŭ rapide ĝi estas manĝita, kaj poste oni ankoraŭ estas malsata. Post 15-20 minutoj la homoj rekuŝiĝas sur siaj lokoj en la barakoj kaj ekdormas aŭ ŝajnigas dormon.

Proksimume je la kvina horo oni aŭdas la samajn

sonorojn, sed la dormantoj aŭ nur la kuŝantoj tiun signalon kvazaŭ ne aŭdas, ili tiun signalon ne ŝatas, ĝi vokas ilin plenumi la "gloran taskon". Ĉiu scias, ke baldaŭ venos la atako, sed ĉiu minuto, dum kiu oni ankoraŭ kuŝas antaŭ la atako, estas gajno kaj oni ĝin profitu, se ekzistas por tio eblo.

Apenaŭ kelkajn minutojn post la signalo, enpaŝas en la barakojn kelkaj soldatoj kun siaj helpantoj, t.n. "samofraniki" (morgardistoj). Tiuj lastaj tenas en siaj manoj dikajn bastonojn.

Generale la koncentrejanoj estis dividitaj laŭ du specoj: krimuloj ordinaraj kaj krimuloj pro popola malamikeco aŭ krimuloj laŭ la paragrafo 58. Esti "samofraniko" rajtas nur la ordinaraj krimuloj, ŝtelistoj, fraŭdintoj, huliganoj, banditoj k.s. Krimuloj pro "popola malamikeco" ne rajtas havi tian funkcion.

La unua demando de la soldatoj estas: "Kial vi ankoraŭ ne leviĝis? Hej, brigadistoj! Kial vi ne elkondukis viajn homojn?" Post tiu demando la "samofranikoj" ektiras la kuŝantajn homojn. Tiuj, kiuj tuj leviĝas kaj foriras, ne estas batitaj. Tiujn, kiuj ekplendas, ke ili estas malsanaj aŭ malfortaj, la "samofranikoj" tuj sanigas aŭ fortigas per siaj dikaj bastonoj.

Sur la kolonia placo, kiam ĉiuj viciĝis laŭ siaj brigadoj, iu soldato ĉiam memorigas, kion egalas unu paŝo dekstren aŭ maldekstren kaj kio minacas en tiaj okazoj. Poste oni gvidas la "laboristojn" al la laboro. Ankaŭ apud la laborlokoj troviĝis diversaj sloganoj, i.a. unu kun jena teksto: "Ni laboras dum ĉiuj ekzistantaj veteroj". Tiu slogano estis ĉiam realigita, oni laboris eĉ sub densaj pluvoj.

Ĉirkaŭ tagmezo estis al la laborloko alveturigita la tagmanĝo. Dum la disdonado de tiu tagmanĝo ofte okazis kvereloj, bataloj kaj similaj okazaĵoj pro la maljusta aŭ justa disdonado.

Kiam tiuj homoj revenis post la laboro al la barakoj, ilia forto sufiĉis nur por ricevi la t.n. vespermanĝon, poste ili kuŝiĝis en la samaj ĉifonvestoj, kiujn ili ĉiam havis sur siaj korpoj kaj endormiĝis. Ili ne kapablis cetere por iuj aliaj okupoj pro la lacego. Neniu ripoztago ekzistis en Peĉorlag. Por laboro oni venigis

la homojn, ne por ripozo. La ĉefa afero estas la plano, kiun oni devas ne nur plenumi, sed superplenumi.

Dekdu Kaldronoj

La nutrado en la koncentrejoj konsistis el dek-du-kvanta sistemo nomita en la tendara parolmaniero dekdu kaldronoj. Aŭdante, ke ekzistas dekdu kaldronoj oni povas imagi, ke la homoj havas ampleksajn eblojn elekti siajn manĝaĵojn, sed vane. La homoj ĉiam estis malsataj kaj pri nenio tiom pensis, kiom pri manĝaĵo.

Tiun dekdukaldronan sistemon certe preparis diversaj specialistoj kaj ekonomikistoj. Ĉio en la nuntempa mondo devas esti ordigita laŭ fiksitaj principoj, do ankaŭ kiam tio koncernas la ekonomion de sklavlaboristoj, kie decidis la principo maksimumo da laboro per minimumo da salajro.

Jen estas la kvantoj kaj kvalitoj de tiu "dekdukaldrona sistemo" :

1. manĝaĵon laŭ la unua kaldrono ricevis : laboristoj, kiuj plenumis la labornormon de 25 ĝis 100 %.
Ĝi konsistis tage el po 450 gramoj da pano, 80 gramoj da grio, 10 gramoj da graso, 10 gramoj da legomoj, 10 gramoj da sukero.
2. manĝaĵon laŭ la dua kaldrono ricevis laboristoj, kiuj plenumis la normon 100-118 %.
Ĝi konsistis el 800 gramoj da pano, 120 gramoj da grio, 20 gramoj da graso, 50 gramoj da viando aŭ fiŝo, 20 gramoj da legomoj, 15 gramoj da sukero. Laŭ la dua kaldrono estis nutritaj ankaŭ la koncentrejaj gardistoj, la t.n. "samoĥraniki".
3. manĝaĵon laŭ la tria kaldrono ricevis laboristoj "rekordistoj", kiuj plenumis la normon inter 118% - 160 %. Ĝi konsistis el 975 gramoj da pano, 160 gramoj da grio, 120 gramoj da viando aŭ fiŝo, 40 gramoj da graso, 20 gramoj da legomoj, 20 gramoj da sukero.
4. la kvara kaldrono nomiĝis "la inĝeniera-teknika kaldrono". Formale devis sin nutri laŭ tiu kaldrono jenaj personoj : ĉefo de la kolonio, lia anstataŭanto, ĉefa laborgvidanto, kuracisto, normisto kaj edukisto, kies eduka tasko estis agitadi por pli multe labori.

- Tiu kaldrono konsistis el 700 gramoj da pano, 160 gramoj da grio, 150 gramoj da viando aŭ fiŝo, 40 gramoj da graso, 60 gramoj da legomoj, 20 gramoj da sukero. Ĝi estis la plej altkvalita, laboristoj povis nutri sin laŭ tiu kaldrono, se ili plenumis pli ol 160 % de la labornormo.
5. Manĝaĵon laŭ la kvina kaldrono ricevis junuloj ĝis la dekoka jaraĝo, se ili plenumis la labornormon je 100%. Tiu kaldrono similis la kaldronon trian.
6. La sesa kaldrono estis por gravegaj virinoj. Ĝi similis la trian. Ili devus ricevi ankaŭ kelkdek gramojn da fruktoj, sed en Peĉorlag fruktoj ekzistis nur en la imago.
- 7-8. La sepa kaj oka kaldronoj estis por malsanuloj, se ekzistis ŝancoj, ke ili resaniĝos kaj ke ili antaŭ la malsano bone laboris. Se ne ekzistis ŝancoj, ke ili resaniĝos, tiuj homoj estis taksitaj invalidoj kaj ricevis manĝaĵon laŭ alia kaldrono. Tiu kaldrono por malsanuloj konsistis el 600-700 gramoj da pano, la cetero laŭ la kaldrono dua. Ili devus ricevi ankaŭ iom da fruktoj, sed en Peĉorlag ili fruktojn ne ricevis.
- 9-10. Laŭ la naŭa kaj deka kaldronoj ricevis nutraĵon homoj malfortaj, sed ili devis ankaŭ labori. Tiu kaldrono variis kvante kaj kvalite inter la dua kaj tria. Ankaŭ tiaj homoj estis nutritaj laŭ tiu kaldrono, se ili antaŭ la malfortiĝo bone laboris kaj se ekzistis espero, ke ili reakiros kompletan laborkapablon. Se tia espero ne ekzistis, ili estis taksitaj invalidoj.
11. La dekunua kaldrono nomiĝis survoja kaj invalida, ĝi similis la kaldronon unuan.
12. La dekdua kaldrono nomiĝis la "puna kaldrono". En la koncentrejo ekzistis ankoraŭ specialaj punoj, ekzemple, se iu ne plenumis 25% de la labornormo aŭ iel rifuzis la laboron. Tiu kaldrono konsistis el 250 gramoj da pano kaj duonlitro da supo por tagokto, nenio pli, laŭ la principo de la konstitucio "kiu ne laboras, tiu ne manĝu".
- Fakte, tiuj kvantoj estis nur teoriaj, ĉar parton, kiun devus ricevi la "laboristoj" forŝtelis ĉefoj, kiuj malsatus, se ili nutrus sin nur per tio, kion ili ricevas laŭ la fiksita kaldronosistemo.

La kolonio, kien ni venis, estis novarangita. Antaŭ nia alveno troviĝis tie nur kelkaj homoj, "kvalifikitaj specialistoj". Ĉio en la kolonio estis provizora. La "loĝlokoj" estis en grandaj tendoj, sed kun duetaĝaj kuŝejoj. La "specialistoj" ne havis necesan tempon prepari la kuŝejojn el tabuloj kaj anstataŭ tabuloj estis metitaj maldikaj arbotrunkoj. Tiel, mi post preskaŭ unujara restado en la malliberejo kaj post deksemajna migrado, fine venis al stabila loko (almenaŭ mi tion pensis) de la granda ĝusta koncentrejo kaj okupis lokon en la malsupra etaĝo sur rondaj ankoraŭ malsekaj ŝtipetoj, forhakitaj en la arbaro antaŭ kelkaj tagoj.

"De ĉiu laŭ liaj laborkapabloj, al ĉiu laŭ akiritaj laborrezultoj". Tiel estas la frazo en la soveta konstitucio. Kompreneble, konstitucio kaj precipe la soveta estas afero, al kiu la civitanoj devas subordiĝi. Tiu konstitucia leĝo estas deviga ankaŭ por la koncentrejanoj.

Nia tasko estis labori laŭ niaj ebloj kaj estis por ni kvazaŭ certigite "leĝe", laŭ la konstitucio, ke ni ricevos salajron laŭ la farita laboro.

La duan tagon post la alveno al la kolonio oni formis brigadojn po kvardek homoj. Mi venis al brigadisto, kiu nomiĝis Kirliŝin. La morgaŭon je la kvara matene, la sonorilo el ferpecoj vekis min. Mi ricevis matenmanĝon, iom da sekigita pano kaj supon - trikvaronojn da litro. Baldaŭ ni estis elpelitaj el la tendegoj al la placo antaŭ la elirejo. Tie ĉiu brigado eliris aparte sub kontrolo de sia brigadisto.

El la ilara baraketo, proksime de la elirejo, ekstere, ni kunprenis segilojn, toporojn, fosilojn, ŝtalajn stangojn, pezajn martelegojn, ŝtalajn kojnojn k.s.

Ekstere atendis nin kelkaj soldatoj, ili kalkulis nin kaj memorigis, kion signifas unu paŝo dekstren aŭ maldekstren, demandinte nin post la memorigo, ĉu ni komprenis. Nia respondo devis esti hore: "Jes!".

Ĉirkaŭ du kilometrojn ni paŝadis sur la lignaĵa vojo kaj poste ni estis gviditaj flanken kelkdek paŝojn en la arbaron.

En tiu mateno la vetero estis frosta. La aperinta suno lumigis la arbajn kronojn, en kiuj vidiĝis kiel

truoj, malhelaj partetoj, kiel el la profundo. La neĝkovritaj arboj aspektis majeste silentaj estaĵoj, kiel en fabelo, kaŝantaj samtempe ian malĝojon en sia interno.

La neĝtavolo sur la tero estis ankoraŭ mola kaj dika. En iuj lokoj ĝi atingis dum la paŝado la genuojn. Tie ni devis prepari la terenon por la fervojo.

La komenca laboro estis faligi la arbojn, forhaki de ili la branĉojn, kiuj estis baldaŭ bruligitaj. Spite, ke mi faris tiun laboron la unuan fojon en mia vivo, mi ne havus kaŭzon por plendi, ke ĝi estas tro streĉa, se mi estus sata, bone vestita kaj ne elsuĉita de pedikoj.

En la tagmezo venis al ni en bareloj la t.n. tagmanĝo. Ni tion opiniis zorgemo pri ni, baldaŭ ni eksciis, ke pro tiu zorgemo nia labordaŭro daŭros dekdu horojn.

Kiam la arboj estis faligitaj en la lokoj, kie devis esti preparita tereno por la fervojo, ni forigis de tiu loko neĝon. Tio okazis rapide. La neĝa tavolo maldikiĝis dum la faligo de la arboj kaj per la paŝado sur ĝi.

Dum la forigado de la neĝo mi laboris kun pola aktoro Utnik. Laŭkutime ni inter ni dum la laboro iom babiladis. Pasante preter ni, iu homo aŭdis, ke ni parolas la polan lingvon, li al ni proksimiĝis. Li salutis nin en la pola lingvo kaj haltis por iom babiladi. Li rakontis, ke li restis en Rusio de post la unua mondmilito, sed nun li estas soveta civitano kaj jam de kelkaj jaroj partoprenas nian nunan scorton. Lia laboro en la koncentrejo estis fiksi normojn por ĉiuspecaj laboroj laŭ dika libro, kiun li kunportis kaj laŭ ĝi antaŭ la fiksado faris la necesan kontrolon. Li demandis la nomon de nia brigadisto kaj notis tion.

En la kvara tago post lia vizito nia brigado ricevis por la matenmanĝo densan, speciale por ni kuiritan supon, iom da griaĵo kaj iom da graso. La samo okazis dum la tagmanĝo, dum la vespermanĝo ni ricevis ankoraŭ iom da terpomoj. La brigadisto klarigis al ni, ke tiun manĝaĵon ni ricevis dank'al la normisto-polo, kiu en la tago kiam ni forigis la neĝon parolis kun mi kaj Utnik. La normisto raportis, ke la neĝo, kiun ni forigis estis 60 centimetrojn alta, fakte ĝi estis nur inter dek kaj dekkvin centimetroj. Nia brigado en tiu tago plenumis tiamaniere pli ol tricent procentojn de la labornormo.

Tiu normisto iĝis nia amiko kaj precipe de Utnik, sed pro alia kaŭzo. Utnik venis al la arĥangelska koncentrejo en tre bonaj vestaĵoj, kiuj en Sovetunio ne estis aĉetebblaj. En Arĥangelsko li venis kun kostumo kaj ĝin "formanĝis". En Peĉorlag li ankoraŭ havis bonan kaj belan mantelon, kiun enviis ĉiuj koloniaj ĉefoj kaj ankoraŭ pli la "ĵulikoj". Utnik portis la mantelon ĉe la laboro, sed ĉiam metis ĝin apud si kaj ĉiam ĝin gardis.

La normistoj apartenas en la tendaro al la plej alta elito kaj nia normisto volis de Utnik aĉeti la mantelon, sed la negoco pri la prezo daŭris kelkajn tagojn. Iun tagon Utnik metis la mantelon apud si kaj ĝi estis forŝtelita preskaŭ de antaŭ la okuloj. Utnik komencis tuj serĉi kaj ĝin "feliĉe" trovis kaŝita en la neĝo. Post tiu retrovo Utnik timis riski pli longe havi la mantelon kaj la vendo okazis je la sama vespero.

Post forigo de la neĝo ni komencis la fosadon. La unua tavolo, frostigita musko, estis malmola kiel metalo. En tiu tavolo troviĝis la radikoj de la ĵus faligitaj arboj kaj ĉion ni devis forigi sen iu ajn mekanika helpo. Por elporti la forhakitan muskon oni uzis permanajn portilojn. Tiuj portiloj havis du longajn tenilojn kaj en la mezo estis alnajligitaj kelkaj tabuletoj.

Kiam la elfoslaboro iom progresis, oni komencis forporti la teron per lignaj ĉarumoj puŝitaj de homoj. Matene la tero estis frosta kaj ni devis forhaki pecojn. Kiam la suno komencis varmigi, la tero degelis en koton. En tiu koto ni devis stari en niaj truitaj ŝuoj, tra kiuj enfluis la mola malvarma malseka maso. Krome, dum la fosado la degelinta tero ĉiam refluis al la fosita loko. Kiam venis la mezuristo, li diris, ke neniun laboro estis farita. Malmulte da farita laboro signifas malmulte da manĝaĵo - tio signifas pli egan malsaton.

Dum la fosado de la koto mi faris la plej egajn streĉojn por ricevi manĝaĵon laŭ la unua kaldrono, sed ne ĉiutage mi tion sukcesis. Miaj fortoj ne sufiĉis por la frostigita tero kaj fluanta koto.

Jen la aspekto de laborantaj kelkcent homoj en

kolonio de Peĉorlag, fosantaj la teron, preparantaj la terenon por la fervojo. En la mezo inter du teraj muroj sur sternitaj dikaj tabulegoj, vico da homoj puŝas ĉarumojn ŝarĝitajn per tero, aŭ malplenajn por la enŝarĝiĝo. Kiam ni komencis uzi la ĉarumojn, la normoj estis pli-altigitaj ol antaŭe dum la forportado de la tero per la portiloj. Ankaŭ ĉe tiu laboro eĉ per primitiva maniero la soveta "stalinovismo" kaŭzis multe da tarmentoj, kiujn oni povus eviti. La ĉarumoj estis lignaj kaj faritaj sur-loke. Tiuj, kiuj faris la ĉarumojn laboris ankaŭ laŭ normoj sufiĉe altaj. Ankaŭ ili volis enspezi por la peco da pano kaj absolute ne atentis, ke la ĉarumoj estu fortaj. Kiam en tiujn ĉarumojn estis ŝarĝitaj pezaj pecegoj da frostigita tero, ŝtonoj, aŭ koto, ili komencis rompiĝi kaj disfalis. Sur la laborplaco troviĝis homo speciale por ripari la ĉarumojn, kiuj difektiĝos dum la laboro, sed li ne riparos ion, kio estis fuŝfarita.

Ne pli bone estis kun la ligna vojeto de la longaj tabulegoj. De la peza ŝarĝo kaj malsekeco la tabulegoj rapide detruigis, mallarĝigis. Se unu ĉarumpuŝanto direktigis iomete flanken, la ĉarumo forigis de la tabulego kaj tiam la tuta longa homvico haltis. Restarigi la ĉarumon sur la tabulon ne estus malfacile por normale forta homo, sed la "Peĉortendaraj" laboristoj estis malfortaj kaj starigi tian ĉarumon kun ŝarĝo estis por ili fizika streĉo. Tiam la longa vico da ĉarpuŝantoj haltis kaj atendis, neniu helpas al tia malfeliĉulo. Por ĉiuj estis indiferenta la tuta laboro, ĉiuj estis lacaj, malfortaj.

* * *

Daŭris apenaŭ du semajnoj kaj miaj fortoj elĉerpiĝis. Sed kion fari? Al la laboro mi estis pelita per dikaj bastonoj. De la brigadisto Kirlišin estis forprenita la brigado, li mem iĝis normala "laboristo".

La nova brigadisto estis tipa "juliko", li malamis precipe la "okcidentanojn". Se li rimarkis, ke mi dum la laboro iom ripozis, li multfoje min frapis sur la vizaĝon aŭ piedbatis. Al neniu mi povis pri tio plendi, li ja rajtis devigi min al la laboro, li ne nur tion rajtis, sed tio estis lia devo de brigadisto.

En la koncentrejoj ekzistas nomo por homoj, kiuj jam komplete malfortiĝis : "Doĥadiagoj". La traduko estas proksimume "alproksimiĝulo", tio signifas : "iu proksimiĝanta al la mortaĉo" (Doĥadiago similas al homoj, kiuj en la naziaj koncentrejoj estis nomitaj "muzulmanoj"). Tiuj "doĥadiagoj" estis de siaj samsortanoj ĝenerale neglektataj kaj en la plej bona okazo de iu kompatataj, kvankam preskaŭ ĉiujn malliberulojn atendas la sama sorto - estiĝi "doĥadiagoj". Helpi al ili neniu povas. La "ĵulikoj" por tiuj trovis sloganon : "Mortaĉo vi hodiaŭ kaj mi mortaĉos morgaŭ".

Mi venis en staton, ke apenaŭ kapablis mi matene stariĝi de la kuŝejo, apenaŭ kapablis mi "tiri" miajn krurojn al la laboro kaj reen kaj mi apenaŭ kapablis iomete labori. Mi komencis ricevi nutraĵon laŭ la dekdua kaldrono, t.e. tricent gramoj da pano kaj iom da supo por la tuta tagokto. Mi havis sur la korpo multe da abscesoj kaj du abscesojn sur la manplatoj. Ĉiutage mi havis la konvinkon, ke tiu tago estas la lasta de mia vivo. Kelkajn fojojn mi iris al la kuracisto peti liberigon de la laboro por unu tago, sed neniel mi sukcesis iri al li. Li ĉiam komencis ekzameni la malsanulojn duonhoron antaŭ la eliro al la laboro kaj antaŭ lia pordo estis multaj atendantoj. Kiam aŭdiĝis la signalo por eliri al laboro, ĉiuj atendantoj antaŭ la pordo estis forpelitaj per bastonoj. "En la koncentrejoj oni devas labori kaj ne malsani aŭ ŝajnigi malsanulon", kriis ĉiam la pelantoj.

Unu fojon mi tamen sukcesis eniri al la kuracisto kaj montris al li la abscesojn sur la manplatoj. Li respondis : "Vere, ke vi labori ne povas. Mi eĉ scias pli bone ol vi, ke vi labori ne kapablas. Sed mi nenion povas al vi helpi. Se mi liberigos vin hodiaŭ, mi devos vin anstataŭigi ĉe la ĉarumo morgaŭ. Vi ne povas veturigi la ĉarumon, ankaŭ mi veturigi ĝin ne volas." Tiu klarigo estis por mi komprenebla. Intertempe mi eksciis, ke la kuracisto estas Volga-germano kaj kun mi li kuraĝis esti pli sincera ol kun aliaj.

Plejofte mi laboris komune kun alia "doĥadiago". Urĝi dum la laboro ni nek volis nek povis, la normon ni do ne plenumos, pli ol tricent gramojn da pano ni do ne ricevos. Komune ni povis pli facile ŝajnigi la laboradon por ne ricevi batojn de la brigadisto "ĵuliko".

Dum du tagoj mi laboris kun juna cigano, poste mia kunulo estis juna blankruso. Ambaŭ ni laboris per unu ĉarumo. La teron ni devis transporti ĝis ĉ. ducent metroj. Unu el ni ŝarĝis la ĉarumon kaj la dua ĝin veturigis, tiel ni povis multe ripozi.

Iun fojon venis al ni unu el la laborgvidantoj kaj vidinte, ke ni laboras ambaŭ per unu ĉarumo, li demandis nin : "Kiamaniere vi intencas plenumi la normon, se vi komune laboras per unu ĉarumo ?" "Sammaniere kiel ni plenumis la normon hieraŭ", mi respondis. "Ĉu hieraŭ vi plenumis la normon ?". "Ne, hieraŭ ni ankaŭ ne plenumis la normon", estis mia respondo. Li rigardis nin kaj foriris, certe pensante : "Doŝadiagoj, kion postuli de ili ?"

Ĉiu homo scias, ke li devos morti, tamen ĉe ĉiu homo ekzistas la volo vivi. Ĉiu homo penas aranĝi sian vivon laŭeble oportune kaj ĉiu strebas per sia vivo atingi ian celon. En la cirkonstancoj de la rusaj koncentrejoj kaj inter ili en "Peĉorlag" la homa menso formiĝas por io alia ol normalo. La konduto de tiuj homoj estis indiferenteco al ĉio. Multfoje estis la ĉefa deziro por la vivo, nur morti kiel homo kaj ne kiel pelita bestaĉo. Tia strebado estis esprimita de la homoj per diversaj deziroj. Iuj volus antaŭ sia morto nur vidi almenaŭ por unu momento iun el siaj proksimuloj. Multaj esprimis la deziron reveni almenaŭ por momento al sia loĝloko, urbo aŭ lando. Ĉe tiuj homoj, proksimiĝintaj al la pereco en tiaj mizeraj cirkonstancoj, la batalo por la vivo ŝanĝiĝas en batalon por pli digna morto, sed por tia morto neniam ŝanĉoj ekzistis.

En la tagoj, kiujn mi opiniis la lastaj de mia vivo, mi cerbumis pri la jeno : Eble postvivos la militon iu el miaj parencoj, certe ja ekzistos la movado de miaj ideaj kamaradoj ekster Rusio, kiamaniere mi povus al iu sciigi kiam kaj kie okazis mia pereco, sed, al kiu mi pri tio diru ? Kiun mi povas pri tio peti, se ĉiuj estas kandidatoj por la pereco sammaniere kiel mi ?... Vidinte ĉiutage ekskluzive la amasojn da mizeruloj, mia menso forlasis konkretajn realaĵojn kaj ĝi venis en staton de revoj, fantazioj. Mi imagis la rakontojn de la Biblio pri la sklavojo en la antikva Egiptio. Mi demandis min mem, ĉu iam aperos ia Moeso, kiu liberigos tiujn sklavojn ? Se tia iam aperos,

kiel fortaj estos liaj kapabloj detruu la potencon de NKVD ? Ĉu aperos iam inter tiuj malfeliĉuloj ia Stenko Razin, kiu ilin levigos por batalo al morto pli digna ol kiu atendas nun ilin ? Ega estus mia ĝojo kaj entuziasmo, se mi pereus en ia ribelo, sed ne kiel "doña-diago".

La abscesoj sur miaj manplatoj kun ĉiu tago pligrandiĝis. Plifortiĝis mia ĉiama kapdoloro. Iun matenon, mi venis al certiĝo, ke tiu tago estas definitive la lasta de mia vivo. Mi decidis fari ankoraŭ unu provon ĉe la kuracisto, peti liberigon de la laboro nur por unu tago - eble se mi ripozos ankoraŭ kelkajn horojn mia stato pliboniĝos... Eble tiam mi ne kredis en mia sukceso, mia provo celis eviti la riproĉon de konscienco, ke mi ne faris ĉion eblan por daŭrigi mian vivaĉon...

Hazarde aŭ feliĉe mi sukcesis resti antaŭ la pordo de la kuracisto, kiam ĉiuj aliaj estis forpelitaj. Mi eniris al la kuracisto kaj montrinte miajn manplatojn, mi nur demandis lin : "Ĉu ankaŭ nun vi ne rajtos min liberigi de la laboro ?". Li rigardis min silente, tion notis kaj diris : "Iru al la barako kaj venu al mi poste, kiam ĉiuj estos foririntaj". Tio signifis, ke mi estis liberigita de la laboro.

Kiam mi eliris el la kuracista baraketo, venis kontraŭ mi la kolonia ĉefo, ankaŭ koncentrejano, kaj diris : "Jeromo ! kial vi ne eliris al la laboro ?

- Kamarado ĉefo, mi estas de la laboro liberigita por la hodiaŭa tago.
- Kiun vi volas stultigi ? Ĉu vi pensas, ke vi estas en Polio, kie vi povis homojn stultigi ? Iru al laboro !
- Kamarado ĉefo ! mi estas liberigita de la laboro.
- Kiu liberigis vin ?
- La kuracisto.
- Iru al la laboro kaj ne stultigu min, plu ordonis la ĉefo.
- Kamarado ĉefo, vi povas iri al la kuracisto kaj kontroli mian liberigon, se vi ne volas al mi kredi."

Kiam ĉiuj estis foririntaj al la laboro, mi venis al la kuracisto. Li fortranĉis la haŭton de la abscesoj, ilin purigis kaj ordonis al la flegisto meti ian ŝmirajon kaj ĉirkaŭbendaĝis la manplatojn.

Eble tio estis hazardo aŭ feliĉo, religiulo sendube vidus en tio la agon de dia volo, ke li restu vivanta en tiu pereujo. En la momento, kiam mi aŭdis de la kuracisto, ke mi estas liberigita de laboro, leviĝis en mi espero, ke mi tamen evitos tiun mizeran mortaĉon aŭ minimume ĝin forigos por iom da tempo.

De la laboro mi estis liberigita por la venontaj tagoj. Mi ricevis manĝaĵon laŭ la dua kaldrono, same kiel mi plenumus 100 % de la labornormo. Ĉiutage la flegisto metis sur la ulcerojn la kuracilojn kaj la manplatoj komencis resaniĝi. Plej grave estis, ke min neniu pelis al la laboro per dikaj bastonoj.

La flegisto estis cigano, li parolis la polan lingvon relative bone. Li rakontis al mi, ke iam liaj gepatroj vivis en Polio kaj de tiam li memoras la polan lingvon. Tial ni ĉiam dum la flegado de miaj manplatoj iom babiladis. Interalie la flegisto al mi proponis, ke mi vendu mian mantrikitan jakon al la kuracisto, la saman jakon, kiun intencis forpreni de mi la "ĵuliko" en la malliberujo de Vologdo. Kontraŭ la jako li promesis al mi iom da pano kaj liberigon de la laboro por iom da tempo.

Kvankam estis al mi klare, ke la kuracisto pro sia helpo volis ankaŭ havi personan gajnon, mi tamen ne povis opinii, ke tio estis lia nura celo. Precipe mi ne povis havi pri li malbonan opinion post kiam mi unu fojon aŭdis lian parolon dum kunveno de kelkaj laborgvidantoj en lia ĉambro, kiu troviĝis en la konsulteja baraketo.

En la tendaroj ĉiuj estas nomataj laboristoj, tiel nin nomis ankaŭ nia ĉefo. Aŭdinte unu fojon tiun esprimon de la kolonia ĉefo dum kunveno de liaj kunlaborantoj, kiun ĉeestis ankaŭ la kuracisto, ĉi tiu rebatis: "Kiel vi kuraĝas tiujn homojn nomi laboristoj? Ili ja estas la plej malfeliĉaj estaĵoj kaj spite, ke mi vidas ilian mizeran pereon, mi per nenio povas al ili helpi."

En la gigantaj produktadoj kaj konstruaj planoj de la rusa registaro okupas la laboro en la tendaroj tre gravan pozicion. Spite ke la homoj en la koncentrejoj sub la regado de Stalin pereis amase pro mizero, la celo de la rusaj regantoj ne estas pereigi tiujn homojn. Ĉiu vivanta homon produktas kaj la mizera peceto da pano al neniu mizerulo estas donita sen iu ajn gajno por la ŝtato. Tial ekzis-

tas ankaŭ en la koncentrejoj sankontrolo aŭ medicina prizorgado.

Vere, la kuracistoj en la tendaroj povas havi la plej sinceran volon kaj faras laŭ siaj ebloj ĉion por savi la homojn de la amasa mortado. Sed kion povis fari kuracistoj en kolonio de mil homoj, kie la plimulto estis fakte malsana, sen la necesaj medikamentoj kaj en tiaj mizeraj cirkonstancoj? Mi rimarkis kelkajn ekzemplojn, kiam la kuracistoj en siaj senhelpaj situacioj anstataŭigis kuracadon per sugestiaĵoj. Unu fojon la kuracisto alportis kelkajn paketojn de t.n. "frukta teo" kaj li donis po peceto al la homoj, kiuj venis al li esti esploritaj kaj kuracitaj.

De tempo al tempo la kuracisto ricevis kelkajn skatolojn da piloloj de vitamino C. Tiam li donis al ĉiuj malsanuloj po du pilolojn de vitamino C. Kiam la piloloj estis donitaj, li verŝis kelkajn gutojn de ia fluaĵo el botelo en glaseton kaj en ĉeesto de la malsanulo li tion miksis kun iom da akvo, ke la malsanulo tion trinku: tio devis kuracadi homojn, kiuj apenaŭ spiras.

Mi rimarkis ankaŭ, ke inter la koloniaj ĉefoj - laborgvidantoj kaj kuracistoj - okazis ĉiamaj malakordoj. Ili plenumigu la laborplanon indifere, ĉu la homoj kapablas labori aŭ ne.

La kuracistoj devis gardi, ke tiuj vivantaj homaj ombroj mortu kiel eble malpli. La kuracistoj rajtis liberigi de la laboro du procentojn de la ĝenerala nombro da homoj en la kolonio, sed ili ĉiam volis liberigi kelkajn homojn pli. La laborgvidantoj postulis, ke kuracisto nenium liberigu.

Por malpliigi la amasan mortadon, okazis de tempo al tempo esplorado de la laborkapableco de la homoj. Dum la tempo, kiam mi estis liberigita de la laboro venis al la kolonio kuracisto de la distrikto kaj ekzamenis certan nombron da homoj laŭ la rekomendo de la surloka kuracisto. Rekomenditaj por ioma ripozo estis la plejegaj "doŭadiaĝoj".

Rezulte de tiu kontrolo oni liberigis de laboro okdek homojn. Oni dividis ilin en kategorioj sub la nomo: "malfortaj grupoj". Unu grupo devis labori, sed sen normo. La dua grupo estis de la laboro komplete liberigita.

Al la dua grupo venis ankaŭ mi.

La liberigo validis por du semajnoj. Ni, la liberigitoj konsistigis tridekmembran apartan brigadon sub estrado de la kuracisto.

Dum la unuaj tagoj de nia liberigo ni havis trankvilon. Kvankam malsataj, ni tamen estis kontentaj, ke neniu nin pelis al la laboro per bastonoj, neniu nin insultis, kvankam inter ni la kvereloj estis sufiĉe akraj pro la justa disdonado de la pano kaj supo.

En Rusio, la pano estas plejofte bakita en ladaj ujetoj. Partoj de pano ĉe la vandoj estas pli sekaj, do ili enhavas pli da faruno ol la mezaj partoj de la pano. Inter la ĉiutagaj revoj ĉe la malliberuloj gravan lokon okupas la havigo de panporcio ĉe la vandoj.

La panon ni ricevis de la magazeno jam porciite kaj ĉiu porcio havis la saman pezon. Tamen ĉiu opiniis, ke la propra porcio estas pli malgranda ol la aliaj. Precipe, ĉiu volis havi ĉevandan panon. La samo okazis dum la disdonado de la supo. Ofte la supo konsistis el makaroniaĵoj aŭ sekigitaj terpomoj. Tiuj produktoj tamen malabundis en la supo, estus pli ĝuste nomi tiujn supojn akvecaj, sed iomete da makaroniaĵoj en ĝi troviĝis. De la kuirejo venis la supo en granda ujo kaj ni disdonis ĝin inter ni. Ĉiu opiniis, ke la aliaj ricevis en la supo kelkajn pliajn makaroniajn fadenojn aŭ pecetojn da terpomoj kaj en tio ni kulpigis la disdonantojn. Fine ni decidis por ĉiuj disdonadoj alian sistemon, sed neniu formo kontentigis ĉiujn.

Tri tagojn post la ripozkomenco la kolonia ĉefo komencis nin nomi : parazitoj, manĝantoj de soveta pano sen ia utilo (tiaj esprimoj estas populare aplikataj de diversaj "politruktoj"). Ni eksciis pri okazintaj, ne tro amikaj interparoloj de la ĉefo kun la kuracisto.

La ĉefo postulis, ke ni iru al la laboro, ĉar la laborplano fiaskos sen nia kontribuo. La kuracisto ne konsentis nin sendi al la laboro. Ankaŭ li havis fortan argumenton, ke li ne rajtas ŝanĝi la decidon de la supera kuracisto.

Ĉiuokaze la ĉefo komencis eksciti ĉiujn kontraŭ la kvardek parazitoj, kiujn "li devas nutri" per produktoj ricevitaj por aliaj. Fakte sub tiuj ekscitoj kaŝiĝis pli lia malamo al la kuracisto ol lia ŝajna soveta patriotismo.

Kiam tiuj ekscitoj ne klinis la "obstinan kuraciston"

sendi la "senutilajn parazitojn" al la laboro, la ĉefo aranĝis kunvenon de ĉiuj laboristoj.

Priparolinte la ĉiaman tedan aferon dum centmiloj kaj milionoj da kunvenoj, ke la laborplano ne estas plenumita kaj ke estas necese labori pli streĉe ol ĝis nun, la ĉefo ankaŭ ne estis konciza en vortoj kontraŭ ni. Li deklaris: "Per la manĝigo de tiuj kvardek parazitoj mi faras duan krimon kaj eble pli grandan ol la antaŭan". Interalie li klarigis al la "laboristoj", ke la monata laborplano estis kalkulita kaj fiksita per la partopreno de ĉiuj homoj en la kolonio. Kaj se kvardek homoj ne laboras, tial la ceteraj laboristoj devos labori multe pli por plenumi la planon.

Supozeble la ĉefo estis antaŭ sia aresto ia aktiva partiano kaj "konscia" komunisto kaj tiaj neniam atentis ian etikon aŭ rimedojn en la batalo rilate al siaj kontraŭuloj.

Verŝajne okazis fine ia interkonsento de la du kontraŭbatalantoj, ĉefo kaj kuracisto. Iun matenon, kiam la ceteraj laboristoj jam foriris al la laboro, oni kunvokis nin sur la placo. La kuracisto al ni deklaris, ke malgraŭ ke ni estas de la laboro liberigitaj, de la hodiaŭa tago ni devos labori. Sed ni ne estos senditaj al la elfosado, ni faros nur diversajn laborojn interne en la zono kaj ankaŭ laŭ niaj laborkapabloj. Sciante, ke ni mem komprenas, kiu kaŭzis nian labordevon, li fine aldonis: "Mi estis devigita fari tiun decidon, por eviti la ĉiamajn kverelojn, kiujn mi ĝis nun havis kun la ĉefo."

Komence nia laboro estis ordigi la zonon, tiel tio nomiĝis. Ni elfosis la trunkojn de la kolonia placo, ĉar dum la aranĝo de la zono ne estis por tio tempo. Ĉirkaŭ la zono ni fosis defluejojn kaj simile. Kiam tiu laboro estis farita, ĉiu el ni ricevis konstantan okupon.

Al la ŝu- kaj vestaĵ-riparejo oni sendis min. En tiu "riparejo" laboris du ŝuistoj por la kontoristoj. Mi funkciis kiel tajloro por ripari vestaĵojn por la samaj. Multe da laboro mi ne havis. Mi supozis, ke tiun funkcion mi ricevis laŭ rekomendo de la kuracisto, ĉar mi estis unu el la plej aĝaj "doŝadiagoj".

En Peĉorlag, same kiel en multaj aliaj grandaj koncentrejoj, ni estis komplete izolitaj de la mondo. Neniu ricevis leteron kaj praktike neniujn leterojn elsendis. En la distriktaĵaj administrejoj funkciis laŭtparoliloj per kiuj oni povis aŭdi nur Rusion kaj aŭdi la elsendojn povis nur kelkaj homoj tie laborantaj.

Vere, en tiu regiono aperis malgrandformata dupaĝa gazeto sub la titolo "Severnaja Pravda" (La Vero de la Nordo), ĝi aperis du aŭ tri fojojn semajne kun mencio: "La gazeto estas nur por la liberaj loĝantoj en tiu regiono". Dum mia kelkmonata restado en Peĉorlag, mi tiun gazeton ricevis du fojojn de la normisto kun peto al neniu ĝin montri.

"La Vero de la Nordo", same kiel la miloj da gazetoj aperantaj en Sovetunio enhavis raportoĵojn pri la planplenumo, priskribojn de laboro en iu kolĥozo, kelkajn registrajn ordonojn kaj partiajn decidojn.

Fakte interesiĝis pri la politikaj okazintaĵoj en la mondo nur la homoj el la teritorioj, kiujn "liberigis la Ruĝa Armeo", t.e. poloj, baltoj, rumanoj. La plimulto da rusoj, kiuj spertis la severan diktaturon de sia ŝtato, komplete malhavis ian kredon aŭ esperon, ke iam povos okazi iaj ŝanĝoj por ili. Iliaj ĉiamaj revoj estis nur akiri iomete pli grandan pecon da pano kaj iom pli da supo. La rusoj interesiĝis nur pri kio okazas en sia kolonio kaj brigado, ĉu ĝi plenumis la labornormon aŭ ne.

Sed kvankam ni troviĝis en la sama mizero, ni komprenis, ke la okazintaĵoj en la mondo povas decidi pri nia sorto, ĉar ni ne estas rusoj.

Laŭ niaj ebloj ni klopodis per interparoloj kun la kontoristoj kaj kun la soldatoj ricevi informojn pri okazintaĵoj en la mondo, eĉ informon la plej koncizan.

Jen ni eksciis, ke antaŭ kelkaj tagoj oni forprenis el la distriktaĵaj kontoroj la laŭtparolilojn, la kontoristoj ne sciis kial. Estis por ni klare, ke okazas io eksterordinara. Post kelkaj tagoj atingis nin la novaĵo - per la radiparoliloj reportitaj al la kontoroj - pri la milito inter Germanio kaj Rusio.

Laŭ la kutimo la rusaj kontoristoj baldaŭ rakontis pri grandegaj rusaj venkoj. Kiam mi demandis la normiston kiel sekvas la milito, li respondis: "La subita atako donis al la germanoj certajn sukcesojn dum la unuaj tagoj.

Sed kamarado Stalin ordonis al la armeo forpeli la germanojn de niaj teritorioj en la templimo de sepdek du horoj. Tuj estis elsendita kvaronmiliono da aviadiloj kaj la tuta germana armeo estos detruita dum la tempo laŭ la menciita ordono."

Soldato, kiu venis al la ŝuriparejo por babilado, komprenigis al ni, ke la germanoj malvenkos, ĉar kamaradoj Marks kaj Lenin diris, ke en la milito inter la faŝistoj kaj la komunistoj venkos la komunistoj.

Iun tagon mi iel ricevis la regionan gazeton por mi malpermesitan. Ĝia dato estis de la dua semajno post la militkomenco. En ĝi troviĝis raportoj pri defendbataloj en la regiono Plock kaj en regionoj aliaj, kiuj apartenis al Rusio antaŭ la invado en Polion. La gazeto enhavis ankaŭ opinion de germanaj militkaptitoj, kiuj taksis la atakon de Hitler kontraŭ Sovetunio frenezaĵo. Kvankam la gazeto estis malnova, tamen estis por mi klare, ke la milito ne okazas por la rusoj sukcesbrile kiel oni rakontas en la tendaro.

* * *

Venis ordono dissendi la homojn al aliaj koloniĵoj. "Nian" kolonion plenigos novvenintoj al la tendaro. Intertempe forpasis la du semajnoj de mia liberigo de la laboro. Nia tuta malfortula brigado estis forsendita kune al zono, kiu situis ĉe ia rivero. La fervoja ponto trans tiu rivero ne estis finkonstruita kaj en tiu loko troviĝis nutrajmagazenoj, ĉar la trajnoj ne povis veturigi la nutraĵon pli malproksimen kaj ĝi devis esti tie malŝarĝita.

Dum ĉiu tagnokto venis po du aŭ tri trajnoj da nutraĵo. De tie la nutraĵo estis transportita per kamionoj al la pli malproksimaj kolonioj trans la provizora ponto. Tie ni devis streĉe labori, tamen ni estis de tiu laboro kontentaj. Ni povis ĉiam ŝteli iom da faruno aŭ grio kaj veninte "hejmen" ni kuiris densan kaĉon. Vere, estis malpermesite kunporti hejmen iujn ajn produktojn, de tempo al tempo la soldatoj ankaŭ serĉis, ĉu iu ion ŝtelis, sed ili serĉis tiamaniere por trovi nenion, ni vivis sataj du semajnoj.

Intertempe la fervoja ponto estis konstruita ĝis la grado, ke la trajnoj ekveturis sur ĝi. Dum kelkaj tagoj

la amaso da grio estis forveturigita. Nia kolonio estis denove sendita kelkdek kilometrojn antaŭen al la nordo.

Dum nia irado laŭlonge de la fervojo veturis unu fondon trajno, kiu havis grandan portreton de Stalin antaŭen sur la lokomotivo. Apud mi paŝanta junulo entuziasmiĝis pri la portreto kaj vokis: "Ho! Kamarado Stalin! Mi iros al li peti de li panon."

La tuta kolonia havaĵo, laborinstrumentoj kaj mebloj, estis transportita per ŝarĝaŭtomobiloj. Ni, la homoj, piediris du tagojn por veni al la nova loko.

En la por ni nova zono troviĝis neniam barakoj, ni devis konstrui. Laŭ la kutimo en tiuj lokoj restis en la zono nur unu aŭ du brigadoj por la barak-konstruado, la ceteraj devas konstrui la fervojon. La brigado por la barakkonstruado estis nia, "la malfortula, la doŝadiagoj". Kelkaj preparis en la arbaro la lignaĵojn, faligis kaj senbranciĝis arbojn. Aliaj portis la lignaĵojn por la konstruo al la zono kaj kelkaj homoj starigis stangojn por grandaj tendoj.

Ĉirkaŭ unukilometra vojo, sed preskaŭ tute marĉa, disigis la arbaron disde la zono. Mi estis inter la portantoj. Inter ni troviĝis la junulo, kiu entuziasmiĝis pri la portreto de Stalin. Tiu juna rusoj havis apenaŭ dekok jarojn. Lia puno estis eksterordinare malgranda - du jarojn. Mi ankoraŭ ne renkontis en Peĉorlag unu homon kun tiel milda kondamno. Dekok monatojn tiu junulo pasigis en la tendaro, ĉiam li ĝojis, ke la tempo por lia liberigo estas proksima. Kompare kun samaĝuloj li estis tre ĝentila. Neniam li ŝtelis, neniam li ofendis aŭ insultis. Li aspektis eĉ iom naiva por la rusaj cirkonstancoj kaj precipe por la loka vivo. Mi intencis kun li amikiĝi kaj doni al li la adreson de mia edzino, ke li skribu al ŝi post la liberigo.

En la tago, kiam ni portis la ŝtipojn, tiu junulo sentis sin malsana, pli malsana ol ni ĉiuj. Matene li iris al la kuracisto peti liberigon de la laboro por unu tago, sed la kuracisto estis for. Tiu junulo estis pelita al la laboro. Dum la portado li ĉiam restis la lasta kaj je longa distanco de la ceteraj portantoj. Tio furiozigis la soldaton nin gardantan, kiu estis inter la plej rigoraj. La soldato komencis lin insulti

kaj minacis mortpafi la junulon, se tiu ne paŝos kune kun la ceteraj portantoj.

"Mi estas malsana ! Ĉu vi tion ne komprenas ? Matene mi estis ĉe la kuracisto peti liberigon, sed la kuracisto estis for", klarigis kelkajn fojojn la junulo.

"Mi absolute ne devas scii, ĉu la kuracisto estis for aŭ ne. Se vi ne havas la liberigateston de la laboro, vi devas labori, same kiel la ceteraj", respondis ĉiujfoje la soldato.

"Mi ne povas paŝi samrapide kiel la ceteraj. Mi estas malsana. Mortpafu min, se vi tion volas".

Aŭdiĝis pafo. La junulo falis sur la marĉon. La soldato nin akompanis al la zono. Irante la sekvantan fojon al la arbaro la soldato ordonis kunpreni du fosilojn, post duono da horo la junulo estis enterigita. Dum la ricevo de la tagmanĝo, kelkaj homoj inter si kverelis, ĉiu el ili opiniis sin rajtigita ricevi la tagmanĝon de la mortpafito.

Iun matenon, komencante la laboron, iu junulo sidigis kaj diris, ke kaptis lin stomakaj doloroj, ke li ne povas labori. Ĉar la multfoja ripetado de la brigadisto vokinta lin al la laboro ne helpis, la brigadisto lasis lin trankvila. Post ioma sidado, la junulo antaŭe sidinta kuŝigis. Baldaŭ li komencis ruliĝi kiel serpento. Li mordis la teron, gratis ĝin per siaj fingroj kaj ruliĝis. Estis terura bildo. Kelkaj pli maljunaj homoj sin turnis al la soldato, ke li permesu al tiu homo iri al la zono. Al ĉiuj la soldato respondis : "Mi ne estas kuracisto, mi ne povas lin ekzameni, mi ne scias, ĉu li fakte estas malsana aŭ tiun malsanon simulas".

Post iom da tempo la junulo trankviliĝis kaj restis kuŝanta sur la tero. Iamaniere sciigis pri tio ankaŭ la kuracisto, li venis per ŝargaŭtomobilo kaj kunprenis la junulon. Kien ? Neniu interesiĝis.

"Por la junuloj ĉe ni ĉien la vojoj liberaj."

Mi ne scias lian aĝon, nek lian nomon, eĉ lian vizaĝon mi ne konis, malgraŭ ke li estis mia najbaro sur la kuŝejo. Mi vidis lin nur kiel silueton en la duonmalluma barako kiel en krepusko. Lia vizaĝo similis aliajn barabajn vizaĝojn. Lia silueto estis same ĉifoneca kiel la

ceteraj en la barako kaj en Peĉorlag. Nur unu fojón mi ekatentis lin. Reveninte de la laboro, mi kuŝiĝis laŭkutime. Li envenis, kuŝiĝis apud mi sur sia ventro kaj komencis suĉi oston kiel hundo. Mi rigardis en lia direkto. Pro la mallumo mi ankaŭ tiam ne vidis lian vizaĝon. Post ioma suĉado li elprenis inter siaj ĉifonvestoj ankoraŭ unu oston kaj ankaŭ ĝin suĉadis, suĉadis kaj mordadis kiel hundo. Li eltiris ankoraŭ unu oston, sed mi ekdormis, mi ne havis la feliĉon trovi ie ostojn.

Iun matenon aŭdiĝis en la barako krioj. Mi elrampis el la kuŝejo por rigardi kio okazas. Kelkaj "ĵulikoj" per dikaj stangoj batadis iun. Neniu kuraĝis al ili proksimiĝi. Estis klare, ke ili volas mortigi tiun homon, sed kial? Versajne iu kuris al la soldata baraketo kaj tion rakontis, ĉar baldaŭ venis du soldatoj. La "ĵulikoj" tuj malaperis. Sur la tero kuŝis maljuna polo, mallaŭte ĝemanta. Oni baldaŭ forportis lin. Kien?... Poste venis al niaj oreloj, ke tiu maljuna homo ŝajne havis ĉe si kaŝitajn valoraĵojn kaj tion sciis la "ĵulikoj". Mi ne certigis, ĉu tio estis vero, eble li fakte havis ion valoran, sed la "ĵulikoj" komencis lin bati per la stangoj ĉar li onidire ŝtelis porcion da pano de unu el iliaj kamaradoj. "Por la maljunuloj ĉe ni la honoro."

Iun vesperon, kiam la dumnokta laborgrupo estis sur la placo, oni elektis ĉ. cent homojn, ankaŭ min, ke ili restu. Kiam la ceteraj foriris al la laboro, ni estis dividitaj en du grupoj, kaj forsenditaj. Intertempe ni eksciis, ke unu grupo estas sendata por iom da tempo al "sovĥozo" (ŝtata agrikultura entrepreno). La dua grupo estas ankaŭ sendata por iom da tempo al kolonio, kiu preparas ŝtipojn por la fervojo.

Laŭ la ĝenerala kutimo por tiaj homfarsendoj oni ĉiam elektas la plej nedeziratajn laboristojn. Ekzemple, tiujn, kiuj per diversaj pretekstoj penas ne labori, aŭ fakte labori ne kapablas. La forsendo estas ankaŭ en certa grado dependa laŭ kiu paragrafo oni estis punita. Ekzemple, plej deca estas verdikto, laŭ la paragrafoj en la tendara lingvo "Bitovie"-krimoj la plej ordinaraj- familiaj kvereloj, spekulado, ŝteladoj k.s. Iom pli maldecaj estas kondamnoj pro huliganeco. Pli maldeca estas banditismo. Sed la plej

maldecaj estas la kondamnoj pro kontraŭrevoluciismo. Ankaŭ nia selektado por la forsendo certe okazis laŭ tiuj principoj. Elektitaj estis unuavice la "doŭadiaĝoj".

Post la paŝado de kelkaj kilometroj sur krutaj vojetoj, ni venis al la "sovĥozo". Tie restis unu grupo. Mi apartenis al la taĉmento, kiu devis iri al preparo de lignaĵoj. Ni eniis la restintojn en la "sovĥozo". Iuj eĉ opiniis, ke ĉe agrikultura laboro ili certe havos luksaĵojn - lakton, ovojn - sed en la plej malbona okazo ili havos sufiĉe da terpomoj kaj ne tre streĉan laboron.

Kiam ni venis al la loko fiksita por ni, jam estis ĉirkaŭ noktomezo. Ĉe la enirejo ni atendis alvenon de nia nova mastro por akcepti nin kaj nin enlasi al sia kolonio. Kiam li venis, komenciĝis kvereloj inter nia akompananto kaj li. Ambaŭ tiuj mastretoj estis junuloj kaj ambaŭ volis sin prezenti gravuloj.

La nova mastro per aroganta voĉo havis jenajn pretend-ojn : "Unue mi ne povas akcepti homojn dum nokto. Mi devas ilin vidi en la taglumo por kontroli, ĉu ili estas laborokapablaj. Due, mi devas kontroli la dokumentojn de tiuj homoj, por scii, laŭ kiuj paragrafoj ili estis punitaj. Mi volas scii ankaŭ, ĉu inter ili troviĝas longjaraj punitoj, pri tiaj mi ne volas havi la respondecon. Sed precipe, ĉe ni oni laboru, ni devas havi homojn laborokapablajn kaj laboremajn". La lasta argumento estis certe originala - homojn laborokapablajn kaj laboremajn ĉu li ĝenerale trovos tiajn en Peĉorlag ?

Nia malnova mastro, kiu nin akompanis, volis plenumi sian taskon, nin lasi kaj foriri. Li komencis blufi pri niaj virtoj, ke ni ĉiuj estas "bitovikoj" - simplaj krimuloj, tre laboremaj ktp.

La nova mastro komencis nin ekzameni en la mallumo. Li demandis la unuan : "Ĉu vi estas sana ? Ĉu vi volas labori ? Sed sciu, ke ĉe ni oni devas labori kaj ne trompi."

La ĝenerala opinio dum la vojo al la kolonio estis, ke en tiu tendaro, al kiu oni nin alkondukos, ni devos streĉe labori. Kiam la unua demandito aŭdis tiajn demandojn, li respondis : "Ho, mi havas malsanan koron kaj

streĉan laboron ne povas fari".

Li demandis la duan : "Ĉu vi estas sana ? Ĉu vi volas labori ?" - "Ho, ne! Mi havas malsanon en miaj kruroj, por streĉa laboro mi ne taŭgas".

Li demandis la trian en la vico : "Ĉu vi estas sana kaj ĉu vi povas labori ?" - "Ho ne, mi estas reŭmatisme malsana kaj la streĉan laboron mi absolute ne povas promesi".

Similajn respondojn pri sia "laboremo" donis ankoraŭ kelkaj demanditoj. La nova mastro per aroganta voĉo ek-kriis : "Nu, kiajn homojn vi alvenigis al mi ? Ili labori nek volas nek povas. Ili do estas ĉiuj "doŭnadiagoj"." - "Vi diras, ke ili estas doŭnadiagoj. Ili ja estas ĉiuj "staŭnanovanoj". Ĉe elfoslaboroj ili faris po 150% de la normo. Kaj kia laborgvidanto vi estas, se vi demandas ilin, ĉu ili volas labori ? Certe, ke ili ne volas. Ĉu iu volus labori, se li ne estus al la laboro devigita ? Via tasko do estas ilin ne demandi, sed devigi al laboro".

La nova mastro rigardis en la okulojn de siaj novaj "laboristoj" kaj elektis inter ili 30 homojn, la ceterajn li akcepti ne volis. Inter la elektitoj estis ankaŭ mi.

Nia unua laboro en la nova kolonio estis elpreni ŝtonojn el ia rivereto, malprofunda, sed larĝa. Tra tiu rivereto oni flosigis ŝtupojn kaj ni elportis la grandajn ŝtonojn, por ke ili ne haltigu ilin.

Ĉe tiu laboro ni estis ĉiuj "rekordistoj". Ni havis propran brigadiston kaj propran mezuriston, ambaŭ malnovaj tendaranoj sciis la metodojn de bona raportado pri la faritaj laboroj kaj ni ricevis manĝaĵon laŭ la tria kaldrono. Por mi tiu laboro estis speciale bona. Starado kun la nudaj piedoj en la akvo kuracis ties abscesojn alimaniere nekuraceblajn.

Ni renkontis ankaŭ la homojn, kiuj estis senditaj al "soŭflozo". Ilia laboro estis kolekti fungojn kaj mirtelojn, kompreneble laŭ normo, kiujn ili neniam povis plenumi. Krom la kolektado de fungoj kaj mirteloj, ili ankaŭ forprenis ŝelon de betulaj arboj kaj dum pluvtagoj ili plektis bastŝuojn. Manĝaĵon ili ricevis malmulte kaj anstataŭ la atenditaj luksaĵoj kaj multe da terpomoj ili troviĝis en pli granda malsato ol ĉe la fosadoj.

Kiam la kolonia ĉefo havis raportojn pri granda nombro da eltiritaj ŝtonoj kaj sufiĉe profundigis la rivero, nia brigado estis sendita al loko, kie la kolonio havis "laborpunkton". Tie estis faligitaj arboj, de kiuj oni preparis ŝtipojn.

Iun matenon ni ricevis panon por la sekvonta tagnokto kaj instrumentojn - segilojn kaj hakilojn. Ni piediris kelkajn horojn sur vojetoj nur por piedirantoj, laŭ montoj, valoj, arbaretoj kaj riveretoj. Fine ni atingis la destinitan lokon por ni. En tiu loko troviĝis nur du kavernoj por loĝejoj. En unu kaverno kelkaj soldatoj, en la dua loĝis kelkaj tendaranoj. Manĝaĵo venis de la kolonio ĉiun duan tagon. Ni preparis por ni laŭbojn el branĉoj.

Dumnokte venis pluvego, ĝi baldaŭ trapenetris la branĉojn kaj nin malsekigis. Ni ne havis sekan pecon da tero ne nur por kuŝi, sed ankaŭ lokon por ŝirmi nin de la pluvo eĉ starante.

Niaj malgrasaj korpoj devis ankaŭ sekigi la dikajn ĉifonojn, kiujn ni surhavis...

Venontan tagon ni iris al la arbaro pli internen por faligi la plej dikajn arbojn. La laboro en la arbaro estis en Peĉorlag taksata la plej bona. Kutimo estis jena: se oni venas al la arbaro, oni tuj aranĝas fajrujoj, eĉ en somero dum varmegaj tagoj. Ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ la fajro kaj babilante forigas de si pedikojn. Tiu okupo okazas dum preskaŭ ĉiuj ripozoj.

Fari la labornormon en la arbaro estas facile per simpla trompo. Ĝenerale oni duope aŭ trioje laboris ĉe la arbofaligo. La grupoj troviĝis dise kaj la brigadisto devis ĉiam iri kaj kontroli la laboron. Kiam la grupo faligis kelkajn arbojn, ĝi povis trankvile ripozi, sen timo ne plenumi la normon.

La ĉiam iranta brigadisto venis kun tabuleto, kiu anstataŭis paperon. Sur la tabuleto li notis la faritan laboron kaj per dika kraĵono signis ion sur la trunko kaj sur la ŝtipo. Tio signifis, ke tiuj unuoj jam estis mezuritaj kaj notitaj de li. Kiam la brigadisto estis for, oni forsegis maldikan tavolon de la trunko kaj de la ŝtipo, kie estis la signoj, tiel ĉiu faligita arbo estis mezurita tri aŭ kvar fojojn kaj ni estis rekordlaboristoj. La brigadistoj kaj la administrantoj konas tiujn trompojn, sed taksas ilin afero tute normala. Tiu ĝojo daŭris por ni

apenaŭ tri tagojn.

La kvaran tagon, post tagmezo venis la mezuristo rajdante sur ĉevalo kaj diris al mi : "Lasu la laboron kaj sekvu min." Mi demandis : "Kien ?" - "Ankaŭ mi ne scias, sed ni baldaŭ scios".

Li kunvokis ankoraŭ kelkajn, kune ni estis ok homoj, li gvidis nin al la zono. Tie jam atendis nin soldato, li ordonis preni siajn havaĵojn kaj sekvi lin.

Estis jam mezo de aŭgusto kaj tiam komenciĝas en tiu regiono la aŭtuno. Dum tago la vetero ŝanĝiĝas kelkajn fojojn kaj ofte venas pluvoj aŭ pluvetoj. La soldato nin gvidis reen al la ĉefa zono. De li ne eksciis, ke la resendo okazas, ĉar ni estas kondamnitaj pro la kontraŭrevolucia agado kaj la komandanto timas sendi nin por laboro en la arbaro, kie la kontrolo estas malfacila.

Dum la irado laŭ la kotaj vojetoj kaj riveretoj, akompanis nin pluvoj. Ĉirkaŭ noktomezo ni atingis la zonan. Ni estis lacegaj kaj malsategaj, la ĉifonoj sur ni malsekaj. Ion por manĝi ni esperis en la zono.

Kiam la soldato anoncis nian alvenon al la kolonio, la laborgvidanto demandis al li : "Pro kia diablo vi ilin revenigis al mi ? Ilia laboro troviĝas ja kie ili estis". La soldato dismetis la brakojn, ridetis, sed nenion respondis. La laborgvidanto eligis sian malicon al ni. "Kial vi revenis ? Mi absolute ne volas vin havi ĉe mi. Prenu la homojn kaj gvidu ilin reen", li diris al la soldato.

Kompreneble, post tia "bonvensaluto" estis sencece demandi pri la vespermanĝo, kiun ni rajtis.

Enveninte en la barakon, mi volis stariĝi ĉe la hejto-forneto por iom varmiĝi kaj sekigi kelkajn ĉifonojn sur mi, sed vane. La forneton ĉirkaŭis kelkaj malnovaj koncentreĵanoj, kiuj jam delonge malhavis ian homan kompaton. Ilia devizo estis : "Mortaĉu vi hodiaŭ kaj mi morgaŭ". Kuŝiĝinte inter homoj de kiuj eliĝis abomena odoro, mi eksentis kápdoloron kaj tremis pro malvarmo. Diri al iu pri tio estis senutile, neniu ja povus al mi helpi.

Matene mi apenaŭ stariĝis, aŭ pli ĝuste starigis min la timo ricevi kelkajn bastonajn batojn. Kiam ni estis post la matenmanĝo vokitaj al la laboro, la soldato ordonis, ke ni, la ok homoj, venintaj dumnokte, restu sur la

placo.

Kiam la ceteraj foriris al la laboro, venis al ni la komandanto - junulo laŭaspekte iom pli ol dudekjara. En la manoj li havis liston kun niaj nomoj kaj nin kontrolis. Li demandis ĉiun : "Pro kio vi estas punita ? Per kiom da jaroj ?" Poste li turnis sin al ni per rigida voĉo : "Kaj vi volis, ke mi lasu vin labori en la arbaro ? Mi prefere vin ĉiujn mortpafos, sed al la arbaro mi neniam tiajn homojn allasos. Reiru al la barakoj, por ke mi ne vidu vin plu", estis liaj lastaj vortoj. La solida komandanto ne volis havi en sia kolonio kontraŭ-revoluciistojn, sed homojn honestajn, ŝtelistojn, huliĝanojn kaj banditojn aŭ similajn.

En la barakoj ni longe ne atendis. Baldaŭ oni vokis kaj rekondukis nin al nia antaŭa kolonio, al la terfosado. Tie ni denove eklaboris en la dumnokta grupo. Poste, disvastiĝis onidiroj, ke la poloj estos liberigitaj el la tendaroj, ĉar okazis alianco inter la pola kaj soveta registaroj kontraŭ Germanio. Ni penis ĉiamaniere kontroli la veron de tiuj onidiroj, kvankam ĝi estis por ni tute logika, sed vane. Pasis pli ol du semajnoj kaj nenio oficiale estis al ni komunikita, ni komencis dubi pri tio. Iuj eĉ aplikis la pollingvan proverbon : "Tio estas tro belega por esti vera".

Tiuj onidiroj tamen ne ĉesis. Ni provis pri tio demandi la soldatojn. Ili nek konfirmis nek kontraŭis. Ni tamen akiris ian informon neoficialan, ke nia liberigo fakte okazos.

Malgraŭ, ke ni atendis la liberigon, oni ĉiutage pelis nin al la laboro kun la aliaj kaj sammaniere.

La nombro da "doŭadiagoj" en la kolonio ĉiam kaj ĉiam multiĝis. Dum iu nokto venis al la trako (tiel estis nomita la tereno por la fervojaj reloj) la edukisto. Li faris laŭtan paroladon kun jena kalkulo kaj konkludo : "Inter la pli ol kvarcent homoj en nia dumnokta laborgrupo plenumas la normon nur ĉ. kvindek homoj. Pli ol kvindek homoj ricevas manĝaĵon laŭ la dekdua kaldrono, tio signifas, ke ili ne faras eĉ 25 % de la labornormo. Preskaŭ tridek homoj ĉiutage kaŝiĝas en la barakoj kaj per diversaj manieroj komplete rifuzas la laboron.

Laŭ tio ni devas konstati, ke en la tendaro troviĝas

sabotistoj, per io alia ni ne povas klarigi tian staton. Tiuj sabotistoj estos sendube trovitaj kaj ili ricevos la merititan punon. Sed estus plej bone eltrovi ilin kiel eble plej rapide. Mi volas, ke ĉiu, kiu havas ian suspekton pri la sabotistoj, rakontu tion al mi, ju pli rapide la sabotistoj estos trovitaj, des pli bone estos por la ceteraj en la kolonio".

Ĉu li fakte estas tiel stulta por kredi en tio, kion li parolas, mi pensis, aŭdante lian paroladon. Sed tuj post la parolado la edukisto havis amikajn interparolojn kun la "laboristoj", li aspektis eĉ simpatia. La afero estis klara : lia parolado celas plenumi lian laŭofican labortaskon kaj li agis laŭ la ordono.

TUFTAF

En la tendaroj ŝvebas kiel fantomo super la laborgvidantoj la vorto "Tuftaf!" (Tiu vorto estas tendara slango, ekster la tendaroj mi neniam aŭdis ĝin). Tia vorto signifas : raportitajn laborojn, kiuj ne estis faritaj. Ekzemple : ĉe la elfoslaboro estis necese forigi parton de monto, kiu havis dekmil kubometrojn da tero. Dum la labordaŭro venas ĉiutage raportoj kiom jam estis elfosite. Kiam laŭ la raportoj estas jam elfositaj la dekmil kubometroj, oni vidas, ke fakte restas ankoraŭ kelkmiloj da kubometroj ne elfositaj. Similaj okazaĵoj ekzistas en ĉiuj terenoj.

Tiu "tuftaf" kreskas ĉiutage kaj haltigi ĝin ne eblas. La kontrolon faras la mezuristoj kune kun siaj brigadistaj kolegoj. Ili ambaŭ scias sufiĉe bone, ke la homoj ne kapablas plenumi la normojn, eĉ per la plejegaj streĉoj de siaj fortoj. Sed ili ne volas havi malbonan opinionon, ke iliaj laboristoj ne plenumas la normojn kaj ili ankaŭ ne intencas kaŭzi redukton de la porcio de jam malsataj laboristoj.

Tiuj mezuristoj kaj brigadistoj en siaj raportoj trompas pri faritaj laboroj, kiuj ne estis faritaj. Fakte, same traktas la aferon ankaŭ la laborgvidantoj. Iliaj taskoj kaj respondeco estas, ke la planoj estu plenumitaj. Se ili la planojn ne plenumos, oni eksigos ilin. Ankaŭ ili scias, ke la homoj ne kapablas plenumi la normojn deciditajn en Moskvo kaj pli malsatigi la homojn ili ankaŭ

ne povas.

Ĝis certa grado la ĉefoj ŝtopas "tuftaf" en raportoj pri neokazintaj kaj nekontroleblaj laboroj. Pri "tuftaf-aferoj" mi aŭdis multajn rakontojn de ĉiuj estintaj mal-liberuloj. La "tuftaf" gvidis multajn laboregvidantojn al la koncentroj aŭ al plilongigitaj punoj, sed kontraŭagi "tuftaf" la ŝtatarato neniel povis.

En nia kolonio, tiu "tuftaf" atingis dum kelkaj semajnoj dumil kubometrojn da neelfosita tero, kiun la ĉefo per nenia trompo povis kovri. Por ne plimultigi "tuftaf" li ordonis al la mezuristoj kontroli precize la faritan laboron dum la mezurado. Krome li ordonis, ke ĉiu plenumu la normon. Se iu ne plenumos la normon dum la normala labortempo, tiu restu ĉe la laboro por la sekvonta labortempo.

Inter la unuaj viktimoj de tiu ordono estis mi kune kun ok poloj kaj judoj el Polio. Inter la mezuristoj unu estis fama pro sia antisemitismo kaj ega malamikeco kontraŭ la t.n. okcidentanoj. Li estis verŝajne ega "ĵuliko", ĉiam li dum la mezurado ĉikanis la kondamnit-ojn laŭ la kvindekoka paragrafo. Kiam li venis mezuri, li antaŭe demandis: "Kiu faris tiun laboron?" kaj rigardante la laboriston, li poste mezuris. Vere, ke li ne notis al iu malpli ol estis elfosite, sed por la rusoj li notis ĉiam iom pli ol ili fakte elfosis. Por ni li tion ne volis fari, klarigante, ke jam estas tro da "tuftaf".

Kiam venis la "originala" ordono, li adaptis ĝin tuj al ni. Mezurinte la laboron matene antaŭ la foriro "hejmen", li ordonis al preskaŭ ĉiuj poloj kaj judoj el Polio en du brigadoj, ke ili restu kaj daŭrigu labori, ĉar la normo ne estis plenumita. Kompreneble, ni devis resti.

Ĉar niaj brigadistoj reiris al la barakoj, prenis la kontrolon super ni la gardanta soldato. Estis la sama soldato, kiu mortpafis la junulon en la arbaro, al ni li kondukis ne agreseme - ni ja jam estis alianĉanoj de Sovetunio. Tiam ni jam havis la certecon, ke nia liberigo povas veni eble eĉ en la sama tago kaj ni jam sentis nin iom ŝirmitaj.

Al lia ordono, ke ni komencu labori, ni respondis:

"Unue ni estas lacaj kaj ni devas iom ripozi. Vere ni la normon ne plenumis, sed ni tamen laboris dum dekdu horoj. Due, ni estas malsataj. Vere ni devas daŭrigi la laboron laŭ la ordono de la kolonia ĉefo, sed laŭ la leĝo ni devas ricevi nian matenmanĝon kaj ni ne ricevis ĝin".

La soldato promesis prizorgi por ni la matenmanĝon, sed ni devas komenci la laboron, ĉar ne estas honeste, ke ni okope kuŝas sur la tero kaj ne laboras dum aliaj laboras. Laŭ lia opinio, ni per nia kuŝado demoralizas aliajn kaj instigas ilin sekvi nian ekzemplon. Ni tamen restis ĉe niaj postuloj : ni estas sen matenmanĝo kaj lacaj.

La soldato rekomendis al ni kuŝiĝi en ia loko, kie ni ne estos videblaj de la ceteraj, ĝis li prizorgos al ni la matenmanĝon. Intertempe li sciigis al la zono pri nia matenmanĝo kaj estis por ni alportitaj la porcioj da pano kaj la supo. Kroma gajno : la sitelo enhavis duoblajn porciojn kaj la supo estis densa. La kuiristo sendis al ni la tutan restaĵon. Restis en mia memoro ankaŭ la rustiĝinta sitelo, el kiu mi iam manĝis.

Kiam ni atendis la matenmanĝon, pasis polo, kiu laboris en alia kolonio kiel ŝoforo, sed ĉar lia aŭtomobilo difektiĝis, li estis sendita ien pro ia afero. Li rakontis al ni kelkajn detalojn pri la interkonsento de la pola kaj soveta registaroj koncerne nian liberigon, kiun li mem legis en gazeto. Laŭ lia opinio la liberigo devus komenciĝi en la sekvontaj tagoj.

Post la matenmanĝo ni klarigis al la soldato, ke post la dekdu horoj, kiujn ni laboris, ni estas lacaj kaj senĉese labori ne povas. Ni sentis nin iom certaj, kvazaŭ duonliberigitaj. La soldato parolis al nia konscienco, ke de nun ni devas labori fidele, ĉar ni jam estas aliancanoj de Sovetunio. Fine la soldato en konsento kun la laborgvidanto donis al ni laboron malproksime de la ceteraj, li do jam komprenis, ke post dekduhora laboro, ni ne multe povos utili al tiu fervoja konstruado.

* *

*

6_ sur la vojo reen

Sur la ligna vojo en Peĉorlag ĉiam paŝadis homamasoj nur de sudo al nordo. La 3an de septembro 1941, kiam nia dumtaga laborgrupo atendis, ke oni kunvoku nin por la reiro al la barakoj, ni rimarkis ion unuafoje vidatan en Peĉorlag. Sur la vojo en malproksimeco moviĝis amaso da homoj de nordo al sudo. Ĉies okuloj direktiĝis al tiu eksterordinara vidaĵo. "Kio estas tio? Ĉu malliberuloj reiras?", demandis la homoj. Eble paŝadas la poloj jam liberigitaj de la koncentrejoj, trapenetris min penso. La samon pensis ankaŭ la ceteraj polaj samsortanoj.

La kelkaj poloj en nia brigado kune kolektiĝis kaj per streĉa intereso ni atendis la proksimiĝon de tiuj paŝantoj.

Subite ekŝajnis al ni, ke tiu amaso kantas, sed ni ne estis certaj pri tio. Silentemaj ni atendis por konstati, ĉu ili fakte kantas. Subite aŭdiĝis ekkrio: "Ho jes". Kantanta amaso, moviĝanta de nordo al sudo, tio povas esti nur liberigitaj poloj. Ni restis silentaj por aŭdi la melodion. Baldaŭ niajn orelojn atingis melodio de populara pola soldata kanto.

Nia laborloko distancis de la ligna vojo ĉirkaŭ ducent metrojn. Kiam la amaso da poloj trapaŝis apude, ni havis la eblon ilin saluti kaj interŝanĝi kelkajn vortojn. Ili nin esperigis: "Ankaŭ vi estos liberigitaj, sed postulu la liberigon kiel eble plej baldaŭ." Ili informis nin, ke estas liberigataj ĉiuj polaj civitanoj sendepende de nacieco kaj paragrafo, ankaŭ la kondamnitaj laŭ la paragrafo 58, - kion la rusoj kredi ne volis.

Kelkajn tagojn poste venis la liberigo ankaŭ en nia kolonio. Veninte de la laboro kaj ricevinte la vespermanĝon, kiun mi eltrinkis kiel kutime, starante ekster la barako, mi rimarkis, ke iu kontoristo tenante papereton eniras en la barakon. Mi sekvis lin, ĉar ofte li

venis kun paperetoj iun voki. Eble li nun vokos la polojn al la liberigo. Kaj fakte, li vokis la nomojn de la poloj, al ĉiu vokito li diris: "Prenu viajn objektojn kaj eliru al la "vaŝto" ". ("Vaŝto" estis la trairpordego de la koncentrejo al ekstero). Inter la nomoj estis ankaŭ la mia.

Dum septembro en tiu regiono estas jam komplete aŭtuno. Sunbrilaj tagoj estas maloftaj. Preskaŭ ĉiam pluvetoj estas miksitaj kun neĝo. Ni kune kolektiĝis antaŭ la "vaŝto". Kune ni estis 24 homoj.

Sub pluveto, en la akompano de iu kontoristo, ni eliris al la ligna vojo. La unuan fojon post la forlaso de la malliberejo mi ne aŭdis antaŭ la ekiro la averton pri la minaco de unu paŝo dekstren aŭ maldekstren, ne akompanis min soldato.

Ni moviĝis sur la malseka kota vojo kiel ombroj, de tempo al tempo lumigitaj per apudveturanta ŝarĝaŭtomobilo. Nek la pluvon nek la lacon mi sentis - mi do rehavigis al mi la liberecon en Sovetunio - tion mi ankoraŭ kredis. Vere mi troviĝis en malproksima nordo sen iu ajn scio pri estonteco. Vere, mi estis malsata, maldikiĝinta, en ĉifonoj kun multe da pedikoj, tamen libera.

Post kelkhora paŝado ni haltis antaŭ iu tendaro, en kiu estis komplete mallume. Ĉe la enirejo troviĝis pola gardisto. Li diris al ni: "Eniru kaj kuŝiĝu, kie vi volas, liberaj lokoj troviĝas multaj."

En la barakoj estis jam aliaj homoj venintaj dum la sama tago, sed en la grandegaj kaj mallumaj barakoj ili preskaŭ perdiĝis.

Mi kuŝiĝis kiel ĝis tiu tempo, tamen sen atendo, ke mi estos matene je la kvara vekita al la sklaviaboro. Dormi mi ne povis pro la malvarmo kaj eble pro la travivaĵo de la ĵus ricevita libereco.

Proksimume je la sesa matene aŭdiĝis la bone konata sonoro. Estis do signalo, ke ni kolektiĝu sur la placo. Tie informis nin polo, ke ni devos resti en tiu loko dum kelkaj tagoj ĝis alvenos la homoj el ĉiuj tendaroj, sed la administrantaro konsistis el poloj. Li rekomendis formiĝi en grupoj laŭ la devenaj tendaroj, prepari listojn en la pola lingvo kaj alporti ilin al la kontoro.

La nura ruso en la kolonio estis la administranto de la nutrajmagazeno. Li informis nin, ke ni estos nutrataj laŭ la kvara kaldrono kun aldono de dudek procentoj.

Dum la kelkaj tagoj de nia restado en tiu kolonio ni havis nenian rusan gardistaron. Ni povis eliri sur la ligna voje ĝui longajn promenadojn.

Iun nokton alvenis por ni malfermitaj fervojaj ŝarĝvagonoj kaj ni forlasis tiun kolonion.

Post tutnokta veturado en la sentegmentaj vagonoj, ni revenis al Kojvo kaj en unu el la barakoj, kiujn ni forlasis antaŭ kelkaj monatoj. En Kojvo okazis la formala liberigado. Tie laboris rusa komisiono, kontrolanta ĉies akuzdokumentojn antaŭ la liberigo.

Laŭ nia opinio, tiu komisiono laboris tro malrapide, sed eble laŭ ricevitaj instrukcioj. Ĉiutage venis al Kojvo centoj da homoj kaj liberigitaj estis apenaŭ ĉ. cent homoj tage. Baldaŭ la malvasteco en la barakoj iĝis terura. Homoj kuŝis unu apud la alia ne nur sur la kuŝejoj, sed ankaŭ sur la plankoj, lasante nur mallargan pasejon en du flankoj.

En Kojvo ni estis gardataj kiel arestitoj. Eliri ekster la zono estis malpermesite. Ĉiu barako estis aparte ĉirkaŭigita per pikdratoj kaj iri de iu barako al alia estis ankaŭ malpermesite; nur kelkaj homoj, kiuj nepre devis rilati kun la rusa administracio havis la eblon iri inter la barakoj. Tamen interne de la barakoj ni estis propraj mastroj.

Tiu interna libereco en la barakoj estis unue uzata por kanti la preĝojn ĉiutage kaj vespere. Meze de septembro estas la ĉefaj religiaj judaj festotagoj - la nova jaro kaj la t.n. pardontago, kiam la religiaj judoj fastas tutan tagnokton. Dum tiuj tagoj la religiaj judoj okazigis komune ankaŭ siajn preĝojn. Kelkaj el tiuj religiuloj opiniis sian liberigon antaŭ tiaj tagoj kiel zorgon de Dio, ke ili havu la eblon preĝi kaj ne estis devigataj labori.

Oni povis ankaŭ rimarki, ke en niaj dokumentoj estis granda malordo. Estis vokitaj homoj, kiuj en Kojvo ne troviĝis. Iuj el tiuj, kiuj estis serĉitaj, mortis en la tendaroj kelkajn monatojn antaŭ la liberigo.

Por ordigi la aferon, scii kiu troviĝas en Kojvo kaj kiu ne troviĝas, ni estis foje kunvokitaj sur la grandan

placon kaj ĉiuj estis vokitaj laŭ la folioj, kiuj ĉiam akompanas la arestitojn. Sed ankaŭ post tiu kontrolo la komisiono liberigis same malmulte da homoj kiel antaŭe. Poste la komisiono petis prepari listojn de la homoj de ĉiu barako aparte. Ankaŭ tio estis farita, sed la liberigo okazis kiel antaŭe, malrapide. Poste la komisiono deklaris, ke la liberigo sekvas malrapide, ĉar ili ne havas la dokumentojn kaj atendas ilin.

Al la demando kie tiuj dokumentoj troviĝas, la komisiono ĉiam menciis alian lokon, komence ili diris en Vorkuto, poste en Abiso. Tiuj lokoj situis proksime kaj per aŭtomobilo atingeblaj en kelkaj horoj.

Iun fojon la komisiono diris, ke estis sendita aeroplano por alvenigi la dokumentojn, sed pro la malbona vetero ĝi devis alteriĝi survoje, ne atinginte la necesan lokon. Multaj arestitoj eksuspektis la rusojn kaj ekdubis pri iliaj sinceraj intencoj nin liberigi laŭ la interregistaraj traktatoj. (Kiam post la milito mi legis kelkajn librojn de diversaj homoj, kiuj devis dum tiu tempo rekte rilati kun diversaj rusaj instancoj, mi rajtis opinii, ke tiuj suspektoj ne estis senbazaj.)

Iun nokton, tre malfrue, mi dormante ekaŭdis kriojn en la barako. Malferminte la okulojn, mi tamen restis duondormanta. La krioj enhavis la krudajn insultojn kaj ofendajn esprimojn, kiujn uzis la brigadistoj kaj aliaj "hompelantoj". Rekonsciante, mi rimarkis, ke en la barako troviĝas kelkaj gardistoj el inter la krimuloj. Ili forpelis nin kun akompano de ofendoj kaj insultoj laŭ la koncentreja maniero. Se iu demandis al la "hompelantoj" kio okazis, la respondo estis per kriaĉantaj voĉoj: "Kion vi pensis, ke ni konstante manĝigos vin kiel parazitajn? Finiĝis jam via parazitado. Jam venis la tempo, ke vi eklaboru. En Sovetunio necesaj estas laboristoj sed ne parazitaj."

Tiel kondukis al ni la lokaj krimulaj aristokratoj, tri tagojn post kiam ni estis gviditaj al granda halo, kie oni montris al ni filmon, kaj kie rusa agitanto alparolis nin "Karaj amikoj, polaj civitanoj", kaj faris al ni paroladon pri la tasko venki nian komunan malamikon.

Kiam ni estis elpelitaj al la elirejo, iuj rimarkis,

ke jam atendas nin armitaj soldatoj, kiuj certe nin gvidos reen al la lokoj forlasitaj de ni. Ni komencis demandi homojn, kiuj rilatis kun la rusa administrantaro, kio okazis, ĉu ni nun estos gviditaj reen al la tendaroj, sed ili nenion sciis kaj severe ni estis traktitaj. Ni estis certaj, ke okazis ia ŝanĝo en la politikaj rilatoj kaj nia reiro al tendaroj jam estas do fakto.

En la nokta mallumo ni estis gviditaj ĉ. du kilometrojn norden. "Nun ni estas perditaj" aŭdiĝis el multaj buŝoj kaj tio estis ĉies opinio. Antaŭ iu kolonio ni estis haltigitaj kaj tien enlasitaj. Nia gardantaro malaperis, nenion dirante. Antaŭ nia alveno tiu kolonio estis senhoma. En la barakoj estis mallume, mi kuŝiĝis same kiel la ceteraj kun la kredo, ke ni estas arestitaj.

Matene ĉio klariĝis, la administrantaro volis evakui nian barakon pro ia bezono kaj nin transigis al proksime situanta kolonio. Sed ĉu estis necese tion aranĝi dumnokte kaj tiamaniere, ke ni estu traktataj kiel arestitoj?... Tia estas la agmaniero de NKVD-istoj, koncerne homojn, kiuj de ili dependas - ĉio devas esti sekreto ĝis la lasta momento.

Intertempe ekvenis sciigoj, ke sur la vojoj estas aktive organizitaj rabistoj. Ili atakas la liberigitajn polojn de la tendaroj. La rabistoj forprenas la manĝaĵon, la monon kaj ĉefe la dokumentojn. Komence ni ne volis kredi al tiuj rakontoj, sed iun tagon revenis al Koĵvo kelkaj tiaj viktimoj. Logis tiujn rabulojn ĉefe la liberigdokumentoj, kiuj estis sen fotoj. Homo kun tia dokumento povis forlasi la koncentrejajn regionojn sub falsa nomo.

Por ne esti viktimoj, ni decidis eliri el la tendaroj en multnombraj grupoj kaj okaze de atako ni defendu nin.

Fine venis la tago, kiam la komisiono venis al nia kolonio. La komisionanoj demandis nur kien iu volas veturi. La plimulto sin anoncis por la pola armeo.

Matene, la 28an de septembro, ni ricevis en nia kolonio la dokumentojn. Sur la dokumentoj estis mencio, ke ni ne rajtas loĝi en ĉefurboj nek en duagradaĵ urboj.

Fakte nenium tio interesis, des pli ke, laŭ la dokumentoj, ni devis nin direkti al Buzi Luk, kie estis formata la pola armeo.

Ĉirkaŭ tagmezo ni estis gviditaj reen al Kojvo. Tie ni ricevis po tri kilogramojn da pano, du skatolojn da konservita viando, tricent gramojn da sukero kaj ĉ. 300 rublojn. La ricevita manĝaĵo estis por kvin tagoj, ĝis ni atingu lokon, kie ni povos aĉeti manĝaĵon.

Laŭ la ordono ni devis ricevi novajn vestojn kaj ŝuojn, vere tendarajn vestojn, sed novajn. La liberigitoj en la komenco ricevis la novajn vestojn. Laŭ la rusa kutimo, la vestaĵprovizo baldaŭ elĉerpiĝis, ilin almenaŭ diris kaj ni tion kontroli ne povis. La administrantaro ja certe komprenis, ke ni forlasos ilin, eĉ se ni ne ricevos novajn vestaĵojn. La liberigitoj poste forlasis la tendaron en siaj malnovaj ĉifonoj.

La saman vesperon, ni la tiutage liberigitaj staris antaŭ la pordego por eliri. Trapasi ni devis po kvaropo kaj ambaŭflanke de la trapasantoj staris NKVD-soldatoj, kontrolantaj niajn dokumentojn dum la traŭro.

Jen mi la lastan fojon trapasas la pordegon, havantan supre la sovetan kvinangulan stelon kaj frazon de Stalin, - malantaŭ ĝi troviĝas la infero.

En la malluma nokto sur la marĉa vojo inter la ĉef-administrejo de "Peĉorlag" kaj rivero Peĉoro moviĝadas ombroj de la homoj. Kaj la homaj ombroj sentas sin feliĉaj pro la rericevita libereco, kvankam konsciaj, ke atendas ilin amaso da penoj, ĉagrenoj kaj neantaŭvideblaj malfacilaĵoj por aliri iam iel normalan vivon.

En la mallumo eĉas senĉese fortega frapado. Ĝi venas de la malŝargado de diversaj feraĵoj el vagonoj alveturigitaĵoj de ie por la konstruo de tiu fervojo.

Nia intenco estis atingi pramon sur Peĉoro kaj ni kredis ankoraŭ dumnokte transveturi al la dua flanko, kie troviĝis fervoja stacio. Kiam ni venis al la loko, kie haltas la pramo, ni eksciis, ke ni devos ĝin atendi ĝis la mateno. Ni iom reiris de la rivero kaj laŭ la tendara kutimo bruligis fajrujojn. Boliginte akvon en niaj gameloj kaj trinkinte la varmegan akvon kun la ricevita sukero, ni babiladis pri la iamaĵ forpasintaĵoj.

travivaĵoj. La muno en la vasta mondo estis al ni nekonata, same nekonata kiel la estonteco, reala estis nur la pasinteco. Matene ni transveturis Peĉoron kaj venis al la fervoja stacio. Por daŭrigi la veturadon ni atendis du tagnoktojn, ĝis venis por ni la ŝarĝvagonoj.

Post tritaga veturado tra la tendaraj regionoj - Sevĵeldolag kaj Ĉibjulag kaj aliaj - ni atingis la stacion en la urbo Kotlaso. Kvankam Kotlaso situas milojn da kilometroj for de la militlokoj, oni tamen vidis la militajn viktimojn je ĉiu paŝo. En kaj ĉirkaŭ la fervoja stacidomo svarmis geviroj ĉe kuŝantaj pakaĵoj. Sur, apud kaj inter la ŝtopitaj sakoĵ sidis, kuŝis kaj rampadis diversgaĵaj infanoj - bildo memoriganta nian vagadon al Rusio antaŭ du jaroj.

Lau la ĝenerala dumilita kutimo troviĝis sur la muroj afiŝoj kun karikaturaj desegnaĵoj pri la malamiko. Strange por mi estis, ke la karikaturaj ne estis pri la ĉefa malamiko, la germanoj, sed pri Mussolini kaj pri la italoj. Demandinte tiujn novajn rifuĝintojn pri ilia devenloko, ni eksciis kiel fulmrapide okazis la invado de la germana armeo en Blankrusion kaj Ukrainon. Por mi kaj mia kamarado Tavelinski, kun kiu mi amikiĝis ankoraŭ en la tendaro, same por la ceteraj ĵusvenintaj tendaranoj, estis la problemo daŭrigi la veturadon al Buzi Lük kaj iel akiri ian manĝaĵon por la tago.

"Kamarado Molotov diris : ĉe ni neniam estos porciumita la distribuado de pano". Tiun frazon mi aŭdis de iu propagandisto en la jaro 1940.

La ĉefa nutraĵo en Rusio, eĉ ĝis la milito, estis pano. Veninte al Kotlaso, mi eksciis, ke la pandistribuado jam estas porciumata, po kvarcent gramoj tage al ĉiu persono. Ni ne havis nutraĵkuponojn kaj ilin ricevi ne estis simpla afero. En la restoracio de la fervoja stacidomo estis "donite" por relative malalta prezo po ducent gramoj da pano kaj supo. Tiuj tagmanĝoj estis donitaj kvazaŭ al la pasaĝeroj, sed ricevis la manĝon ĉiu, sen kontrolo, ĉu oni havas veturbileton aŭ ne.

Por ricevi tian tagmanĝon, oni devis atendi ĉ. du horojn ekster la restoracio. Kiam la homoj venis en la restoracion, daŭris ankoraŭ iom da tempo ĝis oni ricevis la

mangĝaĵon. En la restoracio oni enlasis la homojn, nur kiam la antaŭe mangintoj forlasis la restoracion. Enlasitaj estis precize tiom da mangontoj, kiom estis da sidlokoj ĉe la tabletoj. Kiam ĉiuj sidiĝis, virino venis al la tabletoj kaj vendis kuponojn. Poste venis alia virino, kiu la kuponojn forprenis kaj alportis la panon. Poste venis tria virino, la supportistino. Ĉiujn, ĉ. cent mangontojn, priservis nur du supportistinoj. Neniu el la mangintoj estis ellasita ĝis ĉiuj finis la mangadon por eliri kune.

Kiam ni povis forlasi la restoracion post la mangado, jam estis tagmezo. Intertempe ni eksciis, ke ni povos ricevi po kvarcent gramojn da pano en iu butikoj, se ni montros niajn dokumentojn. Kompreneble, la dokumentoj estis stampitaj per la tagdato, por malebligi la ricevon de pano ankoraŭ unu fojon en la sama tago. Tiu sola loko, kie estis "donata" pano post kontrolo de niaj dokumentoj, troviĝis sur la bazaro.

Inter multaj fermitaj butikoj troviĝis du malfermitaj. En unu el tiuj oni vendis el barelo po glason de ia ruĝeta fluaĵo. Glaso da fluaĵo kostis kvar rublojn, ĝi havis la nomon vino. Por solene festi mian akiritan liberecon, mi aĉetis glason da tiel nomita vino, paginte por ĝi normalan duontagan salajron. Antaŭ la dua butikoj, kie estis "donata" pano staris longa vico da homoj kaj por ricevi la panon ni atendis ĉ. unu horon.

Kiam ni ricevis la panon jam estis vespero. En nia gamelo ni boligis akvon kaj la varmegan akvon kun pano ni opiniis tre bona vespermangĝo; sukero, kiun ni ricevis en la tendaro jam estis formangĝita en la pasintaj ses tagoj. Poste ni ekklopodis pri tranoktejo sub ia tegmento. Plejparte tia tranoktejo povas esti la stacidomo, sed en Kotlaso miliciistoj forpelis la homojn el la stacidomo por la nokto.

Ni eksciis, ke oni povas tranokti en la "Dom kolĥoznika" (Domo de la kolĥozano) per durubla pago. Veninte al tiu domo, ni estis informitaj, ke por tranokti tie oni devas veni antaŭ la oka horo, ni venis iom malfrue.

La vespero estis malvarma, blovis kaj susuris la vento. Ni reiris al la fervoja stacio por serĉi ian malfermitan vagonon, kiu taŭgus por anstataŭi hotelon.

Feliĉe troviĝis kelkaj tiaj vagonoj. Ni renkontis en ili aliajn similajn samsortanojn. En la vagono estis malvarme, dormi ni ne povis ; tamen, estis iom pli bone ol sub la ĉielo dum pluvo.

Kvankam ni matene estis lacaj kaj dormemaj, ni ja tamen devis klopodi pri manĝaĵo por la tago. Por akiri tion, estis necese kiel la pasintan tagon stari kelkajn horojn en la vico sur la bazaro antaŭ la butikoj "donanta" panon. Tiel forpasis la dua tago en Kotlaso. Vespere ni sukcesis veni en la "Dom kolĥoznika" antaŭ la oka. Per durubla pago ni ricevis lokon sur la planko, plenplenigita per similaj senhejmuloj. En tiu domo estis eĉ tro varme, sed tiam vigliĝis niaj pedikoj, pro lacego mi iom dormis kaj faris la pedikmortigadon per la fingroj.

En la tria tago ni ekpensis kiamaniere pluveturi al Buzi Luk. Se ni okupiĝos pri manĝaĵo, ni ja neniam povos forveturi el Kotlaso, sed ni ja devas ankaŭ manĝi. Ni devis decidi, ĉu foruzi la tagon por akiri manĝaĵon aŭ por akiri biletojn por la trajno al Buzi Luk. Ni decidis por la biletoj.

Post kelkhora atendado en la stacidomo, ni sukcesis akiri biletojn por la vespero de la sama tago. Ni sukcesis ankaŭ ricevi kvarcent gramojn da pano. Intertempe ni eksciis, ke en restoracio proksime de la stacio oni povas ricevi po cent gramojn da pano kaj supon, sed ĉefe, ke en tiu restoracio okazas la distribuado tre rapide kaj jene: en la granda manĝejo troviĝis du pordoj ; unu sude kaj unu norde. La suda pordo estis la enirejo kaj la norda - la elirejo. Ĉe la enirejo ĉiu ricevis kuleron kaj devis ĝin redoni ĉe la elirejo. Kiam liberiĝis eĉ unu kulero estis enlasita unu homo. Ĉar la konsumo de cent gramoj da pano kaj iom da supo ĉe malsataj homoj ne daŭras longe, multaj homoj povis esti priservitaj tre rapide.

Vespere ni sidiĝis en la trajno, kiu veturis al Kirovo. Ni sukcesis okupi bonan lokon sur la tria etaĝo. Mi povis dum la tutnokta veturado dormi kaj ni opiniis havi luksan veturadon.

Matene ĉirkaŭ la deka, ni estis en Kirovo. Por veni al Buzi Luk necesis ankoraŭ multtaga veturado. Sed la plej malfacila afero estis, ke por iri tien necesis kelkajn fojojn ŝanĝi trajnojn. Por ĉiu trajnŝanĝo estis en Rusio

necese stampi la bileton en fervoja oficejo.

Laŭ la rusa ordo oni enlasis en la vagonojn tiom da pasaĝeroj, kiom troviĝis da sidlokoj. Precipe por trajnoj longdistancaj estas tiu ordo. Dum la veturado la konduktoroj ĉiam kontrolas, kie iu pasaĝero forlasos la vagonon kaj ĉe ĉiu stacio ili raportas, kiom da liberaj lokoj estos por la sekvontaj stacioj. Kvankam tiu procedo estas zorgo pri la pasaĝeroj, ĝi ebligas por multaj fervojistoj bonan enspezon. Se iu volas stampi la bileton por la daŭra vojaĝado, tiu scias, ke por stampi tion oni devas eniri en ĉambron de oficisto kaj por tio pagi. Grandeco de la sumo dependas de la ruzeco, kiun aplikas la koncerna oficisto, ricevo de la stampo sen tiu speciala pago al la oficista poŝto okazas malofte. Tavelinski kaj mi sciis pri la rimedo por havigi al si stampon sur la bileto, sed ni ne havis sufiĉe da mono por tia elspezo.

Denove estis la problemo, ĉu atendi multajn horojn en la stacio por akiri la stampon por la vojaĝo, aŭ serĉi en la urbo iom da manĝaĵo kaj poste ian tranoktejon.

Estante ankoraŭ apud la vagonoj, ni rimarkis trupojn da viroj portantaj panbulojn en grandaj korboj kaj en sako, parolantaj la polan lingvon. De ili ni eksciis, ke la panon ili portas al la trajno kun liberigitoj el la koncentrejoj veturantaj al la pola armeo. "Ni ja ankaŭ tien veturas. Ĉu ni povas veturi kune kun vi?" "Vi pri tio demandu la leŭtenanton, komandanton de la karavano."

La komandanto tuj nin akceptis, li trovis por ni lokon en unu el la vagonoj kaj la trajno baldaŭ ekveturis.

En la karavano troviĝis ĉ. dumil viroj. En tiu karavano estis oficiroj, suboficiroj kaj tiuj, kiuj iam militservis.

La sorto de la antaŭnelonga pasinteco formis ĉe ni la senton, ke ni jam apartenas al soldata komuneco, kiu libervole akceptis plenumi sian taskon.

En la dua aŭ tria tago de nia veturado venis la ĉefkomandanto, kolonelo (ankaŭ ĵus liberigita de koncentrejo), vestita per la ĝisnunaj ĉifonoj en la akompano de kelkaj oficiroj, vestitaj same kiel li, fari inspektadon. Ĉiu estis demandita kie kaj kiam li militservis, kian

Aldone al la plagoj, kiujn la liberigantoj venigis al la "liberigitaj teritorioj" estis ankaŭ la spekulacia komercado. Tiu plago disvastiĝis al neimagebla grado. Tiun "komercadon" okazigis ankaŭ multaj rifuĝintoj.

Je la komenco, kiam venis la liberigantaj rusaj soldatoj, ili estis la ĉefaj aĉetantoj. Ili aĉetis ĉion, sed plej favore ili aĉetis horloĝojn. Post la soldatoj ekvenis al tiuj teritorioj sovetaj funkciuloj kaj simplaj partianoj, kiuj sukcesis akiri permeson por veni al tiuj teritorioj por la komercado.

Verŝajne la magazenoposedantoj, kiuj ne estis tuj forveturigitaj al Siberio, jam sciis pri la varomanko en Sovetunio. Ili fermis siajn vendejojn kaj per diversaj homoj ili vendis la varojn je spekulaciaj prezoj sur la t.n. "libera merkato". Aliaj varoj al la magazenoj ne estis liveritaj. La novaj regantoj malfermis kelkajn ŝtatajn magazenojn, sed en tiuj oni povis aĉeti tiom, kiom oni povis aĉeti en la magazenoj en Sovetunio.

Estis nature, ke la administrado de la magazenoj estis donita unuavice al la komunistoj. La administrantoj de la novaj magazenoj ankaŭ tre rapide komencis praktiki laŭ la ekzemplo de siaj kolegoj en Sovetunio - kaŝe ili disponigis la ricevitajn varojn al spekulantoj por la vendado sur la bazaroj. La novaj regantoj trankvile rigardis la okazantan spekulacion kaj ĝin praktike ne malpermesis. Sur la liberigitaj teritorioj la spekulacikomercado devas esti libera, same kiel en Sovetunio.

Estis nature, ke tiuj magazeno-administrantoj preferis havi kiel agentojn por la "libera merkato" siajn iamajn kamaradojn, al kiuj ili povis havi pli da konfido en tiu "socialista komercado". Sendube, en tiu "agenta selektado" decidis la motivo helpi sian kamaradon ekonomie. En la ideologio de komunismo jam nek la laŭleĝaj komercistoj nek la "libermerkataj" komercistoj kredis.

Multaj iamaj komunistoj rapide akiris sperton en tiu-karakterita komercado kaj se iu el tiuj renkontis amikon, kiu laboris kaj plendis pri la malalta enspezo, la komercisto ĉiam rekomendis al tiu kamarado forlasi la laboron kaj okupi sin per komercado. La soveta sistemo sur la "liberigitaj teritorioj" iom post iom realiĝis en ĉiuj detaloj.

Fine inter la rifuĝintoj laboris nur tiuj, kiuj estis je alta morala nivelo, aŭ tiuj, kiuj povis ŝteli en siaj laborejoj. Estis ankaŭ tiuj, kiuj laboris nur formale kaj praktike prizorgis siajn vivbezonaĵojn per komercado kaj ŝtelado.

* * *

Kiam la liberigantoj de Okcidenta Blankrusio kaj Okcidenta Ukraino kredis, ke la "aktivaj popolmalamikoj" estas "elpurigataj" el la socio, ili komencis "honoru" la ceterajn loĝantojn sur tiuj teritorioj per soveta civitaneco. Por ricevi tiun civitancon, sufiĉis nur formalajo : akcepti sovetan pasporton, kaj laŭ la soveta praktiko tian pasporton ĉiu povis, eĉ devis ricevi. Laŭ la sovetaj leĝoj devas havi pasporton ĉiu civitano de la aĝo de dekok jaroj. La konstanta loĝantaro vole nevole prenis tiujn pasportojn. Prenis pasportojn ankaŭ aro da rifuĝintoj, sed la plimulto inter la rifuĝintoj rifuzis pasportojn, klarigante, ke ili ne volas akcepti la sovetan civitancon.

Kiel kutime la ŝtataj instancoj uzis ĉiuspecajn allogojn, minacojn al tiuj, kiuj ne volis preni pasportojn. La rezulto estis minimuma. Kvankam tiela rezisto estas la plej pasiva, sed laŭ la psiko de la rusaj diktatoroj nenia kontraŭstaro povas esti tolerata, - ĉiuj ordonoj devas esti akceptitaj kaj plenumitaj, sen iu ajn kritiko. Certe ekzistas iaj internaciaj leĝoj, laŭ kiuj ne estas permesite devigi homojn akcepti ian civitancon kontraŭ sia volo, sed tiajn aferojn la regantoj en Sovetunio ĉiam neglektis. Ili povis tiom neglekti precipe dum sia alianco kun la reĝimo de Hitler.

Kiam la agitaj allogoj kaj la minacoj por akcepti la pasportojn fiaskis, NKVD komencis montri, ke ĝi kapablas obeigi la obstinulojn al la soveta sistemo. En la pligrandaj urboj "liberigitaj", miloj da NKVD-istoj nokte ĉirkaŭsieĝis apartajn kvartalojn, ili paŝis de loĝejo al loĝejo, vokis la dormantajn homojn, kontrolis, ĉu ĉiuj plenaĝuloj posedas la sovetajn dokumentojn. Ĉiuj, kiuj ne havis la sovetajn pasportojn, estis arestitaj, forveturigitaj en por tiu celo starantaj kamionoj, al la ŝarĝvagonoj preparitaj kaj forsenditaj al la malproksimaj malvarmaj partoj de

La lando por tie konstrui novajn loĝlokojn.

Kelkaj miloj da homoj estis forveturigitaj dum kelkaj tagoj en tiu unua rifuĝint-ĉasado. Post kelkaj tagoj NKVD ĉesigis tiun ĉasadon kaj anoncis novan datlimon de registrado por preni la pasportojn. Aro da rifuĝintoj mense kaj fizike lacigitaj rezignis la reziston kaj sin registrigis por la pasportoj. Tiu anoncita nova datlimo estis nur ruza kaptilo de NKVD por havigi al si adresojn de almenaŭ parto de la obstinuloj.

Post kelktaga registrado, NKVD havis malpli da laboro kaj pli da sukceso en tiuj dumnoktaj homĉasadoj. Kiam la rekomencitaj dumnoktaj arestadoj estis konataj, NKVD-konfidenculoj disvastigis informojn, ke oni arestas nur tiujn, kiuj ne registrigis sin kaj tiuj homoj, kiuj finfine komprenis, ke la sovetaj instancoj havas rilate la rifuĝintojn nur bonajn intencojn, ne estos arestitaj. La propagando por la registrado estis daŭrigita. Kontroli la veron, la rifuĝintoj komence ne povis. Ili ne sciis kiu sin registrigis kaj kiu ne registrigis sin. Baldaŭ tiu blufaĉo estis konata, sed la rifuĝintoj jam havis nenium solvon por savi sian kvazaŭan liberecon. Restis nur atendi la dumnoktan areston, sendepende ĉu oni estis registrita aŭ neregistrita. Fine NKVD venkis la obstinajn "popol-malamikajn elementojn" inter la rifuĝintoj. Tiuj "malamikaj elementoj" estis la plimulto, nur malmultaj prenis la pasportojn. La kelksemajna vivado sub la komunista regado faris por tiuj homoj miraklon, kiun ne kapablus akiri eĉ la plej fervora antikomunista propagando.

*
* *

En la lastaj tagoj de marto mi reiris de Uŭvalo al Krupko. Antaŭ ol mi rekomencis labori, mi veturis al Minsko esplori la eblojn por fuĝo. Mi jam ne renkontis tiom da rifuĝintoj, kiom mi renkontis tie la unuan fojon, komence de januaro. La rifuĝintoj ja estis post la malvenko eĉ por tiuj, kiuj restis netuŝitaj de NKVD. Kelkaj ricevis la permeson labori en Minsko post klopodoj de siaj laborejoj. Kelkaj laboris sen permeso de la milici-instancoj. Kelkaj kredis ricevitian permeson. Generale ili jam estis malgranda grupo. Paroli pri fuĝo ili evitis kaj ili eĉ insultis tiujn, kiuj aranĝis la aventurojn. Kion ili pensis, mi do ne povis scii.

Interalie mi renkontis en Minsko mian amikon el Varsovio A. Kaf. Hejme li estis ŝuisto, en Minsko li laboris en la lokomotiva riparejo kiel simpla, nekvalifikita laboristo. Tiun laboron li akceptis pro du motivoj : unue, kiel laboristo ĉe la fervojoj li ricevis la permeson esti en Minsko, due, li kredis per la helpo de rusaj fervojistoj, precipe helpe de la rusaj lokomotivgvidistoj, forveturi al Okcidenta Blankrusio. Li opiniis, ke la ŝancoj por fuĝi estas pli bonaj en Kievo (Ukrajno). Ĉar ni estis bonaj amikoj, li malkaŝis al mi sekreton, ke kuni unu lokomotiv-gvidisto li jam marĉandas pri la traveturigo kaj li havas ŝancojn, ke tio sukcesos. Li promesis memori pri mi kaj sciigi, se estos ia eblo tiamaniere fuĝi. En aprilo mi eksciis de mia perfidinto, ke iun tagon tiu Kaf ne venis al la laboro kaj malaperis. Tamen mi kredis, ke li plenumis sian promeson, ĉar dum esplordemandado la NKVD-oficiro menciis lian nomon. Eble li skribis al mi, sed la letero venis en la posedon de NKVD. Spite la antaŭajn arestojn ĉefe en Minsko, okazis, ke iuj rifuĝintoj de la malgrandaj urbetoj iom post iom malaperis kaj neniu sciis kien. De iuj poste venis leteroj el Polio, sed tio estis unuopuloj.

*
* *
*

Dum mia estado en Krupko amikiĝis kun ni du junuloj, M. Frim kaj J. Lerner, ambaŭ en la 17-18-jaraĝo el Varsovio. Ĝis la milito ili estis membroj de la socialista junular-organizaĵo. Ambaŭ estis inteligentaj knaboj kaj sufiĉe konsciaj pri sociaj kaj politikaj problemoj. Estis ĉe ili ankaŭ enradikigita la reciproka amikeca helpemo, kiel ĝenerale ĉe junuloj edukitaj en liberaj organizaĵoj. Tiuj du knaboj ĉiam rakontis al ni pri siaj ĉiutaga kaj pasinta vivo, strebadoj kaj sentimentoj. Ankaŭ mi kaj mia edzino estis rilate al ili sinceraj.

Ni ĉiuj komencis plani komunan fuĝon. Post ĉiuj eblaj akiritaj informoj, kies verojnkaj fantaziojn ni ne povis kontroli, ni decidis unue veturi al Kievo kaj de tie al Okcidenta Ukrainio. Kien daŭrigi la vagadon poste, ni povis fiksi nenian decidon. Ĝenerale ni kredis, ke ni sukcesos atingi Rumanion.

Nian forveturon ni planis por la fino de aprilo aŭ la komenco de majo. Por la unua de majo ni devis ricevi

Post la militkomenco inter Germanio kaj Rusio, multaj homoj loĝantaj en la eŭropaj partoj de Sovetunio, komencis amasan vagadon for de la lokoj, al kiuj proksimiĝis la fronto. La rusa registaro ordonis forveturigi laŭeble la industriajn instalaĵojn. Kune kun la maŝinoj oni forveturigis la inĝenierojn, teknikistojn kaj ankaŭ laboristojn, se troviĝis por ili loko en la vagonoj. Laŭeble tiuj homoj kunprenis siajn familiojn.

Forlasis la de la milito minacitajn teritoriojn ankaŭ la partianoj, komsomoloj (komunista junularo), NKVD-istoj k.s. Forlasis tiujn teritoriojn multe da judoj, komprenantaj, ke sub la hitlerista reĝimo minacas ilin kompleta pereigo. Tiujn teritoriojn forlasis ankaŭ multe da rusoj, precipe metiistoj, kiuj malgraŭ sia malamo al la reĝimo ne volis resti ĉe la germanoj.

El tiuj grupoj iĝis kelkmiliona vaganta amaso. Ne evitis ilin survoje bombardado de la germanaj aviadiloj kaj inter tiuj vagantoj ne mankis mortigitoj kaj vunditoj. Multaj el ili devis piediri kelkdekojn da kilometroj ĝis ili venis al iu trajno.

Multe da tiuj trajnoj kun evakuitaj homoj estis direktitaj al Meza Azio. Eble tio okazis, ĉar la rusa registaro opiniis tiujn teritoriojn sekuraj kaj eble la rusa registaro celis per tiuj rifuĝintoj plirusigi tiujn landojn.

En ĉiuj urboj de Meza Azio vagadis multaj miloj da tiuj rifuĝintoj. La plimulto havis siajn restadejojn sub la firmamento en parkoj, en proksimeco de la fervojaj stacioj. Al tiuj lokoj venis ankaŭ miloj da diverskalibraj "julikoj", precipe ŝtelistoj.

Por la "julikoj" komenciĝis ankoraŭ survoje tempo de prospero, pri kia ili neniam eĉ revis. Ili amase ŝtelis kofrojn kaj unuopajn objektojn. En Rusio ĉiun objekton, ĉu kulero aŭ mantelo, oni povas baldaŭ vendi. Feliĉe, ni, venintaj el la koncentrejoj, tiujn ŝtelistojn ne devis timi, nenion ŝtelindan ni posedis. Inter tiuj vaguloj estis jam niaj samsortanoj, veturigitaj antaŭ ni al ia armeo, sed kiuj elvagoniĝis kaj partoprenis la ĝeneralan sorton de la rifuĝintoj, rusaj civitanoj.

Post kiam ni estis informitaj kien nia trajno veturas, komenciĝis iom-post-ioma forlaso de la trajno.

Iun noktomezon la trajno haltis kelkajn horojn ĉe la stacio Kogan. Tie oni diris, ke ni ricevos manĝaĵon en la restoracio de la fervoja stacidomo. Tiu subita "bonkoreco" vekis ĉe ni ian suspektemon, ni ja ne ricevis manĝaĵon dum unu semajno.

Malgraŭ la noktomeza tempo, sed pro la milda klimato, ĉe stacio Kogan svarmis rifuĝintoj, inter ili poloj, ekskoncentreĵanoj, kiuj foriris en la pasintaj tagoj de trajnoj similaj al nia. Post mallonga informiĝo pri la vivkondiĉoj en tiu urbo, mi kaj mia kamarado Tavelinski decidis en Kogan fini la veturadon, eventuale ĝin interrompi.

El la vagono mi prenis mian havaĵon, kiu konsistis el sako, en kiu kuŝis malnova litkovrilo ankoraŭ el Polio kaj granda ujo de konserviĵoj, kaj ni adiaŭis la trajnon. La posedaĵo de Tavelinski konsistis el gamelo kaj kulero, ankaŭ en sako. La sakojn ni ŝtelis, kiam ni laboris en Peĉorlag, dum la malŝarĝado de nutraĵoj el la vagonoj. Ĉe la sama stacio elvagoniĝis multaj samsortanoj. Ni estis treege malsataj, sed akiri ian ajn manĝaĵon dum nokto ni eĉ ne povis revii.

* *
*

La plej granda parto de tiuj Mez-Aziaj landoj estas montara. Ĝis la komunistoj akiris la regadon en tiuj landoj, la plimultaj el tiuj popoloj estis nomadoj. Dank'al la varma klimato kreskas en tiuj landoj multaj fruktoj. Tre abunda estas tie ankaŭ la ŝafbredado. Pro la milda klimato neniam staloj estas necesaj por la bestoj. La religio de tiuj popoloj estas la muzulmana. La homoj estas ankaŭ tre piaj, malgraŭ ke ili de multaj jaroj ne havas la eblon okazigi komunajn religiajn ceremoniojn kaj ke inter ili estis multe propagandita la ateismo.

Same kiel ĉe aliaj religiaj komunumoj, la komunistoj forprenis de ili preĝejojn-moskeojn, por aranĝi en ili diversajn klubojn. Multaj iliaj pastroj estis senditaj al la tendaroj por "edukado per honesta maniero akiri sian panon". Religia estas ĉe ili ankaŭ la junularo, tio ĉe la rusoj estas maloftaĵo. La pliaĝaj virinoj kovras siajn vizaĝojn per nigraj vualoj, kiam ili devas

iri en stratoj. La pliaĝaj homoj ne parolas la rusan lingvon. La junularo parolas ruse tre primitive, kvankam en la lernejoj la rusa lingvo estas multe instruata.

La administraciaj postenoj, precipe la superaj, ŝtataj kaj komunumaj, estas plejofte okupataj de rusoj, escepto estas eble nur la juĝistaro en la malsupraj instancoj.

Kiam la uzbekoj kaj kirgizoj eksciis, ke ni ne estas rusoj kaj ne ŝatas la rusan reĝimon, ili kondukis al ni simpatie.

La popoloj en tiu regiono daŭrigis la rezistadon kontraŭ la bolŝevika reĝimo pli longe ol en aliaj lokoj. En la tridekaj jaroj, en tiuj landoj disvastiĝis kaj agadis kontraŭbolŝevika movado, kiu akiris la insultan nomon "basmaĉoj". Supozeble la "basmaĉoj" havis la simpatian kaj helpon de la popoloj. La montara tereno multe faciligis al tiuj popoloj daŭrigi la rezistbatalojn kontraŭ la bolŝevikoj. Post ia atako la rezistantoj povis sin kaŝi en la montoj aŭ kaŝi tie siajn fusilojn.

Por likvidi tiujn "basmaĉajn bandojn", la rusa reĝistaro sendis punekspedicion sub la komando de marŝalo Budieni. Se la bandoj faris en iu urbeto iun teroragon, la urbeto estis sieĝita de rusaj trupoj, ili bombardis la urbeton per kanonoj. Domoj disfalis, mortigante la homojn senkulpajn same kiel la kulpajn.

Post tia senindulga bombardado la rusaj soldatoj venis en la urbon. Ĉiuj domoj estis traserĉitaj kaj ĉiu homo, kiu ŝajnis por la rusaj soldatoj suspekta, estis surloke mortpafita aŭ forveturigita.

La riproĉo kontraŭ la loĝantoj estis, ke ili helpis la banditojn. Tiu teorio de komuna respondeco estis multe praktikita en multaj urbetoj kaj vilaĝoj de Meza Azio, sub la bolŝevika reĝimo. Kontraŭ tia teroro la mezaziaj popoloj batali ne kapablis. La kontraŭrusa rezisto iom post iom ĉesis, sed laŭ rakontoj de rusoj, ekzistis en tiuj regionoj organizitaj bandoj ankoraŭ en la jaroj 1933-34.

* *
*

La ĉefa loko, kie kolektiĝis la vaguloj en Kogan, estis la fervoja klubo. Iam tiu masiva konstruaĵo estis moskeo, konstruita antaŭ kelkaj jarcentoj. En la batalo

de la komunistoj kontraŭ dio kaj religio, ili aranĝis en tiu moskeo la menciitan klubon.

Kiam komencis veni al Kogan la rifuĝintoj el Rusio, estis en tiu klubo aranĝita la "evakuada servo". Tie la rifuĝintoj devis sin registrigi kaj ĉiu registrito ricevis por tri tagoj kupononjn por manĝaĵo donata en kuirejo apud la klubo. En la daŭro de tiuj tri tagoj oni direktis la rifuĝintojn al iu kolĥozo, en la proksimaj regionoj de Kogan.

Mi kaj Tavelinski faris mallongan promenadon al la klubo-moskeo. Trovi lokon en ĝi por kuŝiĝi estis neeble. Ĝi estis okupita de tiuj, kiuj venis antaŭ ni. Okupis la klubon precipe tiuj, kiuj havis pakaĵojn. En la per muroj fermita ejo estis iom pli facile ilin gardi.

Ekster la moskeo, en vastarea parko kuŝis sur la tero homoj en grupetoj, duopoj, paroj kaj unuopuloj. En la malforta lumo, la tuto aspektis kiel tombejo en malordo. De tempo al tempo ia homa ombro sidiĝis kaj per la manoj tuŝante sian kuŝantan havaĵon, kontrolis ĉu ne estis io de li forŝtelita, kiam li ekdormis. De tempo al tempo stariĝis aŭ aperis ie ombro alvenanta aŭ foriranta de tiu vivanta tombejo. De ie en malproksimeco aŭdiĝis el laŭtparolilo azia muziko kaj paroloj pri la milito en la rusa lingvo.

Mi kuŝiĝis sur la tero apud mia kamarado. La malhelaj konturoj de la alta moskeo aspektis kiel ia morta majesto de la antikva epoko, en kies ĉirkaŭaĵo ni nun ripozas.

En la venonta tago ni sukcesis registrigi nin en "evakuada punkto", post kelkhora atendado en la vico, en la klub-moskea parko. Ni ricevis la por tri tagoj manĝkupononjn, kiuj estis fakte por unu manĝaĵo en la tagnokto kaj fervojan bileton al regiono nomita Deŝkanabad.

Tiu regiono, kiel ni eksciis, situas proksime de Kogan. Sed la rusa difino pri proksimeco estas alia ol en malgrandaj landoj. Tri aŭ kvarcent kilometrojn ili nomas proksimo.

Iun posttagmezon ni komencis per la trajno veturi al tiu "proksima" regionurbo Deŝkanabad. Post duontaga kaj tutnokta veturado ni venis al stacio Guzar. De tie

ni devis daŭrigi la vojaĝon al Deŝkanabad per aŭtomobilo, ĉar al tiu loko fervojo ne estis. Mi ne povis diri, ke ni veturis tre rapide, sed ni ne povis plendi, ke la trajno malfruiĝis laŭ la veturplano.

Guzar estas malgranda urbo inter montoj. En ĝia proksimeco troviĝas grandaj fabrikoj. Inter la mezaziaj popoloj Guzar estas tre konata, ĉar ĝi multe suferis, kiam la ruĝa armeo likvidis la "basmaĉojn".

La fervoja stacio de Guzar situas ĉ. du kilometrojn de la urbo. En la sama trajno kun ni venis ankaŭ kelkdek samsortanoj-vaguloj, senditaj de Kogan, parto de tiuj venintoj estis destinita al Guzar.

Apenaŭ ni venis proksime de la urbo, tuj nin haltigis kelkaj miliciistoj, postulantaj ke ni montru al ili niajn dokumentojn. Ni devis montri ne nur la liberigdokumentojn de la tendaro, sed ankaŭ la paperetojn, kiujn ni ricevis en Kogan. Tiujn, kiuj estis senditaj al Guzar, prenis la miliciistoj sub sian protekton kaj gvidis ilin ien. Nin, kiuj estis senditaj al Deŝkanabad severe gardis kvar miliciistoj, ne permesante al ni foriri eĉ je kelkaj paŝoj.

Al nia demando, kial ni estas tiel severe gardataj, la miliciistoj respondis: "Baldaŭ venos aŭtomobilo, kiu veturigos vin al Deŝkanabad".

"Sed ni ja estas treege malsataj, ni volas aĉeti en Guzar iom da pano aŭ ian supon en restoracio. Ĉu vi ne rajtas al ni tion permesi?"

"Ho ne! Manĝaĵon vi ricevos en Deŝkanabad. Ni en Guzar havas por vi neniajn devojn."

"Ni ja ne postulas, ke vi donu al ni, ni volas aĉeti."

"Ho ne! En Guzar vi nenion povas aĉeti. Por ricevi panon en la magazeno jam estas malfrue, la pano jam estas disdonita."

Ne helpis niaj klarigoj, ke ni dum la lasta tagnokto preskaŭ nenion manĝis. La miliciistoj respondis nur: "Manĝaĵon vi ricevos en Deŝkanabad."

Ni ne atendis longe. Venis ŝarĝaŭtomobilo, en kiun ni sidiĝis. La miliciistoj nin gardis ĝis la aŭtomobilo ekveturis kaj antaŭ la forveturo ili avertis la ŝoforon, ke li ne haltu, ĉar ni povos foriri. Nin ili avertis, ne forlasi la aŭtomobilon, sed veturi rekte al Deŝkanabad, se ni malobeos ni havos de ili malagrablajojn.

Deŝkanabad estis tipa uzbeka urbetó, kien la moderna civilizacio ne enpenetris. Ĉiuj dometoj estis konstruitaj el argilo miksitá kun pajlo, - konstruaĵoj, kiujn faris la judoj en la antikva Egiptio, laŭ la rakonto en la Biblio. Tiuj dometoj estis unuĉambraj aŭ duĉambraj, nur la oficejoj havas pli da ĉambroj. La fenestroj en tiuj ĉambroj konsistas el vitretoj je longeco kaj larĝeco ĉ. tridek-centimetraj, fiksitaj en la muroj aŭ en la plafono-tegmento. La enirpordoj estas el kelkaj tabuloj, kunigitaj per najloj en la plej primitiva maniero.

Tiuj loĝejoj havas nek litojn, nek tablojn, nek seĝojn. La nura meblo uzata de tiuj homoj estas granda kofro, tien ili kaŝas siajn valoráĵojn kaj monon. Ĉiujn meblojn anstataŭas la argila planko. Kiam ili purigas la loĝejon antaŭ la festotagoj aŭ por dimanĉoj, ili ŝmiras la plankojn per argilo miksitá kun iom da bova aŭ ĉevala fekaĵo. La fekaĵaodoro kvazaŭ forigas pulojn kaj la planko havas de la fekaĵo belan verdecan aspekton.

Meze en la planko troviĝas truo, ĝi estas fajrujo por kuiri manĝaĵon aŭ por baki panon. Kiel bruligmateriale estas uzataj ĉiuj sekigitaj kreskaĵoj. Sed la ĉefa kaj plej bona bruligmateriale estas la dombesta fekaĵo. Por ke tiu bruligmateriale estu pli ŝpareme uzata, ĝi estas miksitá kun argilo. El la miksitá amaso da fekaĵo kaj argilo ili formas per la manoj platojn sekigitajn sub la sunradioj. Same kiel alilandaj loĝantoj havas provizon da karbo aŭ ligno por hejti, tiel la loĝantoj en la mezaziaj vilaĝoj havas provizon da sekigitaj platoj.

Pano estas bakata jene : en la truo de la planko oni starigas feran konstruaĵon, konsistantan el ringo alforĝita al tri aŭ kvar vertikalaj stangetoj. Sur tiun feraĵon oni metas platan ŝtonon, ĉ. kvin aŭ ses centimetrojn dikán. Oni hejtas en la truo ĝis la ŝtono estas varmega, poste oni metas sur ĝin la paston por baki.

Por kuiri oni starigas kaldronon je duongloba formo sur la feraĵon. La bruligaĵo el fekaĵo ne donas multe da fumo kaj oni povas dum la bruligado sidi apud la fajro. Somere oni bakas kaj kuiras ekster la ĉambro.

La akvo estas ĉerpata el kanaloj, troviĝantaj ofte ambaŭflanke de la vojoj kaj stratoj. Tiu primitiva akvo-

kondukila sistemo troviĝas en la plimultaj sovet-aziaj vilaĝoj kaj urbetoj. Modernaj akvokondukiloj troviĝas nur en la plej grandaj urboj. En la vilaĝoj la akvo venas el pli grandaj riveroj, en iuj vilaĝoj venas akvo ankaŭ de la montoj, putojn mi nenie vidis en tiu regiono.

"Ĉajĥana"

La plej kutima kunvenloko estas "Ĉajĥana", t.e. teejo; oni kunvenas tie ne nur por trinki teon, sed ankaŭ por babiladoj kaj por diversaj negocoj.

Teo estas la plej populara trinkaĵo de la popoloj en tiuj landoj. Sur la argilan plankon en la ĉajĥana ili metas memfaritajn tapiŝojn, homoj sidiĝas en rondo, babiladas dum longaj horoj kaj de tempo al tempo trinkas teon el porcelanaj vazetoj nomataj "pjalkoj". Somere okazas la trinkado ekstere, apud la "Ĉajĥana".

Dumnokte la "Ĉajĥana" servas kiel hotelo por traveturantoj kaj por la senhejmuloj. Per unu aŭ durubla pago oni povas okupi lokon sur la planko por tranokti. Kompreneble, tiuj dumnoktaj gastoj devas kuŝi en la vestaĵoj. Je la sesa matene la dormantojn oni vekas kaj forpelas el la "Ĉajĥana". Je tiu horo venas la administranto por meti fajron sub la granda kaldrono, boligi akvon kaj balai la halon - prepari la "Ĉajĥana"n por la taga tasko.

Kiam ni venis al Deĥkanabad, jam estis antaŭvespere. La regiona komunuma oficejo, kies tasko estis nin prizorgi, jam estis fermita. Ĝis la venonta mateno ni devis solvi du problemojn: akiri ion por manĝi kaj trovi tranoktejon. Pri tranoktejo ni baldaŭ eksciis la lokan kutimon, ke por tio estas la "Ĉajĥana", sed la manĝproblemo estis nesolvebla.

Inter la spritaĵoj pri Sovetunio mi iam aŭdis jenan: "Se la rusoj okupus la Grandan Oceanon, mankus akvo en la mondo". Ĉar Deĥkanabad situas malproksime de la urboj, estis tie ĝis la milito facile aĉeti panon ĝis la vespero. Kiam komencis veni tien multe da homoj el Rusio, estis eble aĉeti panon nur matene. Ĉiuj niaj klopodoj akiri iom da pano estis vanaj, ni devis atendi por tio ĝis la mateno.

En la venonta tago ni nin anoncis en la Regiona Komunuma Oficejo. Dum tago ni havis sufiĉe da tempo por mortigi niajn pedikojn, - okupo por ĉiu libera tempo en Sovetunio. Antaŭ la vespero kunvokis nin la sekretario de la loka komunumo al la oficejo. Kune ni estis ĉ. tridek homoj.

En la oficejo atendis nin dekkelkaj uzbekoj. Inter ili nur unu junulo parolis la rusan lingvon tre malbone. Ni apenaŭ kapablis kun li interparoli. La sekretario en sia informata parolado klarigis al ni : "Ĉi tiuj homoj vin nun kunprenos al siaj kolĥozoj. Ili estas el du kolĥozoj. Iu grupo el vi iros al kolĥozo "Molotov", ĝi situas 30 kilometrojn de ĉi tie. La dua grupo iros al kolĥozo ... (ĝian nomon mi ne memoras, sed ĝi havis nomon uzbekan), ĝi situas de ĉi tie ĉ. 40 kilometrojn.

Tiuj homoj estas tre honestaj, tre afablaj kaj tre bonaj. Ne misuzu kaj ne neglektu ilian konfidon al vi, koncerne la laboron unuavice kaj la ĝeneralan konduton. Ĉefe la laboron vi devas trakti kiel eble plej serioze.

Kiel pagon vi ricevos tage : po kvincent gramojn da pano, cent gramojn da graso kaj cent gramojn da viando."

Tiun pagon mi tiam opiniis sufiĉe alta, precipe la cent gramojn da graso. Ĝis tiam mi preskaŭ neniam grason ricevis. Verŝajne pensis la samon la ceteraj kunvenintoj.

Al nia demando, kian laboron ni havos, li respondis : "diversajn". Kiam ni ripetis la saman demandon, petante pli klaran difinon, li respondis : "Nu, diversajn laborojn".

La sekretario laŭtlegis el listo, kiu iros al la kolĥozo Molotov kaj kiu iros al la dua kolĥozo. Mi estis inter tiuj, kiuj iros al la kolĥozo Molotov. Post tiu nia dungigo unu el la uzbekoj subskribis kelkajn paperetojn kaj la sekretario al ni deklaris, ke de nun ni estas sub ilia protekto.

Ni profitis tiun "soleman momenton" por peti de la sekretario prizorgi por ni iom da pano por la vojo, ĉar ĝi certe daŭros kelkajn horojn. Verdire ni dubis pri ricevo de la pano, sed ni faris tion eblan en la koncernaj cirkonstancoj por akiri ĝin. Je nia surprizo, la sekretario nin gvidis al la bakejo kaj ĉiu ricevis duonkilogramon da pano senpage.

Kiam ni revenis al la oficejo, la uzbekoj disponigis al ĉiu el ni azenon. Laŭ iliaj manmovoĵoj kaj paroloj ni komprenis la inviton sidiĝi sur la azenojn.

En plenluna nokto, lumiganta pintojn de la montaro, inter kiu troviĝis larĝa vojo, moviĝadis nia surazena karavano. La pejzaĝoj dum tiu nokta vojaĝado agordis min romantike. De tempo al tempo aperis antaŭ miaj okuloj ĉiam ŝanĝiĝantaj fantaziaj grandegaj ombraj figuroj de la montoj. Iom similaj figuroj aperis ankaŭ sur la iomete nebulanta firmamento, kun koloroj arĝentaj, hel-flavaj, ruĝetaj kaj profundbluaj.

La ĉirkaŭaĵo de la kruda naturo gvidis min en tiu nokto al fabela mondo, kie ankaŭ mi rajdas sur azeno. Diversaj rememoroj konstante venis, forpasis, revenis kaj disvastiĝis, ŝanĝiĝis.

Ĉiuj provoĵoj interparoli kun la uzbekoj donis nenian rezulton. Je multaj niaj demandoj ili levis la manojn, montrante en malproksimeco kaj diris "Kolĥoz Molotop". La silabon "top" ili prononcis rapide kaj tio sonis por ni iom komike. Pli komikaj estis la respondoj per la kapa jesmovo: "He, he, he", kun ĝojafabla mieno. Nur du vortoj, kiujn mi sukcesis lerni, estis: "joŝag" kaj "jaĥŝi". Joŝag signifas azenon kaj Jaĥŝi signifas bone.

Ankaŭ kun la junulo, kiu kvazaŭ-scipovis la rusan, ni ne sukcesis paroli. Li scipovis en tiu lingvo mal-multe da primitivaj frazoj kaj lia prononcado sonis pli uzbeke ol ruse. De liaj rakontoj ni komprenis, ke li jam estis en Taŝkento. Tiu urbo estas tre granda. En ĝi troviĝas multe da grandaj kelketaĝaj domoj kaj tiajn domojn li neniam antaŭe vidis.

Li scipovis geografion kaj sciis, kie situas Polio. Li sciis ankaŭ la aktualajn militajn kaj politikajn okazantaĵojn en Eŭropo kaj li konis la nomojn de la registaraj ĉefuloj. Li rakontis, ke li estas en "komsomol" kaj li estas en tiu organizaĵo la sekretario.

Iom post iom la surazena rajdado komencis min tedi kaj eĉ turmenti. Mi komencis piediri apud la azeno, ĝin tenante per la ŝnuro. Sed turmentis min ankaŭ la irado same kiel la rajdado, kvankam mi iom rajdadis kaj iom iradis.

Komplete forestis la antaŭaj fabelaj bildoj kaj la romantikaj pensoj. Ni ĉiam demandis, ĉu estas ankoraŭ malproksime al la kolĥozo Molotov. "He, he, he, kolĥoz Molotov, respondis ĉiufoje la uzbekoj."

Ĉe iu loko sur la vojo parto de la karavano nin adiaŭis, daŭrigante la rajdadon sur la ĉefa vojo. La parto de la karavano, kie estis mi, de tiu vojo deflankiĝis. Ni komencis rajdi sur mallargaj vojetoj, ebenaĵoj, supren kaj malsupren tra montoj, en iuj lokoj tre deklivaj. Ŝajnis al mi, ke en tiu loko la azeno kune kun mi ruliĝos al la valo kaj pri la rezulto en tiaj okazoj estas ja pli bone ne pensi. Ĉiufoje, kiam la azeno portiĝis min kaj sin al la valo sen ruliĝo, ŝajnis por mi tia okazo ia miraklo.

Rajdante en tiaj terenoj, mi estis certa, ke ni la kolĥozon tuj, tuj atingos. Post noktomezo, laŭ nia kompreno, la karavano venis en ian valon. El la faldoj inter la montoj ĉirkaŭen elrigardis argilaj dometoj, sen iu ajn signo de lumo. La tereno en la valo estis dike kovrita per pajlo. La uzbekoj lasis la azenojn liberaj, kiuj tamen ne malproksimiĝis, sed surpaŝante la pajlon ili manĝis ĝin kun akra apetito.

La uzbekoj bruligis iom flanke stoketon da pajlo kaj en la fajra lumo ili sidiĝis kaj varmigante sin ili babiladis. Ni kredis, ke jam estas la kolĥozo Molotov, sed ke la uzbekoj ne volas veki nokte siajn familianojn. Por esti certaj en niaj konkludoj ni demandis: "Ĉu tio jam estas la kolĥozo Molotov?". Same kiel antaŭe venis la multfoje aŭdita respondo, per simpatia afabla voĉo: "He, he, he, kolĥoz Molotov".

Kiam ektagiĝis la uzbekoj kolektis la azenojn kaj sur ili sidiĝis. Al ni ili montris, ke ni faru la samon, dirante: "Kolĥoz Molotov".

Denove ni komencis kelkhoran rajdadon tra montoj, sur mallargaj vojetoj kaj sen vojetoj. Ni estis lacaj, la sunbrilo estis varmega, ni ŝvitis kaj en tiaj okazoj la pedikoj iĝas pli viglaj. Ni malsatis, malgraŭ la manĝita pano, ricevita de la sekretario en Deŝkanabad. La junulo, komprenanta la rusan lingvon, foriris de ni kun la dua grupo. Neniu el ni kapablis kompreni kion diris la uzbekoj ol nur "jaŝi" kaj "kolĥoz Molotov". Mirinda estis

la trankvileco kaj la afableco de la uzbekoj al ni.

Ĉio tamen havas sian finon. Ĉirkaŭ tagmezo nia karavano atingis vilaĝon kaj ĝi estis "nia kolĥozo". Ĝi situis inter montoj. Malsupre fluis mallarĝa rivereto. En la vilaĝo troviĝis ĉ. dudek dometoj tre malproksimaj inter si.

En la koloroj de la sunbrilo la vilaĝo aspektis naturĉarma. Supre en la montoj paŝtadis gregoj da ŝafoj kaj kaproj, ĝoje saltantaj kaj manĝantaj la herbon per ĉiuj siaj sensoj.

Ni estis gviditaj al dometo, kie troviĝis la provizejo kaj ankaŭ la kolĥoza kontoro. Ĉ. unu horon ni atendis, ne sciante por kio. Fine venis al ni ruso en soldata uniformo, li kontrolis niajn dokumentojn, notis niajn nomojn, farante intertempe kun ni informbabiladon. Poste li parolis pri io kun la uzbekoj, li adiaŭis nin kaj foriris.

Baldaŭ venis nin saluti ankaŭ aliaj uzbekoj kaj el ĉio parolita ni komprenis: "Jaŝi".

Inter ĉiuj uzbekoj en la vilaĝo nur unu parolis la rusan lingvon, li estis la brigadisto. Poste ni eksciis, ke la rusan lingvon li scipovas, ĉar li estis dum kelkaj jaroj en tendaro en la Malproksima Oriento. Tiu brigadisto estis nia protektanto. Li gvidis nin al granda alta halo. Verŝajne tiu halo iam servis por fojnejo aŭ por ĉevala stalo. Ĝia enirejo estis alta kaj larĝa pordego. En muro troviĝis du fenestretoj laŭ la uzbekaj konstruaĵoj tre grandaj.

"Ĉi tie vi loĝos! Jaŝi?" " - Jaŝi!", estis nia respondo.

Kelkaj uzbekoj baldaŭ alveturigis al nia domo multe da pajlo sur granda ĉaro, ili ankaŭ helpis al ni porti la pajlon en la halon.

Intertempe la brigadisto alportis al ni iom da pano bakita sur plataj ŝtonoj kaj kelkajn akvomelonojn. Apenaŭ ricevinte nian dankon, li tuj forkuris. Post iom da tempo li revenis kun ankoraŭ unu uzbeko, ambaŭ portis litkovrilojn, vere malnovajn, sed por nia posedaĵstato ili estis egaj valoraj.

La brigadisto restis ĉe ni iom da tempo por babili kaj laŭ liaj kelkaj diraĵoj ni komprenis, ke li ŝatas

la rusan reĝimon same kiel ni, - ne sen motivo li estis kelkajn jarojn en la tendaraĵoj "edukejoj".

La postan matenon li denove alportis iom da pano kaj kelkajn akvomelonojn. Ni demandis, ĉu ni hodiaŭ komencos ian laboron. "Ho ne ! Hodiaŭ estas ripoztago." Estis la sesa de novembro, antaŭtago de jubileo de la bolŝevika ŝtatrenverso kaj en la vespero de tiu tago okazas festoj.

Iom poste la brigadisto alportis kaldronon, ke ni havu ion por boligi teon aŭ ion alian.

Matene la sepan de novembro, juna uzbeko alportis al ni en sitelo grasan viandan supon kaj kelkajn pecojn da viando. Verŝajne ili dum la pasinta vespero festis la bolŝevikan venkon kaj ne forgesis lasi por ni iom da festa manĝaĵo.

Kiam ni demandis post la festotago, kiam ni komencos labori, la brigadisto respondis, ke ili ne havas por ni laboron. Laboro estos dum la printempo.

* *
*

Nia nelaboranta kolektivo konsistis komence el naŭ viroj. Unu foriris post kelkaj tagoj serĉi pli bonan "feliĉon". La ceteraj :

Ankoraŭ en Kogan komencis amikiĝi kun mi kaj Tavelinski junulo laŭ nomo Kaŭfman. Li devenis de Lvovo el riĉa hejmo. Liaj gepatroj posedis tie grandan domon. Kiam la milito komenciĝis, Kaŭfman estis lernanto en gimnazio. Laŭ la polaj ĝismilitaj leĝoj ĉiuj gimnazianoj devige havis militekzercojn. Dum la militkomenco tiuj junuloj estis mobilizitaj kaj faris diversajn helpservojn kaj parte ili helpis al policistoj gardi ordon en la urboj.

Kiam la soveta armeo okupis Lvovon, tiuj junuloj estis kaptitaj kvazaŭ militintoj, malgraŭ ke la pola armeo kontraŭ la rusa ne batalis. Male, kiam la soveta armeo proksimiĝis al Lvovo, la polaj trupoj kapitulacis al la rusoj, kondiĉe ke la oficiroj kaj soldatoj, kiuj deziros trapasi la limon al Rumanio, havu tian eblon, kompreneble sen la armiloj.

Sed kiam la polaj trupoj fordonis la armilojn, ili estis traktitaj kiel militkaptitoj. Kune kun la soldatoj estis kaptitaj ankaŭ tiuj gimnazianoj kaj ilin ekzamenis NKVD-oficiroj. Dum la ekzameno Kaŭfman estis

demandita, ĉu li pafis kontraŭ la rusaj trupoj. Lia respondo estis "ne". Al la demando, kial li ne pafis, Kaufman respondis tute sincere, ĉar "li tian ordonon ne ricevis". La oficiro plu demandis : "Se oni donus al vi ordonon pafi al la rusaj soldatoj, ĉu vi pafus?" "Certe mi pafus", estis la respondo de Kaufman.

Tia respondo kompletigis ĉiujn akuzojn kontraŭ li, por taksi lin "klasa malamiko de la proleta soveta ŝtato kaj soveta popolo, pro lia kapitalista deveno kaj laŭ lia konscio". Kaufman ricevis per la "Osoboje Sovieŝĉanie" verdikton plenumi dekjaran edukadan laboron en koncentrejo. Kaufman estis tre inteligenta knabo kaj li tre rapide lernis perfekte la rusan lingvon. Sed diligente li lernis ankaŭ la rusajn "ĵulikaĵojn" - ŝteli, trompi, blufi, ĉantaĝi kaj similajn ruzaĵojn. Ofte li minacis dum konflikto kun iu uzi sian fizikan forton, malgraŭ ke li estis malforta kaj maldika. En la tendaro li eĉ havis tuberkulozon. Ĉefe per la multparolado li kapablis konvinki pri sia pravo. Li akiris tiun konvinkon per simpla tedado al sia kontraŭulo.

Ĉar li en gimnazio lernis la latinan lingvon, li sukcesis esti helpanto ĉe la kuracisto en la tendaro. Mi tamen sukcesis akiri certagrade influon al li por bremsi iujn liajn ruzaĵojn. En la vilaĝo ni tamen opiniis, ke Kaufman povas esti nia plej taŭga reprezentanto kaj ni por tio elektis lin.

La interna kunvivado estus sufiĉe kontentiga, sed ĝin malebligis iu Goldŝtejn.

Ĝis la milito li loĝis en malgranda urbo proksime de Varsovio. Karaktere li estis avarula filozofo. Ĉiujn li traktis suspekteme. Ĉiam al li ŝajnis, ke li estas trompata de la ceteraj. Li preskaŭ ĉiam estis for de la hejmo, faris kun la uzbekoj negocojn sekretajn por ni. Precipe koncerne la manĝaĵon okazis kvereloj.

Kiam ni ricevis la panon, ni dividis ĝin je porciojn laŭ la vido, pesilojn ni ja ne havis. Ofte okazis, ke Goldŝtejn estis for dum la pan-divido. Li ĉiam post la reveno furiozis, kriante, ke ni donis al li pli malgrandan porcion ol al la ceteraj.

Poste li eksuspektis kaj ekakuzis tiujn, kiuj la panon

alportis de la brigadisto, ke ili survoje iom formangas kaj trompas nin ĉiujn. Ni decidis, ke Goldŝtejn mem iru ĉiutage kun alia kamarado al la brigadisto preni la panon. Post dufoja irado li komencis suspekti pri la panŝtelado ankaŭ la brigadiston. Tiuj aferoj pri suspekto finiĝis, kiam la uzbekino rifuzis baki por ni panon, opiniante, ke ni mem povas tion fari.

Tiam ni ricevis anstataŭ la pano po tricent gramojn da faruno. De tiu ŝanĝo ni estis eĉ kontentaj, opiniante, ke estas preferinde kuiru la farunon kun akvo kaj havi per ĝi po du litrojn da amelsupo, kaj ni povas tion manĝi du fojojn tage.

Denove komenciĝis disputoj kun Goldŝtejn. Li opiniis, ke el duono de la faruno ni baku panon, kaj el duono ni kuiru amelon. Ni tamen ne volis tion okupi nin per iomete da faruno.

Intertempe mi kaj Kaufman eksciis ion pri la uzbekaj kutimoj. Nome, se venas al iliaj hejmoj fremdulo aŭ konato, li estas gastigata per manĝaĵo, kiu konsistas ĉefe el iom da pano, akvomelono kaj teo. Teo estis tiam la plej luksa aĵo kaj regalita al specialaj gastoj.

Mi kaj Kaufman komencis fari vizitojn al la uzbekaj hejmoj pro diversaj pretekstoj. Ĉefe ni venis kvazaŭ demandi, ĉu troviĝas tie la brigadisto. Baldaŭ ni estis petataj lavi niajn manojn kaj sidiĝi sur la planko ĉe kovrilo. Antaŭ ni estis metitaj iom da pano kaj akvomelono. Sed la gastoj de uzbekoj dum tiaj invitoj nur gustumas manĝaĵon kaj la ceremonio havas nur simolan karakteron.

Ni, ĉiam malsataj, ĉiam formangiĝis ĉion, kio estis antaŭ ni metita. Vizitante tiel ĉiutage du uzbekajn hejmojn, ni satiĝis. Tiu maskita almozpetado certe daŭrus pli longe, se pri ĝi ne eksciis Goldŝtejn. Li baldaŭ komencis praktiki tiun almozpetadon larĝskale kaj preskaŭ dum la tuta tago. Li eĉ ne volis, ke ni kuiru por li, ĉar li volis ricevi sian porcion da faruno por poste ĝin iam vendi aŭ provizi por alia tempo. La rezulto estis, ke la uzbekoj ĉesis nin gastigi. Kiam ni venis al iu dometo, ili eĉ ne atendis nian demandon, sed diris: "Jok, jok, jok" (ne, ne, ne).

Dum la ĉ. dusemajna restado en la vilaĝo ni sentis nin izolitaj de la mondo. Nenian gazeton ni ricevis kaj ni ne sukcesis ekscii ion de la uzbekoj pri la okazintaĵoj en la mondo. Mi kun alia kamarado decidis iri dimanĉe al la vilaĝo, kie okazas la bazaro, kun la espero renkonti tie niajn homojn aŭ almenaŭ ekscii iajn novaĵojn.

Laŭ la informoj la distanco al la bazaro estis ĉ. dek kilometroj, sed tiun vojon neniu mezuris. Ne ekzistis iu ajn vojo eĉ vojeteto. Oni devis iri nur tra montoj kaj valoj. Tre malofte ni renkontis homon por demandi la vojon al la bazaro. Verŝajne en tiaj okazoj estas sufiĉe forta la homa instinkto, ĉar ni nur laŭ ĝi direktiĝis.

Kiam ni atingis la bazaron, jam estis post tagmezo. Ni tamen renkontis kelkajn el niaj homoj, kiuj venis al la bazaro por la sama afero kiel ni. De la reciproka demandado kaj informado ni konkludis, ke en aliaj kolĥozoj estas proksimume la samo kiel ĉe ni. - Nenie ili havas laboron kaj ĉie estas donata la sama kvanto da nutr-aĵoj. Pri la militaj kaj politikaj okazintaĵoj ankaŭ ili nenion sciis.

Iam pasante en la vilaĝo mi vidis uzbekan familion, metantan argilaĵon sur la tegmenton de sia domo. Laŭ iliaj klarigoj tiu novmetita tavolo da argilo ŝirmas kontraŭ la trapenetron de pluvo dum vintro, kiu baldaŭ venos. Mi proponis al ili mian helpon. Ili baldaŭ tion akceptis kaj eĉ petis min alvoki ankoraŭ unu kamaradon. Mi alvokis Tavelinski, ĉar li estis tre laborema homo. Post la laboro antaŭ la vespero ni ricevis vespermanĝon : panon kaj teon.

En la venontaj tagoj venis al ni ĉiumatene uzbekoj nin dungi al tiu laboro. Ni iris en grupoj el tri homoj. Fakte estis nur du tiaj grupoj. Unu inter ni estis malsanulo kaj ĉiam kuŝis en la hejmo. Li ne havis apetiton, ĉiam sufiĉis por li la manĝaĵo, kiun li ricevis de la kolĥozo. Alia estis frizisto kaj razante aŭ tondante la uzbekojn, li ĉiam ricevis kelkajn rublojn. Por ni estintaj malfortuloj, tiu laboro estis sufiĉe streĉa.

La pago por tiu laboro estis manĝaĵo du fojojn tage, matene kiam ni alvenis al la laboro kaj vespere antaŭ la foriro hejmen. Ni tamen estis kontentaj de tiu laboro,

ĉar por la laboro krom la manĝaĵo ni ricevis ankaŭ iom da produktoj de la kolĥozo kaj ni ne devis malsati.

Komence de decembro, ĉ. la sesa matene venis en la ĉambron iu uzbeko. Ni ĉiuj estis ankoraŭ sur niaj kuŝejoj kaj li komencis al ni paroli, sed vidante, ke ni ne komprenas, li diris: "He, brigadir! rejon, Deŝkanabad". Ni pensis, ke li volas kune kun nia brigadisto iri al Deŝkanabad. Sed li komprenigis, ke ni ĉiuj devas iri tien.

Baldaŭ venis ankaŭ la brigadisto kaj la saman klarigis al ni en la rusa lingvo. Elirinte el nia halo, ni vidis, ke sur la placo jam staras por ni azenoj. Intertempe la brigadisto alportis por ni iom da pano, proksimume la ĉiutagan porcion, kaj, adiaŭante nin, diris al du uzbekoj, kiuj devis nin akompani, ke ni foriru.

Komence nia karavano renkontis neniun sur la vojo. Ĉirkaŭ tagmezo ni ekrimarkis surazenajn kaj piedirantajn karavanojn similajn al la nia. Ni demandis unu la aliajn, por kio ni estas gvidataj al Deŝkanabad. Neniu tion scias. En ĉiuj kolĥozoj, kie estis niaj homoj, okazis la samo, dum la sama mateno kiel ĉe ni.

Ju pli ni proksimiĝis al Deŝkanabad, des pli multe ni renkontis tiajn karavanojn.

Al Deŝkanabad ni alvenis dum la vespero laca kaj malsataj. Ni kredis, ke en Deŝkanabad ni almenaŭ ekscios, kial oni venigis nin.

Laŭ la kutimo niaj uzbekoj iris al la "ĉajĥana" trinki iom da teo kaj tranokti. Apenaŭ ni sidiĝis en la "ĉajĥana", kiam venis milicia oficiro kontroli niajn dokumentojn.

La polaj rifuĝintoj konsistis tiam el du kategorioj: tiuj, kiuj venis el la koncentrejoj, kaj tiuj, kiuj ne estis en la koncentrejoj. La ekstendaranoj ricevis dum la liberigo dokumentojn kiel polaj civitanoj. La netendaranoj posedis sovetajn pasportojn kaj estis traktataj kiel sovetaj civitanoj.

Vere, ne ĉiuj pasportposedantoj en Sovetunio estas egalrajtaj. En la pasportoj estas notitaj diversaj numeroj, laŭ kiuj NKVD devas taksi la fidiindecon de la koncerna persono por la sovetaj instancoj. La numeroj en la pasportoj, kiujn prenis la poloj siatempe, plej ofte limigis iliajn rajtojn aŭ informis, ke tiu persono ne

estas sufiĉe kontrolita.

Kiuj havis la sovetajn pasportojn, tiujn la oficiro senprokraste resendis al la kolĥozoj. Nin, havantajn dokumentojn de la tendaroj, la oficiro direktis al ŝarĝaŭtomobiloj, kiuj nin veturigis al Guzaro.

Tiun kelkhoran veturadon ni faris kiel vere sursarĝita homamaso. Ni estis tiel kunpuŝitaj, ke ne eblis movi membron de la korpo. Plej kompatinda sur nia aŭtomobilo estis iu familio kun du malgrandaj infanoj. Unu infano estis dujara, la dua kvarjara. La edzo estis en Polio instruisto en urbo Radom. Dum la veturado la patro tenis unu infanon envolvita en ĉifonoj, la duan tenis la patrino sammaniere. Dum la veturado ambaŭ infanoj estis trankvilaj kaj ĝuste tiu trankvilo maltrankviligis la gepatrojn kaj ne sen motivo.

Ĉirkaŭ noktomezo la aŭtomobilo haltis en Guzaro, antaŭ iu t.n. "evakupunkto". Interne en granda halo estis komplete mallume. Sur la planko kuŝis homoj. Pro nia enveno kelkaj el ili vekigis. De ili ni eksciis, ke venis antaŭ kelkaj horoj ankaŭ la ceteraj homoj, pelitaj el la kolĥozoj, same kiel ni. Neniu el tiuj homoj sciis, kial ni estas kune kolektitaj en Guzaro. Laŭ supozo, devos verŝajne veni por ni vagonoj kaj ni estos forveturigitaj. Kien?... Tion neniu sciis. Malgraŭ la mallumo mi trovis lokon sur la planko por kuŝiĝi.

Matene estis por mi la ĉiama problemo : kiamaniere akiri ion por manĝi. Monon mi neniam havis. Dum tiu tempo estis jam en la tuta uzbeka respubliko porciumata la pandidistribuado. En la bazaro oni povis aĉeti malgrandajn platajn uzbekajn panbulojn, sed ili kostis po kvin rublojn.

En la urbeto Guzaro mi vagis du tagojn nenion manĝinte, same kiel multaj samsortanoj, la pelitoj el la kolĥozoj. Ambaŭ infanoj de la instruisto el Radom mortis, ne mankis malsanuloj inter la pliaĝuloj.

En la vespero de la tria tago ni ricevis po 400 gramojn da pano, laŭ antaŭe preparitaj listoj po 40-personaj grupoj. La samo okazis en la sekvontaj vesperoj, sed pri la ĉefa demando, kiam kaj kien ni estos veturigitaj, neniu sciis. Kiel kutime disvastiĝis diversaj klaĉaĵoj, precipe, ke oni veturigos nin al Persio. La veron ne eblis kontroli.

En la kvina tago de nia vagado oni sciigis nin, ke ni estu ĉe la stacio, ĉar hodiaŭ venos vagonoj por ni.

La menciitan vesperon venis ĝuste ŝarĝvagonoj kaj ni enŝarĝiĝis. Ĉirkaŭ noktomezo la trajno ekveturis, matene ni estis ĉe stacio Karaŝi. Intertempe ni eksciis, ke ni havas estraron de la karavano. Tiu estraro ordonis prepari listojn de la veturantoj kaj anoncis, ke neniu rajtas memvole forlasi la trajnon. Ĉiu forlasanto estos traktata kiel fuĝinto, kaj laŭ tio punota. Laŭ iliaj klarigoj tiu ordono devenas kvazaŭ de Generalo Anders. Laŭ tiu ordono ni volis diveni, ke ni veturas al la pola armeo. La estraro ankaŭ sciigis, ke ĝi zorgos, ke ni ricevu manĝaĵon, sed ĉiuj demandoj, kien ni veturas, restis sen respondo.

* *

Pli ol semajnon la trajno vagadis sur la mezaziaj fervojoj, haltante nur ĉe malgrandaj stacioj, kie ni ricevis po 200 gramojn da pano aŭ iom da supo. Ĉe iuj stacioj ni renkontis karavanojn vagantajn simile al la nia. Al tiuj homoj okazis la samo : ili laboris en kolĥozoj, aŭ en urbetoj, venis miliciistoj, ilin kunpelis, sidigis en trajnoj kaj nun ili migradas. Kien ? Tio estas sekreto.

En iu stacio venis al ni homo en uniformo de la pola armeo. Sur la ĉapelo li havis distingon de kapitano. Li klarigis, ke li estas pastro kaj venis rigardi, kiel ni aranĝis nian vojaĝon. Vizitante la vagonojn, li demandis kiel ni fartas, li rekomendis precipe zorgi pri la infanoj, al ili instrui kristanan kredon kaj ĉio estos bona.

Je nia demando kien ni estas veturigataj, li respondis : "al bona loko". Laŭ religia rezonado tian respondon oni povus komenti : al la paradizo. Kiam ni plendis, ke ni ricevas malmulte da manĝaĵo, li respondis : "Ankaŭ tio pliboniĝos. Vi devas ricevi ĉiutage manĝaĵon por ses rubloj laŭ la ŝtataj prezoj."

- "Sed ni ja tion ne ricevas.

- Ho, vi ricevos" kaj li eniris en alian vagonon.

Li sukcesis apenaŭ viziti kelkajn vagonojn, kiam la trajno komencis veturi. Ni adiaŭis la pastron per manŝvingoj kaj aŭdis lin diri : "Kun la dia helpo".

Dum tiu migrado mi havis la eblon esti en kelkaj

famaj urboj de tiu regiono. Unu el ili estas Ĝambul. La nomo de tiu urbo estas honorigo al la granda kazaĥa poeto Ĝambul Ĝabajev. Pri lia poezio mi nenion povas opini, sed kiam mi iufoje trarigardis libron de elektitaj sovetaĵoj poeziaĵoj, mi vidis, ke inter la poeziaĵoj pri Stalin ankaŭ Ĝambul Ĝabajev verkis kelkajn tiajn kantojn.

Dum unu tago nia trajno haltis en la urbo Kokando. Krom nia trajno troviĝis ĉe la stacio ankoraŭ kelkaj kun samaj pasaĝeroj kiel ni. Unu el la karavanoj estis jam migrinta tri semajnojn. Fine, tiuj karavanoj entreprenis reziston, postulante aŭ finon de la veturigo aŭ klarigojn kien kaj kial ili estas veturigataj. Fortaj viroj staris ĉe la vagonaj bremsoj kaj kiam la trajno ekveturis, ili ĉiam ĝin bremsis. Kiel finiĝis tiu konflikto, mi ne eksciis, ĉar nia trajno forveturis el Kokando.

Dum kelkaj tagoj ni veturis tra regiono, kie troviĝis amasoj da sukerbetoj ĉe la fervojaj stacioj. En la proksimeco de ĉiu stacio ni vidis grandajn ĉarojn kun tiuj betoj tirataj de bovoj al la placoj proksime de la fervojo. La lingvon de tiuj homoj ni ne komprenis. Ili ĉiam ŝajnis ne vidi, kiam niaj homoj ŝtelis sukerbetojn de iliaj ĉaregoj. Ilia konduto al ni kuraĝigis nin ŝteli tiom da betoj, kiom eblis. Ni manĝis la betojn krudaj, rostitaj, kuiritaj, ni ilin preskaŭ senĉese maĉis. Ni sugestis unu la alian, ke la betoj estas por ni ne nur manĝaĵo, sed ankaŭ medikamento - la betoj ja enhavas sukero kaj tion ni eĉ ne vidis de multaj monatoj.

Tiam mia kamarado Tavelinski malsanis. Li apenaŭ kapablis eliri el la vagono nur por la fiziologiaj bezonoj kaj tiam estis ankaŭ necese lin subteni kaj gvidi. Mi estis la prizorganto de betoj ankaŭ por li. Mi kuiris el la betoj densan sukron por li. Dum la komuna kelkjara restado kun li en Sovetunio, li ofte diris, ke sian vivon li dankas al mi, ĉar mi alportis kaj kuiris la betojn kaj sukero estas la plej bona kuracilo kontraŭ ĉiuj malsanoj kaj la plej bona nutraĵo donanta multe da forto por la korpo.

Intertempe ni eksciis, kial ni estis forveturigitaj de la antaŭaj lokoj, - ili situis proksime de la persa limo kaj NKVD timis nian eskapon al Persio. Vere, ĝis la limo estis ĉ. 300-400 kilometroj. La tuta regiono estas

altmontara. Por trairi ĝin ne sufiĉus niaj fortoj kaj la limo estas certe bone gardata, sed NKVD tamen timis.

Post dusemajna veturado la trajno estis lokita sur la flankajn relojn de iu stacio, apud tri trajnoj similaj al la nia. La trajna estraro ordonis prepari novajn listojn de la ĉeestantoj kaj la ĉeesto de la homoj estis kontrolita.

La estraro sukcesis aranĝi, ke ni ricevu ĉiutage po kvarcent gramojn da pano kaj iom da supo, el la fervojstacia restoracio. En ĉiu vagono troviĝis plejparte 70-80 homoj. La karavanestro eldonis por ĉiu vagono manskribitan kuponon. La skribaĵo tekstis: "Vagono n-ro... Nombro da homoj..." kaj lia subskribo. Per la sama kupono ni ricevis panon kaj la pandonantino notis sur ĝi signon, por ke ni ne prenu panon duan fojon. Poste ni ricevis supon en la stacidoma kuirejo kaj tie la kupono estis forprenita.

Estis tre simple kopii tian kuponon kaj en niaj cirkonstancoj la afero estis tre alloga. En nia vagono sin anoncis iu, kiu tre bone kopiis tiujn kuponojn. Sed li je ne riskos ricevi sola pli ol tridek kilogramojn da pano, ja la tuta afero baldaŭ fiaskus.

Per komuna decido en la vagono ni aranĝis la aferon por "ĉies bono". La kuponkopianto ricevu tri kilogramojn da pano, tri kilogramojn ricevu la homo, kiu riskos preni la panon el la restoracio, tri kilogramojn ricevu la vagona brigadisto, li ja kvazaŭ respondecas pri siaj homoj, la restonta pano estu dividita al la ceteraj. Supoze estis similaj trompoj en aliaj vagonoj.

Post unusemajna restado tie la trajno iun vesperon ekveturis. Dumtage ni rimarkis, ke ni veturas en la direkto, de kie ni venis. Ni revenis ankaŭ en la "betan regionon". Ni profitis de ĉiu stacio en tiu regiono por fari provizon je betoj. - Dum la veturado la manĝajricevo ĉiam malbone funkciis kaj la betoj ja estas ankaŭ "kuracilo".

Fine de decembro ni venis al stacio kun nomo "Kara Su" (Nigra Akvo), nomo de la rivero. La trajno tie haltis unu tagnokton kaj oni sciigis al ni, ke ĉi tie ni elvagoniĝos. Ĝojigis nin la milda klimato ĉi tie. Preskaŭ ĉiuj eliris el la vagono por sin varmigi en la sunradioj

kaj kiel kutime forigi de si pedikojn, kio ne povis okazi en la mallumaj vagonoj.

La morgaŭon oni veturigis nin sur ĉaroj, tirataj per ĉevaloj. Mi, Tavelinski, Kaufman kaj ankoraŭ kvar personoj sidigis sur unu el la ĉaroj por daŭrigi la veturadon al kolĥozo. La veturigisto estis kirgizo, la rusan lingvon li tute ne komprenis. Li ankaŭ ne aspektis tre simpata. Simila al lia aspekto estis lia konduto al ni. Verŝajne li ankaŭ ne estis tre saĝa. Li parolis multe, tre laŭte kaj tre rapide. Ĉar ni ne sciis kion li volas, ni movis la brakojn kaj respondis en la rusa lingvo, ke ni ne komprenas.

Verŝajne la kirgizo opiniis, ke ni neglektas lian deziron kaj komencis paroli pli laŭte per malica voĉo.

Vidinte, ke ni ne plenumas lian deziron, li ekkriis, ekkraĉis kaj laŭ liaj manmovoĵoj ni komprenis, ke li minacas al ni, sed la rezulto ne povis esti alia ol nia respondo: "Ni ne komprenas". Fine li ekveturis, ne parolante kun ni dum la tuta vojo, kiu daŭris kelkajn horojn.

La ĉaro haltis en vilaĝo apud la vojo. Viro staranta sur la vojo diris ion al la veturigisto kaj tiu deflankigis de la ĉefa vojo. Veturinte kelkcent metrojn, la veturigisto haltis antaŭ iu dometo kaj laŭ la parolo kaj manmovoĵoj de la kirgizo ni komprenis, ke ni estas ĉe nia "hejmo".

La dometo estis argila - el la sama materialo kiel la ceteraj najbaraj dometoj. En la flanko estis la pordo en okcidenta direkto, kie etendiĝis plataj kampoj, atingantaj la horizonton. Ĉirkaŭ tricent metrojn de la domo norde staris majeste alta solida monto.

La dometo por ni, sep homoj, konsistis el unu ĉambro. Ĝi ne estis granda kaj ni tion taksis pozitiva: ne estos malvarme dum la noktoj. Loko sur la planko sufiĉis por ĉiuj. En la ĉambro troviĝis jam kaldrono enkonstruita en forneto.

La unua tasko post la enveno estis por ni, kiel kutime en Rusio, informiĝi pri manĝaĵo. Tion esplori iris Kaufman, kiu sin opiniis la plej sperta en tiuj aferoj, lin akompanis Cvibelzis, kiu verŝajne ne konfidis al Kaufman.

Post nelonga tempo ili revenis, portante por ĉiu rondan platan panbulon pezantan tricent gramojn, laŭ la

aserto en la kolĥoza kontoro, kie oni donis la panon. Tiel rapida ricevo de la pano nin surprizis. Laŭ tio ni opiniis, ke la kolĥozo estas tre bona kaj tre riĉa. Intertempe alveturis antaŭ la dometo ĉarego kun pajlo. Du kirgizoj ĵetis antaŭ la dometon amason da pajlo kaj diris, ke tiu pajlo estas bruligmateriale por kuiri teon. La kirgizoj ne praktikas uzon de pajlo por kuŝejo; ili dormas sur la planko.

La du kirgizoj promesis alveturigi pajlon ankaŭ en venontaj tagoj. Ni laŭ tio opiniis, ke la kirgizoj estas bonaj homoj, same kiel la uzbekoj.

En sitelo prunteprenita ĉe kirgiza najbaro ni alportis akvon. La akvon ni ĉerpis el truo, tien ĝi venis el la montoj. Post pluvo tiu akvo ne estis tre pura, kompreneble ne temis pri laboratoria kontrolo, sed nur pri la okulvida, ĝi alfluigis teron kaj etajn objektojn kaj dum la ĉerpado ĝi iĝis malklareta, tamen ĝi estis akvo kaj niaj stomakoj en Rusio iĝis malsentemaj por tiaj bagatelaĵoj.

Intertempe vesperiĝis. Ĉe la lumo de la brulanta pajlo sub la kaldrono ni sidis kaj kuŝis sur la planko kun multe da pajlo, babilante pri la "bona" antaŭmilita pasinteco kaj pri la travivaĵoj en la tendaroj. De tempo al tempo iu ĉerpis el la kaldrono per uĵeto de konservaĵoj iom da akvo, kiun ni baptis per la nomo "teo". Revante pri la estonteco post la forlaso de Rusio kun esperoj pri la venonta tago en la riĉa kolĥozo, ni ekdormis.

La venontan tagon ni spertis, ke nia entuziasmo pri la kolĥozo estis troigita. Niaj mastroj klarigis al ni, ke ni ricevos po kvarcent gramojn da pano tage, se ni laboros. Do kian laboron oni proponis al ni? - Laŭ la soveta agrikultura "planita" mastrumado estas al la kolĥozoj ordonite kulturigi tre vastajn areojn, kion en la praktiko ne eblas realigi. La rezulto estas, ke ili sukcesas la teron plugi kaj semi, sed multe malfruiĝas la rikolto. En la tero restas amasoj da produktoj, kiuj putras.

La kolĥozo Kalinin, aŭ kiel ĝin nomis la kirgizoj - Jangelik (supoze iama nomo de la vilaĝo) - ne estis escepto. Tiun fojon temis pri kotono, kiu restis sur la kampoj jam penetrigita de la pluvoj. En la kolĥozo estis

primitiva forno por sekigi la kotonon, sed rikolti ĝin oni proponis al ni. La kampoj estis ŝlimaj kaj neniu el ni havis ŝuojn taŭgajn por vadi en la koto. Tiun laboron ni akceptis, kondiĉe ke ni ricevu ŝuojn kaj la kolĥozo ŝuojn ne havis. Ni komencis malsati pli ol antaŭe kaj atendi miraklon por savi nian vivon. La rezulto sekvis : al la kolĥozo venis okdekkelkaj homoj kaj ĉiumatene ni eksciis, ke dumnokte iu finis sian turmentadon, sian vivon.

Niaj homoj intervenis ĉe NKVD - ni ja tamen estis sovetaĵ aliancanoj. Post la interveno ni komencis ricevi po tricent gramojn da faruno tage. El la faruno ni kuiris amelon dufoje tage, sed ni ne havis salon.

Iun fojon vizitis nian kolĥozon kuracisto. Li venis en la ĉambrojn, rigardis nin kuŝantajn sur la planko en la mizero, aŭskultis niajn plendojn kaj foriris, - helpi al ni li ja ne povis.

La mort-angelo ankaŭ ne evitis la sep homojn en nia ĉambro. La unua viktimo estis unu el la du fratoj Cvibelzis, ambaŭ el Varsovio, en la aĝo de dudekkelkaj jaroj. La juna estis tajloro, la pli aĝa estis metallaboristo. En Varsovio ili ambaŭ apartenis al la komunista junulara organizaĵo. Post ilia alveno sur la nove "liberigitaj teritorioj", ili libervole anoncis sin por laboro en Sovetunio. Ili estis senditaj al iu urbo en Blankrusio. Tie ili laboris dum kelkaj monatoj. Malgraŭ la multjara aparteno al la komunista junulara organizaĵo, ilia porbolŝevika entuziasmo rapide forpasis. Ili estis arestitaj pro sia malkontento kaj ofta plendo, en Sovetunio diverse nomita, sed ĉefe kontraŭsoveta agitado.

En la koncentrejo ili estis kune kaj kune ili vagadis de la Komi-Regiono en la nordo ĝis la kolĥozo Jangelik.

Kiam ni venis en nian ĉambrojn, la juna Cvibelzis kuŝiĝis ĉe la forneto kaj dormis. Li volis leviĝi, nur kiam li devis eliri el la ĉambro por la fiziologiaj bezonoj. Kiam la manĝaĵo estis preparita, ni devis lin vekti, ke li manĝu. Ĉiam li manĝis iomete de sia malmulta porcio, la ceteron li donis al la frato kaj daŭrigis la dormadon. Post kelkaj tagoj li perdis la konscion. Kiam li sidiĝis por manĝi, li babilis pri aferoj, kiuj nenion komunan havis kun la cirkonstancoj.

La pli aĝa Cvibelzis veturis kun li per ĉaro al hospitalo en la regiona urbo Kurŝab. En la hospitalo la deĵoranta kuracisto ne volis akcepti la malsanulon pro manko de loko. La ĉaro, kiu lin alveturigis jam estis for, la pli aĝa frato lasis la malsanulon en hospitala koridoro kaj foriris, kredante tiel devigi la kuraciston akcepti la malsanulon. Kio okazis poste, la frato post la reveno hejmen ne sciis.

Post kelkaj tagoj la pli aĝa Cvibelzis ankaŭ perdis la apetiton kaj samtempe la konscion. Lin veturigis al la hospitalo Kaufman kaj li sukcesis la malsanulon venigi en la hospitalon.

Post ĉ. tri semajnoj Cvibelzis la pli aĝa revenis. Li estis malforta kaj paŝadis tre malrapide. Li rakontis, ke la hospitalon li forlasis pasintan vesperon. Li tranoktis en ia laborejo sur tablo, sed li eĉ ne memoris, kie tiu loko troviĝas. Dum la tuta tago li iris piede dekse kilometrojn al la kolĥozo "hejmen". Demandite pri la frato, li komencis plori. La frato mortis, lia malsano estis tifo, ankaŭ la pli aĝa frato havis tifon.

La dua viktimo estis Gutman. Li suferis disenterion. Lia aĝo estis ĉ. kvindek jaroj. Antaŭ la milito li loĝis en Varsovio. Tie li havis butikon por horloĝriparado. En Varsovio li lasis du filinojn, ambaŭ maturajn por edziĝi. Laŭ lia diro, edzinon li lastatempe ne havis.

Iom da tempo de sia vivo li estis en kelkaj eŭropaj landoj. Pli longan restadon li havis en Nederlando kaj en Anglio. Ni ĉiam volonte aŭdis liajn rakontojn pri aliaj landoj. Neniu el ni ĝis tiu tempo estis ekster Polio. Nederlandon li tre ŝatis, sed Anglion li alte taksis.

La ununura medikamento kontraŭ disenterio posedata de ni estis paketo da kafsurogato, kiun Kaufman ie aĉetis dum la migrado. Kaufman asertis, ke forta kafo estas bona rimedo kontraŭ disenterio. Gutman asertis la samon. Malgraŭ, ke Gutman ĉiam diris, ke kafo lin sanigas, fakte ĝi ne multe helpis. Li iĝis pli kaj pli malforta kaj malpli manĝema. Iun nokton li komencis kraki, balbuti, voki niajn nomojn, sed nenion respondis, kiam ni parolis al li. Matene Kaufman lin veturigis sur ĉaro al la hospitalo. En la hospitala koridoro ĉesis liaj lastaj vivsignoj. En

la monatoj januaro-aprilo mortis inter niaj okdekelkaj homoj tridek ses, - nur en unu nia kolĉozo.

Nia normala okupo en la "kibitko" estis kuiru du fojojn tage la farunan amelon, ofte sen salo, kaj ĝin konsumi. La ceteran tempon ni uzis por mortigi niajn pedikojn. Pajlon por la hejtado alportis laŭvice ĉiutage alia kamarado.

En marto oni sciigis al ni, ke al la regiona urbo Kurŝab venis komisiono de la pola armeo kaj akceptos ĉiujn taŭgajn por la militservo. Escepte de kelkaj maljunuloj, ĉiuj veturis al la komisiono por sin anonci. Sed vane, la pola oficiro klarigis, ke por esti akceptita al la armeo estas necese posedi dokumenton, ke oni estas polo. La plimulto el ni posedis dokumentojn de tendaroj, ke ni estas liberigitaj kiel polaj civitanoj. Tiuj dokumentoj ne sufiĉis por la komisiono. Ni tion tiam taksis antisemitan eksceson ; kelkajn jarojn poste, kiam mi tralegis la libron de generalo Anders, mi eksciis, ke li havis multe da klopodoj kaj ĉagrenoj kun la rusaj aŭtoritatoj pri tiu afero. La rusoj ne volis akcepti la judojn kiel polojn, malgraŭ la pola civitaneco.

* *
*

7_ mi, soveta agrikulturisto

Venis la printempo de la jaro 1942. Ni komencis esti utilaj homoj, labori kiel agrikulturistoj. Kelkaj plugis la montarajn altaĵojn per sarkiloj (ĉekmenoj), kelkaj elfosis kreskaĵojn el la kanaloj, kelkaj laboris en la provizejoj, kelkaj elŝiris la kotonajn arbustojn. La salajro por ni estis kvarcent gramoj da faruno por farita "normo". Ne mankis inter ni "staĥanovanoj", kiuj faris cent kaj kvindek procentojn tage. Estis al ni promesite, ke post la prikalkulo de la rikolto, post la Novjaro, ni ricevos alpagon per produktoj kaj eble "monon". Ni havis sufiĉe da spertoj en la soveta mastrumado por scii, ke ni ricevos aŭ nenion, aŭ eventuale tre malmulte.

Kiam venis la varmegaj tagoj, aperis sur la kampoj multe da testudoj. Ni kaptis ilin kaj hejme kuiris ilin dum la vesperoj.

Kiam proksimiĝis la tempo de la rikolto, ni estis sur la kampoj tage kaj nokte. Laŭvorte ni laboris de la sunapero ĝis la sunsubiro. Sur la kampoj estis tiam aranĝita kaldrono por kuiri por ni amelon. La kirgizoj nomas tiun kaldronon "Kizil Ĥazan" - ruĝa kaldrono". Mi ne scias, ĉu ili traktas tiun nomon serioze aŭ blasfemas.

Kvankam ni ricevis kvazaŭ duoblon da manĝaĵo kompare al la vintro, ni konstante revis pri la tempo, kiam ni havos la eblon satiĝi.

Somere okazis ankau ŝanĝoj en nia personaro. Kelkaj, i.a. junaj homoj, foriris, eĉ kiam la cirkonstancoj plibonigiĝis. Kaufman, havante la "ĵulikan" sperton, foriris al la regiona urbo. Li nenie laboris. Kiam mi renkontis lin, li ĉiam havis iom da mono. Li ĉiam diris al mi : "Mi ne mal-satas". Li instigis min forlasi la kolĥozon kaj veni al la urbo. Al la demando pri kio li okupas sin, li neniam volis respondi.

Mia kamarado de la tendaro, Tavelinski, ricevis laboron en la hospitalo kiel akvoliveranto. Li ĉerpis akvon el rivero en barelon kaj sur ĉareto tirita per ĉevalo veturigis ĝin por la hospitalaj bezonoj. Fakte li devis fari ankoraŭ aliajn laborojn, interalie gardi la hospitalon dumnokte. Sed ĉar li dumtage laboris, li ricevis nur la salajron de noktgardisto kaj nokte dormis. Tiu funkcio estis al li donita formale. En la hospitalaj elspezoj devas esti ankaŭ noktogardisto kun salajro de cent rubloj monate kaj tia salajro ne povas havi volentulojn.

Kelkaj foriris al la stacia urbeto Kara Su. Tie ili havis la eblon negoci sur la bazaro kaj kun traveturantoj. Kelkaj foriris "serĉi feliĉon" en aliajn kolĥozojn kaj same venis al ni homoj de aliaj kolĥozoj "serĉi la feliĉon" ĉe ni. La restinta anaro konsistis el ĉ. dudek homoj.

Komence ni laboris kune kun la kirgizoj. Ilin treege interesis la vivo en Polio kaj ĉiu el ili demandis, ĉu ankaŭ en Polio estis kolĥozoj. Aŭdinte, ke en Polio ĉiu kamparano mastrumadas por si mem, ili movis la kapojn, ripetante per envia tono la frazon: "Ĉiu mastrumadas por si mem". Ne mankis ankaŭ demandoj naivaj, ekzemple: "Ĉu la germanoj ankaŭ havas fervojojn, lokomotivojn, k.s.?" Iom poste ni estis kunigitaj en aparta laborgrupo kun propra rusa laborgvidanto, kiu verŝajne estis iam forsendita de sia loĝloko kiel "kulako". Ĉar li post longjara restado en Kirgizio parolis la lingvon de la landa loĝantaro, li apartenis al la estraro de la kolĥozo.

Iun tagon oni forprenis de ni la rusan kontrolanton kaj anstataŭis lin alia ruso veninta de io. Li diris, ke li venis al ni kiel agitanto, la praktika signifo de la vorto povas esti ankaŭ kontrolanto. Fakte li nenion kontrolis kaj por nenio agitadis, sed li ĉiam estis inter ni.

Post du aŭ tri semajnoj ni eksciis, ke li estas rusa judo, komprenanta la lingvon plejofte parolatan inter ni. Estis klare, por kio li venis al la kolĥozo.

Dum la tuta somero en tiu regiono ne pluvus. Tagmeze la suno tre ardas. Paŝi nudpiede sur la tero dumtage

estas turmento, eĉ por la piedoj harditaj al varmo. Sed sur kreskaĵoj oni la ardecon ne tiom sentas.

La kvaran de oktobro post tagmezo, la firmamenton ekkovris nuboj. De malproksimo aŭdiĝis tondroj. Oni povis atendi, ke la pluvo venos. Por tiu nekto ni iris hejmen al la "kibitko". La pluvo venis dumnokte. Matene la firmamento aspektis kiel akvoversanto.

En nia ĉambro ni estis kvar homoj, neniu havis ŝuojn. La ĉifonaj vestaĵoj sur niaj korpoj ne povis nin ŝirmi kontraŭ la pluvo eĉ unu minuton. En la ĉambro ni havis nenion por manĝi. La problemo akiri ion por manĝi en tiu tago estis nesolvebla. Antaŭ la vespero la pluvo iom ĉesis. La malsato nin devigis troti nudpiede al la kolĥoza kontoro - eble ni ricevos ion por manĝi. Vana estis nia espero. Neniun ni tie renkontis.

La postan matenon oni jam en la kontoro oficis. Ni renkontis ankaŭ la estron de la kolĥoza. Ni diris al li, ke ni nenion havas por manĝi jam la duan tagon. "Vi ja ne laboras. Kiam vi komencos labori, vi ricevos manĝaĵon. Ĉu vi ne scias, ke kiam oni ne laboras, oni manĝaĵon ne ricevas?". La frazo en la stalina konstitucio: "Kiu ne laboras, tiu ne manĝu" estis de la kirgiza kolĥozestro komentita laŭvorte, precipe kiam koncernis pri manĝaĵo por ni. Cetere, la konstitucio de Stalin devas esti sankta por partiano, same sankta kiel la Korano aŭ la Biblio.

Per la klopodoj de nia brigadisto ni ricevis por la nelabortago po ducent gramojn da faruno kaj promeson: "Morgaŭ, kiam vi komencos labori, vi ricevos manĝaĵon normale." La suno de tempo al tempo eliris el sub la nuboj, ni povis esperi, ke venontan tagon ni laboros kaj la konstitucio de Stalin tiam nin protektos.

Kiam la pluvo venis, restis sur la kampoj amaso da falĉita tritiko. Pro la pluvo ĝi difektiĝis, eĉ komencis burĝoni, tamen ĝi estis draŝita. Konsumantoj de tiu tritiko estis la brutaro kaj nia grupo, nur diference, ke la kvarpieduloj ricevis ĝin en natura stato, dum por ni ĝi estis muelita.

La amelo de tiu faruno estis maldensa, eĉ kiam ni metis la tuttagan 400-graman porcion en malmulte da akvo. Ĝi estis ankaŭ vomige dolĉa. Kelkajn fojojn ni plendis ĉe la kolĥozestro pri tiu faruno. Ĉiam li respondis:

"Venontfoje vi ricevos farunon pli bonan", ĉiam li trompis.

En novembro ĉiumatene prujno kovris la teron. Irinte al la laboro nudpiede, ni sentis kiel tranĉdoloron. Tio daŭris ĝis la horoj naŭa-deka. Poste la suno varmigiis sufiĉe forte la teron. En tiuj semajnoj okazis la kotonliverado de la kolĥozoj. La loko, kie la kotono estis liverita, troviĝis en nia kolĥozo. Tie ĝi estis metita en kelketaĝaj amasoj. Al tiu loko nomata "Ĥlopozavod" (kotonfabriko), la kolĥozoj devis sendi ankaŭ homojn por la laboro.

En la grupo sendita de nia kolĥozo estis ankaŭ mi. La laboro estis enŝtopi la kotonon en grandajn sakojn por liverado al fabrikoj aŭ porti la kotonon en pecegoj da sakŝtofo supren al la altaj amasoj. Tie ĝi estis piedpremata por fariĝi pli kompakta.

La laboro en la "Ĥlopozavod" havis por ni gravan valoron, ĉiuvespere estis kuirita faruna amelo kaj ĉiu laborinto dumtage povis aĉeti porcion por du rubloj.

Inter la novaj venintoj kaj loĝantoj en nia ĉambro troviĝis iu laŭ nomo Lejbo. Li estis simpla, ne tre inteligenta knabo el urbeto proksime de Krakovo. Same kiel aliaj, li tramigris malliberejojn kaj tendarojn. Mi povis rimarki, ke li havas la emon scii, kion iu faras. Li estis ankaŭ envia kaj avida eĉ por la ekzistantaj cirkonstancoj. Ĝenerale li estis silentema, sed ĉar aliaj rakontis diversajn travivaĵojn kaj epizodojn, ankaŭ li akiris la emon kontribui al niaj babiladoj. Plejofte lia kontribuo estis iu negrava epizodo, kiun neniu eĉ atentis.

Iun fojon li rakontis, ke en la malliberejo li estis denunciinto kontraŭ la kunuloj. Al mia demando, el kio konsistis la denunco, li respondis: "Mi rakontis pri kio ili parolis". "Kial vi tion faris?" mi demandis. "Hm, tute simple pro tio mi laboris en la kuirejo kaj havis supon laŭvole. Dumtage mi estis ekster la ĉelo, mi venis al ĝi nur por tranokti."

Mi komprenis, ke estos utile kun Lejbo esti singarda. La samon mi rimarkis ankaŭ ĉe la ceteraj kunloĝantoj en la ĉambro. Sed Lejbo faris min viktimo, kvankam mi tion tute certe ne povis konstati.

En la "Ĥlopozavod" li ĉiam volis labori kun mi. Tiam li allogis min ŝteli kelkajn pecojn da sakŝtofo. Li promesis tion vendi. Mi tion nur elportu. Al mia demando, kial li mem ne ŝtelas, li diris, ke pro iu kaŭzo li estas ĉe la elirejo tre severe reviziata, dum pri mi la gardistoj havas bonan opinionon kaj ili revizias min nur ŝajne.

Venkis la revo akiri kelkajn kilogramojn da pano sen specialo streĉiĝo. En du tagoj mi elŝtelis kvin pecojn da saktolo kaj ilin kaŝis hejme sub la pajlo. Neniu en la ĉambro krom Lejbo sciis pri tio. Kiam vespere mi estis survoje hejmen, subite mi aŭdis malantaŭ mi : "Haltu ! Haltu!". Turninte la kapon, mi vidis du virojn de la gardistaro en la "Ĥlopozavod". Unu, junulo, tenis etendita fusilon (ĝi estis verŝajne militakiro ĉe la franca armeo dum la napoleona tempo). La dua estis ne "armita", sed lia altstatura figuro estis pli minaca ol la napoleona karabeno.

Mi haltis kaj ili alvenis. La junulo tenis la fusilon etendita, starante ĉe mi, imponis al li tia "heroeca pozo". Ili klarigis al mi, ke irinte hodiaŭ hejmen mi kunŝtelis saktolon (ŝalĉa).

"Nu, reviziu min. Mi ja estas survoje kaj hejme mi ankoraŭ ne estis aŭ mi povos iri kun vi al la Ĥlopozavodo kaj vi revizios min tie".

La gardistoj mian proponon ne akceptis, sed ili postulis, ke mi montru al ili, kie mi loĝas. Trompi ilin ne eblis. En la ĉambro ili baldaŭ sciis, kie serĉi la ŝtelaĵon, kaj ĝin trovis. Ili gvidis min reen al "Ĥlopozavod" kun la "trofeo".

Malgraŭ, ke jam estis malfrue vespere, ili iris al Mamalukov (la Ĥlopozavoda administranto) raporti al li pri la okazintaĵo. Mamalukov venis en tre malican humoron, eble pli pro la maltrankviligo ĉe la du edzinoj ol pro la ŝtelo. Lia unua ago estis kelkaj fortaj batoj al mia korpo. Poste li ordonis enfermi min en la gardistejo por la nokto.

Kvankam laca, mi dormi ne povis. Ĉiuhore aŭdiĝis obtuza metala sonorado de ie en malproksimeco. Tiam la gardistino, malalta virineto, venis en la gardistejon - malgranda ĉambro - ĉe la trairpordego ŝovi la sonor-

ilojn sur la pendanta horloĝo.

Dum la tuta nokto tiu virinetó eĉ ne unu vorton diris al mi. Ŝi rigardis min kun stulta fiero, posedante super mi la povon, kvazaŭ heroino kun la fusilo en la mano.

Dum la tuta nokto mi cerbumis, ĉu eskapi? Kelkajn fojojn mi eliris kvazaŭ por la fiziologiaj bezonoj, sed fakte por rigardi la eblojn por eskapi. Mi ne timis ŝian napoleonan fusilon, sed mi sciis, ke en la vilaĝo troviĝas kelkaj aliaj gardistoj-viroj. Okaze de mia eskapo ŝi certe alarmos, komenciĝos ĉasado por kapti min kaj mi ne estis sufiĉe forta por kuri.

Ĉirkaŭ la naŭa matene mi estis vokita al la kontoro. Oni alportis ankaŭ la ŝtelaĵon - kvin ĉifonojn el saka tolo. Ĉe la skribotablo sidiĝis Mamalukov, lia librotenisto kaj la sekretariino. Estis ankaŭ alvokita iu gardisto, maljuna viro, kiu nin gardis dum la laboro.

Mi estis demandita pri la personaĵoj kaj poste la maljuna gardisto prezentis sian atestdeklaron: "Dum la tago... mi plenumis la servon gardi la laboristojn. En certa momento, antaŭ ilia foriro hejmen mi rimarkis, ke tiu ĉi (montrante en mia direkto) ĵetis kelkajn pecojn da saktolo trans la barilon. De tiu momento mi gardis lin pli severe kaj pri tio raportis al la administranto kamarado Mamalukov".

Lia deklaro estis kompleta trompo. Mi trans la barilon nenion ĵetis; sed por mi estis indiferente, ĉu mi diros la veron aŭ ili notos lian mensogon. Intertempe mi komprenis kial Lejbo dum lastaj tagoj ofte interparolis kun tiu gardisto.

Mia sola defendklarigo estis, ke mi ne havas ĉemizon (kion mi surloke pruvis) kaj per la ŝtelita tolo nur volis kudri por mi ĉemizon. La librotenisto diktis al la sekretariino longan skribaĵon - la protokolon pri la ŝtelaĵo kaj la ĉeestantoj ĝin subskribis, aldoninte ankaŭ siajn oficokupojn.

Tiu esplora afero daŭris kelkajn horojn - proksimume ĝis tagmezo. Mamalukov estis intertempe ien vokita, la ceteraj foriris al siaj okupoj. En la kontoro restis mi, en angulo kvazaŭ akuzito kaj ĉe la skribotablo la librotenisto okupata pri siaj dokumentoj.

Post iom da tempo la librotenisto min demandis :
 "Kion vi nun intencas fari ?".

"Dependas, kion vi intencas fari mem, mi ja pri tio ne decidas".

"Ankaŭ mi pri tio ne povas decidi", post momenta pripensio : "Eliru, trovu Mamalukov kaj demandu lin, kion vi faru. Ĉi tie vi ja ne povas sidi kaj mi baldaŭ foriros por tagmanĝi".

Elirinte el la kontoro, mi ĉirkaŭrigardis sur la korto, sed Mamalukov-on mi ne vidis. Ĉar mi ne emis urĝigi mian areston, venis al mi la ideo ĝin eviti aŭ almenaŭ provi tion. Por pripensi, kion mi povus entrepreni, mi iris al la necesejo aranĝita ĉe la ĉirkaŭbarila muro. Tie mi rimarkis, ke la muro estas supre iom detruita, ĝin trarampi estus tute facile kaj mi tion baldaŭ faris kun sukceso.

Estante en la dua flanko, mi rapidis veni malantaŭ vicon da poploj, kreskantaj ĉe kanalo en la kampoj. Kiam mi estis ekster la okulvido de la kotonkolektejo, mi paŝis al la montoj, kie troviĝas pajlostakoj. Kaŝiĝinte en la pajlo mi komencis pripensi la tutan aferon. Kion fari nun ? Mi estas en ĉifonvestoj, ŝuojn mi ne havas, monon mi ne havas, eĉ tranokti en la vilaĝo mi nun ankaŭ ne povas. Mi povas eventuale tranokti en la pajlo, sed kion mi faros morgaŭ ? De kie mi havigos ion por manĝi ?...

Post pripensio mi decidis iri al la regiona urbo Kurŝab provi dum kelkaj tagoj esti ĉe Tavelinski. Por eviti survoje la kotonkolektejon, mi devis troti larĝan rondon sur la kampoj, ĝis mi havis la kotonkolektejon malantaŭ mi. Kiam mi atingis la Ŝoseon, jam ekvesperiĝis kaj la vojo al la urbo estis ankoraŭ longa.

Per miaj lastaj fortoj mi malfrue vespere venis al Tavelinski. Mia alveno dum tiu tempo kompreneble lin surprizis. Mi al li rakontis ĉion kaj petis ĉe li tranoktejon.

Matene venis la konstanta problemo akiri ion por manĝi. De Tavelinski mi tion peti ne povis, li por si mem havis apenaŭ por ne malsati. Tavelinski alportis el la kuirejo kelkajn brasikajn karnojn kaj iom da brasiko, per tio mi "farĉis" la stomakon.

En la sekvontaj tagoj mi helpis al Tavelinski alveturigi akvon, dispecigi hejtlignon por la kuirejo k.s. Por tiu laboro mi ricevis de la kuirejo iom da supo.

Mia restado ĉe Tavelinski ne povis longe daŭri. Oni atentigis lin, ke ne estas permesate havi kunloĝanton ne apartenantan al la hospitalaj laborantoj. Mi komprenis ankaŭ, ke se mi estas serĉata, mi estos ankaŭ trovita kaj Tavelinski povos pro tio havi embarason, ke li kvazaŭ gastigis krimulon.

Mi decidis - estu kiu ajn - reiri al la kolĥozo. Eĉ en la plej malbona okazo, se oni arestos min, mia krimo ne havas politikan karakteron kaj laŭ la aserto de Mamalukov mi povas ricevi dujaran punon en ia proksima koncentrejo. Granda perdo tio por mi ne estos.

Revenante al la "kibitko" mi renkontis Perel. Li estis el la novaj ĉe ni loĝantoj. "Kio, ĉu vi ! Mi ja neniam kredus, ke vi kuraĝos reveni propravole. Ĉu vi scias, ke oni serĉas por aresti vin ? Mi konsilas al vi tuj foriri antaŭ ol oni eksciós en la vilaĝo, ke vi estas ĉi tie."

Perel estis inteligenta knabo kaj samprofesiano. Post nia interkonatiĝo ni estis sinceraj kaj konfidemaj amikoj. Li estis la sola, kiu sciis mian ideologion kaj mi la sola, kiu sciis lian "sekretan". En Polio li estis aktiva komunisto kaj same post la alveno sur la "liberigitaj" teritorioj. Li akceptis sovetan pasporton kaj ĝis la germana atako kontraŭ Sovetunion laboris en Kiev.

Kiam okazis la evakuado pro la proksimiĝo de la fronto, li venis al Uzbekio. Tie li renkontis la polajn civitanojn liberigitajn de la tendaroj. Li tiam kaŝis sian sovetan pasporton kaj sin anoncis ĉe la polaj ŝtatdelegitoj. Li diris, ke li estis en iu tendaro, sed la dokumenton riceviton de tiu tendaro li perdis. Ĉu la polaj delegitoj kredis lian rakonton aŭ ne kredis, li ne scias, sed ili ĝin akceptis kiel veran. Tio estis por li la nura ŝanco iam forlasi Sovetunion. Se la rusaj instancoj eksciis pri lia trompo, li estus juĝata kiel perfidulo al la soveta ŝtato.

Mi rakontis al Perel kie mi estis kaj petis lin lasi la tutan aferon por mi, sed nenion rakonti. Al la ceteraj homoj mi diris, ke mi mem iris al la miliciestro en

Kursabo kaj rakontis ĉion pri la ŝtelo; sed la milicies-tro min resendis al la kolĥozo kaj diris, ke mi ne ĉagreniĝu, ĉar oni ne arestos min. La homoj aŭdantaj tiun rakonton movis la brakojn kaj tion kompreni ne kapablis.

Venontan tagon mi iris kune kun aliaj al la rusa brigadisto akcepti laboron, kvazaŭ nenio okazis. La brigadisto al mi nenion demandis, sed verŝajne mem komprenis sendi min ne al la kotonkolektejo, sed elterigi arbustojn de kotono. Kelkaj tagoj forpasis sen ajna klopodo por mi.

Vespere, kiam mi sidis ĉe la forneto, kuirante por mi la amelon, aŭdiĝis frapado en la pordo. Kiam mi malfermis, enpaŝis Mamalukov. Kvankam en la ĉambreto estis mallume, li rimarkis mian vizaĝon en la fajra lumo de la forneto.

"Ĉu vi sidas ĉi tie? - li demandis.

- Jes! Mi sidas ĉi tie.

- Nu, stariĝu kaj sekvu min!

- Kien? - mi demandis.

- Al la kotonkolektejo.

- Kamarado Mamalukov! Mi dum la tuta tago laboris kaj vi scias, ke mi panon ne ricevas. La nun kuirita amelo estas mia tagnokta nutraĵo. Ĉu vi volas esti afabla kaj atendi ĝis mi formanĝos kaj poste mi iros kun vi, aŭ ĉu eble vi ne havas tempon atendi?

- Ho jes! Mi havas tempon atendi ĝis vi formanĝos, sed mi volas sidiĝi."

Kiam Mamalukov sidiĝis, mi daŭrigis la konversacion.

"Kamarado Mamalukov, vi volas gvidi min al la kotonkolektejo kaj kion vi faros kun mi tie?

- Mi fermos vin en la gardistejo por la nokto kaj morgaŭ matene mi telefonos al la miliciejo, ke ili venu vin aresti.

- Kaj kion vi gajnos, se ili arestos min?

- Vi estos juĝita kaj kondamnita.

- Nu, tion mi komprenas, sed kion vi persone gajnos, se mi estos kondamnita?

- Mi persone nenion gajnos, kion mi devas gajni."

Mi komencis provi la persvadkapablon.

"Kamarado Mamalukov, vi certe mem komprenas, ke por homo en mia situacio estas ne tre grave, ĉu li estas arestita, aŭ libera. Mi nenion posedas kaj ĉiam malsatas. Pli malbone ne povas esti por mi en la malliberejo aŭ en

tendaro. Tamen mi preferas esti libera. Tio nun dependas de vi. Vi vidas, ke mi havas eĉ ne unu ĉemizon kaj homo devas havi ĉemizon. El la ŝtelita saktolo mi volis nur kudri por mi ĉemizon. Mi en tio ne sukcesis kaj la ŝtelitajn pecojn vi rericevis. Se vi kaŭzos mian areston, vi kaŭzos ankaŭ mian malamikecon al vi. Ĉu vi deziras kaj estas interesata akiri malamikon? Mi opinias, ke ne. Se vi lasos min libera, mi ĉiam vin memoros kiel bonulon kaj pardonon nenian vi havos, ĉar la "ŝalĉaĵojn" vi ricevis."

Mamalukov verŝajne rezignis min aresti, sed li iomete obstinis nur pro formo: "Kial vi ne diris al mi, ke vi volas kudri por vi ĉemizon? Mi memvole donus al vi kelkajn pecojn da tolo kaj vi ne devus ŝteli."

"Mi pensis, ke memvole vi ne donus al mi tion kaj tial mi ŝtelis."

Mamalukov momenton pensis kaj diris: "Nu, bone, mi lasos vin libera, sed montru al mi ian sekan vojeton tra la koto ĝis la ŝoseo". Mi akompanis lin al la ŝoseo.

Reveninte al la ĉambro, mi aŭdis de la kamaradoj rekomendon ne tranokti hejme: "Vere, li nun vin lasis, sed li povos baldaŭ sendi gardiston kaj vin aresti". Perel provis min konvinki: "Eĉ se li ne arestos vin nokte, vi ankaŭ nenion riskos, se vi tranoktos ie alie."

Mi restis ĉe mia decido tranokti hejme kaj mi kreĉdis, ke Mamalukov min lasos trankvila. Matene la kamaradoj diris al mi, ke ili estas certaj, ke mi eraras, fidante al Mamalukov. Male, Mamalukov iĝis al mi tre amikema. Ĉiufoje, kiam li renkontis min, li vokis min al sia hejmo kaj regalis min per peco da pano aŭ iom da supo. Foje li proponis dungi min kiel gardiston en la kotonkolektejo.

* *
*

Fine de novembro oni informis nin, ke la kotonkolektejo por tiu jaro ne havas por ni laboron. Ne labori signifas ne manĝi. Por ke ni ne malsatu, oni sendis al ni, ke laŭ la provizora prikalkulo de la jara nikolto, ĉiu ricevos alpagon de ducent gramoj da tritiko por ĉiu labortago en la kuranta jaro. Estis notite por mi cent kvardekkelkaj labortagoj kaj kiel antaŭpagon mi ricevis

tri kilogramojn da tritiko. La ceteron oni devos pagi post la definitiva prikalkulo, kiu okazas en la fino de la jaro aŭ printempe de la sekvonta. En la muelejo mi povis ŝanĝi la tritikon al faruno kontraŭ dekprocenta pago de la tritiko. Iomete pli ol du kilogramoj kaj duono da faruno devus min nutri dum la kelkaj vintraj monatoj. Tiun tutan provizon mi formanĝis en kelkaj tagoj kaj mi iris al Kurŝabo serĉi ian enspezon.

Mia kamarado Tavelinski rekomendis al mi laboron - enterigi mortintojn en la hospitalo. Tiu laboro estis bone pagata - okdek rubloj kaj kvarcent gramoj da pano. Tiu laboro daŭris tutan tagon. Unue mi devis elfosi la tombon, poste preni la kadavron en la hospitalo kaj meti sur ĉaron, kiun povis disponigi Tavelinski, veturigi la kadavron kelkajn kilometrojn al la tombejo kaj ĝin enterigi. La enterigado ne daŭris longe. Sed tiu "laboro" ne estis ĉiutaga.

Por kelkaj tagoj mi estis dungita meti tavolon da argilo sur tegmenton de kelkaj dometoj en iu kolektejo, kien la kolĥozoj liveras felojn. La pago estis kelkaj kilogramoj da faruno. Mian havaĵon, konsistantan el saketo kun iom da faruno kaj siteleto por kuiri la amelon ĉie ajn sub la ĉielo mi ĉiam havis kun mi - vera rusa vagabondo. Sed kiam venis la malvarmaj noktoj, estis por mi malfacile trovi tranoktejon. Normale oni povis ĉiam tranokti en la "ĉajĥana" per trirubla pago, sed dum tiu tempo okazis amasa mobilizado al la armeo kaj la mobilizitoj okupis la "ĉajĥana"n kaj ne enlasis iun nemobilizitan. Mi devis ofte tranokti en la "kibitko" de la kolĥozo. Tie restis nur unu loĝanto, Lejbo, ĉar li laboris en la kotonkolektejo. La ceteraj kamaradoj foriris al konatoj en aliaj kolĥozoj.

Intertempe venis la senkompata vintro. Tranokti en nia "kibitko" estis same kiel tranokti sur la strato. Kelkajn fojojn mi vidis matene homojn trovitajn en iuj stratoj duonmortajn pro malvarmo. Ĉu sama sorto atendas min ?

Feliĉe, mi estis dungita farbi la ĉambrojn en la hospitalo. La pago estis kvarcent gramoj da pano ĉiutage kaj iom da supo de la kuirejo pro kompato kaj kelkaj rubloj, kiuj ne multe valoris. Mi tiun laboron faris plejeble mal-

rapide, ĉar kiam la kuiristinoj foriris el la kuirejo, mi povis tie tranokti. Tio estis malpermesita, sed la kuiristinoj pri tio "kvazaŭ ne sciis".

Kiam mi finis la farbadon, kiu daŭris unu monaton anstataŭ normale unu semajnon, mi la tranoktadon en la kuirejo daŭrigis kaŝe. Foje venis malfrue vespere du kuracistinoj sin lavi, ĉar tie ili havas varman akvon. Renkontinte min kuŝantan sur la planko, ili demandis: "Kiu permesis al vi eniri ĉi tien?"

- Neniu. Mi venis nur tranokti, ĉar alian lokon mi ne trovis.

- Ĉu vi tranoktas ofte ĉi tie?

- Ne! Nur hodiaŭ", mi respondis.

Daŭrigi la tranoktadon en la kuirejo mi ne povis. Miaj tranoktejoj estis forlasitaj staloj kaj kiam la mobilizitoj ne okupis la "ĉajĥana"n, mi povis tranokti tie per trirubla pago.

Dum la tagoj mi vagadis kiel duonkonscia. Kelkajn fojojn mi iris al la regiona komunuma oficejo por esti sendata al kolĥozo por labori. Ĉiam oni respondis: "Venu en februaro-marto, nun neniu kolĥozo vin akceptos".

Al la urbeto venis ankaŭ Lejbo. La kotonkolektejo ne havis por li laboron. Ni okazigis la vagadon kune, nutrante nin per ŝtelitaj aŭ almozpeditaj pecoj da melono aŭ io simila. Nur en la tagoj, kiam mi havis enterigon, mi manĝis iom da pano kaj teon en la "ĉajĥana".

Mi sentis, ke mia forto elĉerpiĝas. Mi apenaŭ kapablis paŝi, konstante mi havis kapdoloron. Mi vizitis la kuraciston kaj plendis pro la kapdoloro. Li direktis min al la hospitalo. Ĉar la kuracisto notis "sendita pro elĉerpiĝo", oni ne volis min akcepti en la hospitalo. "Hospitalo ne estas pensionhejmo", estis al mi klarigite. Restis nur daŭrigi tian vivaĉ-staton.

Meze de februaro mi kaj Lejbo ricevis en la regiona komunuma oficejo paperetojn, direktantajn nin al kolĥozo en la montoj. Post tuttaga trotado en la koto ni atingis la kolĥozon. Veninte al la kontoro, ni demandis pri la administranto. Oni montris al ni iun altstaturan viron inter la babilanta anaro. Mi demandis lin: "Ĉu vi estas la kolĥoza administranto?"

- Ne! Mi estas nur kolĥozano.
- Do kiu estas la administranto ?
- Li forveturis.
- Kien ?
- Mi ne scias.
- Oni ja diras, ke vi estas la prezidanto.
- Ho ne! Mi estas nur kolĥozano.
- Eble vi scias, kie mi povus renkonti la librotenis-ton ?
- Ne, mi tion ne scias."

La apudstaranta anaro da kirgizoj ridis kaj plu babiladis en sia lingvo, kiun ni ne komprenis.

Malgraŭ, ke la altstatura viro ŝajnis ne esti la kolĥoza administranto, mi klarigis al li, ke ni estas senditaj de la regiona oficejo kaj montris al li la paperetojn. "Sed ni laboron ne havas eĉ por ni mem", estis lia respondo.

Ni tranoktis en fojnejo kaj venontan tagon ni troitis reen al Kurŝabo, ĉ. dek kilometrojn tra la montoj.

En la komunuma oficejo oni donis al ni alian papereton, al alia kolĥozo, ankaŭ en la montoj. Tie ni estis akceptitaj, sed ni estis malfortaj kaj nia laboro ne kontentigis niajn mastrojn. Post kelkaj tagoj ili rifuzis al ni laboron.

Denove ni reiris al la regiona oficejo kaj denove ni ricevis direktilon al alia kolĥozo, kiu nin akceptis. Tie ni renkontis du judajn familiojn el Rumanio aŭ Moldavio, kiuj estis "liberigitaj" per la rusa armeo en la jaro 1940. Ili venis al la kolĥozo antaŭ kelkaj monatoj. Ili estis la nuraj eŭropanoj en la kolĥozo. Ili loĝis en apartaj "kibitkoj", al ili oni sendis nin por havi loĝejon. Lejbo dormis ĉe unu familio kaj mi ĉe alia.

Sed denove diabla afero, la vizago kaj korpo de Lejbo ŝvelis. Li multe trinkis kaj glutis neĝon. Mia sanstato ne estis multe pli bona. Dum du tagoj ni portis sterkon al la kampoj kaj jen ekfalis neĝo, neĝis seninterrompe dum du tagoj. Forlasi la ĉambron ni ne povis - ni estis sen ŝuoj.

Kiam la neĝo ĉesis fali, devis daŭri minimume du tagojn ĝis estos eble komenci la laboron sur la kampoj.

La vizaĝo de Lejbo ŝvelis tiel, ke apenaŭ estis videblaj liaj okuloj. Li kuŝis sur la planko kaj dormis senĉese. Matene la dommastrino sciigis al ni, ke Lejbo mortis dumnokte. Mi helpis por enterigi lin sur monto.

Ripozas Lejbo en la montoj de Kirgizio. Ne savis lin el mizera pereco eĉ la stulta denunciado en la servo de la sovetista ŝtato.

Post la morto de Lejbo la kolĥoza administranto rifuzis laboron por mi, eble li volis ŝpari la senutilan elspezon por mia enterigo.

Mi klarigis al la administranto: "Mi estas sendita de la ŝtata oficejo kaj subordigo al ĝi estas deviga, vi ne rajtas min forsendi sen io."

Verŝajne li estis iom timema. Li proponis al mi du kilogramojn da faruno, nur, ke mi foriru. Mi ricevis la farunon kaj kun manĝprovizo por kelkaj tagoj reiris al Kurŝabo.

En Kurŝabo ekzistis manlaborista kooperativo, kiu havis kelkajn fakojn: ŝuistoj, tajloroj, ĉapelistoj, forĝistoj kaj kelkaj aliaj. Al tiu kooperativo apartenis akvomuelejo. Malofte ĝi funkciis. Dum la varmegaj tagoj ne estis sufiĉe da akvo, dum kaj post la pluvoj estis tro da akvo. Kiam la akvo estis laŭ bezono, ofte okazis difektoj en la mekanismo.

Al la kooperativo estis disponigita kelkdekhektara areo por planti legomojn. La ĉefa plantaĵo estis ia speco de blankaj betoj. En la laboristaj salajroj la betoj okupis gravan pozicion. Ĉiu laboristo ricevis kvanton da betoj proporcie al la salajro per mono, praktike tiu betsalajro variis inter duono kaj unu kilogramo da betoj por laborotago.

En la kooperativo estis aĉetebla kalko en etaj kvantoj - sufiĉe por farbi ĉambron. Ĉar akiri kalkon estis malfacile por la kooperativo, la kooperativestro volis tion mem produkti. Troviĝis tie kvazaŭ specialisto, ruso Potapov, kiu opiniis, ke en la ĉirkaŭaĵo de Kurŝabo troviĝas multe da kalkŝtonoj. Necesis nur konstrui fornon por elbruligi la ŝtonojn.

Mi dungigis al tiu kooperativo kiel farbisto kun nutroasekuro de kvarcent gramoj da pano tage laŭ la ŝtata normo kaj duono da kilogramo da betoj - la pago en rubloj ne es-

tis taksita kiel grava afero.

Mi estis provizore sendita al la dispono de Potapov, por helpi al li konstrui la fornon.

Kun mi estis tri samlandaj samnacionoj. Mi tian fornon neniam antaŭe vidis, sed mi aŭdis, ke en tia forno estas necesa tre alta temperaturo. Potapov kredis atingi tian temperaturon, hejtante per pajlo.

Ni elfosis kelkmetre profundan truon kiel puton. Mal-supre el ŝtonoj kaj argilo li konstruis ventumojn kaj grandan truon por hejti per pajlo.

Ni kolektis sur la ĉirkaŭaj kampoj ŝtonojn kaj ilin metis en la truon. La tuta konstruaĵo estis aranĝita sur la kampo plej primitive. Akvon ni devis alporti en site-loj de la apuda rivereto. La argilaĵon ni preparis sur la tero per ŝpatoj.

Kiam ĉio estis aranĝita, Potapov donis al mi kaj alia la taskon hejti. Nia deĵoro devis daŭri tutan nokton kaj matene ni devis esti anstataŭitaj de alia duopo. La pajlo kuŝis ĉ. tridek metrojn de la forno. Ni devis senĉese ĝin alporti en grandaj amasoj kaj ŝovi ĝin en la truon. Daŭrigi tian laboron dum dek horoj estis tre tede kaj turmentige. La pajlo brulis pli rapide ol ni povis ĝin alporti. Ni tamen kredis esti kapablaj daŭrigi tiun laboron ĝis la mateno, - kiam venos la anstataŭontoj.

Ĉirkaŭ noktomeze komencis pluvi. Ni iom daŭrigis la laboron, kredante, ke la pluvo ĉesos. La pluvo tamen ne ĉesis, malsekiĝis la tero kaj ni devis troti per la nudaj piedoj en la koto. Malsekiĝis niaj surkorpaj ĉifonoj kaj ni ĉesis esperi la ĉeson de la pluvo. Por ŝirmi nin de la pluvo, ni faris du kavojn en la pajlo kaj tien enŝoviĝis. Estis plibone ol sub la ĉielo. Ne estus ĝuste opinii, ke mi dormis - mi kuŝis kiel duonkonscia, vekigis de tempo al tempo kaj denove perdis la konscion.

Frumatene la pluvo ĉesis, sed la firmamento estis malhelgriza kaj oni supozis la pluvon denove. Ni provis akiri ion por manĝi. En la foro de kelkcent metroj staris kirgiza dometo kaj mi tien eniris. Interne mi renkontis kirgiz-inon kun du junaj infanoj en la tipe kirgiza mizero. Mi klarigis al ŝi, ke mi kuŝas en la pajlo la duan tagon kaj nenion mi havas por manĝi. La kirgizino min kompatis kaj nenion plu ŝi povis fari. Ŝi montris al mi kelkajn betojn

kaj iom da faruno ĉ. du kilogramojn. "Tio estas mia tuta nutraĵo por mi kaj la du infanoj, nek monon, nek edzon mi havas."

Survoje reen al la pajla stako mi trovis grandegan testudon. Ĝi verŝajne ne estis vivanta. Mi ĝin prenis kaj kuiris en mia siteleto. Apenaŭ ni finis la manĝadon, kiam denove ekpluvis. Ni enŝoviĝis en la pajlajn kavojn kaj restis tie ĝis la venonta mateno, en stato duondorma, duonmalkonscia.

Kiam ni vekigis, brilis la suno kaj la ĉielo estis klarblua. La malsaton mi sentis eble malpli ol la kapdoloron. Ni elŝoviĝis el la pajloŝtako nin varmigi kaj sekigi en la sunaj radioj niajn surkorpajn ĉifonojn.

Kiam venis la duopo nin anstataŭi, ili havis panon ankaŭ por ni, sed vidante, ke la fajro ne brulas, ili al ni klarigis: "Vi la manĝaĵon ne ricevos, ĉar vi ne laboris, tion diris al ni Potapov.

- Ne estas via afero, ĉu ni laboris aŭ ne laboris, vi havas por ni panon kaj ni tion devas ricevi.

- Plendu ĉe Potapov", estis ilia findecida respondo.

Ne helpis kvereloj nek la insultoj, nek la klarigoj, ke en tiu pluvo ne eblis hejti. Ne helpis niaj argumentoj, ke ili devis veni matene de la pasinta tago, sendepende ĉu pluvas aŭ ne pluvas, se ili estas tiaj herojoj. La ricevitan panon por ni niaj "kolegoj" formangis mem. Uzi fizikan forton kontraŭ ili nek mi nek mia kamarado kapablis. Ni iris al la kooperativa kontoro plendi, ke la kamaradoj forrabis nian panon, sed rehavigi la panon la kontoro ja ne povis. Ni ricevis pere de la kontoro iom da betoj por kompensi la panon. En tiu tempo la kooperativo renovigis la muelejon. Mi estis tien sendita farbi la murojn.

* *
*

La okazintaĵoj en la mondo, koncernantaj la militon, estis pli gravaj ol tio, kio koncernis mian mizeran mion. Fine de somero 1942 forlasis Sovetunion la pola armeo formita de generalo Anders. Kune kun la soldatoj forveturis multe da civilaj homoj. En Kirgizio restis plejparte tiuj, kiuj estis judoj. Ni vivis kun espero

forveturi poste. Sed kun la tempopaso ni pri tio seniluziĝis. Nia espero estis, ke ni tamen estas polaj civitanoj, ni troviĝas sub la protekto de la pola registaro en fremdlando - Anglio, kies registaro havas siajn instancojn en Sovetunio.

Ankaŭ en Kurŝabo troviĝis pola sekcio, kie ni estis registritaj kaj de tempo al tempo ni ricevis tie ian malgrandan (por nia mizero) helpon per nutraĵoj aŭ vestaĵo usondevena. Estus tro multe postuli, ke en tiaj cirkonstancoj ekzistu ideala honesteco aŭ ke ne ekzistu diversspecaj krom oficialaj rilatoj. La delegacio (tiel estis nomita la pola oficejo) estis nia espero, kiu iam nin elkondukos el Rusio.

En Kurŝabo la delegacio aranĝis invalidan hejmon por dudek kvin homoj nelaborkapablaj, de tempo al tempo ili estis anstataŭitaj de aliaj "doŭnadiagoj". Vere, tio estis en nia mizero kiel guto en la maro, sed ni ne sentis nin kiel forlasitajn orfojn.

Meze de marto ni eksciis, ke al la delegacio venis NKVD-istoj. Ili prenis la dokumentojn, sigeligis la pordon kaj malpermesis ĝian agadon. En la samaj tagoj la sovetaĵ gazetoj komencis atakkampanjon kontraŭ la pola fremdlanda registaro en Londono, ke ĝi okazigas naciistan propagandon, pro tio la soveta registaro neniuajn rilatojn volas havi kun ĝi. Baldaŭ sekvis informo, ke la polaj civitanoj vivantaj en Sovetunio estas de nun protektataj de la soveta registaro. Oni rakontis laŭ onidiroj, ke la pola registaro rekomendis la protekton de siaj civitanoj al la aŭstralia konsulejo. Kontroli tion ne eblis por ni. Weniajn informojn krom la oficialaj sovetaĵ ni havis.

Fine la afero "klariĝis", ke en Katin la germanoj trovis tombojn de kelkaj miloj da polaj oficiroj. Laŭ la soveta informo ili estis militkaptitaj de la rusa armeo en la jaro 1940. Ĝis la germana atako kontraŭ Rusion tiuj oficiroj laboris en tiu regiono por ripari la vojojn kaj faris similajn laborojn sub gardado de NKVD. Kiam la soveta armeo forlasis tiujn teritoriojn pro la invado de la germana armeo, la oficiroj tie restis kaj ili venis en posedon de la germanoj. La germanoj ilin mortpafis kaj enterigis. Nun la germanoj elfosis la tombojn kaj volas

akuzi la rusojn pri la krimo.

Ni komprenis, ke la germanoj povis tion fari, sed la samon povis fari ankaŭ la rusoj. Detaloj pri tiu afero al ni ne venis. Tamen prijuĝinte laŭ la nura racia rezonado, ni povis kredi, ke tiun krimon faris la rusoj. Kvankam ni komprenis la aferon, ni estis devigataj silenti. Nia malamo al la soveta reĝimo, kiu iom "mildigis", reakrigis denove, sed ni sentis nin kiel katenitaj en la posedo de la senskrupulaj tiranoj.

Samtempe oni sciigis al ni, ke ni akceptu sovetajn pasportojn. Sovetaj pasportoj signifas soveta civitanecan. Rifuzi tion donas riskon reiri al la tendaroj. Trapenetris nin funebra sento.

Ni ne urĝigis por elpreni la pasportojn, sed la miliciistoj venis al niaj hejmoj, al niaj laborlokoj "memorigi", ke ni ne elprenis la pasportojn. Kun doloro en la animo mi fordonis mian dokumenton de la tendaro, la dokumenton, kiu estis simbolo, memoraĵo pri la multaj pereintoj kaj samtempe espero.

Verŝajne la soveta registaro komprenis, ke tiu afero ne finiĝos tiel simple, ke ĝi restos for de la internacia areno. La pola registaro en Londono estis la oficiala reprezentanto de la polaj civitanoj, en kunligo kun la angla kaj usona registaroj. Troviĝis sufiĉe granda pola armeo, kiu akiris venkojn en la bataloj kontraŭ la hitleristoj kaj tio ja ne povos esti neglektita. Por la soveta registaro estis necese organizi ion, kio reprezentus la polojn en Rusio.

La rusa registaro jam tiam planis ne liberigi Polion, sed okupi ĝin kaj havi en ĝi subordigitan registaron. Organizaĵo kvazaŭ reprezentanta la polojn estis kreita sub la nomo "Asocio de Polaj Patriotoj". La ĉefaj personoj en tiu asocio - almenaŭ en reprezentanta senco - estis Vanda Vasilevska kaj profesoro Volpe.

Vanda Vasilevska estis ĝis la milito en Polio tre populara inter la laboristoj, socialistoj kaj inter la radikalaj intelektuloj. Ŝia patro, Leon Vasilevski, apartenis al la Pola Socialdemokrata Partio kaj aktive batalis kontraŭ la cara Rusio por la pola sendependeco.

Poste li estis aktiva subtenanto de la Pilsudski-reĝimo kaj dum iom da tempo ankaŭ ministro en lia registaro. Pro iuj kaŭzoj, supoze laŭ sia radikalismo, li estis "forŝovita" al malgravaj postenoj. En la lastaj jaroj antaŭ sia morto (kelkajn jarojn antaŭ la milito) li redaktis historian revuon "Niepodległość" (Sendependeco). Vanda estis teknika sekretariino en la profesia sindikato de la polaj instruistoj. Ŝi apartenis aŭ almenaŭ simpatiis al la pola socialdemokrata partio kun ĝia radikala grupo. Ŝi verkis artikolojn kun kontraŭ-registara karaktero por la socialdemokrataj gazetoj. Ŝi kunredaktis du gazetojn por infanoj en la komencaj klasoj de la elementaj lernejoj, "Plomik kaj Plomiček" ("Flameto" kaj "Eta Flameto"). La enhavo en tiuj gazetoj estis miksaĵo de pola ŝovinismo kaj internaciismo. Ŝi verkis ankaŭ beletrajn librojn pri sociaj problemoj kun progresemaj tendencoj.

Kiam la germanoj okupis Polion, ŝi foriris al la "teritorioj liberigitaj de la soveta armeo" kaj venis al la urbo Lvov. Tie ŝi konvinkiĝis, ke ĉe tiuj regantoj estas tolerataj neniam opoziciaj radikalaj ludaĵoj. Sub tiu reĝimo oni aŭ silentu aŭ ĝin servu aŭ oni estos de ĝi persekutata kaj pereigata. Ŝi elektis la servadon. Por la sovetaĵoj ŝi verkis artikolojn laŭdantajn la rusan reĝimon en ĉiuj agoj. La rusa registaro taksis ŝiajn meritojn kaj inter la rekompencoj ankaŭ ŝin "elektis" al la Supera Parlamento (Verhovni Sovet).

Kion ŝi pensis en tiu tempo, kiam ŝiaj sampopolanoj kaj la pola laboristaro estis de la germana kaj soveta registaroj persekutataj intelekte kaj fizike?... Al tiu demando povus respondi nur ŝi mem. Eble ŝi sentis sin feliĉa pro aparteno al la supera privilegia klaso soveta. Per sia intelekto ŝi senkondiĉe servis la reĝimon, kiu aliancis sin kun la germanaj naciistoj.

En la printempo de la jaro 1943 ŝi aperis kiel arda pola patriotino en la ĉefestraro de APP.

Volpe estis en Varsovio gimnazia profesoro. Dum la lecionoj li faris ĉion eblan por inspiri al siaj lernantoj la komunistajn ideojn. Sed ekster tiuj aferoj li ne estis konata.

Al la ĉefa komitato de APP estis varbitaj ankaŭ homoj liberigitaj de la koncentrejoj, antaŭe kondamnitaj pro aparteno en Polio al organizaĵoj nekomunistaj. Tiu homoj akceptis siajn postenojn certe por savi tion, kio estos savebla, aŭ ili bone sciis, ke malakcepto de la posteno povos esti komentita kiel kontraŭeco al la soveta reĝimo. Pli-malpli similaj estis la APP-komitatoj sur la tereno.

Per la kreo de tiu organizaĵo la rusa registaro sin asekuris por du eventualaĵoj. - Se la okazontaĵoj sekvos laŭ ĝiaj planoj, ĝi havas ĉe si ĉion organizitan por regi en Polio per poloj kaj ebligos nian reveturon en Polion. Se la okazontaĵoj sekvos ne laŭ deziro de la soveta registaro, ni estos formale sovetaĵoj civitanoj akceptintaj la sovetajn pasportojn kaj nia reveturo al Polio ne okazos.

APP transprenis de la delegacio ĉiujn kreitajn instituciojn, kompreneble sub la rusa superkontrolo. En Kurŝabo la invalida hejmo venis sub la administradon de iama komunisto en Polio, kiu sian ideologion ankaŭ en Rusio konservis kaj propagandis inter la invalidoj. Publikajn kontraŭulojn li kompreneble ne havis.

Mia fizika stato, precipe pro malsato, malboniĝis ĝis la limo inter vivo kaj morto. Kaptis min ankaŭ malario. Kiam oni ricevas malarian atakon, oni sentas treegan malvarmon, ke eĉ la supraj kaj malsupraj dentoj interklakadas. Tiu malvarmo daŭras nur kelkajn minutojn, poste oni estas laca kaj sekvas febro. Interesa fenomeno estas, ke la atakoj ripetigas regule.

La unuan malariatakon mi ricevis laborante en la muelejo, iun posttagmezon. Poste ili sekvis ĉiutage. Ĉiam post la atakoj mi iris al la "ĉajĥana", kie mi restis ĝis la mateno.

Mi apenaŭ kapablis paŝi. Mi estis ankaŭ ŝvelinta. Ke mi laboru, mi eĉ ne povis pensi. Mi komencis meditati. Kion mi faru?... Iun tagon mi iris al la kuracisto. Ŝi sendis min al la hospitalo. Mi ne estis akceptita. Do kion fari?... Ĉu kuŝiĝi ĉe muro kaj mortaĉi kiel multaj aliaj?...

Venis al mi ideo provi ion, en kies sukceso mi eĉ ne kredis. Mi iris al la ĉefa kuracisto de la regiono.

Ŝi konis min de la tempo kiam mi laboris en la hospitalo. Mi rakontis al ŝi, ke la hospitalo ne volas min akcepti kaj mi apenaŭ kapablas tiri miajn krurojn. "Eble vi ne volas al mi kredi, bonvolu esplori min.

- Komprenoble, la hospitalo vin ne akceptos. Ni decidis ne akcepti homojn, havantajn la malsanon, kian vi havas.

- Ĉu vi povas diri al mi kiamaniere resaniĝi sen kuracista helpo?... An ĉu mi mortu tiel, kiel mi estas, sen iu ajn kuracista helpo?..."

La kuracistino pripensis momenton kaj diris: "Iru al la invalida hejmo".

Eniri en la invalidan hejmon estis revo de multaj homoj, multaj homoj estis eĉ akceptitaj, sed ili atendis liberigotan lokon, kiam iu foriros.

"Ĉu mi estos akceptita en tiu hejmo?", mi demandis. "Mi donos al vi skribaĵon, nenion pli mi povas fari por vi."

La skribaĵo devis esti subskribita de la komunuma prezidanto kaj mi devis iri al li. Mi supozis, ke ŝi donis al mi tiun direktilon, nur por ke mi foriru. Feliĉe ŝi havis sincerajn intencojn kaj mi eniris en la invalidan hejmon.

Tiu hejmo estis aranĝita en masiva duĉambra dometo, kiu iam estis privata posedaĵo, sed la revolucio ĝin proprigis al la komunumo. En ĝia malantaŭa parto troviĝis kelkaj maljunaj fruktarboj, de pomoj, piroj kaj ĉerizoj. Apud la domo estis aranĝita kuirejo en budo. En tiu hejmo estis lokitaj dudekkvin homoj, en iu ĉambro la viroj, en alia la virinoj.

Kiam la hejmo estis sub la delegacia administrado, estis al ĝi liverata nutraĵo ĉefe el la delegacia provizo, devenanta de Usono. Sub la nova administrado la nutraĵo estis ricevata nur de la rusaj instancoj, laŭ la sovetaĵ normoj: sufiĉe por ne morti kaj nesufiĉe por satiĝi; krome ĉiam okazas iom da ŝtelado el la malabundaj porcioj - sen ŝtelado nenia institucio ekzistas en Sovetio.

La nova administranto volis akiri ankaŭ iom da nutraĵo krom tiu ricevata de la sovetaĵ instancoj. Precipe por la vintraj monatoj li volis tion havi. Li ricevis

de la komunumo du-trihektaran areon kaj plantis sur ĝi maizon. Sed tio postulas laboron, plugi, akvumi kaj gardi la kampon, kiam la maizo maturiĝas. Por dungii laboristojn li ne havis fonduson.

En tiu regiono estas ankaŭ grava problemo : la hejtmaterialo. Arbaroj tie ne troviĝas, karbo estas monopoligita artiklo de la ŝtato kaj liverata nur por la industrio kaj al la grandaj urboj.

En Kirgizio, same kiel en la ceteraj Mez-Aziaj landoj, kiel hejtmaterialo estas uzataj ĉiuj ajn arbedoj kaj arbustoj. Tion ni devis alporti de la montoj. Kiam la invadida hejmo estis administrata de la delegacio, tion prizorgis speciale dungita homo, sed Rozen ne volis fari tian elspezon aŭ eble li por tio ne havis monon.

Ĉiumatene venis Rozen kaj admonis nin pri la devo labori, malgraŭ ke labori ni ne povas. Kiam liaj admonoj ne efikis, li diris : "Se vi hejtaĵon ne alportos, vi ne havos kuiritan tagmanĝon."

Ĉio en la "sanatorio" estis aranĝita primitive. La kuŝejoj estis sur tabuloj, sen matracoj, sen litotukoj, ĉiu disponis nur kovrilon. Tamen la "sanatorio" havis gravan akiraĵon, dank'al Rozen, kiu sukcesis forigi la pedikojn kaj faris ĉion eblan, ke ili ne reapere.

Mi ricevis manĝilaron : argilan vazareton kaj lignan kuleron. Mi devis tion gardi, ke neniu tion forŝtelu. "Feliĉe", neniu en la "sanatorio" ŝtelis, almenaŭ ne inter ni, kaj fremduloj ne estis enlasataj.

La ĝenerala kunvivado inter ni estis relative bona. Mi estis malforta ĝis la grado, ke mi apenaŭ kapablis iri de la ĉambro al la kuirejo ricevi mian porcion da supo. Ĉiam mi estis dormema ; vekiginte post kelkhora dormado, mi post kelkaj minutoj ekdormis denove. Pli ol ĉio min turmentis la malaraj atakoj du fojojn tage, antaŭtagmeze kaj antaŭvespere. Rozen ne postulis, ke mi helpu en la laboro. Mi komprenis, ke krom la malario kaj malforteco mi havas ankaŭ ian malsanon. De tiaj malsanoj la nura malabunda nutraĵo en la invalida hejmo ne resanigos min.

En la kursaba malsanulejo laboris kuracisto el Polio, nome Grudzinski. Li estis kun sia patro, kiu zorgis pri la hejma mastrumado. Ili ricevis al sia dispono malgran-

dan ĉambbron, kie ili loĝis kune kaj malgrandan terpecon, per kiu ili devis kompletigi la vivbezonaĵojn. Ĉar la patro estis maljuna, la doktoro mem devis ĉiutage post la laboro en la hospitalo kultivi la ĝardeneton. Malgraŭ, ke kiel doktoro li apartenis al la "supera tavolo en la socio", lia vivmaniero ne multe diferencis de tiu de aliaj samlandanoj. Dum mia laboro en la hospitalo ni iom konatiĝis. Mi konservis la direktilon al la hospitalo de antaŭe, kiam mi ne estis akceptita. Tiun paperecon mi provis uzi por esti akceptita en la hospitalo helpe de Grudzinski.

Iun matenon mi iris al la hospitalo lin renkonti. Mi klarigis al li kiel mi fartas, malgraŭ ke mi estas inter la "feliĉuloj" en la invalida hejmo. Miaj klarigoj certe ne estis por li necesaj, sufiĉis mia aspekto. Aŭdinte min, li vokis flégistinon kaj diris al ŝi: "Preparu lin kaj metu lin en la hospitalon."

- Li ja iris antaŭ kelkaj tagoj kaj la kuracistino rifuzis lin akcepti, - ŝi respondis.

- Je mia respondeco, preparu lin kaj metu lin en liton".

La preparado konsistis el lavado en iom da varma akvo en vazaro sur la hospitala korto. Banĵojn la hospitalo ne posedis.

Kiam mi metis min inter purajn blankajn littukojn, miaj pensoj ŝvebis al la pasinteco, kiam mi lastfoje kuŝis tiel lukse... Miajn revojn detruis la antaŭtagmeza malariala atako. Post ĝia ĉeso mi ekdormis kiel kutime.

Venontan tagon, kiam la kuracisto esploris la pacientojn, mi demandis lin, kian malsanon mi havas. "Oni zorgu por ne veni en tian staton", estis lia respondo. Precize la samon respondis al mi la kuracistino unu tagon poste. Post forlaso de la hospitalo mi eksciis, ke Rozen demandis la kuraciston pri mia stato kaj la kuracisto respondis: "Ho, li mortos en la proksimaj tagoj."

Iun fojon tage mi eliris al la necesejo, ĝi estis en la koridoro. Dum la reiro al la ĉambro mi perdis la konscion, mi sentis nur, ke mi falas. Vekiĝinte en la lito, mi havis egan febron. Mi volis rememori, kiam mi ekdormis... Baldaŭ mi demandis min, kiam mi enlitiĝis... Pensante iomete, mi rememoris, ke mi en la necesejo perdis la konscion kaj mi

falis, la ceteron mi ja komprenis.

Sed ja ne ĉiujn malsanojn antaŭvidas la kuracistoj. Mi ne scias, ĉu la iometo da pulvora kuracilo kaŭzis sorĉajn miraklojn por resanigi min, kiu laŭ la opinio de la kuracisto mortos en la unuaj tagoj de la estado en la malsanulejo, aŭ ĉu mia korpo tamen havis la rezistan povon por venki la malsanon...

Post kelksemajna restado en la hospitalo mi dum la matena vizito de la kuracisto aŭdis lin diri al la flegistino: "Ankaŭ lin ni ja povas 'forsendi' ". Tiu kandidato estis mi.

Venontan tagon la kuracisto diris al mi: "Morgaŭ vi ja devos forlasi la hospitalon". "Sed mi ja ricevas la malarialajn atakojn, doktoro", mi diris. "Ankaŭ tio forestos post iom da tempo, nun vi ja povas reiri al la invalida hejmo". Li etendis la manon kaj ni adiaŭis unu la alian.

Post la matenmanĝo en la menciita tago la flegistino redonis al mi "miajn vestaĵojn", ĉifonan pantalonon kaj la supran duonon de iama mantelo. Reiri "hejmen" mi kapablis per malrapidaj paŝetoj.

"Oni devas zorgi por ne veni en tian staton"... diris ambaŭ kuracistoj en la hospitalo. Mi ne scias, kial ĝuste tiuj vortoj fiksiĝis en mia cerbo, sed kion fari por ne veni en tian staton? Kion fari por havi sufiĉe da manĝaĵo, eĉ la plej simplan?... Kion fari por havi vestaĵojn eĉ la plej simplajn por ŝirmi la korpon de malvarmo?... Kiamaniere "akiri" veraĵn ledajn ŝuojn eĉ la plej simplajn, se paro da ŝuoj kostas sumon da rubloj ekzistantaj nur en mia fantazio?...

Por ne malsati kaj posedi eĉ la plej simplajn vestaĵojn, ekzistas en Sovetunio du ebloj: aŭ ŝteli aŭ spekulkomerci. Komerci estas simpla afero - ĉiu aĉa objekto estas bona varo. Ĝi povas esti malnova ĉemizo aŭ malnova sako aŭ kelkaj malnovaj najloj. Konkurenco inter la "komercistoj" ne ekzistas. Sed ricevi iun "varon" oni povas nur de alia, kiu ĝin ŝtelis. Al komercado mi neniam emis. Por tio necesas ankaŭ iom da mono kaj mi tion ne posedas. Komercado estas ankaŭ riska afero. Oni povas esti kondamnata al dekjara pun-

laboro pro iu ajn bagatelaĵo, se NKVD aŭ la milicio tion volas. Pli asekuritaĵ estas la grandskalaj komercistoj, kiuj al la registaraĵ reprezentantoj NKVD aŭ miliciaj ĉefoj pagas multe da mono.

Tia afero por mi ne taŭgas ; estos por mi pli simple ŝteli. Vere, ankaŭ ŝtelado estas riska afero, sed alia alternativa ebleco ja ne ekzistas. Depende ankaŭ kion kaj kiom oni ŝtelas.

Estinte en la kolĥozo, mi iun vesperon post la laboro staris kun Tavelinski sur la vojo. Pasis viro. Aŭdante la parolon en nia lingvo, li proksimiĝis al ni kun la vortoj "Bonan vesperon!". Post kelkminuta interparolo pri niaj vivkondiĉoj en la kolĥozo li diris : "Aŭdu kamaradoj, kiel vi rakontas, via kolĥozo ne apartenas al tiuj, kie fluas lakto kaj mielo. Mi komprenas, ke vi malsatas, eĉ laborante kiel "staĥanovanoj". Se vi volus, mi havas al vi proponon pli bonan ol labori en kolĥozo".

Aŭdi proponon oni ĉiam povas, ĝin akcepti ja ne estas devige. Mi respondis jese. "Do venu kun mi kaj ni ĉiuj tri laboros kune."

Mi komprenis kian laboron koncernas lia propono, sed mi ŝajnigis naivulon. "Kien ni sekvu vin por havi laboron, ni ja havas en la kolĥozo sufiĉe da laboro.

- Ĉu vi estas naivaj por ne kompreni pri kia laboro mi parolas ? Ni ŝtelos kaj tio estas laboro !

- Kion ni ŝtelos ?

- Se vi ŝercas, estas senutile kun vi paroli. Ĉu en Rusio mankas objektoj por ŝteli ? KREDU al mi kamaradoj, ke hejme mi tion ne faris, sed en Rusio mi estas al tio devigata.

- Kaj kio okazos, se ni estos kaptitaj ? - mi demandis.

- He, he, he... Bagatelaĵoj... Monon de la bankoj ni ja ne ŝtelos. Mi jam havas la sperton. Se ni estas kaptitaj, ni ricevas kelkajn batojn kaj oni nin lasas. Se ni forkuras en la "ĝusta tempo", ni ankaŭ tion evitas. Cetere ni risku, se ni ne volas malsati.

- Kaj kial vi havu kunulojn en via laboro ?

- Verdire oni povas labori ankaŭ sole, sed estas pli bone labori kompanie.

- Se vi okupas vin per tiu laboro konstante, kial vi an-

koraù ne havas kompanianojn ?

- Ho, mi havis kompanianojn, kelkajn rusojn, sed inter ni okazis kvereloj kaj mi ilin forlasis. Estas longa historio, sed por vi tio ne gravas.

- Ne ! Vian proponon ni ne akceptas, estis mia respondo.

- Se vi ne volas, mi eù ne allogos vin, sed diru al mi, kamaradoj, eble mi povus tranokti en via "kibitko", se troviĝas en ĝi iom da loko. Vi tamen ne timu, ke mi ion kunprenos.

- Tranokti ÷e ni vi povas. Troviĝas iom da loko sur la tera planko kaj, ke vi ion kunprenos ni tute ne timas, krom iom da pajlo kaj multe da pedikoj ni nenion posedas. Sed se vi timas pedikojn, ni neniel al vi povas helpi.

- Hm, timi pedikojn ? En Rusio la pedikoj estiĝis parto de ni. Mi certe havas pedikojn ne malpli ol vi, sed pri tio oni ja ne parolas."

Somere mi konatiĝis kun kelkaj fruktarboj kaj legomaj kampoj en la urbo kaj en ĝia ĉirkaùaĵo. Preni kelkajn kilogramojn da tomatoj el kolĥoza kampo estis tute simpla afero. Mi nur rigardis, kie sidas la gardantino kaj okazigis mian "laboron" en la loko plej malproksima de ŝi. Preni el kolĥoza kampo ne estas kontraù la moralo, la kolĥozanoj tion multe praktikadas kaj la ŝtato ne malriĉiĝos, se ĝi ricevos kelkajn kilogramojn da tomatoj malpli. Almenaù mi tiun teorion enkapigis, poste mi eù pri tio ne meditis - mi estas malsata, tomatoj estas manĝaĵo, nenio pli min interesas. Same, koncerne bulbojn, kukumojn, pomojn, terpomojn k.a.

Tion, kion mi ne formangiùs, mi vendis "malmultekoste" kaj per la akiritaj kelkaj rubloj povis aĉeti iom da lakto, natura aù acida, sufiĉe da tabakfolioj, kiujn ŝtelis aliaj. Vere, mi devas havi ŝuojn kaj vestaĵojn, sed tiuj aĵoj estas ekster la ebloj de miaj enspezkapabloj, tiaj grandiozaj sumoj ne estas akireblaj per mia "laboro". Cetere mi havas ĉiam esperon pri miraklo. Dum somero ŝuoj ne estas necesaj, sufiĉas ankaù la ĉifona pantalone kaj la supera parto de iama mantelo.

En mia "laboro" mi ne estis la sola inter la invalidoj. Ĉiu havis siajn kampojn kaj arbojn. Ni eù ofte ren-

kontiĝis dum la "laboro". Sed la naturo ne estis avara kiel la soveta ŝtato. La vastaj verdruĝaj kampoj kun tomatoj ne limigis siajn kvantojn al gramoj, laŭ la normoj de la brigadistoj, diversaj ĉefoj, "politrukoj" aŭ Moskvanoj.

Branĉoj de la pomarboj kliniĝis malsupren kiel de la tero gravitigitaj kaj por pomo ili pagon en rubloj ne postulis.

Mi reakiris la normalan forton. Mi povis ne nur iri rapide, sed eĉ forkuri, se iu gardinto volis min dum la "laboro" kapti. La malariaj atakoj iom post iom ĉesis. Forestis la konstanta kapdoloro. En la invalida hejmo mi faris la laboron sen streĉoj. Nun venis la zorgo, ke mi devos liberigi mian lokon en la hejmo. Sed Rozen preferis havi tiujn, kiuj iom resaniĝis, ili ja povas labori - la novvenantoj labori ne povas.

Iun fojon Rozen komencis kun mi interparolon. "Mi volas vin havi aktiva. - Ĉu mi ne estas aktiva ? Mi ja laboras same kiel la ceteraj invalidoj.

- Mi ne pensas aktivecon kun la sarkilo en la kampo, sed pri alia aktiveco, partopreni en niaj kunvenoj.

- Mi ja en la kunvenoj partoprenas same kiel aliaj, kion pli vi volas ?"

Kunvenoj estis aranĝitaj de tempo al tempo, formale pri informaj aferoj de la hejmo, sed la konkludo de Rozen estis, ke ni devas esprimi dankemon al la soveta reĝimo. Ni eĉ aprobis rezoluciojn, kompreneble unuanime, tamen partoprenantoj en diskutoj estis ĉiam nur du aŭ tri invalidoj, ankaŭ la ne tro saĝaj. Rozen dum tiuj kunvenoj rigardis al la du eks-studentoj en Polio kaj demandis, ĉu ili eble volus ion diri, sed ili nenion diris.

"Mi volas, ke vi en la kunvenoj partoprenu aktive, esprimu vian opinion kaj ne sidu silenta kiel mutulo. Vi ja estas politike konscia knabo.

- Vere, mi ne estas analfabeto, sed eble mi ne estas konscia en tia grado kiel vi opinias kaj publikajn paroladojn mi neniam faris.

- Tamen diri kelkajn vortojn dum la kunvenoj vi povus, se vi volus."

Post kelkaj tagoj venis Rozen kun preta projekto :

"Ni preparu surmuran gazeton kaj vi ĝin redaktos."

Mi provis min liberigi de tiu tasko :

"Mi neniam estis gazetredaktoro. Mi eĉ ne scias kiel tian aferon komenci.

- Mi klarigos al vi kaj vi ĝin redaktos.

- Sed por gazeto necesas minimume iom da papero kaj mi tion ne havas.

- Mi prizorgos paperon kaj la gazeto aperu. Tio estas grava afero, de tio eble dependas la ekzistado de la invalida hejmo, ĉu vi min komprenas ?"

La gravecon mi komprenis. En ĉiu soveta institucio devas esti surmura gazeto, ĝi ekzistas eĉ en la tendaraj kolonioj. Verŝajne estis al Rozen rimarkite, ke en la invalida hejmo mankas tiu gazeto. NKVD povas tiun mankon komenti kiel nesufiĉan amikecon al la soveta ŝtato.

El dokumentaj libroj en la kolĥoza kontoro Rozen el-ŝiris la foliojn, kiuj havis unu flankon ne skribitan. De ie li alportis kelkajn pecojn de kolorkrajonoj (tio estis speciala valorajo). Mirinde estis, ke li alportis ankaŭ grandan kartonon.

La gazetan nomon li decidis. Ĝi estu en la rusa lingvo "POBEDA" (Venko). Tiu slogana vorto estas en Sovetunio tre populara. Dum la milito ĝi pliaktualiĝis. En tiu okazo ĝi devis signifi la venkon en la milito al kiu ni, la dudekkvin invalidoj, kontribuos per nia surmura gazeto.

Por la ses literoj POBEDA mi ne ŝparis lokon, proporcie al la kartono, en koloroj, la ruĝa estis kompreneble la ĉefa apud la verda. Rozen opiniis, ke la kapo estas tro granda. Mi opiniis, ke en tia gazeto ne gravas la enhavo, sed la aspekto.

Mi algluis iom da fotoj el la pola gazeto "Wolna Polska" (Libera Polio), eldonita de APP. Mankis nur la artikoloj. Mi klarigis al Rozen, ke eventuale mi povas ion verki, sed ne plenigi la tutan gazeton. Rozen fondis redaktoran kolektivon, aldonante al mi la du estintajn studentojn, sed per la "respondeca" tasko li honoris min.

"Kion verki ?" - raporto de la sieĝita Varsovio en la jaro 1939, temo aktuala pro la milito. Pogorelo, la politika studento, verkis artikolon pri milita teorio laŭ artikoloj en la rusaj gazetoj, ankaŭ aktuale. La studento

de la ĵurnalista fakultato prenis la parton humuran. Priskribinte kelkajn kuriozajn okazintaĵojn en la invalida hejmo, li plenumis sian taskon por la "VENKO".

Rozen devis kontroli la gazetan materialon, antaŭ ol mi ĝin kunmetos. Tiam li konstatis, ke mankas la plej grava artikolo - la laŭdoj por la soveta reĝimo. En iom malica humoro li rapide verkis iom da ŝmirfrazoj por la soveta registaro kaj pri ĝia genia ĉefo kamarado Stalin. Liajn frazojn mi kompreneble surgluis por la ĉefartikolo.

Kiam la gazeto estis preta, Rozen aranĝis kunvenon por laŭtleĝi. La invalidoj estis de ĝi kontentaj, Rozen fieris. Dum la legado lia vizaĝo entuziasmiĝis. La gazeto estis unu el la ĉefaj objektoj, kiujn Rozen montris al la vizitantoj, kiujn li invitis al la invalida hejmo.

Post unu monato mi eldonis duan numeron, mi sukcesis eldoni ankaŭ la trian numeron.

* *
*

8 - mi, laborsoldato

Okazis tio, kion mi povis supozi, - forlaso de la invalida hejmo. Kiam ni "akceptis" la sovetan civitan-econ, ni estis ekzamenitaj de militkuracista komisiono. La komisiono ekzamenis la taŭgecon por la militservo kaj por laboro. La plimulton la komisiono akceptis por la militservo, sed multaj estis netaŭgaj por fizika laboro.

En novembro mi estis klasifikita kiel laborkapabla kaj mobilizita kune kun ĉ. ducent personoj al la t.n. "laborfronto". Mi ja devis forlasi la invalidan hejmon.

Ĝis la forsendo daŭris kelkajn tagojn. La tranoktejo estis la militkomandeja korto aŭ la "ĉajĥana".

Iun posttagmezon ni devis kolektiĝi sur la militkomandeja korto. "Hodiaŭ ni foriros." Ni estis vicigitaj duope kiel soldatoj. La plimulto sen ŝuoj kaj en ĉifonaj vestaĵoj, sed en soldata ordo.

Post nombrado, kalkulado kaj kontrolado ni elmarŝis al Kara Su. La vojon (ĉ. dudek kilometroj) ni faris piede, sed tio ne estis grava. Niaj piedplatoj sufiĉe hardiĝis kiel ledoj ; ilin la trotado sur ŝtoneta vojo ne ĝenis, almenaŭ ne multe.

Ni estis vagantaj en malgrandaj grupoj, okupantaj longan distancon. De tempo al tempo haltigis nin veturanta aŭtomobilo kun NKVD-oficiroj. "Kiu vi estas ?... Kien vi iras ?... Ho, vi apartenas al la mobilizitoj ! Ho bone ! Iru !"

En Kara Su jam troviĝis kelkcentojda homoj atendantaj la forsendon. Ili loĝis en barakoj, proksime de la fervoja stacidomo.

La kondukistoj sciigis ĉiumatene, ke volontuloj povas havi laboron. La pago : tricent gramoj da pano

kaj tagmanĝo en la laborloko. Mi akceptis laboron,
- nenion por manĝi mi havis.

Mi estis sendita al kotonkolektejo kun grupo da homoj kiel mi nenion posedantaj. Ne tro streĉe ni laboris, sed la promesitaj tricent gramoj da pano malgrandiĝis al ducent dum la ricevo, protestoj ne efikis. En aliaj entreprenoj oni ricevas iom pli da manĝaĵo kaj la mon-nehavantoj tiel akiras siajn modestajn vivbezonaĵojn.

"Kiam ili nin forsendos?... Kiam ni estos forsenditaj?..." jen la ĉefa demando dum niaj babiladoj en la barakoj ĉe la stacidomo - nia hejmo dum multaj tagoj.

Nokte kaj dum pluvtagoj ni sidis kaj kuŝis, kelkcent homoj sur plankoj. Dum la belveteraj tagoj multaj vagadis en la urbo por ion enspezi, iuj per komerco sur la bazaro, iuj alimaniere. Ne mankis inter ni "ĵulikoj". Ili preskaŭ ĉiam ludis kartojn. Ili manĝis komune, sidante en rondo, ĝuste kiel siaj kolegoj la rusaj "ĵulikoj".

De tempo al tempo aŭdiĝis inter ili kvereloj kun iuj uzbekoj. Temis tiam pri kelkcent, aŭ kelkmil rubloj, kiujn iu uzbeko malgajnis dum la ludado. La uzbekoj opiniis, ke la ludo ne estis honesta. La uzbekoj ne malofte volis uzi siajn tranĉilojn, sed la gajninto sukcesis malaperi. La kolegoj de la gajninto konvinkis tiam la uzbekojn pri la honesteco dum la ludo, montrante, ke ankaŭ ili posedas tranĉilojn.

* *
*

Fine venis niaj novaj mastroj por gvidi nin al laborloko. Okazis nombrado, kontrolado kaj formigo en grupoj. Nia grupo konsistis el ĉ. cent homoj. Ni eksciis, ke ni veturos al Frunze (la ĉefurbo de Kirgizio). Tie ni laboros kiel fervojistoj. Niaj mastroj ne ŝparis bonajn promesojn, ĉiutage po okcent gramojn da pano kaj tri fojojn tage kuiritan manĝaĵon, krome, monon: kelkcent rublojn monate kaj aĉetebleconde produktoj en la fervojistaj butikoj. La ĉifonvestitoj demandis pri vestaĵoj. "Jes! Vi ricevos! Tiel vestitaj vi ja ne povus labori." Logika rezonado: tiel ni ja ne povus labori.

Denove la trajno nin veturigis. En la vagono inter la pasaĝeroj troviĝis ruso, ĉ. kvindekjara. Li demandis, kiu estas nia grupo. Aŭdinte, ke ni estas mobilizitaj por la fervojo en Frunze, li demandis: "Kiel vi laboros, tiel 'vestitaj'?" Dum la plua interparolo kun li klariĝis, ke ankaŭ li tie laboras. Li ricevis dusemajnan libertempon por veturi hejmen kaj nun li veturas reen. "Vi pereos en tiu loko, li diris, certa pereoo..."

- Niaj gvidantoj ja promesis al ni vestaĵojn.

- Jes! Ili promesis... promesis!... certa pereoo, nenio pli... Ha!" kaj li kuŝiĝis kun la kapo sur sia sako por dormi. Kompreneble, ni kredis al tiu ruso pli ol al niaj oficialaj mastroj, sed estis nenio por fari, cetere kial tuj ĉagreniĝi?... En la vagono estis varme, ni povis ankaŭ dormi, kuŝante dum la nokto sur la benkoj de la dua kaj tria etaĝoj.

Antaŭtagmeze ni atingis Frunze. Falis tie neĝo, kelkaj inter ni nenion posedis por siaj piedoj. La vetero estis tamen milda, sed ne por senŝuaj homoj. Mi estis en bona situacio. Somere, vagante en la hospitala parko mi trovis tri malsamajn galoŝojn. Mi jam havis sufiĉe da sperto por konservi ilin por la vintro. Unu galoŝo estis relative laŭmezura por miaj piedoj, se oni ĝenerale povas taksi trovitajn galoŝojn en tiaj cirkonstancoj "laŭmezuraj". Du galoŝoj estis grandegaj. Ekzistas en iuj okazoj solvo: alligi per ŝnureto, ĉifoneto aŭ drato.

Antaŭ ĉio ni celis trapasi de la vagono al la stacidomo, en tio miaj galoŝoj helpis ankaŭ aliajn. En la stacidomo estis varme, almenaŭ en ĝi ne neĝis.

De niaj du gvidantoj ni eksciis, ke ni devos daŭrigi la veturadon vespere per trajno. Ni demandis pri pano. "Ho jes! Ni prizorgos panon", kaj ili foriris. Dum la tuta tago ambaŭ niaj mastroj ne venis al la stacidomo. Homoj, estinte en la urbo sur la bazono, ilin tie renkontis, ili komercis kaj drinkis. Eble ili ankaŭ vendis la panon ricevitan por ni. Helpe de la pandistribuisto, tiaj aferoj tiam okazis.

Vespere ni denove veturis, bedaŭrinde tiun fojon la distanco estis nur ĉ. cent kilometroj. Ĉirkaŭ noktomezo la trajno venis al la finstacio Bistrovko. Ĉiuj pasaĝeroj foriris, ankaŭ mi devis forlasi la vagonon. En tiu

loko la neĝo glaciĝis, estis terure malvarme. Neniu stacidomo tie estis videbla. Niaj gvidantoj estis en la vagono ebriaj, en Bistrovko ili ien malaperis.

En la ĉirkaŭaĵo de la fervojo estis kelkaj dometoj, - en ĉiuj mallumo, estis ja post noktomezo. La kelkaj sensuuloj terure suferis kaj insultis. Iu preterpasanto nin informis, ke iom fore troviĝas barakoj por la laboristoj, li montris al ni ankaŭ la direkton.

En la barakoj por la laboristoj la vivo okazis kiel en la koncentrejoj barakoj : iuj kuiris teon aŭ manĝaĵon, iuj sidis ĉe la varma forneto kaj babiladis kaj fumis, iuj ludis kartojn, iuj riparigis siajn "vestaĵojn", iuj dormis, novvenantoj ilin ne interesis, tio estis ĉiutaga okazaĵo. Mi trovis liberan lokon sur la tabulaj kuŝejoj kaj kuŝiĝis, pensante pri la bona pasinteco en la invalida hejmo kaj ĝis kia grado nin trompis niaj mastroj per siaj mensogoj, - cetere la decido ne dependis de mi.

Matene la gvidantoj nin transdonis en la kontoro al la novaj mastroj.

Ĝojo ! Ni ricevis monatajn kuponojn por pano kaj produktoj. Pano po okcent gramojn tage. La kuponoj por produktoj ne estis tiom malavaraĵoj, tagporcio estis 40 gramoj da grilo kaj 13 gramoj da grasajo, sed okcent gramoj da pano ĉiutage estis por mi ĝis tiam revo.

Ĉirkaŭ tagmezo ni denove estis veturigataj per ŝarĝaŭtomobiloj al la definitiva loko, kie ni laboros ĉe la konstruado de la fervojo.

Paralele al la rivero Ĉuj, fluanta inter altaj montoj, troviĝas kelkaj argilaj kabanetoj kelkajn kilometrojn unu de la alia. En ilia apudo troviĝas ŝoseo inter la urboj Frunze kaj Ribaĉev. Paralele al tiu vojo okazis la konstruado de la fervojo inter ambaŭ tiuj urboj. Laŭ la bolŝevika kutimo faras tian laboron tendaranoj aŭ homoj alimaniere devigitaj.

Unu el la devigformoj nomiĝas en la rusa lingvo : "Masovi viĥod". Laŭvorte tio signifas "Amasa eliro". Praktike ĝi okazas jene : La kolĥozoĵoj, ofte eĉ aliaj entreprenoj, ricevas ordonon sendi certan nombron da homoj al iu loko en la sama respubliko por iom da tempo, - plej ofte 1-3 monatojn - kie okazas konstruado de afero por la

tuta respubliko, ekzemple ŝoseo, kanaloj aŭ io simila. La senditaj homoj ricevas pli-malpli normalan pagon kaj loĝejon en barakoj. Ili devas formale labori nur antaŭe fiksitajn tempon, sed tio ne estas tiel simpla.

La kolĥozoj sendas la malplej laborkapablajn homojn - maljunulojn, malsanulojn kaj mallaboremulojn. Ĉefas, ke ili plenumu la ordonon kaj sendu homojn. Ĉu la senditoj laboros aŭ ne, tio la sendintojn ne interesas.

Ĉar la laboroj per tiaj laboristoj ne multe progresis, oni decidis aldoni al la laborotempo ankaŭ labornormojn. Laboristo veninta por unu monato aŭ por tri monatoj devis plenumi la laborkvantojn. Sed, se iu ne povis aŭ ne volis labori, ne multe ŝanĝis la decido pri laborkvantoj. La homoj restis anstataŭ unu monato ses monatojn aŭ unu jaron, tamen la konstruadoj neniam progresis laŭ la fiksitajn tempo. Tiu sistemo tamen daŭris en la jaroj kvindekaj, por la sovetaĵoj cirkonstancoj ĝi estis la plej oportuna por varbi laboristojn.

Kiam la rusa armeo komencis forpeli la germanojn el la antaŭe okupitaj teritorioj, tiuspecaj konstrulaboristoj estis necesaj ankaŭ por rekonstrui la detruitajn urbojn.

Dum la milito NKVD estis multe okupata malantaŭ la frontoj. Ĝia "agado" aresti homojn por la grandaj konstruadoj estis iel limigita pro politikaj kaŭzoj kaj homoj estis pli necesaj por la armeo. La rusa registaro tiam ordonis organizi laborarmeon per la militkomandejoj.

Prizorgo de laboristoj por la konstruo de la fervojo Bistrovko-Ribaĉev apartenis al la militkomandejoj en Kirgizio. La administrantaro de tiu konstruado troviĝis en Bistrovko. Ĝalal Arek estis punkto formita en la proksimeco de la antaŭe kvar-kvin kabanetoj, en la dua flanko de la ŝoseo. La konstruantoj de la fervojo devis ankaŭ konstrui por si la loĝbarakojn kaj aliajn dometojn por la administra bezono.

En tiuj lokoj la barakoj estis simplaj kavernoj. Pro ekonomiaj kaŭzoj la barakoj estis ĝis 30 metrojn longaj. Ĉe la muroj de tiuj kvarangulaj kavoj estis ligitaj per argilo neprilaboritaj ŝtonoj. Por ke la pluvo ne envenu tra la ligna tegmento, sur ĝin oni metis dikajn argil-

tavolon. En la barakojn lumo penetris tra kelkaj malgrandaj vitretoj en la tegmento. Vespere la barakojn lumigis petrolaj lampetoj faritaj el konservajaj skatoloj. La flametoj memorigis la flametojn sur la tombejoj dum iuj religiaj festotagoj. Sur la duetaĝaj kuŝejoj sen iu ajn matraco ripozis laboristoj post siaj tagaj laboroj.

Dum la cara regado la kirgizoj estis plejparte nomada popolo. La riĉaĵo de la bienuloj konsistis el ŝafoj kaj kaproj. Ĝis 1934 la nunaj rusaj regantoj havis multe da klopodoj kaj malfacilaĵoj por eduki la kirgizojn kiel terkulturistojn por la kolĥozoj. Oni ne vidas en Kirgizio malnovan civilizon kiel en la najbara lando Uzbekio.

Malgraŭ ke la lingvoj kirgiza kaj uzbeka malmulte diferencas, la religio de ambaŭ tiuj popoloj estas la sama, tamen la karakteroj de la homoj ege diferencas. La uzbekoj estas afablaj kaj trankvilaj. Ili zorgas pri pureco de la korpoj kaj de siaj hejmoj, sendepende ĉu la hejmo estas argila ĉambro aŭ nur loko sur la kuŝejo en la barako. Al la kirgizoj tiuj ecoj certagrade mankas.

Iu el la ne tre simpatiaj kutimoj ĉe la kirgizoj estas kraĉado. Ili ne kraĉas pro ia malsano aŭ pro fizika bezono, sed ŝajnas, ke ili havas plezuron en la kraĉado. Ili kraĉas precipe kiam ili faras nenion alian. Alia ŝatata okupo de la kirgizoj estas monkkalkulado. Ili entreprenas etajn komercadojn nur por havi rilatojn kun mono. Ofte iu kirgizo sidiĝas sur sia kuŝejo, elprenas la pendantan saketon sur sia kolo malantaŭ la vestaĵo, prenas el ĝi monon kaj ĝin kalkulas kaj kalkulas. Poste li prenas multvaloran bileton kaj serĉas voluntulon por ŝanĝi ĝin je malpli valoraj biletoj. Iam ili okazigas la kontraŭon.

Tiu fervojo inter Frunze kaj Ribaĉev estas branĉo de la longa fervojo Turkestano-Siberio, t.n. Turksib. La kirgizoj povus vivi sen ĝi, sed por la tutsovetia ekonomio ĝi verŝajne estis necesa.

Kiam nia grupo alvenis al Ĝalal Arek, ni havis eĉ ne lokon sur kuŝejo en tegmentita barako. Ĝis ni akiris tian lokon, ni devis nin kontentigi per iom da loko sur la tera planko en barako, kiu jam estis tegmentita. Por finkonstrui la novajn barakojn, necesis multe da laboro.

La kaldronoj de la kuirejo staris sub la firmamento kaj atendis finkonstruon de la ŝtona dometo. Nek banejo nek desinfektĉambro ekzistis.

Ankaŭ la kontoro ne estis finkonstruita. Kuracistino deĵoris du horojn antaŭ tagmezo en la kontoro, kaj dume ne povis labori kontoristoj. Kiel kutime venis al ŝi ĉiutage kelkdek homoj kaj neniam ŝi povis ĉiujn ekzameni. Vere, la kolonia ĉefo disponigis por la domkonstruadoj kvanton da homoj laŭ la ordonoj de Moskvo, sed ĉiun ŝtonon oni devis porti kelkcent metrojn sur la homaj dorsoj kaj la konstruado ne povis okazi rapide. "Ni konstruas fervojon, unu el la teknikaj mirindaĵoj, per la teknikaj metodoj de la antikva Egiptio dum la konstruado de la piramidoj kaj sfinksoj", diris iu el ni.

Ĉiumatene, antaŭ la tagiĝo aŭdiĝis sonoj per la fera batado. Ili signalis la samon kiel en la koncentrejoj - tendaroj - stariĝi kaj ricevi la matenmanĝon : trikvaronlitron da akva supo. Ĉi tie la procedo estis alia ol en la koncentrejoj, pli klopoda. La brigadisto devis aĉeti kuponojn en la kuireja kaso kaj ilin disdoni al "siaj homoj". La brigadisto ne volis disponigi sian monon aŭ eble li la monon ne havis. Ankaŭ ne ĉiuj "liaj homoj" havis monon. La kirgizojn oni suspektis, ke ili havas monon, sed trompas por ne pagi kelkdek kopekojn. Multaj homoj ne havis proprajn ujojn por la supo. Tiu afero solviĝis tamen facile. Kelkaj, ricevinte la supon, ĝin trinkis starante proksime de la kuirejo kaj disponigis siajn ujojn al siaj kamaradoj. La ricevo de la supo tamen okupis la brigadiston minimume unu horon.

La pelado al la laboro okazis ceremonie - ni ja estis "liberaj homoj" kaj kvazaŭ soldatoj, - laŭ la nomo. La anaro devis kolektiĝi sur la placo por mallongdaŭra kunveno. Plejofte estis laŭtlegetaj raportoj de la frontoj aŭ registaraj decidoj kaj komunikoj. De tempo al tempo paroladis la "politruko" aŭ li laŭlegis rezolucion, kiu estis akceptita unuanime. Poste, la amaso da kirgizoj, plejparte maljunuloj, vestitaj en siaj longaj nigraj manteloj, elŝoviĝis el la placo. Ne multe ili dum la kunvenoj komprenis, malpli ili estis en la kunvenoj interesataj, sed al la laboro ili devis iri.

Kiam la laboristoj revenis al la zono post la taga laboro, okazis ricevo de la tagmanĝo. Tiu procedo estis komplika. Ekzistis laboristoj simplaj kaj "staĥanovanoj". La "staĥanovanoj" ricevis aldone al la supo ian specialaĵon, ekzemple du aŭ tri kulerojn da rizo aŭ peceton da kolbaso aŭ kelkajn salitajn fiŝetojn. Ĉiu kirgizo sin opiniis "staĥanovano", sed en ĉiu brigado povis esti nur kelkaj "staĥanovanoj". La kirgizoj la vorton en la rusa lingvo "staĥanovec" mallongigis per "staĥan", sed ili ne povas prononci "staĥan" kaj prononcas "stakan". Stakan en la rusa lingvo signifas glason, el kiu oni trinkas. La kirgizoj, kiuj sin opiniis viktimoj de maljusteco, vokis : "Mi ankaŭ stakan".

Multnombra anaro, kiu ne havis ŝuojn, ne iris al la laboro. Ili restis la tutan tagon en la barakoj. Inter ili estis ankaŭ mi. Pro ĉiutaga alveno de multe da homoj al Ĝalal Arek nia ĉefo kun ili estis tre okupata kaj nian sidadon en la barakoj toleris, - almenaŭ ni tion opiniis. Miajn galoŝojn mi uzis nur kiam mi devis iri eksteren. En la barako mi tenis ilin kaŝitaj.

Posttagmeze nia ĉefo kun la "politruko" inspektis la barakojn, precipe por renkonti la homojn, kiuj al la laboro ne iris. Al ĉiu li direktis nur unu demandon : "Kial vi ne iris al la laboro ?

- Mi ne havas ŝuojn, kamarado ĉefo.
- Vi ricevos bastŝuojn kaj morgaŭ iru al la laboro."

Ĉiutage li diris la samon kaj ĉiumatene li pri ni kvazaŭ forgesis. Intertempe ni eksciis, ke en la kolonia "vestaĵmagazeno" bastŝuoj absolute ne troviĝas, oni devis ilin alveturigi. Ĝis tiam mi povos havi "parazitan" vivon. Iom da "kapitalo" mi posedis. En la tempo de mia "redaktora kariero" mi ŝparis kelkdek kajeraĵajn foliojn. Nun mi ilin vendis du-tri rublojn por ĉiu folio. Per vendita folio mi povis ĉiutage aĉeti la panon per la kuponoj kaj du supojn.

En la barakaj komunumoj de Ĝalal Arek okazis farunkomercado. Kiel kvantmezurilo servis malplenigitaj konservskatoloj. Ujeto da faruno kostis 10-20 rublojn. Per la faruno oni kuiris amelon - la plejegan "delikataĵon" en la komunumo. Mi ne apartenis al la riĉuloj, kiuj povis ĝui tiun luksaĵon. Mi devis min kontentigi per la supo

kaj pano, ricevitaj per kuponoj, kvankam ne sufiĉe por satiĝi.

Unu el la farunvendantoj, Vajnŝtajn, havis sian kuŝejon proksime de la mia. Li estis judo el "Okcident-ukrajna" urbeto. Hejme li estis metiisto. Lia veno al Ĝalal Arek okazis tra la tendaroj en la nordo kaj poste tra la kolĥozoj en la sudo. En Sovetunio li havis bonegan metion. Li povis ripari ankaŭ truitajn ladajn ujojn, se li havis nur ladon. Inter ni ni nomis lin "frenezulo", nomo eble ne tro korekta, sed ja ne tre saĝa li estis. Li havis la feliĉon iam lerni metion tre bonegan en Sovetunio.

En la kolĥozoj li "riĉiĝis". Kiam li estis mobilizita, lia posedaĵo konsistis el ĉ. dudek kilogramoj da faruno, saketo kun sekigitaj tabakfolioj, tri kilogramoj da rizo kaj iom da mono. Sed lia ĉefa riĉaĵo estis metiinstrumentoj : du marteloj, tondilego por lado, kelkaj fajliloj, iom da malgrandaj feraj iloj kaj iama kaleŝa akso. Valoro de la akso estis, ke ĝia meza parto estis ronda kaj la ambaŭflankaj finpartoj estis kvarangulaj. Li do povis per ĝi formigi la ladon laŭ bezono. Tiun kaleŝan akson li havigis al si en la nordo, kiam li forlasis koncentrejon, kaj ĝi migris kun li kelkmil kilometrojn.

Por la instrumentoj li havis keston, kiun li gardis pli ol sin mem. Sur la vojo de la kolĥozo al Ĝalal Arek necesis por li porthelpanto, precipe gardanto. Tiu gardanto estis unu el liaj kolĥozaj kamaradoj Mendel. Fakte Mendel seninterrompe sidis ĉe la riĉaĵo de sia mastro kaj ĝin gardis kiel hundo.

Mendel estis kvin jarojn pli juna ol la "frenezulo". Kompreneble, Mendel gardis por pago, - li manĝis kun la "mastro" la kuiritan amelon du fojojn tage.

La "frenezulo" pro sia pliaĝeco kaj precipe pro sia "riĉeco" kondutis rigore al sia servisto. Ĉiam li kriis per aroganta tono, ne sciante mem, kion li volas. Mendel estis senmona kaj sen io ajn por manĝi kaj devis sin nutri nur el tio, kion li ricevis de la "frenezulo". En la kolĥozo Mendel lasis edzinon kaj filineton, pri kiuj li eĉ minuton ne ĉesis zorgi. La "frenezulo" havis ankaŭ monon kaj dum la veturado de Kara Su li ĉe preskaŭ ĉiu

stacio forkuris de la vagono aĉeti ion por sia "malforta koro". En tiuj lokoj oni vendis sekigitajn persikojn, sed la "frenezulo" kutimis longe pripensi dum ĉiu aĉeto. En iuj stacioj li pripensis ĉe la vendistoj ĝis la trajno ekveturis kaj li apenaŭ sukcesis salti en la vagonon, nenion aĉetinte. En la vagono li poste bedaŭris, ke li ne aĉetis ion, kio estas ja necesa por lia "malforta koro".

En iu stacio li foriris kun fina decido aĉeti ion, sed la trajno komencis veturi kaj la "frenezulo" ne revenis. Mendel dume devis gardi la posedaĵon de sia mastro. Ekestis problemo. Kiam necesis ĉion transporti el la vagono al la stacidomo en Frunze kaj ankaŭ dum la sekvonta vojaĝo ĝis Ĝalal Arek, kiel helpanton Mendel prenis D. Flantz, kiu estis kun ili en la kolĥozo.

Flantz, laŭ propraj rakontoj, devenis de bonhava familio en Varsovio, kaj estis ĉe la gepatroj la sola infano. En sia infanaĝo li multe malsanis kaj ne povis plenumi la gimnaziajn studojn. Kiam la malsanoj lin forlasis, li ne havis emon peni por akiri la scion kaj por reveni al la gimnazia klaso en sia aĝo. Liaj gepatroj dungis por li hejman instruiston, sed D. neglektis la lecionojn kaj ankaŭ la instruiston kaj venkis. Poste Flantz laboris ĉe sia patro, kiu havis laborejon de altkvalitaj peltoj kaj li ricevis bonan pagon.

La filozofio de Flantz estis, ke oni devas vivi. Vivo signifas drinki kun la kolegoj, ludi kartojn kaj ĝui ĉiujn eblajn plezurojn. Politiko lin ne interesis. En Rusio Flantz devis sperti la koncentrejojn pro akuzo "konscia popola malamiko". Ankaŭ en Sovetunio politiko ne interesis lin, sed por satiĝi li estis decidinta fari ĉiujn ajn ruzaĵojn. Li tamen ne havis la talenton havigi al si monon en la sovetaĵoj. Por spekula komercado li absolute ne taŭgis, pli taŭga li estis por estĉtelado.

Kun la "frenezulo" li kvazaŭ amikiĝis ankoraŭ en Kurŝabo, celante ion de la "frenezulo" havi praktike. Kiam Mendel prenis lin kiel helpanton, Flantz proponis, ke ili vendu la tabakon kaj la farunon antaŭ ol la "frenezulo" revenos kaj poste diru, ke tio estis forĉtelita.

Mendel tiun proponon ne volis akcepti. Flantz tamen sukcesis instigi Mendel'on ne esti avara kun la faruno dum la kuirado de la amelo.

Kiam la "frenezulo" alvenis al Ĝalal Arek kelkajn tagojn post ni, li estis en la unua momento kontenta, ke Mendel bone gardis la instrumentojn. Pri la foruzo de multe da faruno li montris malkontentan mienon, sed nenion diris. Li memoris nur la survojn malfacilaĵojn al Ĝalal Arek kaj pri ili senĉese rakontis.

Vajnŝtajn opiniis, ke en Sovetunio li estas specialisto kaj ne devas iri al simplaj foslaboroj. La kolonia ĉefo kaj la "politruko" opiniis, ke en Ĝalal Arek la metio de Vajnŝtajn ne estas grava. Dum siaj ĉiutagaj inspektoj en la barakoj ili volis la "frenezulon" per forto devigi al la foslaboroj. Tiam Vajnŝtajn sin kaptis ĉe la brusto kaj kriis: "Ĵus, ĵus mi sentas la saltadon de la koro kaj baldaŭ ĝi certe krevos."

Fine Vajnŝtajn per siaj krioj tedis la kolonian ĉefon kaj la "politrukono". Ili lasis lin trankvila. De mateno ĝis malfrua vespero Vajnŝtajn majstrumis en la barako el konservaĵaj ujetoj siteletojn kaj riparitis truitajn siteletojn.

Intertempe la "frenezulo" eksciis, ke per mono oni povas en Ĝalal Arek "ion fari". Ion fari signifis esti liberigita de la laborarmeo pro malsaneco. Tiam Vajnŝtajn komencis vendi la farunon. La tri kilogramoj da rizo estis de li forŝtelitaj antaŭe. Je tiu "laboro" Vajnŝtajn suspektis Flantz'on, sed li ne havis konkretan pruvon.

Iun vesperon venis al la "frenezulo" viro aĉeti ujeton da faruno. Kaj jen mi aŭdis ĉe la nekonato voĉon al mi konatan. Mi rigardis lian vizaĝon, sed la ĉifonita pelta ĉapelo kaj la ceteraj vestaĵoj malebligis rememori kiu tiu homo estas. "Pardonu! En kiu urbo vi estas?" - mi demandis. "El Varsovio, mia nomo estas K...".

Verŝajne estis en la sama momento al li konata mia voĉo. Li gvidis min proksime al la lumeto kaj surprizite diris: "P...! Ĉu estas vi?". Ni estis kamaradoj en la junaĝo. Dum multaj jaroj li estis aktiva komunisto, eĉ ĝis la milito. Kvankam ideologie ni havis nenion komunan, tamen kiam ni hazarde renkontiĝis, ni havis longajn diskutojn pri aferoj aktualaj kaj ne aktualaj.

Antaŭ lia alveno al Ĝalal Arek li spertis la soveticajn koncentrejojn kaj multspecajn mizeraĵojn. En Ĝalal Arek lin kaptis ankaŭ ia grava malsano kaj dum kelkaj semajnoj li kredis havi tie la eternan ripozon. En Varsovio li lasis ĉarman edzinon kaj filineton. Dum la malsano li petis min: "Se vi travivos la militon kaj revenos al Polio, sciigu al miaj familianoj aŭ parencoj, kie kaj kiam mi mortis". Intertempe li iĝis religia, iel li havigis al si preĝlibron kaj kuŝante sur la tabuloj ofte en ĝi rigardis, samtempe preĝante.

De lia menso tamen ne forestis la bolŝevika kredo. Mi renkontis lin en Polio post la reveno tien. Lia familio, same kiel multaj el liaj parencoj, pereis en la germanaj koncentrejoj. Sed K. kiel antaŭe "alte tenis" la bolŝevikan standardon. Kiel ĝis la milito, li kredis je la sankta tasko de la leninismo-stalinismo trudi al la homaro la bolŝevikan ideologion. La aliancon inter Stalin kaj Hitler li opiniis unu el la geniaj agoj por plivastigi la bolŝevikan ŝtaton. Aktive li sin enjungigis en la servo de la komunista reĝimo en Polio, ne por konstrui en Polio socialismon - tiun vorton li sarkasme pririkanis. Lia ideo estis nur detrui sur la terglobo la putrantan kapitalismon, ĝiajn ŝtatojn kaj instituciojn.

La "politruko" Ferĉenko eksciis, ke mi havas galoŝojn kaj kaŝas ilin por ne iri al la laboro. Li minacis, ke pro tiu "krimo" mi povas esti juĝata. Mi komprenis, ke la minaco estis iom troigita, sed li posedis sufiĉajn aliajn rimedojn por persekuti min.

Ĉiumatene li pelis min el la barako kaj sur la placo ordonis al fanatika kirgizo brigadisto min atenti. Tiu kirgizo ne permesis al mi iri for eĉ unu paŝon. Sub lia kontrolo mi devis iri al laboro kun la kirgizoj en lia brigado.

La ventego sur tiu intermontara vojo hurlis terure. Ankaŭ la kirgizoj en siaj longaj manteloj spertis la malvarmon. En mia pantalono troviĝis multe da truoj. Mi absolute ne imagis elteni ĉiutage tian ventegon.

Veninte al la loko, kie okazas la fosado, ni ripozis, sidante iom da tempo. La laboro - meti per ŝpato iom da

tero sur portilon aŭ kun kamarado forporti iom da tero, kiun metis sur la portilon alia homo - estis tre teda, sed pli turmentis la malvarmo.

Al la laborvojo komencis veni Azamatov, uzbeko, sed krudanima, maloftaĵo inter la uzbekoj. Liaj vangoj atestis, ke li ne suferas malsaton. Lia longa pelta mantelo lin ŝirmis de malvarmo. Lia agitanta kapablo kaj komunista fanatikismo certigis al li relativan bonstaton. Verŝajne li ankaŭ kredis en ĉio, kion li aŭdis dum la partiaj kunvenoj. Por havi pri io propran opinion, lia menso ne sufiĉis. Nenian gazeton li legis, eĉ ne la kirgizajn, kiuj estis samenhavaj kiel la rusaj "Pravda" kaj "Izvestia". En la leg- kaj skribarto li estis progresinta por subskribi sian nomon. Vere, laŭ la komunista partia statuto ne povas aparteni al la partio analfabetoj, sed por ne esti analfabeto en Sovetunio sufiĉas, ke oni povu subskribi sian nomon kaj tion Azamatov kapablis. Kiel bolŝeviko li estis eksterordinare valora estaĵo.

Sur la laborvojo Azamatov paŝis de unu grupo al alia, kunvokis ĉiujn kaj parolis kun ega emocio. La aŭdantaj lin kirgizoj al ĉio kapjesis kun rideto laŭ sia kutimo, he, he. Ni, kelkaj nekompreneantaj la kirgizan lingvon, petis lin klarigi kion liaj paroloj koncernas, ĉu eble la milito finiĝis... Azamatov parolis la rusan lingvon tre primitive, tamen sufiĉe por komprenigi sin.

Nu, temis, ke la fervojkonstrua administrantaro en Bistrovko anoncis vetpremiojn de kelkcent rubloj por la kolonio, kiu akiros la plej elstaran laborrezulton. Azamatov klarigis, ke temas ne nur pri monsumo, sed per tiu mono "ni" ricevos nutraĵojn laŭ ŝtata prezo. Samtempe Azamatov klarigis sufiĉe longan programon, kiu gvidos nin al tre alta ŝtupo : se ni ricevos multe pli da manĝaĵo, nia laborkapablo altiĝos kaj "ni" ricevos de la registaro ankoraŭ pli altan rekompencan kaj per tio denove multe pli da manĝaĵo kaj nia laborkapablo plimultiĝos kaj ni ĉiam venos pli alte ĝis... ĝis... Ho, ho, ho... Nun necesas nur fari la unuan streĉon - gajni la premion. Premioj ekzistis tri, sed Azamatov rekomendis akiri la plej altan. Ĉu la kirgizoj taksis tiun aferon serioza oni devas dubi. Pri tiaj premioj ili ja aŭdis multfoje.

Azamatov vizitis la laborvojon ĉiutage, sed la kirgizoj iom post iom neglektis lin. Kial ? Tiun sekreton kaŝis la kirgiza lingvo, kiun ni ne komprenis. Azamatov komencis amikiĝi kun la nekirgizoj, tiam liaj sampopoloj komplete evitis lin. Fine ni eksciis, ke Azamatov havis kelkajn amaventurojn kaj li infektis kelkajn kirgizinojn per venera malsano.

Al Ĝalal Arek oni alveturigis multe da vestaĵoj. Ne temis pri ĉemizoj aŭ aliaj kapitalistaj luksaĵoj. Troviĝis ĉ. ducent ŝafpeltaj jakoj, kelkaj peltaj ĉapoĵoj kaj multe da feltbotoj. Laŭkutime estis favorataj la "stafanovanoj", laŭ rekomendo de Ferĉenko. Por jako oni devis pagi kelkcent rublojn, sed pago laŭ la ŝtata oficiala prezo estis traktata kiel ricevo senpaga, cetere la pago estis deprenita de nia ĉiumonata enspezo kaj tion oni ne traktis kiel pagon.

En la lumo de du flametoj venantaj de petrollampetoj, faritaj el konservajaj skatoloj, okazis en la kaverna magazeno "disdonado" de la vestaĵoj. Iuj provis ŝteli ion dum la ricevo de siaj vestoj. Post tiu provo Kolao aŭ Nikolao, la magazinadministranto, fermis la pordon kaj enlasis al si nur po du homojn. Pro tio la "disdonado" okazis tre malrapide.

Fine, post noktomezo, mi sukcesis ricevi feltbotojn por miaj piedoj. Por ricevi peltan jakon miaj ĉiutagaj laborrezultoj devus superi la fiksitajn normojn.

Intertempe estis reduktitaj niaj ĉiutagaj panporcioj de okcent gramoj al sescent gramoj. Pro la malpliigo de niaj panporcioj plialtiĝis la prezoj en la "libera komercado". Kilogramo da pano kostis cent rublojn. Kilogramo da faruno kostis cent dudek rublojn. Por mezurilo da faruno oni poste pagis tridek rublojn. La manĝaĵo de la kuirejo konstante pli akvumiĝis. Ĉiutage mortis en la kolonio du aŭ tri homoj.

Ferĉenko kaj la kolonia ĉefo havis aliajn zorgojn - la kirgizoj forkuris. Ĉiumatene oni rimarkis, ke dumnokte malaperis kelkaj homoj kaj la forkurado intensiĝis. Forkuris kompletaj brigadoj kune kun la brigadistoj.

Azamatov, kiu venis kiel "helppolitruko" al Ferĉenko, estis komisiita havi la kontrolon super la barakgardistoj. Dumnokte li iris de barako al barako kaj kontrolis, ke la

gardistoj ne dormu. La gardistoj devis atenti, ĉu la elirintoj al la necesejo revenis ; se ili ne revenis, tuj raporti pri tio al Azamatov. Tamen multaj kirgizoj sukcesis en la nokta mallumo foriri de la kolonio.

Azamatov estis de la kirgizoj eĉ insultata. La kirgizoj eĉ konsilis al ni esti singardemaj al Azamatov kaj ili ĉiam aldonis : "Azamatov jaman adam" (Azamatov malbona homo).

Iun vesperon ni rimarkis, ke Ĝalal Arek estas sieĝata de armitaj soldatoj. Ankaŭ ĉe ĉiu baraka enirejo staris du soldatoj. Kelkaj soldatoj venis en la barakon kaj strikte kontrolis ĉiujn. Komence ni pensis, ke la kontrolo okazas por konstati, kiu forkuris, sed absolute ne. La barakoj en Ĝalal Arek estis nestoj por kirgizaj militdizertintoj kaj kelkaj tiaj estis trovitaj. Dumtage ili vagadis en la ĉirkaŭaĵo kaj dumnokte ili havis en la barakoj siajn dormejojn.

Por bremsi la amasan forkuradon Azamatov organizis multipersonan gardistaron, kiu disponis eĉ kelkajn fuzilojn kaj ricevis nutraĵon kiel "stafanovanoj" - tio estis la plej alloga rimedo por ĉiuj laboroj.

En la printempa pluvo kaj en la malsekeco de la degelinta neĝo miaj feltbotoj tre detruigis. La akvo en ilin trafluis kaj estis kvazaŭ mi estus sen io ajn sur la piedoj. Nek Ferĉenko, nek la kolonia ĉefo volis pri tio scii, ankaŭ ne la fanatika kirgiza brigadisto. Mi devis suferi ĝis iom post iom venis la varmaj kaj sekaj tagoj.

En marto oni sciigis al ni, ke la Asocio de Polaj Patriotoj organizos la polojn laborantajn ĉe la konstruado de la fervojo kaj ni ricevos helpon de APP. Rezulte de kelksemajna organizado oni informis nin, ke iun dimanĉon ĉiuj anoj de APP havos kunvenon en Kiz Kijao, tie ni post la kunveno ankaŭ ricevos nutraĵojn.

La printempa vetero en tiu regiono estas pluvema kaj de la montaro blovas akraj ventoj. En tia vetero ne povas esti agrable fari kelkkilometrajn promenadojn, sed kunveno de APP estis por ni la lumanta radieto de kie eble venos la helpo, kiu nin gvidos el Sovetunio. Ni

decidis iri tien.

En Kiz Kijao ni jam renkontis en granda ĉambro aliajn alvenintojn. Entute ni devis esti ĉ. cent kvindek homoj, sed de la malproksimaj lokoj ne ĉiuj venis.

Sur unu el la tabloj jam kuŝis la "produktoj" envolvitaj en pintsaketoj el papero el libraj duonfolioj. Kio troviĝis en tiuj paperetoj, ni ekscios poste, kiam ni estos ricevintaj ilin. La kvanto envolvita en tiuj paperetoj aspektis kiel de apoteko tre forta medikamenta pulvoro, sed... tio estis produktoj "altkvalitaj".

La kunvenon malfermis civitano L. Li devenis de iu urbo en Silezio. En Polio li estis oficisto kaj same en Sovetunio. Laŭ onidiroj li estis antaŭ la milito aktiva komunisto kaj ankaŭ apartenis al ia partia instanco. Pri sia pasinteco ĝenerale kaj en Sovetunio, antaŭ ol li estis mobilizita por la fervoja konstruado, li nenion rakontis.

L. estis inteligenta homo kaj lerta organizanto. Ĉio en liaj paroladoj estis klare esprimita kaj sendepende de la enhavo ankaŭ interesa. Aŭdante paroli civitanon L. oficiale, oni povus opinii, ke li estas ardanima bolŝeviko. En privataj interparoloj L. estis pli sincera, spite sian singardemon, li ne kaŝis sian kontraŭbolŝevisman. Pro sia opinio, en la loka APP-estraro li estis multe kritikata kaj eĉ iom ĉikanata. Por APP li tamen estis bezonata pro sia laboremo kaj pro siaj organizkapabloj.

En mallonga parolado civitano L. kiel kutime laŭdis la sovetunian registaron pro ĝiaj bonfaroj kaj komprenemo al ni, rifuĝintoj, ĝis tia grado, ke ĝi konsentis al ni la azilrajton. (Tio estis kontraŭ la vero. La sovetunia registaro devigis nin akceptis la sovetan civitanecon.)

Post la parolado L. informis, ke la produkthelpo, baldaŭ ricevota, estas nur la komenco de tiuspeca helpo kaj en estonteco ni ricevos multe pli.

Por la "produktoj" ni devis pagi po tri rublojn, ĉar estis faritaj elspezoj por du homoj, kiuj ien veturis por alvenigi la produktojn. Okazis ankaŭ eta disputo. Kelkaj postulis, ke la ricevo kaj la disdonado okazu sub kontrolo de delegitoj de la komunumoj. L. ne volis akcepti iun ajn kontrolon, klariginte, ke la APP-komitato konsistas el homoj, kiuj meritas la konfidon.

Paginte tri rublojn, ni ricevis ĉe la tablo la "produktojn" : cent gramojn da sukero, kvardek gramojn da pulvorigita lakto kaj dudek gramojn da teo. La sekigita lakto estis tro alloga frandaĵo, por ke ni konservu ĝin ĝis ni estos "hejme". Preskaŭ ĉiuj ĝin formangis surloke.

* *
* *

Somere de la jaro 1944, ni, la restaĵo de la granda amaso en Ĝalal Arek dum la vintro, vivis trankvile. Vere, la manĝaĵo ne estis sufiĉa, ni plu dormis sur la plankoj, sen matracoj, somere ne mankis en la barakoj la plago de cimoj kaj puloj, kvazaŭ aldono al la pedikoj, tamen de niaj ĉefoj ni estis respektataj kaj traktataj kiel fide-laj homoj, kiuj ne forkuris, sed restis surloke plenumi la taskon de la socialista ŝtato, - konstrui la fervojon.

La sukcesojn en la konstruado dum tiu tempo oni povis oble noti nur en la raportoj. Entute ni estis tiam iom pli ol cent homoj. La oficistaro konsistis el ĉ. dekkvin, de diversaj karakteroj, ĉ. dudeko estis gardistoj, kelkaj kuiristoj, kelkaj devis ĉiutage iri en la montaron kolekti arbustojn por hejtigi en la kuirejo, kelkaj estis ĉiutage malsanaj, la ceteraj iris al la laborvojo per ŝpatoj kaj manpuŝataj ĉarumoj forigi la gigantajn montojn kaj per la montara tero plenigi profundajn valojn.

Komence de julio ni eksciis, ke grupo da homoj estas sendota ien por alveturigi ŝpalojn. Kelkaj estis elektitaj por tiu vojaĝo, ankaŭ ni. Simile al nia grupo oni elektis homojn en la najbaraj kolonioj - Kiz Kijao, Mertva Petlo kaj Krasni Most (Ruĝa Ponto). La definitiva formado de la grupo okazis en Bistrovko. Kune ni estis dudek sep laboristoj, unu brigadisto kaj unu gvidanto.

Dum la formado de la grupo oni evitis la kirgizojn, ĉar estonte survoje ili profitus la okazon por eskapi hejmen. Du rusoj troviĝis inter ni, krom la brigadisto kaj la gvidanto. Ĝis la vagonaro estis formita ni vagadis kelkajn tagojn en Bistrovko.

Laŭ la praktiko ĉe ĉiuj "komandirovkoj" (portaskaj homsendaĵoj) ni devis ricevi iom da mono kaj laŭ kutimo estis en la ordonoj de la superaj instancoj menciite, ke la senditaj homoj estu bonorde vestitaj, t.s. en ŝuoj,

ĉemizoj, bonaj pantalonoj kaj vatojakoĵoj. Sed en Sovet-unio estas pli facile tiajn ordonojn skribi ol plenumi.

Neniu el ni ricevis ŝuojn, sed eron de vestaĵo ĉiu ricevis. Mi ricevis ĉemizon kaj mi ĝin baldaŭ vendis. Pli grave ja estis iom da manĝaĵo ol ĉemizo dum somero en varma lando. Ankaŭ la ceteraj vendis la ricevitajn vestaĵojn.

Fine alvenis la platforma vagonaro kaj oni komencis definitive prepari nian forveturon. Por la homoj estis disponigita malgranda pasaĝera vagono, sed ni havis en ĝi sufiĉe da loko por ĉiuj.

Jen leviĝis problemo pri la pano. Normale ni ricevis po sescent gramojn da pano tage, sed laŭleĝe devis veturantoj ricevi nur po kvincent gramojn. Laŭ kalendaro ni estis en la mezo de la monato. Se ni ŝanĝos niajn kuponojn al dumvojaĝaj kuponoj, ni perdos ĝis fino de la monato unu kaj duonon de kilogramo da pano, t.e. granda perdo. Ni sukcesis pri tio konvinki niajn ĉefojn. Ili ordonis, ke ni ricevu per niaj kuponoj panon ĝis la monatfino. Ni sciis, ke la panon ni formanĝos en unu semajno kaj poste devos iom malsati, sed perdi iom da pano ni ne volis. Ĉiu el ni ricevis ankaŭ ducent rublojn. Provizore ni kredis per tiu veturo havi bonan aferon.

Ruliĝis nia trajno tage kaj nokte sur la senfinaj reloj. Ni traveturis staciojn grandajn kaj malgrandajn, mistere aspektantajn montegojn kaj neinteresajn ebenaĵojn. La vetero estis preskaŭ seninterrompe belega, eĉ ne nubeto sur la firmamento estis videbla kaj ĉefe ni estis sataj.

Ĉe la stacioj, kie la vagonaro haltis, ni ĉiam havis eblon aĉeti ian bongustaĵon per kelkaj rubloj. Pli ol ĉio bongustis al ni rostitaj fiŝoj, vendataj en multaj stacioj de Kazahio. Fiŝo pezanta ĉ. duonon de kilogramo kostis dekdek kvin rublojn. Ni opiniis, ke tio estas nemultekosta, kvankam tiu mono estis tuttaga laborista salaĵo. En iuj stacioj estis vendataj iaj laktaĵoj, el lakto kuirita iom longe ĝis ĝi dikiĝis, almenaŭ diris tion la vendistinoj. Multe da konfido al la asertoj de la vendistinoj ni ne havis - la pecoj estis tro malmultekostaj, por ke ili konsistu el nura lakto, almenaŭ iom da lakto en tio troviĝis. Ofte en Kazahio estas vendata kazeo, laŭ asertoj de la

vendistinoj, el ŝafa lakto. Por ni ja estis indiferente el kio ia manĝaĵo estis preparita.

En la naŭa tago de nia veturado la lokomotivistoj diris, ke ni jam estas en la regiono de Semipalatinsko. Nia senzorga vivo proksimiĝis al sia fino. Ankaŭ la kelkcent rubloj elruliĝis el niaj poŝoj kaj ni kalkulis kiom da ĉervoncoj ni havas (ĉervonco estas dekrubla bileto). Pri malpli ol ĉervonco ne valoris paroli. La loko, kien ni devis veturi, Ĵana Semejo, situas kelkajn kilometrojn de la granda urbo Semipalatinsko.

La 23an de julio ĉ. tagmezo nia trajno enveturis sur la vastan terenon de la fabriko. Tie ni devis atendi ĝis ŝpaloj estos ŝarĝitaj sur la platformaj vagonoj de nia trajno. Nia nutraĵprovizo estis la lastaj pecoj da pano kaj nia monposedaĵo la lastaj rubloj en la poŝo. Denove estis por ni la konstanta problemo en Sovetunio, kion ni manĝos en la sekvontaj tagoj, ĝis ni ricevos la pankuponojn por la nova monato.

Ĵana Semejo estis ne granda urbo, sed en ĝi troviĝis kelkaj grandaj fabrikoj. Unu el ili zorgis pri impregnado de ŝpaloj - al tiu ni iris. La ŝpal-impregnado okazis mekanike kaj en tiu fabriko laboris malmulte da homoj. Multe da laboro troviĝis sur la granda tereno de la fabriko, kunmeti diversajn lignaĵojn kuŝantajn ĉiam en malordo. Salajroj en tiu fabriko estis malaltaj. En ĝi ne laboris rusoj, ili certe uzis ĉiujn eblajn formalaĵojn por ne labori tie. Estis nur kelkaj ĉeĉenoj, kiuj estis forsenditaj de siaj hejmoj en Kaŭkazio fare de NKVD. Nemulte pli bonaj salajroj estis en la tekstil-fabriko, ankaŭ tie laboris multe da ĉeĉenoj.

Laboro en la muelejo havis la avantaĝon, ke eblis ŝtelelporti iom da faruno. Al la laboristoj "aristokratoj" apartenis tiuj de la viandkonservaĵa fabriko. Spite la striktan gardadon, tie eblis havigi al si dum la laboro ian viandaĵon. Tie oni ankaŭ vendis al la laboristoj "viandproduktojn" - diversajn internaĵojn de la bestoj, i.a. ankaŭ ostojn, el kiuj ili povis hejme kuiri viandajn supojn. La fabriko ankaŭ liveris por la urba "libera merkato" sangkolbasojn kaj hepataĵon, kiu estis kiel grio, verŝajne estis el ĝi eltirita la graso. Tiuaj produktoj, en ia senco viandaj, estis sur la bazaro laŭ la sovetiaj

cirkonstancoj, malmultekostaj. Granda peco da kolbaso aŭ kelkcent gramoj da hepataĵo kostis tri rublojn, sed ni venis al la fabrika tereno kaj ne sciis pri tiuj aferoj aĉetebraj malmultekoste en Ĵana Semejo.

En la vespero de nia alveno sur la fabrikan terenon ni eksciis, ke la grupoj estos al la dispono por nia vagonaro nur post unu monato. Poste daŭros kelkajn tagojn la ŝarĝado; ĝis tiam ni devos resti en Ĵana Semejo. Al la sovetunia mastrumado ni jam estis alkiutimiĝintaj kaj indiferentaj.

La venontan matenon al ni sciigis nia rusa mastro, ke li kontraktigis nin al la mastroj de la fabriko. "Vi laboros sur la placo ĝis la traboj estos ŝarĝitaj sur niaj vagonoj. Je la oka matene vi estu pretaj al la laboro sub la kontrolo de nia brigadisto", klarigis al ni mastro Orlov. Ni demandis: "Kiel statas la afero, ke ni ricevu panon?". Lia respondo estis la kutima en Sovetunio: "Mi faros kion eblos fari, ke vi ricevu panon". Ni jam havis la sperton, ke de tiaj respondoj, nenion promesantaj, oni ne atendu ion pozitivan. Cetere, ankaŭ formale, "laŭleĝe", niaj mastroj neniel povis al ni helpi, ĉar ni la ricevitajn panon tro rapide formangiĝis. Ni ekklopodis pri afero pli reala en tiaj cirkonstancoj. Ni sciis, ke en la urbo Semipalatinsko troviĝis la gubernia oficejo de APP kaj multe da samlandanoj, inter ili troviĝis "bonhavaj", kompreneble tiuj, kiuj havis spekul-komercajn kapablojn. Ni komprenis, ke ĉe niaj samlandanoj ni ricevos "ion" por niaj stomakoj kaj ni pri tio ne eraris.

Pro formo, ni petis ĉe nia mastro permeson iri al la urbo sin anonci en APP, klarigante, ke tio estas nia formala devo. Nia mastro sendube komprenis nian trompon pri la "oficiala devo". Li permesis al ni resti en la urbo ĝis tagmezo, tiun limigon li certe faris pro sia "oficiala devo".

En APP ni ricevis po paketon da supo pulvorigita el vegetaĵoj - ĉirkaŭ duono da kilogramo. Tiu supo estis delikataĵo, ĝi devenis de la usonaj helpsendoj. Ni vendis la supon sur la bazaro je "alta prezo" kaj per la mono aĉetis multe da elsanga kolbaso. Ni tamen ne havis la

emon labori, ĝis ni ricevos panon, t.s. post unu semajno, komence de la nova monato.

Ĉiumatene venis en la vagonon la mastro memoriĝi nin, ke ni iru al la laboro. Komenciĝis tiam intertraktado. Ni postulis panon. Li respondis : "Vi ja panon jam ricevis.

- Nu jes, ni ricevis, sed ni ja ĝin formanĝis."

La mastro poste parolis al nia konscienco. "Kial vi volas vivi kiel parazitoj, kiam aliaj homoj laboras ?"

Ankaŭ ni parolis al lia konscienco : "Kiel vi povas postuli, ke homoj ne havantan panon faru fizike streĉan laboron ?"

Kiam el la "moralalvokoj" nenio rezultis, komenciĝis la reciproka minacado. "Mi raportos pri vi al la prokuroro. Vi rifuzas labori en Sovetunio dum la milito. Vi per tio sabotadas la landan ekonomion."

Ni uzis la saman argumenton : "Ni raportos pri vi al la prokuroro. Vi volas en Sovetunio devigi malsatajn homojn al laboro. Prizorgi por ni panon vi rifuzas, sed al laboro vi nin pelas, por ke ni mortu. Per tio vi volas malmultigi la laboristojn necesajn por la landa ekonomio, precipe nun dum la milito". Fakte ambaŭ flankoj, ni kaj li, sciis, ke neniu al la prokuroro raportos ion ajn, ni nur okazigis la kutiman sovetunian kontestadon.

Orlov jam evitis menciin, ke ni ricevis panon en Bistrovko. Ni havis kontraŭ li fortan riproĉargumenton. Antaŭ la forveturo li ricevis kelkajn litrojn da petrolo en sitelo por lumigi la vagonon. Ĉar la tagoj estis longaj, ne necesis dum la veturado lumigi en la vagono. En iu stacio Orlov vendis la petrolon kun la sitelo. Kiam li ricevis por la petrolo ni ne sciis, sed ni kredis, kelkcent rublojn. Kiam Orlov diris, ke ni panon ricevis en Bistrovko, ni postulis, ke li dividu inter ĉiuj la monon, kiun li ricevis per la petrolo. La petrolo estis por ni ĉiuj kaj li ne rajtis vendi ĝin, ne demandinte nin, kaj ne konvenis, ke sovetunia oficisto faru spekulantan komercadon. Tiel daŭris ĉiumatene la disputado ĝis tede.

Kiam ĉesis la kvereloj kun Orlov, ni interparolis en nia lingvo, ke fakte impresas malbone, ke ni rifuzas labori kaj estus pli oportune, se ni iom laborus, almenaŭ ĝis tagmezo.

"Kamarado Orlov ! Ni iras al la laboro !". Apenaŭ komencis ni malsupreniĝi de la etaĝaj benkoj, findecidinte por labori, kiam aŭdiĝis iu insultanta "ilin" per la plej vulgaraj vortoj. Eksplozo kaj konkludo de la insultinto estis : "Se ili donos al mi panon, mi laboros, alie ne ". Baldaŭ venis respondo de alia : "Se li ne volas labori, kial mi do laboru ?" Denove ni ekdisputis : ĉu labori aŭ ne labori ? Orlov staris dume kiel stultigita, li ja ne komprenis, pri kio ni diskutas.

Ĉirkaŭ la deka, ni elŝoviĝis el la vagono por labori. Ĉu labori ? Tio estis nur laŭ nomo. Nia unua okupo sur la placo estis fumado kaj babilado. Tiuj tagoj estis por ni speciale ĝojigaj. La rusa kaj la pola armeo formita en Sovetunio okupadis teritoriojn, kie situas polaj urboj, kies nomojn ni konas, kie iuj inter ni lasis siajn parencojn, amikojn, kaj kun kiuj ni do estas ligitaj. Ni atendis ĉiutage la gazeton, kiun la brigadisto alportis kaj laŭtleĝis en nia grupo sur la placo, dum laborpaŭzoj.

Ĉirkaŭ la dekunua ni iom laboris, kunmetis ŝtipojn kuŝantajn en malordo. Nia laborado daŭris maksimume unu horon, por iom pli ni nek emon nek forton havis. Je la dekdua estis paŭzo por tagmanĝo. Ankaŭ ni rajtis ricevi tagmanĝon en la fabrika restoracio - po unu aŭ du porciojn da supo kuirita el urtiko aŭ aliaj folioj. Krom iomete da foliaĵoj kaj akvo tiuj supoj nenion enhavis. Ekzistis ankaŭ "staŝanovanaj" porcioj, plejofte el tri kuleroj da grio. Surprizo por ni estis, ke ankaŭ por nia grupo estis ĉiutage disponigitaj kelkaj "staŝanovanaj" porcioj. Ni ilin donis ĉiutage al aliaj kamaradoj.

Post la tagmanĝo neniu inter ni eĉ pensis pri laboro. Iuj iris al la urbo aĉeti iom da hepataĵo aŭ da elsanga kolbaso, iuj klopodis iel enspezi kelkajn rublojn. Al kelkaj venis manio sin bani ĉiutage en la fabrika banejo. Ankaŭ Orlov kaj la brigadisto ĉiam post tagmezo malaperis kaj neblis trovi ilin.

Intertempe komenciĝis la nova monato. Ni ricevis la monatajn manĝkuponojn sed la labortagajn okupojn ni okazigis laŭ la antaŭa maniero.

Post preskaŭ dumonata restado for de la "hejmo", ni revenis, vere ne pli riĉaj, eble ne pli spertaj. Ni supozis, ke ni devos repagi iom da mono el la ricevitaj ducent rubloj, kiujn ni ricevis en Bistrovko antaŭ la forveturo, ĉar en Jana Semejo ni ja malmulte laboris. Sed post la prikalkulo de la de ni farita laboro, ni ricevis ankoraŭ cent dek rublojn.

* *
*

En Ĝalal Arek kaj ceteraj kolonioj komenciĝis ega aktiveco. Devos veni novvarbitaj laboristoj. Tiufoje ili estos mobilizitaj fare de la civilaj instancoj, "masovi viĥod". Ekvenis plejparte maljunuloj, viroj kaj virinoj, el diversaj kolĥozoj en Kirgizio. Nur kelkaj el iliaj gvidantoj estis rusoj, la amaso konsistis el kirgizoj aŭ uzbekoj. Formale ili venis labori nur unu monaton, sed en la kontoro oni havis alian opinion pri la daŭro de ilia restado.

Inter la gvidantoj troviĝis kelkaj oficiroj, invalidoj de la milito. Tiuj rusaj "politrukoj" ankaŭ opiniis sin mastroj. Kvankam ili faris civilan servon, ili ŝatis daŭrigi la soldatajn, pli ĝuste, la oficirajn kutimojn. La kontoro estis de ili nomata "la stabejo". Ilia ĝenerala konduto estis aroganta. Unu el tiuj oficiroj, kapitano, kondutis pli arogante ol siaj kolegoj. La kialo de lia aroganteco : li militservis en taĉmento nomita "gvardio", li do estis gvardiano. Kio diferencis la gvardianojn de aliaj soldatoj mi ne sciis.

La ĉefo de la kolonio, verŝajne por eviti malagrablajojn en la rilatoj kun la "gvardiana kapitano", deklaris lin "ĉefo de la stabejo". Pri la laboro tiu "stabejestro" havis nenian komprenon, li eĉ ne interesiĝis pri ĝi, gravis por li estis "ĉefo de la stabejo".

Mi, traktate kiel unu el la malnovaj kaj "fidelaj" laboristoj, estis je la dispo de la kolonia komando Azamalov, tataro laŭdevene. Dum la revolucio li estis en la "ruĝa armeo" kaj havis la rangon de kolonelo. Se li daŭrigus la karieron en la armeo, li estus dum la dua mondmilito marŝalo. Sed okazis al li ia serioza afero, pri kiu li ne volis rakonti. Li estis forigita el la partio kaj el la armeo.

Unu el la ĉefaj taskoj por la komandanto estis "prepari la banejon". Krome, li devis zorgi, ke estu hejtmaterialo por la kuirejo ; atenti, ke la plankoj en la barakoj estu balaitaj, same ankaŭ en la kontoro ; atenti, ke la konstruaĵoj estu en bona stato ; li havis ankaŭ aliajn similajn taskojn. En la rilatoj kun siaj ĉefoj Azamalov ĉiam ŝajnis obeema. Praktike li neniam penis, ke iliaj ordonoj estu plenumitaj. Li havis la sperton de soveta civitano kaj de sperta soldato ne trakti strikte ordonojn de superaj instancoj. Per delikata maniero li inspiris la homojn laborantajn sub lia kontrolo ne streĉiĝi dum la plenumo de la taskoj komisiitaj al ili.

En interparoloj kun mi li delikate esprimis sian ne tro fortan entuziasmon por la sovetunia sociordo.

Kvankam ĉirkaŭ sesdekjara, li tamen prizorgis por si rusan vivkunulino, kiu laŭ sia aĝo aspektis kiel lia plej juna filino. Krom sia juneco, ŝi posedis ankaŭ la ecojn, kiujn atentis la viraj okuloj. Azamalov ankaŭ ŝatis forigi siajn zorgojn per iom da ebrigaĵo. Ĝenerale li apartenis al la homoj kapablaj rezisti la sekvojn de drinkado, tamen okazis, ke brando regis lin.

Pli ol ĉiuj ekscitis la malsobremojn de Azamalov la edzino Nina. Dume ankaŭ ŝi faris ĉion eblan por havigi al si iom da trinkaĵo por forigi siajn zorgojn. Sed Nina ne sukcesis en tiaj penoj, kiel Azamalov. Se Nina tamen sukcesis sin ebrigi, ŝi baldaŭ vizitis la konatojn, precipe la konatinojn unu post la alia kaj insultis la virojn, dirante, ke "la intenco de ĉiu viro estas stultigi la virinojn, kaj neniu viro meritas la respekton de la virinoj". Nina tamen ne apartenis al virinoj, kiuj lasas sin stultigi. Dum sia parolo ŝi uzadis vulgaraĵojn esprimajn, kiuj superis eĉ la nedelikatajn esprimmanierojn de viroj. Kompreneble, ŝi vivis kun Azamalov ne pro amspiroj al li. Kiel edzino de la komandanto ŝi havis almenaŭ sufiĉe da pano, iom pli da sukero kaj iom pli da graso ol kelkaj aliaj knabinoj en Ĝalal Arek. Azamalov ankaŭ prizorgis por ŝi laboron en la zono kaj ŝi ne devis iri al la foslaboroj. Ŝi ne devis loĝi en la virina parto de la granda barako. Azamalov aranĝis ĉambregon en unu el

la baraketoj, nur por ili ambaŭ. En la tiamaj cirkons-tancoj ĝi estis "luksa" loĝejo.

Malgraŭ la "luksa" vivo, kiun Nina havis ĉe Azamalov, ne povis esti por ŝi indiferente, ke la edzo estas pli ol duoble pli aĝa ol ŝi. Kvereloj inter ili okazis precipe kiam Azamalov "trinkis" iomete pli ol li devus trinki. Tiam li batis ŝin eĉ en la ĉeesto de aliaj homoj kaj diris : "Oni devas subordiĝi al la sovetuniaj instancoj". Per tiu frazo Azamalov nur ripetis la vortojn de diversaj sovetuniaj mastroj kaj mastretoj.

Al miaj labortaskoj ĉe Azamalov apartenis labori en la banejo, t.e. la plej "respondeca" laboro interne de la zono. La banejo estis aranĝita primitive. En unu ĉambrego, sen iu ajn benko, la homoj devis senvestiĝi kaj pendigi siajn vestaĵojn sur ringo el dika drato. Tiu ringo kun la vestaĵoj estis enpendigita en malluma ĉambreto, la desinfekta kamero, kun temperaturo ĝis okdek gradoj. Por akiri tian altan temperaturon necesis hejti per arbustoj minimume unu tagnokton. La lavĉambro : en iu angulo troviĝis la malfermita kaldrono kun la varma akvo. Tiu varma akvo estis porciigita, ĉiu ricevis duonon da sitelo el tiu "luksaĵo". La malvarma akvo ne estis limigita. La sapo dum tiu tempo estis nur por la armeo. Nur unu fojon en kelkaj monatoj ni ricevis po kvarcent gramojn da mola sapo, neniel tiu kvanto povis sufiĉi por kelkaj monatoj. Tamen la homoj sin lavis. Pro la amasa komunloĝado en la grandaj barakoj, en kiuj pureco kaj higiena zorgado de la homoj pri si estis bedaŭrinda, eĉ tia banejo estis grava ŝirmilo kontraŭ epidemioj.

En la banejo la mastrino estis Nina. Ŝia ĉefa laboro estis enpendigi la vestaĵojn en la kameron. La vestaĵoj de ĉiu kirgizo pezis 5-10 kilogramojn, kaj, se Nina devis dum la tago enpendigi vestaĵojn de kvincent kirgizoj, ŝi devis levi sume kelkajn tunojn ĉe arda temperaturo. Estis kompreneble, ke ŝi dum la laboro estis ĉiam kolerema kaj ĉion insultis.

Al miaj taskoj apartenis hejtado por la desinfekta kamero, hejtado sub la kaldrono por la varma akvo, doni la akvon, gardi, ke neniu "ŝtelu" iom da varma akvo, kaj elpreni la vestaĵojn el la kamero, kiam ili estis

"pretaj". Mi havis ankaŭ aliajn "gardotaskojn". Ĉe la kirgizoj kaj uzbekoj ekzistas kutimo aŭ eble religia devo forigi la harojn ĉirkaŭ la seksorgano. Ili uzis por forigi la harojn poŝtranĉilojn akiritajn kiel raziloj. Plejofte ili ŝatis tion fari en la banejo, antaŭ aŭ post sia lavado. Laŭ ordono de miaj mastroj, mi devis atenti, ke ili la harojn ne forrazu en la lavĉambro nek en la proksimeco de la banejo. Sed gardi kvindek homojn samtempe en diversaj anguloj estis ekster miaj ebloj.

Klopodojn mi havis kun la kirgizinoj, almenaŭ en la komenco de niaj renkontoj en la banejo. Kiam ili venis la unuan fojon en la lavĉambro kaj vidis min, kelkaj el ili komencis krii en sia lingvo, kiun mi ne komprenis. Iuj postulis, ke mi eliru. Iuj el la ĉambro forkuris kaj iuj ne volis eniri antaŭ ol mi forlasos la ĉambron.

Viro povas certe havi plezuron esti inter kvindek nudaj virinoj, precipe eŭropano inter azianoj, sed en eleganta salono kaj kun inoj korpe allogaj. En la duonmalluma primitiva baneja lavĉambro de Galal Arek kun inoj, kiuj laŭ aspekto ja havis maturaĝajn nepojn, la afero ŝanĝis sian karakteron. Al la virinoj estis malpermesite sin kombi en la banejo kaj mi devis atenti, ke ili tion ne faru kaj tiam ili traktis min malbona homo. Iom post iom ili akceptis la fakton sin lavi nudaj en mia ĉeesto, sed mi absolute ne estis ravita de la vidaĵo.

* *
*

Inter la laboristoj de la "amasa Eliro" komenciĝis malkontenteco. Ili venis por unu monato, la monato forpasis kaj nenia signo ekzistis, ke ili estos liberigitaj al siaj hejmoj. Elĉerpiĝis la nutraĵprovizo kaj la mono, kiujn preskaŭ ĉiu el ili kunportis. Ili komencis iom malsati. Ili murmuris pri tio inter si kaj kun siaj kunvenintaj "politrukoj". Iom post iom ili komencis iri al la kontoro demandi, kiam ili estos liberigitaj. La kontoro respondis, ke ili ne plenumis la normon. La kolonia ĉefo kaj la kolonia "politruko" deklaris, ke ili faris nur dekkvin procentojn de la fiksitaj normoj farenantaj dum la monato. La kirgizoj kaj ties "politrukoj" nenion

povis kontroli. Fakte tiuj "politrukoj" dum la tuta monato pli interesiĝis havigi al si duonlitrojn da brando ol pri la laboro. Al la montoj kie okazis fosado ili preskaŭ neniam venis. La kirgizoj laboris ankoraŭ kelkajn semajnojn kaj de la kontoro venis la sama klarigo : la normo ne estas plenumita.

Fine komenciĝis konferencoj inter la kolĥozanoj kun iliaj reprezentantoj kaj kun la koloniaj mastroj. Rezulte, estis interkonsentite, ke ĉiu laboristo individue plenumu la labortaskon kaj ĉiu, kiu plenumos sian taskon, estos liberigita hejmen. Post kvar monatoj aro da homoj estis preta. Sed antaŭ la forveturo ĉiuj tiuj homoj devis sin bani kaj desinfektigi siajn vestaĵojn.

Jen troviĝis en la banejo kiel kutime kelkdek homoj, kies vestaĵoj pendis en la kamero kaj ili atendis nur ricevi ĵin kaj poste ricevi en la kontoro siajn dokumentojn, ke ili veturu hejmen. Multaj el ili certe sin sentis feliĉaj, ke fine ili revenos al siaj vilaĝoj. Nina staris ĉe la desinfekta kamero, babilante kun unu el siaj amikinoj. Kiel kutime ŝi de tempo al tempo enrigardis al la kamero tra la vitreto en la pordo. Subite ŝi ekkriis : "Brulas !..." Ŝi tuj malfermis la pordon de la kamero, tra kiu elpuŝiĝis flamoj en nubo de fumo. Sekvis krioj, ploro kaj paniko, ĉio konfuziĝis en ĥaoso. Kaptinte sitelon mi povis nur verŝi akvon el la barelo en la lavĉambro. Ankaŭ iu viro faris same kiel mi. La ceteraj nenion praktike povis fari, en la banejo troviĝis nur du siteloj.

Feliĉe ni sukcesis estingi la fajron en la kamero, antaŭ ĝia disvastiĝo en la konstruaĵon. Samtempe alkuris homoj el la barakoj kaj ankaŭ la ĉefoj. La plimulto el la vestaĵoj estis savita, sed kelkaj vestaĵoj estis preskaŭ komplete bruligitaj. Feliĉe la kirgizoj kompatis siajn kamaradojn, kies vestaĵoj bruliĝis, kaj donacis al ili iom da vestaĵaj eroj por kovri la korpojn.

Apenaŭ estis estingita la fajro, kaj la ĉefo de la kolonio ekakuzis Ninan, senĉese plorantan, ke ŝi per la fajro faris intencan saboton. Unu el la apudstarantoj diris al la ĉefo : "Via riproĉo estas ja absurdaĵo".

- "Mi eĉ pruvos, ke ŝi la brulon faris intence".

Ankaŭ la kapitano, "ĉefo de la stabejo", direktis

kontraŭ Ninan la saman akuzon. Li komencis demandesploron kvazaŭ specialisto, certa pri sia konvinko : "Kial vi bruligis la vestaĵojn ?", li demandis Ninan.

"Ne estas mia kulpo, hazarde okazis la brulo", respondis Nina.

"Ne ekzistas hazardaj okazaĵoj sen kaŭzoj ! Vi pri tio respondecas", finis la konversacion la kapitano kaj foriris.

Fakte, en la riproĉo de la kapitano temis pri io alia ol kelkaj bruligitaj vestaĵoj. En Sovetunio devas ĉio esti traktata laŭ la marksista principo, ke "ne ekzistas hazardaj okazaĵoj, sed ĉiuj okazaĵoj fontas de kaŭzoj, kiuj gvidis al certaj sociaj fenomenoj". La teorio pri kaŭzoj en la sociaj fenomenoj estas per primitiva rezonado aplikata ankaŭ al ĉiuspecaj okazaĵoj. Se okazis ia akcidento, ĝi ne okazis hazarde kaj iu devas respondeci, ĉar li aŭ ŝi ne zorgis, ke la akcidento ne okazu. Laŭ rakontoj pri similaj okazintaĵoj, tiu estas de la juĝinstancoj traktata laŭ du premisoj : konscia sabotado aŭ akcidento pro neglekto de la devoj. Praktike la juĝistoj ne klasifikas la krimon laŭ ĝia memstara karaktero, sed laŭ la ĝeneralaj enlandaj severaj aŭ malseveraj cirkons-tancoj en la tempo, kiam la juĝo okazas.

La ĉefoj timis, ke ili devos respondeci pro la brulo, volis sin asekuri kaj riproĉi la kulpon al Nina. Verŝajne la tuta brulakcidento estis prisilentita. Dum la milito NKVD ne havis tempon por tiaj ludaĵoj.

* *

Post la forveturo de la kolonoj restis por iom da tempo malmulte da laboristoj, nur laboristoj konstantaj. Ili okupiĝis nur pri laboroj en la kolonia zono. La laboro en la banejo okazis nur unu tagon en la semajno. Mi estis tiam sendita kiel helpanto al Miler. Li estis masonisto, unu el la konstruistoj de la barakoj. Miler estis kvazaŭ majstro, almenaŭ oni tiel lin nomis. Fakte, li estis ekde sia juneco ĝis la jaro 1932 aŭ 1933 kamparano, terkulturisto. Nacidevene li estis germano loĝinta ie en Ukrainjo. En Germanio li neniam estis. Dum la konstruado de la barakoj estis kun li ankoraŭ kelkaj germanoj. Poste liaj kole-

goj estis forsenditaj al aliaj kolonioj. Li estis lasita en Galal Arek por ĉiamaj riparoj de la barakoj. Dum la laboro ni iom amikiĝis. Li estis kontenta precipe, ke li povis paroli la germanan lingvon kun mi.

Iam, dum laborpaŭzo, Miler prenis ŝtoneton kaj diris al mi : "Rigardu P. ! " Li desegnis per la ŝtoneto kvarangulon sur la tero. En la granda kvarangulo li faris malgrandan kvarangulon kaj daŭrigis : "Ĉi tie mi havis kvar ĉevalojn". Li faris ankoraŭ kelkajn kvarangulojn. "Ĉi tie troviĝis granda fojnejo. Ĉi tie troviĝis kelkdek kokinoj, ĉi tie troviĝis la iloj por la terkulturado, ĉi tie troviĝis la grenejo, ĉi tie troviĝis kelkaj dekoj da ŝafoj, ĉi tie troviĝis mia loĝdometo, ĉi tie troviĝis kelkaj bovinoj. En la jaro 1933 el ĉio..." (en tiu momento li forviŝis sur la tero ĉiujn kvarangulojn) "mi estis pura ! pura !"

"Kio okazis ? ", mi demandis.

"Hm, kio okazis kun ĉio mi ne scias. Mi scias nur, ke venis al mi kelkaj miliciistoj akompane de kelkaj partuloj kaj ili diris, ke post du horoj mi estu preta forlasi "tiun domon". Ni rajtis preni kun ni havaĵon po dek ses kilogramojn por persono".

Miler partoprenis la sorton de centmiloj da "kulakoj" forsenditaj al malproksimaj regionoj. Tie li lernis ankaŭ konstrui por si loĝbarakojn. Post kelkjara restado en iu loko, Miler ricevis la permeson ĝin forlasi. De tiu tempo li vagadis kun sia edzino en diversaj partoj de la larĝa kaj longa imperio kaj antaŭ la milito li vivis en urbeto proksime de Frunze (Kirgizio). Dum la milito li estis mobilizita por konstrui tiun fervojon. Li posedis de la iama tempo libreton kun la psalmoj en la germana lingvo. Tiun libron li konstante havis kun si. Ofte li faris paŭzon dum la laboro, elprenis la psalmojn kaj ilin legadis kaj legadis. En la barako li ofte kuŝis sur sia dormloko kaj legis la psalmojn laŭte nur por si mem, kvankam post la multfoja legado li ja ĉiujn psalmojn devus havi en la memoro.

Somere de 1945 venis ankoraŭ unu fojon multe da homoj mobilizitaj de la militkomandejo. La plimulto ankaŭ tiun fojon estis maljunaj kirgizoj kaj ĉ. tridek mezaĝaj kir-

gizinoj. La komandon super la kirgizinoj havis uzbeko nomita Ŝaripov. La kirgizinoj loĝis en parto de granda barako, dividita per vando. En tiu barako Ŝaripov aranĝis por si apartan ĉambreton. Ĝi ne estis pli granda ol por la kuŝejo, pli da spaco li ne rajtis okupi. Kun kelkdek kirgizinoj li kondukis kiel en haremo. Ĉe si sur la kuŝejo li ĉiam havis du aŭ tri favoratinojn, malgraŭ ke li havis ie en Kirgizio familion. Al aliaj viroj Ŝaripov eĉ ne permesis veni tra la pordo de lia barako. Unu fojon, kiam mi devis ion ripari en la barako, Ŝaripov min gardis dum la tuta tempo, kiom daŭris la laboro. Tiu "haremo" tamen kostis al Ŝaripov la vivon. Dum la laboro falis sur lian kapon ŝtono kaj lin surloke mortigis. Inter la kirgizoj ne estis sekreto, ke la ŝtonon faligis unu el liaj konkurantoj. Pri tio certe sciis ankaŭ la ĉefoj, tamen neniam esplorado okazis pri lia sorto. - Tio ja ne estis ia kontraŭŝtata propagando.

En Galal Arek, same kiel en la ceteraj kolonioj, kie la plimulto vivis en mizero, troviĝis aro da homoj ĝuantaj bonan vivon. La elito konsistis el la ĉefo de la zono, la librovidisto, la "politruko", la nutraĵprizorganto kaj la butikadministranto. Al la pli malsupera grupo de la elito apartenis la laborgvidantoj, la administranto de la kuirejo. Poste sekvis aro da sekretarioj en la kontoro, kuiristoj kaj ĝis certa grado la komandanto. Tiuj ankoraŭ havis aron da konfiduloj, ĉar publike ili ne povis entrepreni la negocadon. La kuiristoj povis vendi nur etajn kvantojn da grio aŭ faruno kvazaŭ ŝparita de siaj porcioj.

Laŭŝajne la pli altaj elitanoj povis klarigi sian pli bonan ekonomion pro siaj salajroj, pli altaj ol la salajroj de la simplaj laboristoj. Sed tia klarigo estis trompo. Se la oficiala enspezo de tiuj elitanoj estis inter mil kaj dumil rubloj monate, kaj litro da brando kostis en la "libera merkato" cent-ducent rublojn, dum minimume du litrojn da brando ĉiumonate devis konsumi ĉiu superaklasa homo, tiam duono el lia salajro estis elspezita por brando. Kvankam iliaj nutraĵporcioj estis ĝenerale duoble pli grandaj ol la laboristaj, tamen ili ne sufiĉis por normala sinnutrado. Ili devis havi enspezojn oficiale nekonatajn.

La ĉefa, plej disvastigita komercado estis la panvendo laŭ la t.n. "libermerkataj prezoj". Unu kilogramo da pano kostis en tia "merkato" en la jaro 1943-44 ĉirkaŭ cent rublojn. La ĉefa liveranto de pankuponoj al tiu merkato estis la librogvidisto. Al liaj funkcioj apartenis ankaŭ disdonado de la nutraĵkuponoj. Parte liveris pankuponojn al la merkato la butika administranto pere de kelkaj al li konfidaj homoj. La kolonia ĉefo kaj la ceteraj plejaltaj elitanoj povis disponi aĵojn altvaloraĵajn, ĉefe vestaĵojn, kaj tiuj varoj estis senditaj al la bazaro per konfidencaj homoj.

Fine ankaŭ mi estis influita akiri iun tian enspezon. Iun tagon unu el la malsuperaj komercistoj proponis al mi jenan aferon : Li havas tricent poŝtkartojn, li vendos ilin al mi po unu rublon kaj mi povos ilin vendi al la kirgizoj po du aŭ tri rublojn. En la unua momento tiu afero ŝajnis al mi kiel fiksideo. La oficiala prezo de poŝtkarto estis dudek kopekoj ; estas vere, ke en la poŝtofacejo ĝi ne estas aĉetebla, sed neniu ja pagos ĉokoble pli ol ĝian oficialan prezon. R. estis tamen sperta negocisto. Kiam mi klarigis al li mian opinion, li diris, ke mi estas naivulo. Mi tiam memoris, ke en Arĥangelsko ankoraŭ antaŭ la milito mi ja mem pagis tri rublojn por poŝtkarto kaj mi estis kontenta, ke mi sukcesis ĝin akiri.

Vespere, kiam la kirgizoj revenis de la laboro, mi komencis vendi la kartojn. Komence la kirgizoj ne sciis por kia celo estas tiuj kartoj. En siaj vilaĝoj ili neniam korespondadis. Kiam ili venis al Ĝalal Arek, ili skribis leterojn sur pecoj de gazetoj, meze de la presitaj linioj kaj tion sendis hejmen, kie estis pagitaj la afrankokostoj. Al mi helpis en tiu vendado unu el iliaj brigadistoj, kirgizo, kiu scipovis la rusan lingvon kaj havis la scion de mezgrada lernejo. Li klarigis al la kirgizoj, ke tiu karto jam havas pagitan la poŝtmarkon kaj ĝin rekomendis aĉeti ankaŭ, ĉar ĝi aspektas "kulture". Iuj kirgizoj ĝin aĉetis nur pro ĝia aspekto.

Iun tagon diris al mi M. (unu el la "grandkomercistoj"), ke li volus kartludi kun kelkaj kirgizoj, sed ili ne povas akiri kartojn. En la malliberejo mi ja

estis kartofaristo. Mi proponis al li fari kartojn por la venonta vespero. Mi duonigis la poŝtkartojn kaj sur la flanko, kie estis presitaj markoj kaj strekoj, mi faris per ŝablono la necesajn vinjetojn. Kiel farbon mi uzis la kolorajn kraĵonojn, kiujn mi havis de la invalida hejmo.

Mia enspezo per tiuj kartoj estis pli bona ol mi supozis. Mia intenco estis vendi la kartojn por cent rubloj, tiom kostis unu kilogramo da pano. Sed mi estis naivulo en tiaj aferoj. Vespere mi estis vokita al la ĉambreto de la frizisto. Tien venis la ludemuloj kaj M. Ili klarigis al mi, ke mi ne vendu la kartojn, sed ricevu post ĉiu unufoja ludado tri rublojn, tia estis la kutimo. Post duhora ludado mi enkasigis sesdek rublojn kaj la kartoj restis ĉe mi. Poste tiuj kartludoj okazis dum tutaj noktoj en unu el la kirgizaj dometoj. Post ĉiu tutnokta ludado mi enkasigis inter tricent kaj kvarcent rublojn - iom pli ol ricevis laboristo por tutmonata laboro. Kiu gajnis kaj kiu malgajnis, min ne interesis. Matene, la ludintoj prenis de la kuracisto atestilon, ke ili estas malsanaj kaj liberigitaj de la laboro.

Miaj enspezoj per la kartoj baldaŭ kaŭzis avidon ĉe kelkaj homoj, kiuj pri tio eksciis. Du ŝuistoj de la ŝuriparejo komencis peni per ĉiuj rimedoj havigi al si fabrikitajn kartojn. Post kelkaj semajnoj unu el la ŝuistoj sukcesis aĉeti kartojn en Frunze, pagante mil kvincent rublojn. Mia konkuranto tamen ne havis grandan enspezon, ĉar tio, kio kostis al mi nur iomete da laboro, kostis al li mil kvincent rublojn. Post kelkaj semajnoj forpasis la intereso por la kartludado ĉe la ludantoj kaj mi perdis mian plej grandan enspezon dum mia kelkjara restado en la "laborista patrio".

* *
*

9_ realiĝo de la revoj

En la fruaj horoj de la oka de majo 1945, mi estis okupita ĉe la preparoj de la banejo. De tie mi ekrimarkis, ke la homoj reiras amase de la foslaboroj al la zono. Veninte al la zono, mi aŭdis, ke la milito estas finita. La ĉefo ricevis ordonon per telefono interrompi la laboron por tiu tago kaj aranĝi amasan kunvenon. Por la vespero estis aranĝita en Ĝalal Arek speciala kunveno por la poloj de ĉiuj kolonioj.

Esperoj, duboj, meditado pri la estonteco kaj pri la parencoj, proksimumoj kaj amikoj svarmis en mia menso. Kiamaniere komenci por akiri informojn pri mia edzino, mia frato kaj lia familio, kiu troviĝis sur la sovetunia teritorio antaŭ la milito inter Germanio kaj Sovetunio? Diskutoj kaj meditado okazis konstante en nia rondo, kiam estos eble forlasi Sovetunion.

De APP ĝis tiam neniam oficialaj informoj ekzistis, sed ni tamen kredis, ke ni al Polio reveturos. Poste ni spertis, ke tiu afero ne estis simpla, kaj daŭris pli ol unu jaro post la militfino ĝis la realiĝo.

Iun tagon oni kunvokis ĉ. tridek personojn en la kontoro de Ĝalal Arek, - inter ili ankaŭ mi. Tie oni informis nin, ke ni estas sendotaj al la grupo surmetanta la relojn. Tiujn grupojn oni traktis kiel laboristojn je pli alta ŝtupo. Ili estis pli bone pagataj kaj ricevis iom pli da manĝaĵo. Fakte tiu laboro estis nur plibonigo de la jam metita relvojo, ĉar por daŭrigi la relmetadon ne estis preta la grundo. Nia tro rapida espero pri pli bona salajro rapide forpasis. Por la unuaj ses labortagoj (ĝis la fino de la monato) ni

ricevis po 1-3 rublojn, iuj nenian pagon ricevis. Kiam ni plendis ĉe la kolonia ĉefo pri la "salajro", li klarigis al ni jene : "Fakte via salajro estis sufiĉe alta, sed vi ja devas ankaŭ pagi jenajn impostojn : imposton de la enspezo, imposton por la kulturaj bezonoj, imposton por la militelspezoj, pagi por la premiaj valorpape-roj, kiujn vi mem libervole kontraktis kaj kiujn vi jam ricevis. Kompreneble, post la dekalkulo de ĉiuj impostoj ne restis multe por vi." Kompreneble, laŭ la kalkulo de la librogvidisto ĉio estis en ordo kaj ni ne havis moti-von plendi pri io.

Kiam ni venis en la relmetanta grupo, ni transloĝiĝis de Ĝalal Arek al zono pli proksima de Bistrovko. En tiu kolonio la barakoj tiel ekstere kiel interne neniel dif-ferencis de la aliaj multnombraj barakoj, en kiuj mi loĝaĉis en Sovetunio. Vespere, kiam ni kuŝiĝis por ripo-zi kaj dormi, atakis nin amaso da cimoj. En Ĝalal Arek ni sukcesis forigi de ni la cimojn, ŝmirante la korpon per iom da petrolo. En la nova zono la cimoj estis indi-ferentaj al la odoro de la petrolo. Ne efikis eĉ kiam ni petrolumis la tabulojn, sur kiuj ni kuŝis. La nura eblo por dormi estis kuŝiĝi ekstere sub la firmamento.

Nia ĉefo tamen ne deziris, ke ni tranoktu ekstere, tio povos kaŭzi malvarmumon kaj tiam li ja ne havos homojn por la laboro. Li venigis de Bistrovko specialan skipon por ekstermi la cimojn. La venigitaj "specialis-toj" metis en la barakojn sulfuron, laŭlonge de la irejoj kaj ĝin ĉirkaŭigis per sablo por ke fajro de la sulfuro ne disvastiĝu.

Antaŭ ol bruligi la sulfuron, ili argilumis ekstere ĉiujn fendojn de la fenestretoj kaj de la pordo. Laŭ la rekomendo de tiuj "specialistoj" devis la barakoj esti hermetike fermitaj dum du tagnoktoj. La cimoj devis dum tiu tempo esti mortigitaj pro la venenaj gasoj de la sulfuro. Kiam la barakoj estis malfermitaj post la for-paso de la du tagnoktoj, ne estis eble resti tie eĉ dum kelkaj minutoj pro la sveniga fetoro. Pli ol unu semaj-non estis malfermitaj en la barakoj la fenestretoj kaj pordo por traventumi ilin. Koncerne la cimojn, - ili sukcesis travivi la gasojn kaj nin turmentadis poste

kiel antaŭe ĝis la vintro.

Kiam ni iun antaŭvesperon revenis de la laboro, ni vidis, ke sur la placo staras kelkaj tabloj kovritaj per ruĝaj tukoj kaj ĉirkaŭ ili staras benkoj. Estis preparita publika juĝado kaj la publiko estos ni. Antaŭe oni iam tiajn juĝadojn praktikis amase kaj organizis ilin pompe. Sur la urbaj placoj, en ĉeesto de granda publiko, estis juĝitaj diversaj "popolaj malamikoj", akuzitaj pri diversaj krimoj, precipe kun ekonomia karaktero pro "politikaj" motivoj. Tiaj juĝadoj havis la taskon kvazaŭ formi proksimiĝon inter la juĝistoj kaj la popolo, samtempe montri al la popolo la kulpulojn, kiuj bremsis penojn de la registaro por plibonigi la vivnivelon en la lando.

En komenco de la praktikado de tiuj juĝadoj ili estis sensaciaj, eble la popolo ilin traktis serioze kaj je ili kredis. Iom post iom tiuj juĝadoj okazis tre malofte. Do mi havis okazon ĉeesti tian spektaklon.

La spektaklo komenciĝis post nia vespermanĝo. La juĝistaro konsistis el la ĉefa juĝisto, kolonelo, - ruso ; la sekretariino ankaŭ en arma uniformo - rusino ; troviĝis ankaŭ prokuroro, sed ĉar la akuzito ne havis advokaton, do la prokuroro ne "rajtis" lin akuzi, almenaŭ li tion diris ; ĉe la juĝotablo sidis ankaŭ la "edukisto", kies tasko estis interpreti, ĉar la akuzito ne scipovis la rusan lingvon.

Al la juĝotablo akompanis la akuziton du soldatoj kun bajonetoj sur la karabenoj kaj la trio restis staranta dum la tuta tempo ĝis la fino de la juĝado.

La akuzito estis kolĥozano, iam mobilizita al la fervojkonstruo, de kie li fuĝis hejmen al sia vilaĝo, al sia familio. La akuzito estis kompleta analfabeto, eĉ ne scipovanta subskribi sian nomon.

Al la demando, kial li fuĝis, li klarigis : "Mi nur iris hejmen al mia familio por dimanĉo. En la kolĥozo min renkontis nia administranto kaj diris al mi : Nun ni havas multe da laboro en la kolĥozo kaj ni vin bezonas. Por la ŝtato ne estas diferenco, kie vi laboras, ĉu en la kolĥozo aŭ ĉe la fervoja konstruado. Ne iru reen al la fervoja konstruado, restu en la kolĥozo. Mi

faris kiel diris al mi nia administranto de la kolĥozo kaj mi laboris en la kolĥozo ĝis mi estis arestita. Ke mi malbone agis, laborante en la kolĥozo, mi ne sciis."

Kvankam la prokuroro rezignis la akuzon, lian taskon plenumis la "politruko" por la tuta fervoja konstruo inter Bistrovko kaj Ribaĉevo. La "politruko" estis ankaŭ kirgizo kaj verŝajne la akuzo estis lia devo. Per furioza voĉo li laŭtegis mallongan paroladon en kies lastaj frazoj li diris: "Mi ne povas konsideri pravigita la klarigon de la akuzito pri la administranto. Pri li ne respondecas la administranto, sed li respondecas por si mem: Li de la laboro fuĝis kaj devas pro tiu krimo esti punata". (Modela konkludo de partia reprezentanto, kiu devas defendi la laboristan klason).

Tiu hipokriteca ceremonio estis kompletigita per deklaro de la kolonelo: "Laŭ paragrafo... kaj paragrafo... mi sole ne rajtas juĝi, devas esti en la juĝista kolegio ankoraŭ juĝistoj komisiitaj de via anaro."

La "politruko" proponis kiel juĝistojn du brigadistojn kaj ni ilin akceptis unuanime. La juĝistoj foriris al sia interkonsulta kunsido kaj la prokuroro faris paroladon.

La prokuroro estis kirgizo. En sia parolado li priparolis la militajn okazintaĵojn kaj laŭdis la heroecojn de la rusa popolo en la bataloj kaj rezistoj kontraŭ la germanan naciismon kaj imperiismon. Poste li parolis pri la dua malamiko de Sovetunio, la samurajaj japanoj. Poste li alvokis al la ĉeestantaj ursoj, ke ili edukigu la kirgizojn laŭ sia ekzemplo. Same li alvokis la kirgizojn, ke ili lernu de siaj pli spertaj fratoj, - rusoj.

La konkludo de lia parolado estis, ke tiu nun okazanta juĝo estas honto por ambaŭ popoloj - la rusa kaj la kirgiza. Por la kirgiza, ĉar inter la samnacionoj troviĝis homo, kiu fuĝis. Por la rusa, ĉar la homoj de tiu popolo ne sufiĉe dediĉis sian influon por edukigi la kirgizojn inter kiuj ili vivas, por ke ne okazu tia fuĝo. "Ambaŭ vi estas morale respondecaj pri tiu homo, kiu hodiaŭ estos kondamnita."

Post la parolado de la prokuroro revenis la juĝistoj kaj la kolonelo laŭtegis la verdikton: "Laŭ paragrafo... parto... kaj paragrafo... n-ro..." sekvis aro da numeroj,

li menciis la nomon de la juĝito, "estas kondamnita je kvin jaroj da eduklaboro en unu el la koncentrejoj en Kirgizio aŭ ie alie, sur la teritorio de Sovetunio."

* *
*

Dormante iun nokton, mi aŭdis bruon, kriojn kaj kve-relojn. Kiam mi oscedis, mi aŭdis inter la krioj plejparte la voĉojn de Kokonov kaj Stepanoviĉ.

Kokonov estis kirgizo, unu el la ĉefaj brigadistoj kaj membro en la partio. Stepanoviĉ estis ruso, la "politruko" de la kolonio. Kokonov sidis sur sia kuŝejo en la duaetaĝa parto de la kuŝejoj. Lia vizaĝo estis vundita, sur ĝi fluetis sango. Sur la planko kun vizaĝo al li direktita staris Stepanoviĉ, kiu trankviligis lin per promesoj: "Ne timu, Kokonov. Ni ĉiam ĝis nun zorgis pri vi kaj tion ni faros ankaŭ plue. Mi persone ĉiam zorgis, ke vi Kokonov ricevu ĉion en la unua vico. Mi donos al vi ankoraŭ multe pli ol ĝis nun."

Kokonov tamen senĉese kriis kiel vundita besto, sed mi ne komprenis pri kio li krias, liaj krioj estis en la kirgiza lingvo.

En la sekvonta tago tiu afero klariĝis. En la malantaŭaj kulisoj, kaŭzintaj interbatalon ĉe la kirgizoj, troviĝis la "politruko" Stepanoviĉ kaj la edukisto Babajev. Stepanoviĉ estis ruso kaj Babajev estis kirgizo. La "politruka" posteno estas pli alta ol la edukista. La "politruko" decidas en ĉiuj aferoj de la kolonio, samgrade kiel la kolonia ĉefo, precipe pri la prizorgado de vestaĵoj kaj premioj. Kvankam la edukisto ricevas salajron pli altan ol tiu de laboristo, li ne rajtas pri io decidi kaj dependas de la "politruko". Praktike ambaŭ tiuj "oficistoj" faras nenian pozitivan laboron.

Babajev volis akiri la postenon de "politruko" kaj incitis la kirgizojn kontraŭ Stepanoviĉ, uzante iliajn naciajn sentojn. Sed ankaŭ Stepanoviĉ havis inter la kirgizoj siajn fidelulojn kaj li en tiu batalo uzis la sloganon de "kamarado Stalin pri la amikeco inter la popoloj en Sovetunio".

Fine la intrigoj inter ambaŭ parazitaj pri la loko

ĉe la trogo gvidis al batalo per pugnoj kaj tranĉiloj. Krom Kokonov estis vunditaj kelkaj kirgizoj. Babajev havis la kapon bandaĝita, verŝajne li rekte partoprenis en la batalo. Stepanoviĉ estis sen iu ajn vundo, li "batalis" kaj gajnis per la manoj de aliaj.

Ĉe la partia kunveno oni decidis forpreni de Babajev la edukistan postenon kaj sendi lin al laboro kiel simplan laboriston. Tiu decido tamen ne estis realigita. Kelkajn tagojn post tiu batalo Stepanoviĉ akiris ankoraŭ unu sukceson.

En la posttagmezaj horoj, ĉiuj brigadoj de la kolonio estis kunvokitaj por tre grava kunveno. Oni sciigis al ni, ke ni akiris "grandan venkon". La administrantaro de la fervoja konstruado havis standardon. Tiun standardon ricevis la kolonio, kiu atingis en la pasinta monato la plej grandan laborsukceson.

Pri la kolonio akirinta la standardon raportis la gazonetoj en Kirgizio kaj la ĉefoj ricevis specialajn premiojn. La laboristoj de tiu kolonio estis ankaŭ fieraj, almenaŭ ili devis esti fieraj.

Dum tiu kunveno la kolonia ĉefo esprimis la dankon al ni kaj direktis ankaŭ du alvokojn : unue, ke ni tiun akiron alte taksu, due, ke ni streĉiĝu havi la standardon konstante. "Se vi sukcesis unu fojon per viaj streĉoj akiri tiun venkon, vi kapablos viajn streĉojn daŭrigi kaj multobligi, se tion vi volos. Do, konservu la standardon, kiu vin glorigas, ĝis la finkonstruo de tiu ĉi fervojo."

Samkarakterata estis la parolado de Stepanoviĉ kaj li finis per frazoj : "Ĉie, kie mi laboris kiel politruko, mi ĉiam sukcesis akiri la standardon kaj la samo okazis ankaŭ nun, kompreneble, per via helpo. Do, helpu al mi plue en la sukcesa laboro por konservi la standardon por nia kolonio." - Karakteriza rezonado de la "politruko" : la standardon akiris li, ni la laboristoj al li nur helpis.

* * *

Proksimiĝis la sepa de novembro, la datreveno de la bolŝevika ŝtatrenverso en la revolucio de la jaro 1917. Ankaŭ en nia kolonio oni komencis preparojn al tiu festo. Dum kunveno oni menciis kaj decidis, kiu ricevos por tiu jaro la premiojn. Al la laboristoj sur la vojo venis fot-

isto de Bistrovko kaj fotis kelkajn "staĥanovanojn" laŭ la rekomendo de la laborgvidantoj. La fotoj estos poste por la surmuraj gazetoj. Stepanoviĉ sciigis al mi, ke mi preparu afiŝojn kun sloganaj tekstoj.

De kie akiri paperon por la afiŝoj ? La sola eblo estis la de cemento malplenigitaj papersakoj. Sed tiujn paperojn ĉiam forprenis la kontoristoj por la kontoraj bezonoj. Ĉiam, kiam oni devis elŝuti cementon el la sakoj, gardis ilin iu de la kontoro kaj ilin prenis. En la kontoro baldaŭ la glatajn paperojn oni pecigis laŭ bezona grandeco, sed la raspaj paperoj estis konservitaj kiel paperprovizo. Tiujn raspajn paperojn tiam ricevis Stepanoviĉ kaj li konsilis al mi glatigi ilin per gladilo, poste ilin kunglui por pli granda formato.

En nia kolonio posedis gladilon, varmigitan per ligna karbo, nur unu familio inter la laborgvidantoj. Tiu gladilo estis traktata kvazaŭ juvelo, tamen oni pruntedonis ĝin al la konatoj, al kelkaj edzinoj de niaj ĉefoj, loĝantaj en aparta baraketo je kelkcent metroj de la laboristaj barakoj.

Per la rekomendo de Stepanoviĉ estis al mi pruntedonita la gladilo kaj mi gladis la paperojn.

Por kunglui la paperojn necesis iom da faruna amelo. Por ricevi iom da faruno necesis skribita mendilo de la kontoro kun subskriboj, i.a. ankaŭ de la edukisto Babajev. Dum la skribado de la mendilo mi petis kvaronon da kilogramo. La edukisto opiniis, ke povas sufiĉi nur kvindek gramoj. Ke sufiĉos kvindek gramoj ankaŭ mi sciis, sed mi volis el la ricevota faruno kuiri iom da supo. Supo el ducent gramoj da faruno estis porcioj por kvin homoj.

Kiam la paperoj estis preparitaj, mi petis de Stepanoviĉ tekstojn. Dum semajno Stepanoviĉ tion prokrastis de tago al tago, promesante, ke tekstojn li donos al mi morgaŭ. Poste li prokrastis de matenoj ĝis vesperoj kaj de vesperoj al venontaj matenoj.

Kvankam mi en tiuj tagoj ne laboris, tamen Stepanoviĉ certigis al mi, ke mi ricevos salajron kvazaŭ mi plenumus cent procentojn de la relvojaj riparoj. Kvar tagojn antaŭ la sepa de novembro Stepanoviĉ diris al

mi, ke mi venu al li posttagmeze kaj mi ricevos tekstojn. Veninte al li posttagmeze mi trovis lin dormanta. Veki lin mi ne kuraĝis. Mi atendis ĝis li vekigis. Kiam li oscedis, li demandis min por kio mi venis. "Ĉu vi ne memoras, kamarado Stepanoviĉ, ke matene vi diris al mi, ke mi venu posttagmeze por la tekstoj?" "Ha, jes!" li respondis per artifika tono, celante sin prezenti grava persono, havanta multe da aferoj kaj ke li povas ion forgesi.

Stepanoviĉ botumis siajn piedojn kaj stariĝis flegme kun serioza mieno, per malrapidaj movoj li prenis papereton kaj krajonon. Iomete li ankoraŭ meditis kaj komencis skribi: "Estu salutata la XXVIIIa datreveno de la oktobra revolucio!".

"Preparu kelkajn afiŝojn kun tiu teksto kaj morgaŭ mi donos al vi pli da tekstoj." Kiam mi la venontan tagon montris la afiŝojn al Stepanoviĉ en la kontoro, unu el la ĉefoj rimarkigis, ke devas esti "grandega oktobra revolucio". - Jes, mi pensis, ĝi estis vere grandega, dudek ok jarojn post ĝia venko ne troviĝas eĉ adekvataj paperoj por afiŝigi tiun sloganon.

Du tagojn antaŭ la sepa de novembro klariĝis al mi kial Stepanoviĉ prokrastis doni al mi la tekstojn. La sloganoj, uzendaj por ĉiuj festoj, estas aperigitaj en la gazetoj kelkajn tagojn antaŭ la koncernaj festotagoj. Stepanoviĉ atendis la gazetojn kun la koncernaj sloganoj, nur unu tekston, la ĉiujare anoncitan, li riskis mem doni al mi. Por la vespero, la sesan de novembro, mi pendigis la grizpaperajn afiŝojn super la enirejoj al la barakoj. Dumnokte blovis forta vento. Matene la afiŝoj ruliĝis sur la tero de la vasta placo. Neniu ili interesis. Ĉefe estis, ke la "politruko" en siaj raportoj povis menciigi, kiom da afiŝoj li preparis kaj pendigis por la datrevenaj festotagoj de la "grandega oktobra revolucio".

* *
*

Kiam ni veturos hejmen? Tiu afero estis inter ni konstante diskutata. Ni demandis niajn reprezentantojn en APP, ni aŭdis diversajn onidirojn, sed neniu oficiala sciigo ekzistis. Iom post iom ni ekdubis en niaj esperoj, ke ni

iam forlasos Sovetunion. Jen ni trovis en la gazeto "Libera Polio" (eldonita de APP) komunikon pri la interkonsento de la pola kaj sovetunia registaroj por nia rehejmigo. En tiu interkonsento troviĝis aro da formalajoj, kiuj devos plenumi ĉiu, kiu deziros rehejmiĝon.

Dum pli preciza studo de tiu interkonsento oni povis konstati, ke teorie la rusoj havis multe da ebloj bremsi la rehejmiĝon de la plimulto. Ekzemple, ĉiu, kiu volis reveturi al Polio, devis peti ĉe la Supera Sovetunia Parlamento la eksigon de la sovetunia civitaneco. Tiu peto pravigis nur tiujn homojn, kiuj ĝis la deksepa de septembro 1939 estis polaj civitanoj. Do, kiamaniere doni pruvon pri la pola civitaneco, se ĉe la plimulto el ni NKVD forprenis la dokumentojn kaj pri ili nenian kvitancon donis? Kaj de tiu tempo ni tramigris malliberejojn, koncentreajn tendarojn kaj landojn. Due, kion iu povus fari, se la Supera Sovetunia Parlamento ne konsentus liberigi de la sovetunia civitaneco? Krome, ekzistis aro, kiu havis pasportojn kiel senŝtatanoj. Tiuj senŝtatanaj pasportoj estis donitaj al tiuj, kiuj hezitis akcepti la sovetunian civitanecon, kiam la sovetunia registaro interrompis la rilatojn kun la pola registaro en la jaro 1943, kiam estis trovitaj la mortigitaj polaj oficiroj en Katino. Do, kiel oni traktos la homojn kun tiaj pasportoj?... Senŝtataneco ja ne estas pola civitaneco.

En la praktiko, tamen, la sovetuniaj instancoj traktis tiun fojon la aferon ĝenerale humanece kaj favore por ĉiuj polaj civitanoj kaj ne faris al iu ajn malfacilaĵojn dum la formalaj aranĝoj por la rehejmigo.

* *
*

En oktobro venis ordono de la fervoja administrantaro en Bistrovko, ke la kolonio sendu dekelkajn homojn al grupo de tridek personoj, kiuj devos veturi al Altajlando por prepari tie lignon, en arbaro, kiu apartenas al la fervoja administracio "Turksib". Al tiuj grupoj kutime oni ne prenis la kirgizojn, ĉar survoje ili forlasus la grupon kaj veturus hejmen. La kolonia ĉefo elektis por tiu forsendo kelkajn polojn, kelkajn rus-

germanojn kaj unu ruson. Tiu selekto ne estis hazarda. Malgraŭ, ke la germanoj estis naskitaj en Rusio kaj multfoje deklaris sian favoron al Sovetunio kaj kontraŭ la naciisma Germanio, ili tamen estis de la rusoj traktataj kiel suspektaj homoj. La rusoj pli-malpli opiniis la samon pri la poloj, kvankam ne en la sama grado. Kaj la sola ruso, kiu devis kunveturi, ĉiam ĉion kritikis malkaŝe - kritikemulojn oni ĉiam preferas havi for de si.

Neniu el ni tiam havis la emon forveturi. Ni havis en tiu tempo sufiĉe da manĝaĵo en la kolonio kaj ni sciis, ke en aliaj lokoj ni devos malsati. Neniu emis veturi por la vintro al la malvarma Siberio, precipe ni, kiuj aranĝis en Kirgizio la formalaĵojn por la rehejmiĝo al Polio.

La germanoj, traktataj suspekto, nenion faris por ne veturi. La ruso provis en la kontoro fari ĉion eblan por resti en la kolonio, sed li nenian sukceson havis. Ni klopodis trovi helpon ĉe APP. Komence la komitato promesis al ni interveni ĉe niaj ĉefoj, sed vane. Post kelkaj monatoj ni eksciis, ke APP havis la formalajn eblojn postuli, ke ni restu en Kirgizio. Verŝajne ili ne kuraĝis havi konflikton kun la fervoja administracio en Bistrovko. Ni nur ricevis leteron de la Kirgizlanda APP-komitato, atestanta nian apartenon al la asocio kaj ke ni aranĝis la formalaĵojn por la rehejmiĝo. Ni kredis, ke dank'al tiu letero nin protektos niaj reprezentantoj en la Altajlando kaj ni pri tio ne eraris.

Estis por ni unu espero resti en Kirgizio : ni ne havis ŝuojn nek bonajn vestaĵojn por labori en la malvarma klimato de Altajlando. Ni sciis, ke la administrantaro en Bistrovko ne donos vestaĵojn al homoj, kiuj forveturas labori ien kaj la administrantaro ankaŭ neniajn vestaĵojn havis, eĉ se ĝi volus al ni tion doni.

La rusoj estas tamen specialistoj trovi ian provizoran solvon por si kaj lasi la klopodojn por aliaj. La administrantaro en Bistrovko akiris kelkajn parojn da malnovaj kaj detruitaj soldataj botoj kaj ilin riparis. Por tiu riparo ili havis belsonan nomon "renovigitaj". Tiuj "renovigitaj" botoj kostis cent kvindek rublojn, sed tiun monon ili prenis de la sumo, kiun ili devis doni al ni

kiel antaŭpagon por la laboro, kiun ni faros.

Antaŭ la forveturo al Siberio, ni kiel kutime restis en Bistrovko por kelkaj tagoj, ĝis estis aranĝitaj ĉiuj preparoj. Kune ni estis tridek homoj. Nia loĝloko estis sur la tera planko en evakuita barako, kie tamen restis fera forneto. En novembro komenciĝas en tiu loko la aŭtuno kaj pluvoj. Plejofte estas malvarme ankaŭ dumtage. Por hejti la barakon ni ŝtelis novajn relŝtipojn.

Al kelkaj alveturis iliaj amikinoj de la zonoj por la adiaŭaj amoroj. La geamikoj sciis, ke post la forveturo ili eble neniam renkontos unu la aliajn, la amantoj devos esti forgesitaj laŭ la praktika rezonado al kiu ili al kutimiĝis.

Fine oni sciigis nin, ke vespere ni forveturos al Frunze. Ĝenerale ni estis dum la tagoj en la urbeto, se ne pluvis. Vespere ni ĉiam estis en la barako. Sur la planko en diversaj lokoj kuŝis geoj kovrinte sin per la vataj jakoj. La soluloj estis okupitaj per siaj babiladoj. En la vespero antaŭ la forveturo neniu kuraĝis lumigi la solan elektran lampon en la mezo de la barako.

Proksime de la relvojo apud la barako estis antaŭ kelkaj semajnoj malŝarĝitaj kelkaj vagonoj da salo. Ĝi eĉ ne estis kovrita per io. La pluvoj certe malpliigis la kvanton de la salomonto, sed en sovetunia mastrumado tiaj aferoj apartenas al la bagatelaĵoj. La loĝantaro en Bistrovko estis kontenta provizi al si grandan kvanton da salo senpage. Vere, la salo estis kvazaŭ gardata, sed sufiĉis iom interparoli kun la gardisto enuanta dum la gardado kaj tiam li estis ne vidinta, se iu prenis kelkajn aŭ dekojn da kilogramoj da salo. Al kiu tiu salo apartenis nenium interesis kaj laŭ menso de la sovetuniaj homoj ĝi estis komuna propraĵo, difino en laŭvorta senco. Ni komprenis, ke dum nia kelktaga veturado ni certe venos al lokoj, kie salo estos multekosta produkto kaj ĉiu el ni volis kunhavi iom da salo. En la lastaj du horoj antaŭ la forveturo ni entreprenis provizi nin per salo en niaj saketoj kaj niaj siteletoj.

Kiam oni vokis nin prepariĝi por la envagoniĝo, la barako estis ankaŭ lumigita. Ankaŭ la amorantoj komencis rapide provizi salon. De la diversaj kuŝlokoj la li-oj stariĝis kaj forkuris de la barako kun siaj saketoj kaj

siteletoj. Ankaŭ la ŝi-oj stariĝis. Per okuloj esprimantaj iom da fiero, iom da ĉagreno kaj iom da sopiro, ili rigardis kvazaŭ senmovaj.

Krepuskiĝis sur la kajo, lumigita per malfortaj lampoj malproksimaj inter si. Ĉio aspektis filigrane, eĉ la alveninta, peze ronkanta trajno, en kiu ni okupis lokojn. Post duhora veturado, proksimume je la deka vespere, ni estis en Frunze. Por la nokto ni restis en la stacidomo. Kelkajn fojojn venis miliciistoj kontroli la pasportojn. Kelkajn junulojn inter dek-dek kvin jaroj ili forpelis el la stacidomo.

Por daŭrigi la vojaĝon de Frunze ni atendis tie du tagnoktojn. Kial? Neniu sciis. La sovetunia mastrumado ampleksas multe da formalajtoj, sekretoj, misterajtoj kaj kuriozaĵoj, eĉ kiam koncernas la veturon de tridek liberaj homoj ien al la laboro.

Matene ni laŭ la rusa kutimo gapadis la bazon. Vespere ni renkontis polajn rifuĝintojn loĝantajn en Frunze. Ili invitis nin al si por tranokti. Min kaj du miajn kolegojn invitis junulo por tranokti en la bakejo, kie li dumnokte estis gardisto.

Antaŭ ol iri al la tranoktejo, ni volis vespermanĝi en la moderna "ĉajŝana" de Frunze. Oni povis ĝin kompari al la luksaj kafejoj en la grandaj eŭropaj urboj. Ĝi estis malfermita nur vespere kaj gardata de du miliciistoj ĉe la pordo interne, por ke ne eniru pli da homoj ol troviĝis sidlokoj ĉe la tabloj.

Al la envenintoj estis servite porcio da rizo, preparita laŭ la kirgiza maniero nomita "plof", duono da plata panbulo kaj ujo kun teo. Tiuj manĝaĵoj kostis dek rublojn. Kompare al la laboristaj enspezoj tio estis tuttaga salaĵaro. Kvankam oni devus tion konsideri multekosta ĝuo, oni ne vendis pli ol unu porcion.

Por eniri ni devis atendi ekstere pli ol unu horon en vico. Tamen ne ĉiuj devis atendi. Dum la longa vico da homoj staris humile, venis du junuloj. Ili rekte iris al la pordo, frapis en ĝin vokinte per ordona tono "Malfermu!". La miliciistoj iomete malfermis la pordon por rigardi la frapinton. Unu el la junuloj elpoŝigis la ruĝkoloran partian membrokarton kaj ĝin montris. La miliciisto res-

pondis "Ne troviĝas libera loko, atendu iomete" kaj fermis la pordon.

Unu el la junuloj frapiĝis denove pli forte. Kiam la miliciisto elrigardis la duan fojon, la junulo elpoŝigis la ruĝan libreton kaj diris : "Ĉu vi vidas, kiu parolas al vi ? Ĉu vi volas, ke mi forigu vin de ĉi tie aŭ vi enlasos min ?". Humile la miliciisto malfermis larĝe la pordon kaj ambaŭ junuloj eniris. Kiel prava estis la frazo de George Orwell, du jarojn poste, en la libro "La besta farmo" : "Ĉiuj bestoj estas egalrajtaj, sed iuj bestoj estas pli egalrajtaj ol aliaj".

Post la manĝado ni renkontis la junulon de la bakejo kaj li gvidis nin al si por tranokti. Al ni li disponigis la knedtablojn kaj li memdormis interne en la forno, en kiu estis dumtage bakate. Ni ne komprenis, ke li povas en la forno spiri, sed li klarigis, ke li al tio alkutimiĝis kaj trovis ĝin bonega dormloko : estas varme. Li eĉ proponis al ni provi la dormejon en la forno, ni tamen ne volis riski. De li ni eksciis, ke kompare al niaj vivkondiĉoj ĉe la fervoja konstruado, la rifuĝintoj en Frunze vivas bone, iom ili laboras, iom ili ŝteladas en la laborejoj same kiel la rusoj kaj iom ili komercadas sur la bazaro. Ankaŭ la ceteraj kamaradoj trovis tranoktejojn en la hejmoj ĉe la rifuĝintoj. Malgraŭ ke ĉiuj loĝis kelkope en ĉiu ĉambro, iom da loko sur la plankoj ili havis kaj tion disponigis al tiuj, kiuj ne havis dormlokojn.

Post dutaga vagado en Frunze ni kolektiĝis en la stacidomo por daŭrigi la veturadon. Nia gvidanto konstatis, ke tri homoj malaperis. Li atendis ĝis la lastaj minutoj antaŭ la foriro de la trajno kaj telefonis de la stacidomo al la koncernaj aŭtoritatoj en Bistrovko pri la fuĝo de la tri homoj.

Post dutaga veturado ni malfruvespere forlasis la vagonon ĉe la stacio Ozierko, situanta sepdek kilometrojn de la urbo Novosibirsko. Ekstere hurlis ventego, ruliganta la falantan neĝon. En la stacidomo estis mal-lume. De tiu stacio ĝis la vilaĝo, kie devis esti nia hejmo, estis ok kilometroj. Matene ni iris al la bazaro sciigi kio atendas nin en tiu nova loko. Ni konstatis,

ke en Kirgizio estis kvazaŭ paradizo kompare al tiu regiono. Ĉiuj manĝaĵoj kostis kelkoble pli ol en Kirgizio. Nur terpomoj estis malmultekostaj kaj ili estis la ĉefa nutraĵo.

Post tagmezo la ventego ĉesis hurli. El la vilaĝo venis por ni sleda veturilo. Sur la veturilonni metis nur nian havaĵon kaj sekvis post ĝi piede tra la arb-araj vojetoj.

En la vilaĝo ni renkontis iamajn laborkamaradojn, kiuj estis senditaj de la fervojkonstruaj kolonioj al tiu loko antaŭ unu jaro. Kompare al niaj vivkondiĉoj en Kirgizio ili vivis en pli granda mizero, ankaŭ la ĉefo ilin konstante teruris.

La loĝejoj por ni estis en tiu vilaĝo aranĝitaj en normalaj dometoj, ne kiel en Kirgizio en barakoj. La kuŝejoj estis por ĉiuj apartaj, matracojn havis nur kelkaj. Ni, ĉiuj novvenintaj deksep homoj, estis lokitaj en unu sufiĉe granda ĉambro.

Vespere venis nin saluti nia nova ĉefo. Li ŝajnis kontenta, ke li ricevis nin. Ĝis nia alveno lia tuta laboristaro konsistis el dudeko da homoj kaj unu ĉevalo. En tiu laboristaro estis enkalkulitaj : la librotenisto, sekretario, komandanto, tri mastroj, mezuristo, iu, kiu zorgis pri la laborinstrumentoj, iu, kiu protektis la ĉevalon kaj laboris kun ĝi por veturigi hejtlignon kaj produktojn por la komuna kuirejo, unu purigistino kaj unu estis ŝuisto kaj frizisto. Por la laboro en la arb-aro li fakte havis ok aŭ naŭ homojn kaj ĉiam unu aŭ du malsanis. Per nia alveno lia laboristaro kelkobligis.

Pro kontento la nova mastro donis al ĉiu novveninto po unu pudon (16 kg) da terpomoj kaj diris : "Tio estas niaj siberiaj vinberoj". Li ankaŭ promesis doni feltbotojn al tiuj, kiuj tion ne havis.

La venontan tagon, kiu estis dimanĉe, nia ĉefo nin lasis ripozi. Lunde estis uragana vetero kaj la laboristoj restis hejme. Al la novvenintoj estis sciigite, ke ni nin anoncu en la kontoro al la ĉefo.

De la atendeja ĉambro li envokis al si ĉiun aparte kaj demandis, ĉu oni estas laborkapabla. Laŭ la ordono de la fervojaj instancoj oni devis al li sendi homojn

laborkapablajn. Nia ĉefo kontrolis, ĉu li ne estis trompita de siaj kolegoj en Bistrovko.

Dum la lastsomeraĵaj monatoj en Kirgizio ni havis sufiĉe da manĝaĵo kaj ni estis laborkapablaj. Sed por la vintra klimato en Siberio kelkaj el ni ne estis vestitaj laŭ la minimumaj necesoj eĉ en la sovetuniaj cirkonstancoj. Inter ili estis tri el Polio kaj la ruso. La kaŭzoj, ke ni estis sen konformaj vestoj, estis, ke ni en Bistrovko ĉiam estis traktataj malpli bone ol la kirgizoj kaj la rusoj. Tri el nia sesopo el Polio estis kontentige vestitaj, ĉar ili aĉetis por si vestaĵojn per specialaj enspezoj. Unu estis ŝuisto, li laboris en la ŝuriparejo kaj enspezis iom krom la oficialaj salajfoj. Unu estis nigramerkata komercisto. Unu estis en Polio ŝildpentristo kaj iom amatora artpentristo. En Bistrovko li estis nomita artpentristo kaj lia laboro estis nur pentri tekstojn de diversaj sloganoj. Li ofte veturis al la kolonioj por tiu "artpentrado". De la koloniaj ĉefoj kaj "politrukoj" li estis traktata iom pli favore kaj respektinde. En la kolonioj li ricevis manĝaĵon dum la restado kaj la ricevitaĵajn nutraĵkuponojn plejparte vendis "libermercate". Ankaŭ pri vestaĵoj li estis prizorgita : artpentristo ja devas esti reprezentanta persono. Pro iuj kaŭzoj li venis en konflikto kun unu el la "politrukoj" kaj pro tio estis de li forprenita la "privilegia" laboro.

Kiam mi eniris al la ĉefo, li demandis min : "Ĉu vi estas laborkapabla ?". Mi respondis, jes. "Do, vi iros morgaŭ al la laboro en la arbaro".

" - Kamarado ĉefo, mi ja ne estas vestita por labori en la arbaro en tiu klimato.

- Ja mi demandis vin, ĉu vi iros al la laboro en la arbaro.

- Mi iros al la laboro, se mi ricevos vestaĵojn.

- Vi ne parolu al mi pri vestaĵoj, sed respondu al mi, ĉu vi iros al la laboro."

Mia respondo kaj lia demando estis ripetitaj kelkajn fojojn. Simpla rifuzo, ke mi ne iros al la laboro sen klarigi la motivon, povus al mi kaŭzi gravajn ĉagrenojn. Fine mi diris : "En tiuj ĉifonoj mi ne iros al la laboro"

"Do vi al la laboro ne iros ?" "Ne", mi respondis.
Li notis tion kaj diris : "Vi ja povas foriri."

* *
*

Nenie en la mondo oni kunvenas tiom multe, kiom en Sovetunio. Oni povas aserti, ke simpla homo devas ĉeesti kunvenon ĉiun duan tagon. Tamen la plimulto de la kunvenoj koncernas la laboron. Por doni kelkajn ekzemplojn: Komence de ĉiu monato la homoj en ĉiuj laborejoj estas vokataj al kunvenoj. Tiam ili devas aŭdi la labortaskojn laŭ la plano por la koncerna monato. Poste okazas kunvenoj de la apartaj laborgrupoj pri la sama afero. La laborgvidantoj de la apartaj grupoj devas anonci kiom da procentoj ili promesas plenumi krom la fiksitaj plano aŭ je kiom ili promesas "superplenumi" la planon. La laboristoj ĉeestantaj en tiuj kunvenoj devas laŭte jesi, ke ili aprobas la promeson kaj taskon, kiun esprimis la laborgvidantoj. Ĉi lastaj ĝenerale promesas plenumi la labortaskojn je 120-160 procentoj.

Du-tri tagojn post tiuj kunvenoj, la laboristoj estas vokataj al kunvenoj nomataj "pri socialista vetado". Pli ĝuste estus nomi ilin "pri socialista konkurenco". Tiuj kunvenoj okazas jene : La ĉefoj kaj la "politrukoj" priparolas la labortaskojn por la monato. Poste priparolas la saman aferon la diversaj laborgvidantoj, ĉiu pri sia parto. Poste la apartaj grupoj vetas inter si pri atingo de la maksimuma rezulto.

Meze de la monato okazas kunvenoj por plifortigi la "labordisciplinon". Tiuj kunvenoj okazas ofte sub aliaj nomoj, sed ili rilatas al la sama afero. Dum tiuj kunvenoj la "politrukoj" kondutas rigide ; almenaŭ kiam la kunvenoj estas komencitaj. La "politrukoj" tiam mallaudas la laboristojn, ke ili lastatempe malatentis la labordisciplinon, okazis kelkaj rifuzoj de la laboro kaj ekzistas serioza danĝero, ke la plano por la monato ne estos plenumita kaj ĝuste nun plenumi la planon estas pli grave ol ĉiam antaŭe. Plejofte la "politrukoj" kunligas la gravecon por plenumi la planon al ia aktuala politika okazaĵo. Ĉar ĉiam ja io okazas en la politiko, ili ĉiam havas motivaĵon por tiu graveco.

Post la paroladoj de la "politrukoj" sekvas paroloj de la ĉefoj kaj de la laborgvidantoj laŭ la enhavo de tiuj de la "politrukoj". Se okazis intertempe ia incidento, eĉ malgrava, kun iu laboristo, ĝi estas dum tiuj kunvenoj priparolita kaj ĝia proporcio estas ridinde troigita. Tiuj kunvenoj tamen ĉiam finiĝas, ke la laboristoj akceptas "unanime" rezolucion por pli atenti la "labordisciplinon", senmaskigi la sabotistojn, kontraŭbatali la laborrifuzantojn kaj fari ĉion eblan, ke la plano estu plenumita.

La laboristaj kunvenoj pri gravaj politikaj okazaĵoj ĝenerale ne daŭras longe. La "politrukoj" priparolas la aferon dum kelkaj minutoj, ili laŭtlegas rezoluciojn, kiuj estas akceptataj. Kunvenoj pri proksimiĝantaj festotagoj sekvas unu la alian.

Fine de la monatoj okazas la raportkunvenoj. La ĉefoj raportas pri la plenumita plano ĝenerale kaj por ĉiuj grupoj aparte. Ili raportas pri la premisoj de la planoj dum la "vetkunvenoj" (kiujn neniu traktis serioze) kaj raportas pri la realigo de la plano. En tiuj paroladoj ili citas nombrojn pri la laborunuoj, nombrojn prikalkulitajn laŭ nomo, nombrojn prikalkulitajn je procentoj kaj simile. La finrezulto estas ĉiam, ke la planoj estis plenumitaj je 110-130 procentoj. Kiam ni venis al Sovetunio, ni traktis tiujn kunvenojn serioze kaj estis por ni strange, ke la rusoj estas al tiuj kunvenoj indiferentaj.

Nia ĉefo en la vilaĝo estis tre severa pri okazigo de la kunvenoj. La kunvenojn li anoncis dumtage kaj sciigis pri ili pere de la laborgvidistoj - la tri mastroj. Antaŭ ol ni iris de la laboro hejmen, la mastroj ankoraŭ unu fojon memorigis pri la kunvenoj. Sed nia ĉefo havis sufiĉe da sperto por scii, ke tiuj sciigoj ne sufiĉas por venigi la homojn al kunvenoj.

Vespere la tri mastroj kuradis tra la vilaĝo de domo al domo, de ĉambro al ĉambro, kie loĝis nur laboristoj, por voki ilin al la kunvenoj. La mastroj venis tiom da fojoj, ĝis ili nenion renkontis hejme.

Antaŭ ol komenci la kunvenojn la ĉefo kontrolis laŭ listo, ĉu ĉiuj ĉeestas. Post la kunvenoj li kontrolis

laŭ la sama listo, ĉu ĉiuj restis ĝis la fino. Ĉu nia ĉefo fervora en arango de la kunvenoj estis pli sindonema ol aliaj partianoj, aŭ ĉu li la kunvenojn atentis severe, ĉar en la malluma vilaĝo li ne havis ion alian por fari ? Mi ne scias, - supozeble estis la dua kaŭzo.

Kvankam mi kaj kelkaj aliaj diris al la ĉefo dum la kontrolado, ke ni ne iros al la laboro, se ni ne ricevos pli varmajn vestojn, li tamen trovis rimedojn por devigi nin al laboro. Ĉiumatene venis al nia ĉambro unu el la mastroj, kiu loĝis en la sama domo kaj klerigis nin, ke ni devas iri al la laboro. Apenaŭ foriris li, venis lia kolego, alia mastro, kaj komencis saman parolon, kiun finis lia kolego antaŭ kelkaj minutoj. Apenaŭ foriris la dua, sekvis la tria mastro kaj ĉion ripetis denove. Tio okazis ĉiutage dum la tuta semajno. Poste ni estis vokitaj al la kunveno pri "labordisciplino".

Dum tiu kunveno la atakoj de la ĉefo estis direktitaj kontraŭ ni. En mia memoro estas kelkaj karakterizaj frazoj : "Vi diras, ke vi havas iom detruitajn vestaĵojn kaj pro tio vi sentas la malvarmon, sed tio nur pruvas, ke vi neglektas la laboron. Se vi havas iom detruitajn vestaĵojn, vi povas ilin ripari. Homo, kiu fakte volas labori, ĉiam trovos solvon pri la vestaĵoj. Li metos unu flikon sur la duan flikon kaj sur la du flikojn ankoraŭ unu flikon. Sed vi ne volas labori kaj homo, kiu ne volas labori, ĉiam trovos ian kvazaŭan motivon por sia malnobleco." Ĉiu direktis la rigardon al ni.

Inter ni estis iu babilemulo, Dafner. La babilemo kaŭzis al li en la pasinteco diversajn malagrablojaĵojn, sed babilema li restis. Kiam neniu el ni respondis al la atakoj de la ĉefo, Dafner provis konvinki la ĉefon, ke pravas ni kaj ne li. Precipe li volis konvinki la ĉefon, ke la kulpon pri ni havas la respondecaj instancoj en Bistrovko, ĉar ili ne agis laŭ la ordono por vesti nin laŭ necese en tia klimato.

Per la babilemo de Dafner la ĉefo atingis, kion li volis - konversaciigi iun el ni. Iom post iom li komencis trakti Dafner kiel nian reprezentanton, kvankam Dafner al tio absolute ne celis. Fine la ĉefo akiris "konsenton"

kun Dafner per diversaj minacoj kaj persvadoj, ke ni iros al la arbaro nur bruligi la forhakitajn branĉojn kaj ni fakte varmigis nin ĉe la fajrujo. Ni venis en situacio, ke ni devis la proponon de la ĉefo akcepti, ĉar Dafner la proponon kvazaŭ akceptis.

Ni komencis iri al la arbaro. Ni pli frostis survoje ol dum la laboro. Sed ni okazigis la iradon al la laboro en du etapoj. Survoje estis butikoj, kie oni povis aĉeti panon por la kuponoj. En la butikoj ni ĉiam haltis por iom da tempo. De la butikoj al la arbaro estis ĉ. unu kilometro. En la arbaro ni, laŭ la kutimo, unue aranĝis fajrujon, sidiĝis ĉirkaŭ ĝi kaj babiladis. Ni ankaŭ iom laboris, faligis arbojn, ilin senbranĉigis, bruligis la branĉojn, kuntiradis la ŝtupojn permane helpe de dikaj ŝnuroj al unu loko, kie ni ilin ŝarĝis sur fortajn sledojn tiratajn per traktoroj al fervojaj ŝarĝvagonoj.

En la lasta semajno de januaro estas la datreveno de Lenin. En tiuj tagoj okazas en Sovetunio kunvenoj dediĉitaj al la memoro de Lenin. Meze de januaro, nia ĉefo komencis aranĝi tiujn kunvenojn, preskaŭ ĉiuvespere. Ni apenaŭ iom ripozis post la laboro, ekvenis la tri mastroj, unu post la alia, voki al la kunvenoj. Nia ĉefo ne estis sperta preleganto pri politikaj aŭ aliaj temoj. Li povis nur agiti, ke oni devas labori. Anstataŭ prelegi, li laŭtleĝis artikolojn el gazetoj. Tiumaniera "klerigado" estas en Sovetunio populara kaj ĝi estas nomata "prilabori la artikolon".

Pri la dato de la festkunveno la ĉefo sciigis ĉiuvespere. Li aktivigis la artpentriston. En la kontoro kaj en la komuna manĝejo estis pendigitaj afiŝoj de la envilaĝa produkto. En la vespero de la festkunveno venis al nia ĉambro unu post la alia la komitatanoj, kiuj aranĝis la kunvenon, memorigi al ni, ke tiu vespera kunveno estos "por ni speciale tre interesa".

Por la festkunveno kolektiĝis fakte pli da homoj ol al la konstantaj kunvenoj. Ĉu la homoj venis pro la promesita programo aŭ por honoro la memoron de Lenin, mi ne scias.

La kunvenon malfermis kaj prezidis la kuracisto en

la nomo de kelkaj asocioj, pri kies ekzistado neniam en la vilaĝo estis konate. La prelego de nia ĉefo daŭris apenaŭ dekkvin minutojn ; ĝi estis je nivelo de lernolibro por infanoj en la unuaj klasoj. Dum tiu ne tro longa "festparolado" li legis el libro leteron, kiun skribis vilaĝanoj al la caro, petinte lian kompaton, ĉar ili estas terure traktataj de la oficistoj kaj de la ĝendarmoj, kaj interparolon de Lenin kun gardisto en la malliberejo. La fina parto de la "prelego" estis : "Ĉio, al kio Lenin strebis kaj por kio li batalis, estas nun realigita de Stalin, la plej kapabla homo inter la kunlaborintoj de Lenin".

Post la prelego kelkaj knabinoj de la lernejo kantis kaj deklamis.

Post proksimume dusemajna laboro en la arbaro ni estis ĉiutage tro lacigitaj por daŭrigi. Ni ĉesis iri al la laboro. Nia ĉefo verŝajne havis tiam aliajn pli gravajn okupojn kaj lasis nin iom trankvilaj. Ankaŭ la gazetlegadon dum la vesperaj kunvenoj li komisiis al la reprezentanto de la profesia sindikato. Plejofte tiu "sindikata reprezentanto" havis klopodojn kun ni "okcidentanoj", kiujn ne estis eble eduki al la sovetunia nivelo.

Praktike tia interveno okazis jene : Ni estis vokitaj al la kontoro. Tie la ĉefo demandis : "Kial vi ne laboris en tiu kaj tiu tago ?". Ni respondis, ke estis tre malvarme. La ĉefo sin direktis al la "proforgo" (sindikatorganizanto) per demando : "Kion vi faras, ke mi povu plenumi la planon ? Se mi ne plenumos la planon, tio estos nur via kulpo. Mi raportos al la prokuroro ne nur pri ili, sed ankaŭ pri vi".

La sindikata reprezentanto ŝajnis iom ĉagrenita. La minaco pri la prokuroro li ne taksis serioze, sed li tamen estis en situacio, kiam oni ne scias kion diri. Anime li simpatiis kun ni. Li sciis, ke en tiu okazo ni ja pravis. Kontraŭdiri la ĉefon, kiam koncernas laborrifuzon, li ne povis, almenaŭ li povis tion fari en nia ĉeestado. Li ankaŭ ne havis la sperton kaj la impertinenton de la ekzercitaj "politrukoj".

La "proforgo" sin direktis al ni : "Kamaradoj, vi ja povas mem kompreni, ke la ĉefo pravas. Li havas la respond-

econ plenumi la planon, kaj se vi ne laboros, li ja la planon plenumi ne povos, kaj li estos devigita raporti pri via laborrifuzo al la prokuroro. Ankaŭ mi konsilas al vi iri al la laboro. La ĉefo faros ĉion eblan por havigi al vi vestaĵojn, sed antaŭe vi devas prezenti vian bonan volon, ke vi estas laboremaj".

Post kelkaj tiaj "konferencoj" la ĉefo provis trovi ian pacan interkonsenton. Li proponis pruntedoni al ni po kelkcent rublojn kaj ke ni veturu al Barnaulo aĉeti por ni vatojakojn kaj vatajn pantalonojn. Ni konsentis. Ni komprenis, ke tiu propono estis nur babilajo, la ĉefo volis per tiu interkonsento trovi honoran finon en la "konflikto".

Mi volis la tutan blufon lasi al la ĉefo kaj proponis, ke ne necesas, ke ni ĉiuj veturu al Barnaulo, tio estus ankaŭ malnecesa elspezo. Pli bone estos, se la ĉefo sendos la komandanton al Barnaulo kaj tiu aĉetos la vestaĵojn por ĉiuj. La ĉefo tiun proponon akceptis. Verŝajne li volis ankaŭ ŝajnigi la seriozecon de la interparolo, almenaŭ dum la kunveno. Li demandis la apudsidantan sekretarion, ĉu troviĝas en la kaso la necesa monsumo, ĉirkaŭ mil rubloj. La sekretario pri tio ne sciis. "Do alvoku la libroteniston".

La librotenisto estis koreano. Lia nomo konsistis el kelkaj silaboj, inter kiuj unu estis Li. Por mallongigi kaj simpligi lian nomon lin oni nomis nur Li. Kiam kaj kial li venis al Sovetunio oni rakontis diversajn historietojn. Li mem pri si nenion rakontis. Inter ni Li kondutis tiel, ke ni rimarku lian malkontenton al la sovetunia mastrumado.

Kiam Li venis, la ĉefo klarigis al li la aferon. La unua respondo de Li estis: "Ili ja devas resti ĉi tie nur ankoraŭ tri semajnojn laŭ la ordono, kiun ili kunportis." De la ĉeestantoj aŭdiĝis laŭtaj ekridoj. La ĉefo ŝajnis serioza, precipe volis li seriozigi la kunvenintojn. "Kiu diris al vi, ke ili restos nur ankoraŭ tri semajnojn? Krome, ankaŭ dum la tri semajnoj ili devos labori".

"Sed en la kaso ni havas nur kvindekkelkajn rublojn, tio ja ne sufiĉos por vestaĵoj". La kunvenintoj ekridis pli laŭte. Ankaŭ ĉe la ĉefo la rigideco malstreĉiĝis.

"Do tiel statas la afero...Nu, ni povas pruntepreni ĉe iu mil rublojn, eble la komandanto, - mi kredas, ke li havas monon kaj li tian sumon pruntedonos al ni."

Tiu afero havis alian finon. Al Ozierko estis alveturigita brando. La ĉefo kaj la komandanto pro "soifeco" veturis al Ozierko sabate antaŭvespere per la ĉaro. Kio okazis kun ili tie dumnokte, ni en la vilaĝo ne eksciis. Dimanĉe matene rakontis al ni la ĉevalgardisto, ke dumnokte la ĉevalo venis mem hejmen al sia stalo. Ĉirkaŭ tagmezo venis en la vilaĝo la komandanto kun bandaĝita kapo. La ĉefo ne estis videbla ĝis merkredo kaj ankaŭ lia kapo estis bandaĝita. Laŭ rakontoj aŭ supozoj ili falis teren de la ĉareto. Ilia tria kunestaĵo, la ĉevalo, kvankam sobra, al ili neniel povis helpi kaj daŭrigis sian vojon hejmen sen la mastroj. Meze de la semajno venis al ni la komandanto pri iu afero. "Nu, kiel statas la afero pri la aĉeto de vestaĵoj por ni?" ni demandis. "Ho! ĉu vi ne scias? Ni ja fordrinkis la monon", li respondis bonhumore.

* *
*

En marto 1946 en la tuta Sovetunio devis okazi balotoj. Nia ĉefo apartenis al la plej altaj mastroj en la vilaĝo. Li komencis "dekoracii" la vilaĝon per sloganoj pri la balotoj, same kiel oni faras en la grandaj urboj. La artpentristo ricevis de li multe da taskoj. Dum preskaŭ du semajnoj la artpentristo preparis sloganojn, kiuj poste estis pendigitaj en diversaj lokoj en la vilaĝo. En la plano estis ankaŭ konstrui "triumfpordegon" dekoraciitan per diversaj sloganoj. Okazis multaj kunvenoj pri la balotoj.

Post la kunvenetoj ni estis vokitaj al la granda ĉefa kunveno por decidi pri la kandidatoj. En tiu vespero la vokintoj en nia ĉambro sekvis unu la alian ĝis nia foriro.

En la klubo, tre bone lumigita por la cirkonstancoj en la vilaĝo, ni jam renkontis multe da homoj. La prezidento de la kunveno, malferminte la kunvenon, deklaris en mallonga parolado, ke ja ne necesas multe paroli pri la grava tasko de tiuj balotoj, ĉar la plimulto de la ĉe-

tantoj voĉdonis multajn fojojn antaŭe kaj sufiĉe bone scias de la pasintaj balotoj, pri kio koncernas la afero.

"Nia tasko dum la hodiaŭa kunveno estas decidi pri la kandidatoj, kiujn prezentos kamarado Morozov."

Stariĝis forta viro, kiu ekprezentis la kandidatojn : "Nia unua kandidato por la Supera Parlamento estas kamarado Stalin. Lia kompleta nomo estas : Josif Visarionoviĉ Ĝugaŝvili. Li loĝas en Moskvo. Li estas membro en la komunista partio, tio signifas en la registara partio kaj li estas ĝenerala sekretario de la partio. Li estas membro en la centra komitato de la partio kaj membro en la Politika Buroo de la partio. Li estas membro en la sovetunia registaro kaj ministro-prezidanto de la registaro. Li estas ĉefkomandanto de la sovetunia armeo kaj havas la rangon de generalisimo, tio estas la plej alta rango en nia armeo. Kiu estas por akcepti kamaradon Stalin nian unuan kandidato al la Supera Parlamento, levu la manon."

Ĉiuj levis la manon.

"Kiu kontraŭas akcepti kamaradon Stalin kiel nian unuan kandidaton por la Supera Parlamento, levu la manon".

Neniu levis la manon.

"Kiu sin detenis voĉdoni, ke kamarado Stalin estu nia kandidato al la Supera Parlamento, levu la manon."

Neniu levis la manon.

"Do mi deklaras, ke nia kunveno la... en... unuanime akceptis kamaradon Stalin kiel nian unuan kandidaton al la Supera Parlamento."

"Nia dua kandidato al la Supera Parlamento estas kamarado Molotov. Lia kompleta nomo estas : Viaĉeslav Miĥajloviĉ Skrjabin. Li loĝas en Moskvo. Li estas membro en la komunista partio, tio signifas en la registara partio. Li estas membro en la centra komitato de la komunista partio kaj membro en la Politika Buroo de la partio. Li estas membro en la registaro kiel ministro por eksterlandaj aferoj. Kiu estas por akcepti kamaradon Molotov kiel nian duan kandidaton al la Supera Parlamento, levu la manon."

Okazis la sama ceremonia voĉdonado kiel por Stalin kaj kamarado Molotov estis unuanime akceptita kiel la

dua kandidato al la Supera Parlamento. Poste estis unu-
anime akceptitaj la ceteraj kandidatoj por la landa par-
lamento, kiujn proponis kamarado Morozov. Al ni, kiuj
petis eksigon de la sovetunia ŝtataneco, estis sciigite
post kelkaj tagoj, ke ni ne havas la rajton voĉdoni en
tiuj balotoj. Tiu sciigo estis por ni optimisma signalo,
ke ni fakte forlasos Sovetunion.

La portempa celo de nia seso estis reveturi al Kirgi-
zio, kie la klimato estas milda kaj kie ni havos sufiĉe
da manĝaĵo. Niaj klopodoj por reveturi al Kirgizio devis
esti nekonataj al nia ĉefo. En lando, kie la vivcirkons-
tancoj estas normalaj, tia reveturo estas simpla afero :
oni aĉetas trajnbiletan kaj veturas. En Sovetunio en la
jaro 1946 necesis havi por la veturado de Okcidenta Sibe-
ria al Kirgizio oficialan dokumenton de iu organizaĵo,
por kia celo oni volas veturi, alie ne eblis ricevi bile-
ton por la trajno. Krome, ne estis permesite forlasi la
laborlokon, se la ĉefo ne volis liberigi de la laboro.
Plie, ni estis kvazaŭ soldatoj, mobilizitaj por la laboro.

Feliĉe por ni, necesis aranĝi ankoraŭ formalizaĵojn por
la reveturo al Polio, en la loko kie oni petis la eksigon
de la sovetunia civitaneco. Dank'al tiuj necesaj formal-
aĵoj, ni sukcesis helpe de APP reveni al Kirgizio.

En Kirgizio APP jam preparis la t.n. "repatriigon" de
la polaj civitanoj. Niaj dokumentoj por forlasi Sovet-
union konsistis el folio kun duono en la rusa lingvo,
duono en la pola lingvo.

Fine ni komencis la veturadon en specialaj trajnoj,
vere ŝarĝvagonoj, sed ni sentis nin feliĉaj.

* *
* *

Post unumonata veturado de Kirgizio nia trajno atingis
Breston, kiu estas la limurbo inter Sovetunio kaj Polio.
Dum nokto en la fino de majo venis en la vagonon sovet-
unia pasportkontrolanto. Li forprenis de la dokumentoj la
parton en la rusa lingvo kaj deziris al ni feliĉan voja-
ĝon.

"Ĉu tio estas ĉiuj formalizaĵoj ?" ni demandis.

"Jes, tio estas ĉiuj formalizaĵoj. Kion vi deziras plu ?"

"Kamaradoj ! Mi havas la impreson, ke ni veturas el Rusio

al Rusio", diris Ŝerce iu en la vagono. Ĝis certa grado tiu diraĵo estis trafa, tamen estis granda diferenco inter unu Rusio kaj la dua Rusio. Iom post iom tiu diferenco malpliĝis, sed en la jaro 1946 la diferenco estis vere granda.

fino
